

Ribelo de la pendumitoj

B.Traven



Mahagonciklo romano 5

Aŭtoro	B.Traven
Titolo	Ribelo de la pendumitoj
Tradukis	Dorothea & Hans-Georg Kaiser (Donjo & Cezar) laŭ la unua eldono de la romano „Rebellion der Gehenkten” de librogildo Gutenberg en Zuriko, Vieno kaj Prago el la jaro 1936
Lingve	
kontrolis	Vladimir Türk
Aranĝis	Frank Vohla Hans-Georg Kaiser
Finredakto	je la 14-a de oktobro en la jaro 2016

Ĉapitro 01

01

Proksime al la loko Chalchihuistan, en setlejo de malgrandaj, sendependaj kamparanoj, kiu havis la nomon Cuishin, vivis sur sia eta ranĉo la cocil-indiĝeno Candido Castro kun sia edzino Marcelina de las Casas kaj siaj du filoj Anĝelino kaj Pedrito. La malgranda korto, kiun mastrumis Candido, havis ĉirkaŭ du kaj duonon da hektaroj kiel terposedon, kiuj estis sekaj kaj ŝtonecaj kaj kultivendis kun multe da peno kaj diligento, por ke ili nutru la familion.

Grandaj kortoposedantoj, bienuloj de la distriktoj Jovel kaj Chiilum ofte per logaj ofertoj provis instigi Candidon setli kun la tuta familio sur unu el la bienoj kaj rezigni pri la magra kaj aĉigita *ranchito*, kiu laŭ ili estis senutila posedo.

La bienuloj, ĉiam serĉante novajn familiojn, kiuj estas malhaveblaj sur bienoj, ne estis ĉiam tre elektemaj pri la uzataj rimedoj por logi indiĝenajn familiojn el

sendependaj vilaĝoj kaj setlejoj. Ne malofte okazis, ke kvereladis bienuloj pri la posedo de tiaj familioj, kvazaŭ ili estus brulmarkitaj bovidoj, pri kiuj ĉiu bienulo de la regiono supozis havi rajtigitan pretendon. Tiuj kvereladoj pri la posedo de la sendependaj indiĝenaj familioj kun multaj infanoj estis ofte la kaŭzo de longtempaj malamikecoj inter bienuloj, jen malamikecoj heredigitaj dum kelkaj generacioj de la patroj al la filoj, ili ekzistis plu eĉ tiukaze, se la indiĝenaj familioj en la longa intertempo jam elmortis sekve de kvereloj en la parencaro aŭ neniĝis en la tribo aŭ formigris kaj neniuj homoj povis plu memori pri tio, kial la malnovaj familioj de najbaraj bienuloj vivis en mortiga reciproka malamikeco.

La *Jefes Politicos*, la politikaj ĉefoj kaj reprezentantoj de la diktatoro en la distriktoj, tiel, kiel ĉiuj aliaj instancoj estis ĉiam flanke de la potencaj kaj riĉaj bienuloj.

Kompreneble. Se al la instancoj sukcesis senposedigi sendependan indiĝenan familion, ĉu per deklaro pri la senvalideco de ties posedorajtoj, ĉu per rimedo, kiu en ĉiu rilato estis la sama kiel krimo, oni transdonis la

senrajtigitan familion al la bienulo kiel posedon. La bienulo transprenis la ŝuldojn de tiu familio kaj pagis la altajn monpunojn, kiujn oni ŝarĝis al unu aŭ pluraj membroj de la familio por iuj krimoj, kiujn ili aŭ vere entreprenis aŭ por krimoj, pri kiuj oni kulpigis ilin senjuste. Monpunojn, kiujn oni ŝarĝis pro neniu alia celo krom enŝuldigi la familion tiom, ke bienulo, kiu deklaris sin preta transpreni la ŝuldojn, povis akiri la familion kiel servutulojn por sia bieno. Ju pli proksime bienulo estis en parenca rilato al *Jefe Politico*, ju pli bone li rilatis amikece kun li kaj ju pli bonvoleme li montriĝis kontribui al tio, ke la *Jefe Politico* aŭ alia subĉefo de la diktaturo povu vivi oportunan kaj bonfartan vivon, des malpli la bieno devis suferi pri la manko je indiĝenaj laboristaj familioj.

Per denaska kamparana prudenteco, per sobreco kaj per tio, ke li zorgis pri nenio alia krom pri sia laboro, li sukcesis pri sia agro kaj pri la bonfarto de sia familio. Tial Candido kapablis konservi sian sendependecon kiel libera *campesino*.

La indiĝena setlejo, *rancheria*, konsistis nur el kvin familioj, ĉiuj apartenantaj al la Cocil-nacio. Kvankam la

lando de la ceteraj familioj estis eĉ ne je joto pli bona ol tiu de Candido Castro, kvankam ĉiuj vivis en tre mizeraj palmkabanoj nur ŝpareme priĵetitaj per argilo, kaj kvankam ili vivis tiel simple, praorigine kaj mizere kiel kapablas tion sur la kontinento Ameriko nur indiĝenaj etkamparanoj, ĝi ne nur ne sukcesis logi Candidon al bieno kiel peonon, sed ankaŭ neniun el la aliaj familioj. Sciis ĉiu viro de la setlejo, ke la vivo de la peonoj sur la bienoj en multaj rilatoj estas pli facila, pli sekura kaj pli fidinda ol tiu sur tiu magra, arda, seka, ŝtoneca tero. Kun bona rajto la setlejo nomiĝis Cuishin, Varmego. Sed ĉiuj ĉi familioj preferis vivi povre, eterne minacataj de perditaj rikoltoj ol meti sin sub regadon kaj komandon, eĉ se la komandopovo asignus al ili la ĝardenon de Edeno kiel anstataŭaĵon por la perdita sendependeco kaj la libero rajti paroli tion, kion ili volas. Ili prefere malsatadis en sendependeco kaj libero ol flate reagi je la komandoj de regento. Se oni demandus ilin, kial ili preferas tiun vivon al tiu de peono, ili eble donus saman aŭ similan respondon, kiel sciigis ĝin pramaljuna negrino en Luiziano. En sia juneco antaŭ la intercivitana milito ŝi estis ankoraŭ sklavino. Ĉiujn zorgojn pri ŝia bonfarto

havis tiam ŝia mastro kaj majstro; ŝi laboris kiel servoknabino en la domo de siaj mastroj kaj rajtis manĝi de ĉio, kion ofertis la kuirejo. Poste ŝi vivis en kunrompiĝema kabano, lavis la tolaĵon por la najbaroj kaj sciis neniam, ĉu ŝi havos ion por manĝi je la sekva tago sen devi ŝteli kaj tial enprizoniĝi. Oni demandis ŝin iutage: „Aŭskultu, onklineto, ĉu vi multe pli bone fartis, kiam vi ankoraŭ estis sklavino?“

„*Jassuh*“, ŝi respondis, „tiam mi certe statis multe pli bone, sed nun mi estas multe pli feliĉa; sciu, Siro, estas la sento kaj ne la stomako, kiu feliĉigas homon.“

Kaj certe parolis ankaŭ ĉi tie en Cuishin en ĉiuj familoj pli la sento ol la stomako. Alie oni ne povus klarigi al si, kial la homoj eltenis vivi tiel povre kaj tiel pene, anstataŭ ŝarĝi ĉiujn zorgojn sur bienulon por la rekompenco fari tion, kio plaĉas komandi al la bienulo.

Rimarkoj

campesino = kamparano

Jefe Politico = la politika ĉefo de distrikto

ranchito = malgranda ranĉo, malgranda bieno

Yassuh = Jes, Siro

La indiĝeno, en la profundo de sia animo, kredas pli pri la potenco de la sorto ol pri la potenco de iu dio aŭ mastro. Sian destinon li ne povas eskapi, kion ajn li faras. Se li sentas proksimiĝi sian sorton, li batalas same kiel ĉiuj homaj estaĵoj pro biologia memkonservada instinkto kontraŭ la sorto kun ĉiuj armiloj kaj rimedoj, kiuj estas je dispono aŭ pri kiuj li pensas, ke ili povus esti avantaĝaj por li, ĉu tiel aŭ ĉu tiel, inklude la propetojn al sanktulo, kiu havas kun la kara Dio telefonan interrilaton.

Sed li sentas, ke li troviĝas jam sur perdita tereno, kaj ke li kontraŭas la sorton nur, por prokrasti ties efikon.

Kiam Marcelina, la edzino de Candido, neatendite tre malsaniĝis kaj neniu el la rimedoj, kiuj estis uzataj en la familioj, havigis al ŝi mildigon, sciis Candido pro instinkto, ke li atingis decidan turnopunkton en sia vivo.

Marcelina havis neelteneblajn dolorojn je la dekstra flanko de sia abdomeno. Ŝi asertis, ke ŝi povas povi senti, kiel ŝia korpo interne ŝvelas kaj, ke ĝi certe krevos. La

maljuna *partera* de la familioj, la akuŝistino, diris, ke la intestoj interplektiĝis kaj nodiĝis kaj ke necesas malnodi ilin. Ŝi subtenis la malnodadon per fortaj laksigiloj, kiuj taŭgus por elefantoj kun konstipo. Sed Marcelina ĝemis kaj ĝemegis nur des pli kaj asertis, ke la intestoj estas ŝirataj tien kaj tien kaj tuj disŝiriĝos. La *partera* diris al ŝi kaj al Candido, ke ŝi estas certa, ke tio estas la unuaj veigaj mortosignoj, kaj ke nun estas jam tempo sendi knabon al *don* Mateo kaj diri al li, ke li kunprenu certan *caja*, keston el Jovelto, por povi entombigi Marcelinan je pia kristana maniero.

Pri tiu decido Candido ne estis kontenta. Li amis sian edzinon kaj eĉ ne pensis pri tio tiel facile rezigni pri ŝi. Li decidis ŝarĝi Marcelinan sur mulon kaj transporti ŝin al Jovel al ĝusta doktoro, kiu lernis la fakon.

La tutan monon, kiun li havis en sia kabano, li kungratis, kaj kiam li nombris ĝin, li konstatis, ke estas entute dekok pesoj. Ke la kuracistoj same faras ion por nenio tiel, kiel la ekleziaj sinjoroj, tion li sciis; kaj ke tiu malsano estas de speco, kiu per la kutima peso ne kontentigus la kuraciston, tion li sciis aldone.

Ĉiu paŝo, kiun faris la mulo, kaŭzis tiom da penoj al la sinjorino kaj ekplorĝemetigis ŝin tiom, ke Candido, tuj kiam la vojo fariĝis aĉa kaj plena de malglataĵoj, prenis sian edzinon sur la dorson kaj kondukis la mulon per ŝnuro. Sed tio estis eĉ malpli bonfartiga por la edzino, ĉar nun premiĝis la doloranta abdomeno kun la tuta pezo de ŝia korpo kontraŭ la dorson de ŝia edzo. Per tio ŝiaj turmentoj grandiĝis tiel konsiderinde, ke ŝi petis sian edzon, ke li tamen residigu ŝin sur la mulon, kie ŝi sentis malpli da doloro. Sed lastfine la edzino nek plu kapablis sidi sur la mulo, nek entute moviĝi.

Ŝi tre petis sian edzon, ke li metu ŝin sur la vojrandon kaj lasu morti ŝin en paco; ke ŝi sentas, ke ŝi proksimiĝas sian morton kaj ne povas eskapi ĝin.

Kiam ambaŭ tie jam ripozis ĉirkaŭ duonon de horo, la edzino sterninta sin surtere kaj la edzo malespere kaŭranta kaj de tempo al tempo portanta akvon al ŝi de malklara varmete fluetanta rojo, kiun sorbis la vojo je la kontraŭa flanko, proksimiĝis grupo de indiĝenaj familioj, kiuj en Jovel vizitis la foirplacon kaj nun troviĝis sur la vojo reen en sian vilaĝon. Ili apartenis al la sama tribo kaj

al la sama paroĥo, do al la preĝeja komunumo, al kiu oni aligis ankaŭ la setlejon.

Ĉiuj sidiĝis por ripozo apud la roĵo por trinki tie.

„Kien vi iros, Candido?“ demandis iu el la viroj. La foiro jam delonge finiĝis.“

„Marcelina estas tiel malsana je la abdomeno, ke ŝi certe baldaŭ mortos. Mi volis transporti ŝin al kuracisto al Jovel, kiu eble kapablas malnodi ŝiajn intestojn, kiuj ĉiuj kunplektiĝis. Sed mi ne povas porti ŝin sur mia dorso, ĉar ŝi tiukaze krias, kaj sur la *bestia* ŝi same ne plu povas sidi, tiom da doloroj ŝi havas en la abdomeno. Ŝi estas jam preskaŭ morta kaj mi nun atendas ĉi tie, ĝis ŝi estos morta. Tiam mi ree povos meti ŝin sur la mulon kaj porti hejmen. Estas domaĝe. Ŝi estas tiom juna, tiel bonega, kaj tia fervora laboristino en la domo kaj sur la kampo, kaj la du infanoj ne plu havos patrino.“

Jen iu respondis: „Vi ne tiel facile rezignu pri ŝi, Candido. Kompreneble, se Marcelina mortu, jen ŝi mortos. Sed eble ŝi ankoraŭ ne mortu kaj ni povos helpi al ŝi. Atendu

iomete.“

Li vokis kelkajn virojn flanken kaj parolis kun ili. Poste li revenis. Al Candido li diris: „Ni portos vian edzinon Marcelina sur niaj ŝultroj al kuracisto en Jovel, ni iros tiel facilpaŝe kaj tiel softe, ke ŝi tute ne sentos, ke ŝi efektive estas portata.“

Candido kapjesis sen diri vorton.

La viroj premiĝis inter la arbojn kaj detranĉis trunkojn, per kies helpo ili faris simplan brankardon. Inter la trunkojn ili streĉis siajn malplenigitajn portoretojn, kaj sur tiun kuŝilon ili metis Marcelinan. Siajn aĉetitajn varojn ili disdividis inter la hejmenmigrantaj inoj kaj viroj.

Marcelina pro doloroj fariĝis senkonscia kaj ne rimarkis, kio okazis al ŝi.

Malfrue vespere ili alvenis en Jovel. Ili portis la malsanulinon al kuracisto. La kuracisto pripalpis la dolorantan lokon sur la abdomeno kaj tiam diris: „Necesas operacii ŝin kaj tuj nun: Mi devos malfermtrancî

ŝian ventron kaj elpreni pecon de intesto, kiu pusas kaj post dekdu horoj kaŭzus ŝian morton, se mi ne eltranĉus ĝin. Kion vi do povos pagi, chamulano?“

„Dekok pesojn, *Doctorcito*, *Patroncito*, kuracistĉjo kaj patronĉjo mia.“

„He, kion vi vi pensas, kion tio kostas? Dekok pesojn kostas ja jam nur la vato al mi, la alkoholo kaj la jodoformgazo. Kion mi komencu per dekok pesoj? La kloroformo kostas al mi dek pesojn.“

„*Pero, por el amor de Dios*, sed, pro la amo de Dio, kuracistĉjo, ĉefĉjo, mi ja ne povas lasi morti mian edzinon kiel hundon, ĉu?“

„Mi rakontu la sekvan al vi. Sciu, se la amo de Dio pagus mian nepagitan luprezon, mian lumfakturon, miajn ŝuldojn al la butikistoj, al la bakisto, al la viandohakisto, al la tajloro, jen mi tute bone povus operacii vian edzinon, ankaŭ por la amo de Dio. Sed sciu, chamulano, mi fidas pli pri via mono kaj pri viaj bonaj garantiantoj, kiujn vi prezentas al mi, ol pri la amo de Dio. Dio zorgas pri

pasereto, kiu falas de branĉo, sed ne al kuracisto, kiu kvazaŭ dronas en siaj ŝuldoj. Kaj ĉio ĉi estas ŝuldoj, kiuj devenas de mia studado kaj de fakturoj, kiujn mi ne povis pagi, ĉar ĉi tie estas tro da kuracistoj kaj tro malmulte da malsanuloj, kiuj havas monon.“

„Sed *doctorcito*, mia edzino mortos, se vi ne operacios ŝin.“

„Ankaŭ mi mortus pro malsato, sciu tion, se mi operacius por nenio. Bone, ĉio, kion mi povas diri al vi, estas, ke la operacio kostas tricent pesojn. Sed, por ke vi ekkomprenu, ke mi ne estas pagano kaj neniun lasas morti, eĉ ne la edzinon de malklera indiĝeno, se mi povas fari ion kontraŭ tio, mi faros la operacion por ducent pesoj. Estas hontego, kaj oni povus elpuŝi min humilige el la organizo de kuracistoj pro prezfusado. Do, ducent pesojn. Kaj vi donu al mi la ducent pesojn interne de malpli ol tri horoj aŭ la operacio ne plu havos sencon. Mi ne volas trompi vin per operacio, kiun mi farus nur pro ties beleco. Se mi akceptos vian monon, vi ricevos mian laboron por tio kaj la sanecon de via edzino, aŭ, se ŝi ne transvivos, vi devos pagi nenion al mi. Pli mi ne povos

fari por vi, chamulano. Vi ne povas fordonaci vian maizon, vian lanon kaj viajn porkojn, tiel, kiel mi ne mian laboron kaj mian medicinon.“

Dum tiu interparolado kuŝis Marcelina sur *petate*, sur mato el palmfolioj, sur la brika planko en la portiko de la kuracista domo. La viroj, kiuj portis ŝin tien, kaŭris proksime, ne laŭte babilante kaj fumante cigarojn.

Ja kion alian ili faru? La tuta kunĵetita mono, kiun ili havis en siaj hejmoj, estis malpli ol ducent pesoj. Ili krome povus vendi siajn ŝafojn kaj verŝajne eĉ en tiu kazo la sumo ne atingus ducent pesojn.

Kiel kaj kie Candido pensis ricevi la ducent pesojn, li ne diris, ĉar li ne sciis tion. Kaj ke en tiu granda mizero, en kiu li troviĝis, povus pluvi ducent pesojn el la ĉielo, tion li ne konsideris. Tia miraklo eble okazas ĉeokaze al riĉa bienulo aŭ al generalo aŭ al la *Jefe Politico*, sed neniam al povra indiĝeno, kies tuta posedaĵo konsistas el peceto da ŝtoneca agro.

Rimarkoj

bestia = besto

caja = kesto, ĉerko

don = titolo por vira antaŭnomo

konstipo = malfacilo feki.

partera = akuŝistino

petate = specifa mato el palmfolioj

Pero, por el amor de Dios = Sed, pro la amo de Dio

La kuracisto, fiksinte la prezon kaj ne plu vidante klienton en sia konsultejo, surmetis malnovan ĉapelon kaj iris eksteren sur la straton. Li ree foje devis rigardi, ĉu la domoj ankoraŭ ĉiuj staras sur sia malnova loko aŭ ĉu io okazis dum la lastaj tri horoj en la urbo, kio indas pri tio babiladi en la kantino kaj por povi elgustumi ĝin denove kaj denove en la plej diversaj nuancoj. Eble *doña* Adelina lastfine eksciis, ke ŝia edzo *don* Pablo ĉiun duan vesperon dum horo aŭ dum horo kaj duono pasigis ĉe la apetita vidvino *doña* Pilar, kies edzo kuŝis ĝuste nur kvar monatojn entombe. Tio estis hontego. Sed ne, ĉar *doña* Pilar plezuriĝis kun *don* Pablo, sed ĉar ŝi ne montris tiom da kristana deco almenaŭ atendi dum tuta funebra jaro, antaŭ ol ŝi fordonos sin al tiaj kaj aliaj ĉimondaj plezuroj. La tuta urbo estis informita pri la vesperaj vizitoj, kun la escepto de *doña* Adelina. Kaj ĉar la urbo krome ne posedis ion je novaĵoj, ĉar stratakcidentoj okazis neniam kaj nur ĉeokaze kunrompiĝo de domo, la tuta urbo atendis la grandan okazaĵon, kiam *doña* Adelina ekscios, ke ŝi estas ne la ununura kaj la sole preferata, kiu havas la

rajton kaj la plezuron trovi plifaciligon el diversaj kazoj de surteraj bezonoj. Kaj tute egale, ĉu trovis sin du viroj en kantino aŭ du inoj sur la foirpalco aŭ antaŭ la domo – tuj kiam oni menciis la veteron per kelkaj vortoj, leviĝis la demando: „Ĉu *doña* Adelina ankoraŭ nun ne scias pri tiu hontego?“ Neniu rigardis tion kiel hontegon, aŭ vidis ion nemoralan je tiuj vesperaj vizitoj. Ĉiu estis sufiĉe sanaj kaj normalaj por ekkompreni, ke *doña* Pilar, devis uzi siajn laŭnaturajn rajtojn. Kaj ĉar neniu alia sufiĉe frutempe ekkompatis ŝin, fariĝis do *don* Pablo la savanto, kaj ĉiu alia edzino de la urbo ĝojis enkore, ke la posteno estis okupita kaj, ke ne estis la propra edzo, kiu efektivigis la okupon. La najbaroj ne deziris la malkovraĵon. Tio malmulte afliktis ilin. Neniu enviis al alia ĝojojn de tiu aŭ de simila maniero. Tion, kion la homoj deziris vere, estis, povi ĝui la skandalon, kiun *doña* Adelina pro memestimo devis riski. Estis nur unu zorgo en la urbo, tiu, ke *doña* Adelina eble jam sciis la aferon, sed intence ne faris skandalon el tio kaj tiel detruis ĉiun esperon pri sana drama komedio.

Antaŭ ol la kuracisto faris sian rondiron trans la placon

por poste iri en la kantonon kaj vidi, kiu tie estas kaj tiel havi kaŭzon trinki du komitekojn anstataŭ unu, li iris unue en la apotekon, al la *botica* por deziri al sia plej bona amiko kaj negocopartnero, al la apotekisto *don Luis*, „*Buenas Noches*“. Kie kuracisto kaj apotekisto estas bonaj amikoj, floras la negoco por ambaŭ; sed tie, kie ambaŭ vivas en la plej furioza malamikeco, malsanuloj fariĝas grasaj kaj maljunaj kaj la germanaj farmaciaj entreprenoj devas maldungi laboristojn.

Kiam la kuracisto forlasis la domon, Candido ne sciis, kion plu fari tie. Li decidis iri sur la straton kaj rigardi kien iros la kuracisto. Li ne konsideris viziti alian kuraciston, ĉar li sciis sufiĉe bone, ke ĉiuj kuracistoj estas samaj, se temas pri la prezo.

Al la kuracisto Pablo li iris, ĉar ĉiuj najbaroj en la setlejo kaj en la plej proksima vilaĝo iris al li, se ili bezonis kuraciston. Ili ŝanĝis la kuraciston nur tiukaze, se li mortkuracis iun el la parenkaro. Jen ili elprovis alian, dum tiom da tempo, ĝis ankaŭ tiu estis kulpigata pri la morto de parenko. Post kelkaj monatoj kompreneble la vico de kuracistoj elĉerpiĝis kaj la tuta tribo iom post iom

reiris al la unua, ĝis ties sorto pluan fojon plenumiĝis. La kuracistoj de la urbo vidis la indiĝenojn ne malvolonte kiel klientojn; ĉar ili estis tiuj klientoj, kiuj tuj pagis ĉiun kuracadon, kaj tial tuj pagis ĝin, ĉar oni ne pruntedonis monon al ili. Tuj, se indiĝeno paŝis en la konsultejon, kaj antaŭ ol la kuracisto demandis lin, kion li celas kaj je kio li malsaniĝis, li devis demeti sur la tablon peson, aŭ, kun rabato, duonon de peso, aŭ ses realojn, trikvaronon de peso. Kuracisto, kiu havas multajn indiĝenojn kiel klientojn, materiale rigardate, statis multe pli bone ol tiu, kiu akceptis nur *ladinos*, la meksikan loĝantaron. La *ladinos* pagis pli bone, sed ili pagis malofte antaŭ ol pasis tri tutaj jaroj, kaj tiam ili ankoraŭ grumblis, ke la kuracisto eterne molestis ilin per siaj fakturoj. La sekvan fojon, ili diris, ili prenos alian.

Rimarkoj

Buenas Noches = Bonan nokton!

don = titolo por vira antaŭnomo

doña = titolo por, ina antaŭnomo

ladino = mestizo = ido de blankuloj kaj indiĝenoj, en Ĉiapasozate specife por diferencigi ne-indiĝenojn kaj indiĝenojn, do blankulojn de indiĝenoj

Candido postlasis sian edzinon en la prizorgado de siaj amikoj en la portiko de la kuracista domo.

Starante sur la strato, li ne sciis, kien turniĝi. Sed, ĉar li ne havis alian penson ol sian morte malsanan edzinon, li paŝis al la plej proksima *botica* kun la intenco demandi la apotekiston, kiun medicinon li povus rekomendi por la edzino. La necerta espero, ke eble ekzistas efika rimedo, kiun li povus pagi per siaj dekok pesoj, kondukis lin en la apotekon.

„Kion vi volas havi, chamulano?“ demandis lin *don Luis*. „Ĉu amoniakon, ĉu kamforon?“

„Tio ne multe helpus al mi“, respondis Candido, „mia edzino havas“, li montris la abdomenan lokon je si mem, „ĉi tie fortajn dolorojn.“ Li klarigis la malsanrakonton.

Kiam li finis la rakontadon, diris la *boticario*, ke li ne havas medicinon por tiu kazo. Li estis honesta viro. Kiam li aŭskultis ĉion, li sciis, kiun malsanon la edzino havas,

kaj li diris malkaŝe, ke li ne havas medicinon por tio, kaj ke nur operacio povos helpi al ŝi.

„Parolu kun la kuracisto tie“, li konsilis al Candido, ĉar en tiu momento la kuracisto venis en la apotekon por aŭskulti de *don Luis*, kiuj novaĵoj okazis en la urbo, en la lastaj kvar horoj, dum kiuj ambaŭ ne vidis sin reciproke.

„Mi konas la chamulanon“, diris la kuracisto. „Lia edzino kuŝas ĉe mi en la portiko. Ŝi havas apendiciton. Mi surmetis iom da glacio al ŝi. Sed tio ne multe helpos. Se mi ne operacios ŝin, ŝi mortaĉos. Sed kiel mi operaciu lin, li havas ja nur dekok pesojn.“

„Por tio vi kompreneble ne povus fari ĝin“, ridante diris la apotekisto. „Nur por la vato, la gazo kaj kloroformo mi ja jam devas postuli de vi pli ol dekok pesojn.“

„Tion mi jam klarigis al la chamulano.“ Nun li turnis sin al Candido: „Ĉu vi konas neniun, kiu eventuale pruntedonos la ducent pesojn al vi; por ke vi povu savi vian edzinon?“

„Mi ne povas imagi, ke iu pruntedonos ilin al mi.“

Candido diris tion nek malesperega nek malespera, sed tiel simple, kvazaŭ li dirus: 'Tiel estas, kaj tion mi ne povas ŝanĝi.'

„Eble vi povus akcepti kontrakton kiel kafoplukisto en Soconusco. La *enganchador* certe donus ducent pesojn al vi, kiel antaŭpagon“, proponis la *boticario*.

Candido kapneis. „Al Soconusco mi ne iros. Jen la *alemanes*, la germanoj. Tiuj ĉiuj havas *cafetales*, kafoplantejojn. Kaj ili estas pli kruelaj ol la bestoj de la ĝangalo, ili traktas indiĝenon kvazaŭ li estus malpli ol hundo. Tien mi ne povus iri, ĉar tiukaze, se mi irus al Soconusco, por labori tie en la *cafetales*, mi tute certe dishakus iun *aleman*, se li kontentigus sian kruelan volupton je sendefenda indiĝeno.“

„Tiukaze apenaŭ iu povos helpi al vi, chamulano“, respondis pro tio la *boticario*. „Kaj via edzino certe mortos.“

„Tio certe okazos, *Patroncito*“, opiniis Candido kun paroltono, kvazaŭ oni parolus pri ino, kiun li ne konas. Li

gratis sian dorson helpe de pordofosto, perfingre fosadis
sian hararon kaj kraĉis sur la straton, kiu estis mizere
iluminata de kelkaj malĝoje ardetantaj inkandeskaj
lampoj.

Rimarkoj

aleman = germano

botica = apoteko

boticario = apotekisto

cafetales = kafeplantejoj

enganchador = varbisto por la laborkontraktoj

patroncito = patronĉjo

Ambaŭ brakojn metinte pigre sur la vendotablon kaj kirle moviĝante cigaredon en la buŝo, la *boticario* rigardis samtempe sur la straton, kiu tie aliĝis en la nordorienta angulo al la placo. La apoteko troviĝis en la anguldomo. La placo, nomata ankaŭ *zocalo*, estis prikreskata de altaj maljunaj kaj ombraj arboj. Je la orienta flanko leviĝis la konstruaĵo de la *Municipalidad*, de la municipo, je la norda flanko la katedralo kaj je ambaŭ aliaj flankoj brilis la magazenoj de la elstaraj butikistoj el la urbo.

La kuracisto apogis sin per sia dorso je la vendotablo. Por ripozi post la streĉoj de tute senlabora tago tiel pigre kaj oportune kiel eblas, li malantaŭ si metis bubaĉe ambaŭ kubutojn sur la vendotablon kaj la dekstran piedon sur keston, kiu jam de matene neelpakite staris en la apoteko.

„Kiam la pramaljuna senklapulino, *doña* Amalia, finfine transmondiĝos?“ demandis enuante la *boticario*. Envere li ne havis intereson pri la bonfarto de *doña* Amalia, ĉar ŝi neniam preparigis recepton en ties *botica*. Li demandis nur por paroli. La plimulto de la viroj, speciale, se ili

konas sin reciproke, sentas sin maloportunaj, tuj, se ili havas nenion por interparolo. Tial la duono de ĉio tio, kion viroj parolas kune, estas sensencaĵo, kaj ĝi estas esence pli malutila ol la klaĉado de oldulinoj antaŭ la lavkuvo.

„*Doña Amalia*? Kiun vi celas?“ demandis la kuracisto.

„Tiun kun la utera kancero.“

„Laŭ ĉiuj medicinaj aŭguraĵoj kaj laŭ la plej bonaj profetaĵoj de Eskulapo *doña Amalia* estus jam pli ol dek jarojn morta kaj entombigita. Sed ĉar ŝi ankoraŭ nun ĉirkaŭsaltadas kaj pasigas siajn tagojn per tio lamenti pri siaj suferoj kaj insulti la senutilan drinkulon, kiun ŝia filino edzigis, tio ŝajne estas nova ekzemplo por la laika aserto, ke la medicina scienco troviĝas sur la sama ŝtupo, sur kiu ĝi troviĝis jam antaŭ trimil jaroj, kaj tio estas ankaŭ mia honesta opinio.“ La kuracisto ankoraŭ volis aldoni ion. Sed interrompis lin ĉe lia filozofia traktado viro, kiu subite aperis en la lumo de la bone iluminata *botica*.

„He, *don* Gabriel“, vokis la kuracisto, „de kie venis vi? Ĉu vi estas pro plezurekskurso ĉi tie?“

Don Gabriel haltis, kvazaŭ li pripensus, ĉu li enpaŝu ĉu ne. Li decidis fine paŝi en la apotekon kaj eĉ pli stultigi la malutilan babilaĉon, kiu tie okazis. Li stumble grimpis sur la tri ŝtonŝtupoj supren, paŝis trans la sojlon kaj diris: „*Buenas Noches, caballeros!*“ Ĉe tio li ŝovis per longe etendita montofingro sian bastĉapelon nukon kaj ĝemis:

„Damnita aferiĉo.“ Jen mi por monerigi la ĉekojn de la monterio. Sed nun *don* Manuel ne havas sufiĉe da kontanta mono je dispono.“

„Li ja povus skribi al vi ĉekon por sia banko“, diris la *boticario*.

„Kompreneble li povas tion kaj tion ankaŭ volas fari. Sed tion, kion bezonas mi, estas *dinero en efectivo*, kontanta mono. Post ses tagoj li havos ĝin ĉi tie. Tiom longtempe mi nun ĉi tie devos atendi. Kaj mil diabloj, tio ĉio estas perdita tempo.“

„Por plibonigi al ni ĉiuj la humuron, mi nun unue skue

miksos nefalsitan apotekistokoktelon, por ke ni sentu ree pli sanaj“, diris *don* Luis, la *boticario* kaj iris al la receptejo, al la *Sanctum*, kiel li nomis ĝin, kie li faris siajn venenpilolojn kaj miksis la preskribitajn sorĉistotrinkaĵojn.

„Kial atendas ĉi tie la chamulano?“ demandis *don* Gabriel, akceptante cigaredon, kiun la kuracisto etendis al li.

„Lia edzino havas akutan apendiciton kaj necesas operacii ŝin. Mi ofertis al li liberigi ŝin de la intesta peco por ridindaj kvardek *duros*. Ŝi estas finita, se mi ne operacios ŝin. Sed kie, ĉe ĉiuj inferaj diabloj, tiu *muchacho* povus ricevi ducent pesojn?“

La intereso de *don* Gabriel je tiu ĉi kazo estis kortuŝa. Li estis bona kristano kaj eĉ pli bona katoliko kaj sentis la biblian devigon helpi al suferanta najbaro, ĉiukaze, se ofertiĝas okazo. Oni ne devas loĝi en Samario por esti bona Samariano.

„Ĉu vi ĉi tie en la *ciudad* havas neniun, kiu pruntedonos

al vi la ducent pesojn?“ demandis *don* Gabriel Candidon.

„*No, Jefecito, nadie*“, respondis Candido kaj kraĉis vaste arke sur la straton. Poste li profunde suĉis je la kruda cigaro kaj rigardis la okazaĵon kiel finitan.

„Mi volonte pruntedonus al vi la ducent pesojn, chamulano, eĉ kvindek pesojn aldone; kaj kiel kromaĵon vi ricevus ankoraŭ eĉ du botelojn da *aguardiente* por viaj amikoj, kiuj tiom penis porti vian kompatindan malsanan edzinon ĝis ĉi tie. Tiujn vi ja ne povos lasi simple foriri sen montri vian dankemon.“ *Don* Gabriel diris ĉion tion kun paroltono, kvazaŭ li povus fordonaci tutan kontinenton, kiun neniuj volas havi, kaj li nun tre feliĉas renkonti povran indiĝenon, kiu akceptas almenaŭ peceton de la kontinento.

Rimarkoj

aguardiente = brando

caballeros = caballeros = sinjoroj, ĝentlemanoj, kavaliroj

ciudad = urbo

dinero en efectivo = kontanta mono

duro = kvinpesa monero

muchachos = knaboj, junuloj

Municipalidad = municipo aŭ municipio = urbodomo,

komunuma administrejo (urbo aŭ teritorio havanta relative sendependan registaron)

No, Jefecito, nadie = Ne ĉefĉjo, bedaŭrinde

Sanctum (latina) = sanktejo, templo

zocalo (Meksiko)= la ĉefplaco

Candido nek kapablis legi nek skribi. Ankaŭ krom tio li ne faris la impreson, kvazaŭ li posedus eksterordinaran inteligentecon, kiu elstarigus lin inter liaj tribanoj. Sed li posedis talenton, kiu por kutima vivo pli gravas ol ĉiuj lernitaj sciencoj: la naturan doton bone kompreni, kio estas kaŝita post la vortoj de parolanto. Aldoniĝis spertoj kolektitaj en la rilato kun aliaj homoj, speciale kun *ladinos*. Se *ladino* ofertis peson al li, li certis, ke la peso rapide povus kosti dek pesojn, se li akceptus ĝin.

Li ne longtempe provadis fari nur aludojn pri la afero, sed rekte celis la decidan punkton: „Al Soconusco, al la *alemanes*, mi ne iros, *Patroncito*, ankaŭ ne por kvincent *duros*.“

En tiu momento la *boticario* elpremiĝis de sia plejsanktejo, skuante kaj svingante la misterian mikstrinkaĵon en granda glaso. Li palpebrumis kiel enamiĝinta korniko kaj diris: „Caballeros, tio estas kokteleto, kiun vi ĉiuj ne forgesos dum tuta semajno. Tion mi garantias. Kaj eĉ ne por dudek kvin pesoj mi vendos la

recepton al vi. Enestas eĉ rozakvo kaj eta guteto da benzoo – nur por ke vi sciu, kiel komplika estas la konsisto de tiu *bebida*.”

Don Gabriel estis nun okupita pri negoco, kaj ankaŭ la plej sekretoplena koktelo ne povus logi lin malestimi tian grasan profiton, kiu tiel gaje iris renkonte al li.

Sekretoplenaj trinkaĵoj estas plezuro de la stomako, sed grasa profito estas ĝuo de la animo. Ĉar kiel profitus homo, kiu devas zorgi pri siaj negocoj, se li eĉ rajtus gustumi ĉiujn koktelojn de la mondo, kaj perdus dum tio sian gajnon?

„Al la *alemanes*, al Soconusco, por pluki kafon, ĉu?“ *Don* Gabriel montris mirigitan vizaĝon. „Sed, *muchacho*, *manito mio*, frateto mia, mi tute ne parolis pri *cafetales*. Tie oni enspezas ja neniom, *muchacho*, kaj la *alemanes* estas kruelaj homoj, kiuj ĉiam persekutas kun la vipo la povrajn *muchachos*, kiuj devas laboraĉi ĝis la animo fuĝos el la intestoj por enspezi kelkajn mizerajn pesojn.“

„Vi pravas, patronĉjo“, diris Candido. „Sed kiel mi perlaboru ducent kvindek pesojn, se ne en la

kafoplantejoj?“

„Mi donos al vi kontrakton por montería, *muchacho*.“

Don Gabriel rulumis lante cigaredon. „Vi konduku *confiador*, garantiulon al mi. Unu el viaj amikoj, kiuj portis vian edzinon ĉi tien, certe estos bona al vi kaj estos via garantianto. Vi diros al mi vian nomon kaj la lokon, en kiu vi loĝas, mi skribos por vi kontrakton kaj poste mi donos al vi tuj la ducent kvindek pesojn, jen ĉi tie kontante manen.“

„Estas pli bone, se vi rapidos“, interrompis lin tiumomente la *boticario*. „La *doctorcito* diris ja jam al vi, se oni ne eltranĉos la malican inteston interne de du horoj de via ezino, tiukaze vi povos enterigi ŝin je la komenco de la matena krepusko, kaj vi estos sen edzino.“

„Kaj viaj infanoj ne plu havos patrinon“, aldonis la kuracisto. Kial li ne same atentu pri sia negoco kaj helpu per vortoj sorĉi materiajn valorojn en sian monsaketon?

Kvankam Candido devis sufiĉe streĉe labori per sia kapo por pesi la „por“ kaj la „kontraŭ“ de la propono, li ja

tamen ne forgesis, ke li ne estis la ununura persono, kiun li devis konsideri. La rimarko de la kuracisto turnis liajn lante moviĝantajn pensojn al la infanoj kaj al lia terposedaĵo. Por sia peceto da agro li sentis sin same tiel respondeca kiel por siaj infanoj.

„Kion faru mia edzino kaj kion faru miaj infanoj, se mi iros en la monterion kaj devos lasi ilin solaj?“ li demandis. Li sentis sin kaptita en la propono. Ofertiĝis rimedo savi sian edzinon; kaj rifuzi tiun rimedon, kiu eble estis sendita de la sanktuloj, por eviti suferojn kaj penojn, estus la sama kiel grava peko. Se li rifuzus la kontrakton kaj per tio la helpon, li verdiktus la mortkondamnon kontraŭ la patrinon de siaj infanoj kaj li facile povus konsideri sin kiel ŝian murdiston. Li turniĝadis kiel haringo por fuĝi el tiu reto. Se li akceptus la kontrakton, tiukaze tio signifus, ke li devus labori dum kelkaj jaroj en monterio, kaj per tio li estus disigita de sia edzino, de siaj infanoj kaj de sia terpeco. Se li ne akceptus la kontrakton, kaj lia edzino mortus, kvankam oni povus helpi al ŝi, tiukaze plagus lin dum la resto de lia vivo konscienriproĉoj. Tage kaj nokte eble ĉirkaŭus lin la

spirito de lia edzino, ĝi molestus kaj akuzus lin. Tial li serĉis truon en la reto, tra kiu li povus gliti sen ŝarĝi sian konsciencon. Li pensis: 'Kion faru miaj edzino kaj infanoj, se mi lasos ilin solaj?' Ne lasi siajn infanojn solaj, tio povus esti pravigo rifuzi la kontrakton kaj li povus atribui la morton de sia edzino al la destino de Dio kaj al la sanktuloj kaj li liberigus sin per tio de ĉiu respondeco pri la morto de sia edzino.

Sed Candido ne konsideris la negocan lerton de *don Gabriel*. *Don Gabriel*, tiel kiel Candido, vidis la truon en la reto, tra kiu Candido provas fuĝi. Sed *don Gabriel* tenis la reton kaj tiris laŭ sia plaĉo.

„Ja kiu diris ion pri tio, ke vi lasu vian edzinon kaj viajn infanojn solaj, chamulano?“ *Don Gabriel* levis mirigite siajn brovojn. „Mi certe diris nenion pri tio.“

Candido malfermis la buŝon kaj demandeme rigardis *don Gabrielon*. Kvankam li ne kredis pri mirakloj de tia speco, ja tamen eblis, ke tie, en la rilato al lia minaca situacio, troviĝas elirvojo, kiu permesas al li ricevi la monon por la operacio kaj tamen plu restadi sur sia terpeco kaj havi plu

sian familion ĉirkaŭ si. Kiel tio eblas, tion elpensi dum malmultaj sekundoj, kompreneble estis tro komplike por Candido. Kaj antaŭ ol li havis tempon por demandi, Gabriel jam elpafis la respondon: „Tio estas tre simpla, *chamulito*. Vi prenos vian edzinon kaj viajn infanojn kun vi en la monterion.“

Rimarkoj

aleman = germano

alemanes = germanoj

benzoo = aroma rezino

bebida = trinkaĵo

caballeros = sinjoroj, ĝentlemanoj, kavaliroj

chamulito = chamulano

confiador = garantiulo,

manito mio = frateto mia

montería = monterio: laborkoncentrejoj en la ĝangalo, kie oni dehakas kaj prilaboras permane la mahagonarbojn, por povi fortransporti ilin de tie. Tiu laboro per maŝinoj pro la altaj kostoj ne fareblas

Pri tia solvo Candido neniam pensis. Ĝi estis surpriza por li. Li vidis tuj, ke li ne povos rifuzi ĝin. Ĝi superfortis per unu bato ĉiujn liajn kontraŭajn dirojn, kiujn li eble ankoraŭ povus kontraŭmeti. La lasta truo en la reto estis fermtiritita. Dum sekundo li pensis diri, ke li ne volas rezigni pri sia terposedaĵo, ĉar li povus perdi ĝin. Sed li sentis samtempe, ke tio ne estus bona kaŭzo; ĉar la terpeco estis tro magra por fari multe da bruoj pri ĝi. Neniu donus eĉ nur kvindek pesojn por la ŝtonriĉa kampo, kiun li nomis sia tero.

Terpecon kiel tiun, kiel *don* Gabriel dirus al li, li povus havi ĉiutage por kvindek centavoj da skriba kotizo, kiun li pagus ĉe la plej sekva urbestrejo, se li tie lasus skribi al si posedan dokumenton.

Don Gabriel nun ne lasis eĉ sekundon da tempo al li hezitigi la negocon. Li demandis lin pri liaj nomoj kaj loĝloko, demandis lin pri la nomo kaj loĝloko de samtribano, kiun li nomis kiel garantianton. *Don* Gabriel skribis la nomon en sian notlibreton. Post kiam li faris

tion, li disbukis ledorimenan zonon sub sia ĉemizo kaj eltiris ĝin. Tiu zono estis leda tubo, en kiu *don* Gabriel konservis sian monon tiel, kiel ĉiuj komercistoj, brutacĉetistoj kaj bienuloj, kiuj devis longtempe vojaĝi sur ĉevaloj. Ili portis tiun zonon sur la nuda korpo, ili ne demetis la zonon eĉ dum la nokto, sed turnadis ĝin tiel, ke ili povis dormi sur la buko.

Don Gabriel skuis kvindek arĝentajn pesojn el la zono, nombrante metis ilin kiel montetojn sur la tabloplaton kaj diris: „Jen la kvindek pesoj kiel antaŭpagon. Por la ducent pesoj, kiuj ankoraŭ mankas, respondecas mi al la kuracisto, mi pagos al li la ducent pesojn morgaŭ. Ĉu akceptite, kuracisto?“

„*Aceptado*“, respondis la kuracisto, kiu turnis sin nun al la apotekisto. „Pretigu por mi la recepton kaj tuj, *don* Luis.“ Antaŭe li jam skribis rapide kelkajn hieroglifojn sur peceton da papero kaj donis ĝin al la apotekisto.

„Post dek minutoj mi sendos ĉion ĉi transen al vi. Sed nun ni finfine ankoraŭ unue sorbu la koktelon, kiu postulis de mi tiom da peno kaj talento, *caballeros*.“

„Ne malbone“, diris ŝmacante *don* Gabriel, post kiam li malplenigis la glason per unu movo.

„Honoron al tiu, kiu meritas honoron“, diris ridante la kuracisto, kiu elŝovis sian langon kaj lekadis en la malplena glaso.

„Unu plua glaso por ĉiu ankoraŭ estas je dispono“, diris la *boticario* kaj tiris la malplenajn glasojn al si por plenigi ilin denove.

„Dum la *caballeros* kantis laŭdokantojn pri la famo de l' koktelo kaj gloris la talentojn de tiu, kiu tiel grandanime miksis kaj donacis ĝin por ili, Candido fervore turnis la monon en sian ruĝan lanan surkorpan zonon. Enmetinte ĝin, li saltis el la pordo sen adiaŭi sin kaj foriĝis en la malhelo.

Rimarkoj

aceptado = akceptite

centavo = nikela monero

En la domo de la kuracisto Candido trovis siajn amikojn, kiuj kaŭris en la portiko de la interna korto kaj gardis lian edzinon tiel silenteme, ke li supozis ilin dormantaj. Ja ne estis la kutimo de liaj amikoj, tiel, kiel ne estis la kutimo de la viroj de lia popolo, kunkaŭri en grupo kaj stulte gapadi sin reciproke. Kie ajn sudaj indiĝenoj en grupo kunestas, ili babiladas seninterrompe. Ili babiladas ĝis malfrua nokto, kaj se ili fine dormas, ili vekigĝas en ĉiu duono de horo kaj paroladas al siaj najbaroj, kiuj ripozas je ilia flanko. Kaj matene, tuj, kiam ili malfermas la okulojn, rekomenciĝas denove la kvazaŭa gakado. Nur survoje, ĉe la laboro surkampe kaj en ĉeesto de homoj, kiujn ili ne konas, ili montras obstinan, neskueblan silentadon, kiu vekas la impreson, kvazaŭ ili tute ne kapablus paroli kaj estus proksimaj al tuta stultiĝo.

Candido proksimiĝis al la grupo. Li ekkonis ilin nur neprecize, ĉar la interna korto estis iluminata nur de malgranda kerosenlampo, kiu videblis post fenestro en ĉambro sur la transa flanko de la interna korto.

Li tute proksimiĝis al la kaŭrantaj viroj kaj trovis, ke ili ĉiuj kaŭris en cirklo ĉirkaŭ ties edzino. Tuj li konsciiĝis pri tio, kio okazis.

Li kaŭriĝis apud la plej proksima viro, kiu staris tie kaj tuŝis lin softe sur ŝultro kaj diris lace: „Kiam ŝi forlasis min?“

Antaŭ duono de horo aŭ ĉirkaŭ tiu tempo. Ŝi vekiĝis kaj tre ĝemis. Poste ŝi diris: „Ve, Candido, edzo mia, kie vi estas?“ Tiam ŝi etendiĝis kaj estis morta.

Tiumomente paŝis la kuracisto tra la peza lignopordo en la domirejon. Li fajfis melodion por si kaj vokis al la angulo de la portiko, kie laŭ lia scio troviĝas la indiĝenoj: „Portu ŝin en mian konsultejon. Mi ŝin nun operacios.“

Sen halti survoje li iris kun longaj paŝoj al la pordo de sia kuracista ĉambro. Li malfermis la pordon kaj vokis poste trans la internan korton: „*Oye*, Rodolfa, damnita bufino, dormema knabino, portu al mi ses kandelojn sur malplenaj boteloj kaj starigu ilin. Mi havas operacion. Kaj varmegan akvon, plenan sitelon. *Y algo prontito*, kaj rapidu.“

„*Vuelo, Doctorcito*, mi flugas“, vokis la knabino el angulo.

La kuracisto lasis vaste malfermita la pordon de sia konsultejo. Li ekbruligis kandelon, kiu tie staris sur malbela rustmanĝata emajla kandelingo sur la tablo. En malgranda murŝranketo kun etaj vitrotabuloj li havis kelkajn brunajn flakonojn kun etiketoj, kiuj montris kranion de mortulo. Tiuj boteletoj faris profundan

impreson al lia klientaro, tial li prezentis ilin en la ŝranketo ĉiam antaŭe. En la malsupra fako de la ŝranketo, same videbla por la vizitantoj, li havis siajn instrumentojn. Ili pli similis al la tenaĵoj, kunteniloj kaj pinĉiloj de simpla dentkuracisto ol al tiu de kirurgo. Se oni rigardis la ilojn pli detale, montriĝis, ke je ĉiuj deŝeliĝis la nikela eksteraĵo, kaj kelkaj el la instrumentoj estis abunde rustkovritaj. Sur malgranda blanke farbita tablo, sur kiu estis metita polvkovrita kaj makulita blanka vindotuko kvazaŭ kiel tuko de tablo, kuŝis ankoraŭ pluaj instrumentoj, kiuj aspektis pli fortikaj kaj tute bone povus esti rigardataj kiel iloj, kiujn uzas kutime hufferisto. Ke ili estis la iloj de kuracisto, oni ekkonis nur je tio, ke ili certe iam havis belan nikelan kovraĵon. Sed nun kompreneble de la nikelo apenaŭ io plu videblis. Ĉar ili estis pli elmetitaj al la klimataj influoj de la pluvsezono ol la pli malgrandaj iloj, kiuj estis konservataj en la ŝranketo, la rusto sur la iloj estis tiom dika, se oni foje ne konsideras la ceteran polvon, la muŝokoton kaj la ŝprucaĵojn de la viŝĉifonoj, ke necesus kruda sablopapero por smirgi la rustaĵon.

Rimarkoj

Oye = Ho ve

vuelo, doctorcito = Mi flugas, kuracistĉjo

y algo prontito = Kaj rapidu iom

La kuracisto ekbruligis cigaredon. Poste li iris al la ŝranketo, elprenis gigantan medicinbotelon, sur kies etikedo legeblis grandlitere „*Hennessy*“. Li tenis ĝin antaŭ la lumo de la kandelo, por kontroli la kvanton de la enhavo, poste li prenis akvoglason kaj plenigis ĝin je duono. Per du abundaj glutoj li verŝis la medicinon trans la langon. Li ŝmacis, gorĝe grakis kelkajn fojojn kaj diris ne laŭte: „Damne, mi ja morĝaŭ devos aĉeti novan botelon. La likvaĵaĉo forfluas kiel varma olivoleo. Aŭ la bufino, la *muchacha*, trinketas de tempo al tempo je la botelo, se ŝi balaas tiun ĉi ĉambron. Mi surgluos venenetikedon. Estas pli sekure.“ Li kraĉotusis nun forte kaj iris al la tablo, sur kiu kuŝis la tenaĵoj, marteloj, boriloj, tranĉiloj kaj fajliloj de la hufferisto. Li levis kelkajn kaj komencis purigi ilin per kota tuko.

Li ankoraŭ ne finis tion, kiam li subite ekpensis pri sia klientino kaj turniĝis subite. Li iris al la pordo kaj vokis: „Ho, ĉe l' infero! Ĉu vi nun alportos ŝin aŭ ĉu vi ne alportos ŝin? Kio estas tie?“

Neniu respondis. Li prenis la kandelon, ĉirkaŭiris la portikon, ĝis li venis al la loko, kie la indiĝenoj silente kaŭris ĉirkaŭ la ino.

La viroj rigardis lin sen diri ion. Li kliniĝis, prilumis la vizaĝon de la ino, pripalpis ŝiajn vangojn, levis palpebron de ŝi kaj diris: „He, he! Kio tio estus?“

Lia vizaĝo montris seniluziiĝon. Li sentis sin trompita de la ino. Esperante, ke li eble tamen ankoraŭ povos labori je ŝi, li ŝovis manon sub la antaŭparton de ŝia ponĉo kaj palpis ŝian mamon. Sed li retiris la manon rapide. Li ŝovis la kandelon pli proksimen kaj pinĉis forte vangon de ŝi. Montriĝis eĉ ne iomete da transkoloriĝo.

„Kial vi ne venis pli frue?“ li demandis krude Candidon, dum li rektiĝis kaj levis la kandelington.

„Mi estis sufiĉe frutempe ĉi tie, *doctorcito*“, defendis sin Candido per mallaŭta voĉo.

„Mil diabloj, fermtenu la buŝaĉon! Elportu ŝin el la domo.“

„*Con su permiso, Doctorcito!* Kun via bonkora permeso ni portos ŝin hejmen.“ Candido karesis la vizaĝon de sia edzino kaj kovris ĝin per la antaŭparto de ŝia ponĉo tiel, ke la nudaj mamoj ekvideblis.

Liaj amikoj eltiris unu el la du bastmatoj, sur kiuj la edzino kuŝis; kovris tiun maton sur ŝian korpon; kaj kun la alia bastmato ili enfaldis la mortan korpon, kvazaŭ ĝi estus trunko. Poste ili rulis la supran maton same ĉirkaŭ la korpon kaj kunŝnuris la tuton kiel faskan pakon. Poste ili levis la inon kaj metis ŝin sur la simplan brankardon, sur kiu ili alportis la inon.

Candido iris antaŭe kaj malfermis la dompordon.

Rimarkoj

Con su permiso, Doctorcito! = Kun via permeso, kuracistĉjo!

Hennessy = viskiomarko

lorongo = ponĉo

muchacha = ino

Kiam la viroj estis jam survoje, vokis la kuracisto: „*Oye, muchacho*, vi ja ne eble volas eĉ foriri sen pagi viajn ŝuldojn?“

Candido revenis. „Mi forgesis tion, *doctorcito*. Pardonu al mi. *Cuanto debo?* Kiom mi ŝuldas al vi?“

„Kvin pesoj por la antaŭekzamenado, kaj kvin pesojn por la ekzamenado *post mortem*, mi celas diri, por la ekzamenado, ĉu ŝi estas morta.“

„Pardonu al mi, kuracistĉjo, sed vi ja ne sanigis ŝin, ĉu ne? Vi faris ja nenion por helpi al ŝi.“

„Ĉu mi do ne bone ekzamenadis ŝin kaj diris al vi, ke necesas operacii ŝin?“

„*Si, Jefecito*, tion vi certe faris.“

„Ĉu tio estas laboro, ĉu ne?“

„Kompreneble tio estas laboro, kuracistĉjo. Sed la laboro

ja ne havis valoron. Mia edzino estas morta. Tion vi ja povas vidi. Tion ja ĉiu povas vidi.“

„Mi ne havas tempon marĉandi kun vi. Mi devas fari alian. Aŭ vi pagos la dek pesojn, kiujn vi ŝuldas al mi, aŭ mi enkarcerigos vin. Tion vi nun scias. Kaj la kadavron vi ricevos nur tiam, kiam vi estos paginta viajn ŝuldojn. Mi estas honesta homo kaj havas kompaton por povra indiĝeno kaj eĉ pli, se pri vi temas. Alia kuracisto postulus ankoraŭ dek pesojn krome de vi, por la kampadejo ĉi tie. Mi devas purigi la lokon, kie via edzino mortis, per *creolina*. Tion postulas la sanitara oficejo, kies ĉefo mi estas. Kaj tiun *creolina* oni ne donacas al mi.“

La kuracisto etendis malferman manon al Candido, por aludi tiel, ke la lastaj vortoj en tiu afero estas parolitaj kaj, ke la mano nun estu plenigenda.

Candido jam komencis malvolvi la lanan surkorpan zonon. Li eligis la dek pesojn kaj nombris ilin sur la manon de la kuracisto.

Dum li pagis peson post peso, ĉiun peson unuope pesis

surmane kaj memoris, kiom da dura laboro kostis al li ricevi kontantan peson sur la foirplaco, kie li vendis la produktojn de sia mizera agro, liaj amikoj elportis la faskan pakaĵeton el la domo.

Sur la strato ili atendis Candidon.

Rimarkoj

creolina = kontraŭinsekta likvaĵo, ankaŭ uzata por mortigi pulojn je hundoj

post mortem = post la morto

„*Si, Jefecito*” = Jes, ĉefĉo

La sepultentreprenejoj malfermas tage kaj nokte sen interrompo, ĉar pro la klimato la enterigoj okazas maksimume dek du horojn post la morto, ofte eĉ pli rapide. Tial ĝi estis normala, ke Candido trovis malfermitan vendejon, kie li povis aĉeti ĉerkon. La plej malkara ĉerko estis kvarangula nerabotita kesto. Tiu kesto estis nigre farbita. Sed, ĉar la entombiga entrepreno tiom malmulte pagis al la ĉerkfaristo, kiu estis sendependa metiisto, tiel, ke postrestis por la metiisto apenaŭ sesdek centavoj por lia laboro je ĉiu kesto, li devis ŝpari farbon, kaj la kestofarbo estis tiom maldika, ke ĉie la nuda ligno videblis sub la farbo. La fundo de la kesto tute ne surhavis farbon.

„Tiu ĉerko kostas kvar pesojn“, diris la komercisto al Candido.

„En ordo, tiun mi prenos.“

„Sed mi supozas, ke ĝi estos tro mallonga por via edzino“, opiniis pri tio la komercisto, kiam li rimarkis, ke Candido

havas monon, intencis vendi al li pli multekostan ĉerkon.

Unu el la amikoj de Candido mezuris perbrake la longon de la envolvita kadavro ka poste la longon de la ĉerko. „La ĉerko estas sufiĉe longa“, li diris al Candido.

Kiam la komercisto rimarkis, ke li povus perdi pli bonan enspezon, li frapis al Candido afable sur ŝultron kaj diris per malĝoja voĉo: „Nun aŭskultu foje, chamulano, ĉu vi volas entombigi vian edzinon, kiu donacis la infanojn al vi, en tia mizera kesto? Kion pensu Sankta Virgulino pri vi, se ŝi trovos vian edzinon en tia aĉa kesto? Eble ŝi eĉ preteriros vian edzinon kaj ne kunprenos ŝin en la ĉielon. Vi tute certe ne volas, ke via bona edzino devu restadi ekstere antaŭ la pordo de la ĉielo tiel, kiel la malicaj pekintoj, friponoj kaj murdistoj. Tiu ĉi kesto, kiun vi volas aĉeti, estas nur kesto por la perditoj, kiuj morte estas kolektitaj de sur la stratoj aŭ vojoj, kaj kiujn konas neniu, kaj kiuj ne havas parencojn. Rigardu foje tiun ĉi belan ĉerkon ĉi tie. Vi ne devas aĉeti ĝin. Nur rigardu ĝin. Kiel bele kaj delikate via bona edzino kuŝus en tiu splenda ĉerko! Se tiun ĉerkon vidus Sankta Virgulino, ŝi tuj kun kantado kaj sonorilado iros al ĝi, etendos al via edzino

manon kaj prenos ŝin kun si supren en la ĉielon; ĉar ŝi vidos, ke via edzino ne estas perdita pekulino, sed benata, kiu estas baptita. Via edzino estas ja baptita, ĉu?”

„*Si, Patroncito*. Ŝi estis baptita, kiam ŝi ankoraŭ estis malgranda.“

„Tiukaze vi ne povos entombigi ŝin en tia malkara kesto. Tiu ĉi ĉerko estas glate rabotita kaj bone farbita, ekstere nigra kaj interne blanka kaj kun ora strio, kiel vi povas vidi. Interne ĝi estas elmetita per aŭtentika ĉina papero, kun punteca papero.“

„Kiom kostas tiu ĉerko?” demandis Candido.

„Dudek pesojn, chamulano.“

La komercisto vidis la timigitan vizaĝon de Candido, li tuj ŝanĝis la negocan tonon de la parolo kaj diris nun kun kunsento: „Estas terure perdi la edzinon, frato mia, mi scias tion; mi perdis jam du edzinojn. Ĝi estas la lasta, kion vi povos fari por via bona edzino. Kaj vidalvide kun la la funebra situacio kaj la doloro, en kiu vi nun estas, mi translasos la ĉerkon por dek sep pesoj al vi. Tiel mi gajnos

neniom; mi ĵuras al vi ĉe Sankta Virgulino, ke la ĉerko al mi mem kostis dek ses pesojn kaj kvindek centavojn.“

Nun komenciĝis la efektiva marĉandado.

Kiam Candido fine povis meti sian edzinon en la ĉerkon, li pagis dek tri pesojn.

Li aĉetis unktitajn kandelojn; poste *aguardiente*, por ne lasi foriri la funebrantojn kun seka gorĝo.

Ĉapitro 02

01

Ekde la tago, kiam li eksciis, ke lia edzino malsaniĝis, ĝis la semajno post ŝia entombigo, Candido vivis en obtuza dormemo. Li ne kapablis pensi. Lia kapablo percepti ion, fariĝis malforta. Li ne povis diri certe, ĉu li dormas aŭ sonĝas.

Kiam li aĉetis la ĉerkon, la kandelojn kaj la kruĉon kun la kvin litroj da *aguardiente* por la regalo de siaj amikoj kaj la funebraj gastoj, li elspezis la monon, kiun li portis en la zono, sen eĉ unufoje pripensi, kiel li ricevis la monon kaj kion signifas la posedo kaj foruzado de la mono por li kaj lia sorto.

En la kazo, ke li ne havus monon, tamen troviĝus elirvojo entrepreni la entombigon en sufiĉe deca maniero. Oni entombigus lian edzinon envolvitan en ambaŭ matoj aŭ liaj amikoj kaj samtribanoj helpus haki el ĝuste falintaj arboj krudajn tabulojn kaj fari pli-malpli bone keston. Sed la elspezado de la mono komenciĝis tute sen lia volo

en tiu momento, kiam la kuracisto postulis la dek pesojn kaj rifuzis la redonon de la kadavro en tiu kazo, se li ne pagus la dek pesojn. Tio estis nur minaco, ĉar pli ol dek horojn la kuracisto ne povus reteni la kadavron en sia domo sen esti devigita entombigi ĝin je siaj propraj kostoj aŭ je tiuj de la urbo. Sed la penso devi postlasi la kadavron de sia edzino en la domo de la kuracisto kaj sola devi iri hejmen en la setlejon kaj alfronti siajn du infanojn sen hejmenporti la patrinon vivantan aŭ mortan, ne lasis heziti lin eĉ dum sekundo ekuzi la monon, kiun li portis ĉe si. La sekvajn elspezojn li faris kvazaŭ en tranco.

Kvankam honesta laŭ karaktero, li elspezus eĉ monon, kiu estus konfidita al li por transporti ĝin por alia persono, sen povi distingi en tiuj horoj de obtuziga doloro eĉ dum sekundo, kio estas justa kaj kio maljusta.

Kaj tiel en tiuj tri pasintaj semajnoj ekde la morto de lia edzino, vekiĝis en li eĉ ne unufoje la ekkono, ke li decidis per la elspezo de tiu mono sian estontan sorton.

En lia setlejo ne estis eblo por elspezi monon. La kampo donis al ĉiu tion, kion homo bezonas por plenigi la stomakon. Sed li devis aĉeti tri suĉporkidojn. Porkoj

estas, jam pro la graso, apenaŭ malhaveblaj en la mastrumado de indiĝena kamparano, tiel, kiel ŝafoj malhaveblas por altaĵa indiĝeno aŭ tiel, kiel bovinoj por farmisto en Minesoto aŭ Dakoto. Krome aldone disrompiĝis lia ununura maĉeto je ŝtono. Kaj ĝi disrompiĝis tiel dense super la tenilo, ke eĉ la tigo de la tenilo ne plu uzeblis. La maĉeton li prikalkulis je tri pesoj. Kaj ĉiu porkido kostus lin certe kvar realojn, se ili estus ankoraŭ tre malgrandaj, kaj se li penus serĉi malkarajn porkidojn sur la bazaro en Jovel. Tio estis do entute kvar pesoj kaj kvindek centavoj, kiujn li bezonis.

Kiam li nun decidis morgaŭ migri al Jovel, kiam estos bazartago, li kunserĉis la monon, kiun li bezonis por la aĉetoj. Kiel ĉiuj anoj de lia nacio loĝantaj en vilaĝoj kaj setlejoj, ankaŭ li havis la kutimon volvi sian monon en malnovan ĉifonpecon kaj enfosi ĝin en la tero de sia kabano. Se la mono aŭ parto de ĝi estis elprenita, oni kaŝis ĝin ĉe la reenfosado en alia loko de la kabano, ofte sub la fajrejo, kiu ja same troviĝis sur nuda tero.

Candido serĉis sian monon, kaj kiam li trovis ĝin kaj prenis ĝin sur manon, li mirigite ekkriis, kiam li vidis la

monkvanton antaŭ si. Estis pli ol dudek ses pesoj, kiuj restis al li, inklude de liaj originaj pesoj.

En la lastaj tagoj li komencis vekiĝi el sia obtuzeco. La laboroj de la kampo, kiuj pro la komenciĝonta pluvosezono tre urĝis lin, tiel, kiel ankaŭ la zorgo pri liaj du infanoj, kaŭzis plej multe, ke li retrovis la fadenon en la reala vivo. Ĉar liaj klaraj pensoj finiĝis je tiu tago, kiam li akompanis sian edzinon al Jovel, kaj ĉar la intertraktadoj en la domo de la kuracisto kaj en la apoteko estis kvazaŭ inkubo, li memoris nur la originajn dek ok pesojn kiel sian kontantan monposedon.

Kompreneble la mirigiteco, vidi tiom da mono antaŭ si, daŭris nur duonon de minuto, en la sekva duono de la minuto, li tute rekonsciiĝis pri la deveno de la mono kaj ties parta foruzado. Kaj li ankaŭ konsciiĝis, ke li perdis ne nur sian edzinon, sed ankaŭ la liberon povi decidi pri si mem. Li estis nun sklavo de *don* Gabriel, kiu sendis lin al monterio kaj disigis lin de lia tero kaj de la tombo de lia edzino.

Li havis la intencon preni siajn du infanojn kaj fuĝi. Sed

du aferoj, kiuj tuj poste enkapiĝis al li, malhelpis lin fari tion. Unu el liaj samtribanoj fariĝis lia garantianto. Kaj se li ne plenumus la kontrakton, lia amiko devus anstataŭi lin. Ne eblis permesi tion por li. La alia kialo estis, ke tiukaze, se li fuĝus, li estus ja same disigita de sia tero, kun kiu li fariĝis unueco. Kaj se li restus en la setlejo, tiukaze iutage venus la uloj de rura polico kaj pelus lin, sekvante la kontrakton, al monterio. Tio speciale pro tio ŝajnis ebla al li, ĉar *don* Gabriel ja ne transdonis la ducent pesojn al li, post kiam la pago al la kuracisto fariĝis superflua. La agento do ne plenumis la kontrakton komplete.

Rimarkoj

realo = realo = dudek kvin centavoj

Je la sekva mateno, longan tempon antaŭ sunleviĝo, Candido prenis siajn du filojn kaj ekiris sur la vojo al Jovel. Li portis pezan ŝarĝon da maizo sur la dorso. La pli grandan knabon li ŝarĝis per sekaj nutroherboj, la pli malgrandan per sako da ŝafa lano. Estis la produktoj, kiujn li intencis vendi por aĉeti de la gajno salon, krudan sukeron kaj pecon da blanka kotona ŝtofo. Ses pesojn li portis kiel kontantan monon ĉe si.

Ankoraŭ antaŭ tagmezo li finis ĉiujn siajn negocojn. Siajn produktojn li vendis tiel, kiel kutime, por ridinda prezo. La porkidetojn, kiujn li aĉetis, li portis en sako sur la dorso. Ili kvikadis kaj grimpadis sur lia dorso. Sed tio pli ĝojigis ol ĉagrenis lin, ĉar tio pruvis, ke li aĉetis sanajn bestojn kaj, ke li plenkreskigos ilin.

Li estis nun sur la vojo al la vemdejo de feraĵoj „El Globo“, kie li intencis aĉeti la maĉeton. La sakon li demetis antaŭ la malfermita pordo kaj transdonis ĝin al siaj filoj, por ke ili gardu ĝin. Poste li iris embarasite kaj honteme en la magazenon, kvazaŭ li ne estus aĉetisto kun

kontanta mono, sed kiel almozetanto, kiu ĉiumomente atendas elĵeton eksteren per piedbato sur la postaĵon.

Apenaŭ li enpaŝis, jam iu diris al li: „Aha, jen vi ja estas, chamulano. Vin mi ĝuste atendis.“

Candido rigardis supren kaj vidis, ke staras *don* Gabriel antaŭ li, la *enganchador*, la varbagento de laboristoj.

Estis la kutimo de *don* Gabriel, tiel, kiel tiu de la plej multaj *ladinos*, okupiĝi la tutan tagon per tio iri de butiko al butiko, tie babiladi kun la posedantoj kaj rigardi, ĉu eble konato renkonteblas. Intertempe oni vizitis plurfoje iun *cantina* por lavi per kelkaj altprocentaj komitekoj la gorĝon kaj kun aliaj malnovaj aŭ ĵus akiritaj konatoj paroli sensencaĵojn. Kompreneble ĉiu opiniis, ke ĉio, kion oni parolis, estas grava kaj havas specialan influon je la politiko de la lando. Se la gorĝo estis lavita per swingoplenaj enverŝoj, oni rondiris plu laŭ la magazenoj de la urbo. Tiel la hela tago pasis. La vespero denove donis okazon iri al *cantina* kaj verŝi gorĝen anstataŭ nur unu *copita* tuj dek du da ili. Poste oni rondiris la placon, kaj tiam jam venis la vespera manĝo. La vespermanĝo necesigis multe da likvaĵo, kio estis sufiĉe da preteksto por iri rigardi pluan fojon, kiu eventuale renkonteblas en unu el la *cantinas*. La efektiva laboro de la *caballeros*, kiu nepre necesis por vivteni la iradon de la civilizacio, intertempe estis tuŝita tie kaj tie; kelkaj minutoj estis uzataj nur por negocaj aferoj.

Oni devas faciligi la vivon al si kaj laborigi tiujn, kiuj ne estas *caballeros* kaj tial ne havas sufiĉe da graso en siaj cerboĉeloj por povi rikolti sen plugi.

Estis dumminutaj okazoj, kiujn *don* Gabriel sciis uzi por si. Dum tia minuta okazo li kroĉis la kontrakton al Candido, kaj nun denove estis tia dumminuta okazo, kiam li provis sekurigi ĝin. Promeni de magazeno al magazeno kaj en ili stari dum duono de horo kaj tie babilaĉi do tamen ne estis tiel malnegoca kiel tio facile supozeblas.

Se li ne estus tie, ŝajne tute sence, en la magazeno, li ne renkontus Candidon por sciigi al li gravan.

„Tion vi ja scias, chamulano, ke lunde ekmarŝos la trupo, al kiu vi apartenas, kaj kiu marŝos al la monterioj.“

„*Patroncito*, patronĉjo mia, sed mi ja ne prenis la monon, ĉar mia edzino estis morta, antaŭ ol venis la kuracisto.“

„La ducent pesojn mi postlasis en la *botica*, vi povas ricevi ilin tie, se vi volas.“ La ducent pesoj kompreneble ne estis en la apoteko aŭ ie aliloke demetita por

transpreno. Se Candido vere postulus la ducent pesojn, kiujn li jam ne plu bezonis, estis sufiĉe da tempo por demeti ilin en la apoteko aŭ por persvadi lin, ke li tute ne bezonas ilin.

Candido estis obstina, sen esti ribelema. „Mi ne prenis la ducent pesojn, ĉefĉjo. Kaj tial mi ankaŭ ne havas kontrakton por la monterio.“

„Sed vi prenis ja la kvindek pesojn, aŭ ĉu eble ne?

„Konsentite, sed la kvindek pesojn mi povas repagi.“

Don Gabriel iĝis subite suspektema kaj iom konfuziĝis. Ekestis la danĝero, ke li perdos la viron. Sed samtempe li trankviliĝis, kiam li pripensis, ke la indiĝeno neniukaze povas havi la kvindek pesojn, ĉar li certe sciis, ke Candido pagis la kuraciston kaj ankaŭ aĉetis ĉerkon, kvindek ŝparitajn pesojn li do certe ne posedis.

„Ne rakontu al mi, mi tre petas, historiojn, kiujn vi volas rakonti al mi“, li diris. „Egale, ĉu vi alportos aŭ ne alportos la kvindek pesojn, ĝi tamen ne liberigos vin de la kontrakto, kiun vi konsentis al mi antaŭ atestantoj.“

Ankaŭ la antaŭpagan monon vi akceptis antaŭ atestantoj. Se vi akceptus nur tri pesojn da antaŭpaĝo, vi estus jam en la kontrakto. Aŭ ĉu mi prefere konduku vin al la polico, kie oni diros al vi, kiu rajtas pri la afero, ĉu vi aŭ mi?“

Don Gabriel atendis respondon. Dum tio li ekhavis novan penson: „Vi certe ne volas forkuri, chamulano, el via kontrakto, ĉu? Tion mi tuj malhelpos.“

Candido sciis, kio nun okazos. Per unu salto li eliĝis tra la pordo. Eble sukcesus al li fuĝi, se antaŭ la pordo ne kaŭrus liaj du knaboj, kiujn li ne povis postlasi solaj en la urbo. Li vokis al ili, ke ili sekvu lin. Sed antaŭ ol ili povis suprensalti, *don* Gabriel jam firme kaptis iliajn brakojn.

Nun li vokis per kriĉanta voĉo: „Policia! Policia! Acá, acá!“

Rimarkoj

cantina = kantino

copita = brandoglaseto, glaseto por brando, ekz. por komiteko aŭ por ĉerizbrando

La konstruaĵo de la *Municipalidad* estis rekte transe de la strato, kie ĝi okupis la tutan longan flankon de la kvarangula placo. Post la kvara pordo troviĝis la *Comandancia de Policia*, kaj antaŭ la malfermita pordo staris kaj kaŭris ĉiam kelkaj policianoj, kiuj atendis ordonojn de sia komandanto. La kriadado de *don Gabriel* ankoraŭ ne tute perdiĝis, kiam jam tri policianoj, svingante siajn lignajn bastonojn, rapidege kiel sur ĉaso anhele atingis la vendejon de feraĵoj.

„Pri kio temas, *don Gabriel*? Ĉu la du knaboj ŝtelis ion?“ demandis unu el ili.

„Prenu ambaŭ bastardojn transen al la *Comandancia* kaj bone firmtenu ilin. Mi tuj venos mem por paroli kun la *jefe*.“

„*Muy bien*, *don Gabriel*, je via tre ŝatata servo!“ servofervore diris la policianoj kaj trenis la knabojn post si.

La knaboj, kun la pako surdorse, komencis nun terure krei, kvazaŭ oni volus mortbati ilin, kaj ĉiu el ili vokis kun la plena forto de sia juna voĉo:

„*Tate! Tate! Patro! Patro!*“

Candido, spite al sia peza pako jam forkuris certan distancon kaj troviĝis meze de la placo. Li estis certa, ke liaj knaboj sekvas proksime al liaj kalkanoj. Li sciis, kiel bone ili povas kuri, se ili persekutas leporon aŭ junan simion.

Sed aŭdante krei siajn knabojn kaj rigardante post sin, li vidis ilin trenataj al la *cabildo*, al la karcero. Tial restis nenio alia al li krom reiri kaj same kuniri al la *comandancia*.

Kiam li iris en la policejan komandeton, la policianoj liberigis la knabojn kaj tiuj fulmrapide kuris al sia patro kaj kroĉiĝis al ties gamboj, serĉante protekton.

Viro, kiu sidis enuante post tablo kaj rigardis tra la malferma pordo sur la placon, ĉar li ne sciis kion fari, diris dormeme: „Atendu, chamulano, ĝis alvenos *don*

Gabriel, kiu akuzas vin.“

En la portiko de la *cabildo* staris benkoj apogataj de la konstruaĵaj muroj. Tie sidis la homoj, kiuj devis atendi ĝis oni vokos ilin. En la konstruaĵo troviĝis krom la *municipalidad*, la komunuma administrejo kaj la polica komandejo ankaŭ la civila juĝisto, la esplorjuĝisto, la impostoficejo de la ŝtato, la impostoficejo de la federacia registaro kaj la *Registro Civil*, la oficejo pri civila stato. En la vasta interna korto de la konstruaĵo estis ankoraŭ pluaj oficejoj. Tie troviĝis ankaŭ la *calabos*, la karcero de la polico.

Sur unu el la benkoj, proksime al la enirejo de la polica komandejo sidis nun la policianoj, kiuj tie atendis pluajn ordonojn. Dum certa tempo starinte en la antaŭĉambro, sen tio, ke iu okupiĝis pri li, Candido fine eliris kaj kaŭriĝis en la portiko. Forkuri li ne povis, ĉar la policianoj proksime sidis sur la benko.

Daŭris kvaronon de horo ĝis *don* Gabriel leĝere paŝante proksimiĝis. Li paŝis en la antaŭĉambron de la policejo kaj demandis la dormeman skribiston: „Ĉu *don* Alejo

estas ĉi tie?“ *Don Alejo* estis la polica komandanto.

„Momente ne, *don Gabriel*. Li foriris kun *diputado* por trinki aperitivon, apetitigilon. Sed baldaŭ li revenos.“

„*Bueno*. Mi revenos. *Hasta luego*.“

„Je via ŝatata servo, *don Gabriel*“, diris ĝentile la skribisto.

Ekstere en la portiko *don Gabriel* staris dum certa tempo, ekbruligis ege atente cigaredon, rigardis trans la placon, poste turnis la rigardon al la kaŭranta Candido kaj diris al li: „Ne forgesu tion, chamulano, de mi forkuras neniu. Ankaŭ vi ne. Tiun, kiun mi surhokigis, tiun mi firmtenas.“

Li etendis al la policanoj la pakaĵeton kun cigaredoj. Ĉiu el ili eltiris tre atenteme kaj kun longaj fingroj cigaredon kaj diris: „*Muchas gracias, don Gabriel!* Ni tre dankas!“

Dum li turniĝis por foriri, li diris preterire: „Kaj bone observu la chamulanon, *hombres*.“

„Ne zorgu, *don Gabriel*, li ni forkuros de ni.“

Candido tiris la sakon al si, en kiu li portis la porkidojn. Li malfermis iom la sakon, permane kaptis en la sako la junajn bestojn kaj mankaresis kaj frapetis ilin. La porkidoj kvikis kaj provis grati sin tra la aperturo de la sako eksteren.

„Ne tiom malpacienca, petoluloj“, diris Candido. Poste, turnante sin al siaj du knaboj, li opiniis: „Tiuj ja vere estas viglaj kaj sanaj. Ili fariĝos bonaj grasaj porkoj.“

„Certe, *tate*“, respondis la knaboj samtempe, „ili estas tre lindaj bestetoj.“

Candido elvolvis kvincentavan moneron el sia lana zono kaj diris al sia plej maljuna filo: „Angelino, jen, prenu tiun *quinto*, kaj kuru preter tiun angulon tie, jen la foirplaco, kaj aĉetu por la kvin centavoj maizon; mi donos al tiuj malsataj etuloj manĝon.“

La knabo forsaltis. Post kelkaj minutoj li revenis, portante la aĉetitan maizon en sia mallonga lana ponĉo. Al la indiĝenoj, kvankam ilia mono estas same tiel bona kiel tio de la *ladinos*, oni nenion volvas en paperon, oni ankaŭ ne

donas papersaketojn al ili. Ja por kio? Li povas ŝuti la aĉetitan en sian ĉapelon, ĉu sukeron, ĉu salon, ĉu kafon aŭ en sian ponĉon aŭ li povas fermŝnuri sian pantalonon malsupre kaj plenigi ĝin per la varo. Indiĝeno ne atendis alian priservadon ĉe la komercisto, kvankam sen la indiĝenaj aĉetistoj la tuta komerco de la urbo pereus kaj ĉiuj komercistoj malsatmortus, ĉar la indiĝenoj, kiuj ĉiusemajne aŭ dufoje en monato venas en la urbon por komerci, estas dudek mil aŭ eĉ dudek kvinmil; laŭkvante ili estas duoble tiom, kiom la tuta loĝantaro de la urbo, kiu vivas pere de ili.

Rimarkoj

cabildo = urbodomo, municipa sidejo aŭ municipa organizaĵo,
ankaŭ = carcerero

Comandancia de Policia = Polica komandejo, policejo

diputado = deputito, parlamentano

hasta luego = ĝis baldaŭ

hombres = homoj, viroj

Municipalidad = municipo aŭ municipio, do urbodomo,
komunuma administrejo (urbo aŭ teritorio havanta relative sendependan registaron)

muy bien = tre bone

tate = patro

Kiam la porkoj manĝis kun apetito sian maizon kaj Candido kaj ties filoj plezure observis ilin, revenis la komandanto. Li ne observis la indiĝenon kaŭrantan sur la ŝtona planko, ĉar en la portiko dum ĉiu horo de la tago aŭ de la nokto ĉirkaŭkaŭradis kelkaj indiĝenoj, kiuj tie en la konstruaĵo ĉe la instancoj devis plenumi iujn aferojn kaj aliaj nur por ripozi aŭ atendi kunulojn de sia tribo, en kies komuneco ili intencis remigri en siajn hejmvilaĝojn.

Kelkajn minutojn poste aperis *don* Gabriel.

„Kiel vi fartas, *don* Alejo?“ li demandis.

„*Regular*, *don* Gabriel, ne malbone.“

„*Don* Alejo, mi havas tie ekstere chamulanon.

Enkarcerigu lin ĝis lunde. Mi pagos la nutradon.“

„Kiun akuzon vi havas kontraŭ li, *don* Gabriel? Sen akuzo mi ne povas enkarcerigi iun ĉi tie. M devas skribi ion en la libron.“

„Neplenurado de la kontrakto. Aŭ pli bone dirate:
Provita rompado de la kontrakto.“

„Tio sufiĉas.“ La komandanto elvokis: „*Un hombre*, unu viro, ĉi tien!“

Unu el la policianoj suprensaltis, kuris rapide al la pordo, salutis militece kaj diris: „*A sus ordenes, mi Jefe!*“

„Konduku la chamulanon ĉi tien, la chamulanon de *don Gabriel!*“

„*A sus ordenes, mi Jefe!*“ La policano iris al la pordo kaj vokis en la sama tono, kiel ĵus uzis ĝin la komandanto kontraŭ li mem: „He, chamulano, venu ĉi tien, kaj saltu, aŭ mi mem saltigos vin kaj viajn pigrajn gambojn.“

Candido saltis supren, fermŝnuris la sakon, en kiu kvikis la porkoj, prenis siajn sakon kaj pakon kaj sekvis la policanon.

„Kion vi tie havas en la sako, chamulano?“ demandis la komandanto.

„Junajn porkidojn, *Patroncito*, por plenkreskigi ilin.“

„Bone, kunprenu ilin en la internan korton.“ La komandanto ekvidis tiumomente ambaŭ indiĝenajn knabojn kun iliaj pakoĵ sur la dorso. Ili alvenis dorse de sia patro kaj staris proksime de liaj gamboj.

„Kion celas vi ĉi tie, *niños*?“ li demandis.

„Tio estas miaj du knaboj, viaj obeemaj servistoj, *Patroncito*“, diris ĝentile Candido.

Don Alejo rigardis *don Gabrielon*.

Don Gabriel ne embarasiĝis. „Estos plej bone, *don Alejo*, se vi kunenkarcerigos la knabojn. Solaj ili ne povos reiri en sian vilaĝon.“

„Tio estas ĝusta, *don Gabriel*. Sed kion vi faros kun la knaboj lunde, se la patro marŝos en la monterion?“

Don Gabriel ridis glugle. „Nu, kion ni do faru kun ambaŭ knaboj? La patrino estas morta. Mi pensas, ke ni povos fari nenion pli bonan ol sendi ilin kun la patro en la

monterion.“

La komandanto kapjesis konsente, rigardis la knabojn laŭ maniero, kvazaŭ li devus pensi en la sama momento pri dudek aliaj aferoj, kaj li diris: „Tio ŝajnas al mi esti la plej humana, *don Gabriel*, ke la infanoj ne estos disigitaj de la patro. Dum tio enkapiĝis al mi, *don Gabriel*, ke mi devas priparoli certan aferon kun vi. Ni iru transen en la kantonon de *don Ranulfo* kaj trinku glaseton da brando.“

„Volonte, tion mi ĉiam jesas, *don Alejo*.“ Ili forlasis la konstruaĵon kaj leĝere promenis transen al la kantino.

Sur la vojo diris *don Gabriel* al la komandanto: „Vi scias, *don Alejo*, ke mi enspezas monon, sed mi lasas enspezi ankaŭ aliajn.“

„Tion mi scias, *don Gabriel*. Kaj ĝuste pri tio mi volas paroli kun vi.“

„Kun plezuro, *don Alejo*, ĉiam je viaj tre ŝatataj servoj.“

Kiam ili malfermpuŝis la svingopordon al la kantino, diris la komandanto: „La knaboj estas sanaj kaj fortikaj. Kial ili

tute bone ne laboru kiel bovnutristoj aŭ kiel bovpelistoj, por helpi al sia patro. Tio estas kvazaŭ ilia devo, de Dio ordonita, al siaj gepatroj.“

„Tion ankaŭ mi pensis, *don Alejo*. Kaj krome tio estus krueleco senkompara, disigi infanojn de la propra patro.“

„Jen krueleco, por kiu ne ekzistas alia vorto krom: peko, kiu neniam pardoneblus, *salud, don Gabriel!*“

„*Salud, don Alejo!*“

La komiteko fulmis tra iliaj gorĝoj. Dum *don Gabriel* ankoraŭ suĉis je duono de citrono por postsendi al la brando delikatan guston, li vokis: „*Dos mas*, du pluajn *copitas, don Ranulfo*. Ĉi tie estas du soifaj *caballeros*, kun sekaj gorĝoj kaj kovritaj per polvo, pro longa rajdado tra la dezerto.“

Dum *don Ranulfo* turnis la dorson al ili, por kapti la botelon, diris *don Gabriel* rekte en orelon de la komandanto: „Dudek kvin pesoĵ, *don Alejo*. Mi pensas, ke tio egaligos nian kalkulon.“

„*Aceptado*, *don* Gabriel. Ĉiam je via servo, se mi povas fari ion por vi.“ Li ŝovis la monon poŝen, trinkis per unu gluto la enhavon de la glaso, pinĉprenis iom da salo, ŝutis ĝin sur mandorson, forlekis ĝin per larĝa lango kaj diris poste: „Malbenite, sed nun mi devas elkuregi. Mi petas pri pardono, *don* Gabriel, ke mi devas forlasi vin. Hasta luego, *don* Ranulfo.“

Li faris mangeston al la *cantintero* kaj kiel fulmo malaperis eksteren.

Rimarkoj

a sus ordenes = je via servo

cantintero = kantinisto

copita = brandoglaseto, glaseto por brando

niños = infanoj

regular = ne malbone, laŭkutime

Ĉapitro 03

01

Lunde la trupo ekmarŝis al la monterio.

Estis tridek kvin viroj, inter ili la du knaboj. Krome iris en la trupo kvar inoj, kiuj ne volis forlasi siajn virojn kaj tial marŝis kun ili en la monterion, sufiĉe kuraĝaj elteni ĉiujn suferojn de siaj edzoj kun ili komune, tiel montriĝantaj kiel veraj helpantinoj kaj kunulinoj.

Dum la marŝado, antaŭ ol la trupo atingis la grandan ĝangalon, aliĝis diversaj ne tre grandaj grupoj konsistantaj el viroj, kiujn *don* Gabriel varbis en la indiĝenaj vilaĝoj kaj en la bienoj, kiuj tenis sin pretaj por la tago, kiam la ĉefa trupo iros tra la regiono.

La trupo de la mahagonlaboristoj kreskis kun ĉiu mejlo, kiun ĝi marŝis plu. Kiam ĝi fine atingis la lastan setlejon enireje de la ĝangalo, la kvanto de la varbitoj estis cent dudek. Aldoniĝis dek kvar inoj kaj naŭ infanoj, kiuj ankoraŭ ne havis almenaŭ dek du jarojn. Infanoj, kiuj

ŝajnis esti pli maljunaj, ne validis kiel infanoj, sed jam kiel laboristoj kun duono de la salajro.

Estis akceptitaj ankaŭ tri strangaj junaj viroj, kiuj aliĝis, kiam la trupo jam forlasis unu el la vilaĝoj, tra kiu ĝi marŝis.

Kiam la uloj demandis *don* Gabrielon, ĉu li pretas kunpreni ilin al la monterio, *don* Gabriel rigardis ilin dum certa tempo kaj diris: „Se vi pretas diligente labori, mi tute bone povos dungi vin tie en la monterioj.

En vero li plej prefere ŝmace kiskus ilin, ĉar ili pligrandigis lian trupon je tri tiaj fortikaj viroj. Ili ne kostis antaŭpagon al li, neniujn elspezojn de iu ajn maniero, escepte de la kelkaj kilogramoj da nigraj faboj, kiujn ili manĝas dum la marŝo. Sed ili enspezis al li po viro kvindek pesojn da komisipago. Jen mono falinta el la ĉielo. Kompreneble li memgardis demandi ilin, kiuj ili estas kaj de kie ili venis. La nomojn, diritajn de ili, li skribis en siajn listojn sen eĉ per mieno aludi, ke li dubas pri la ĝusteco de tiuj nomoj.

Post ricevdonac' de graso koko ne demandu pri ties voko.

Strange aspektis la tri viroj, ĉar, laŭ aspekto, ili certe vagadis jam dum kelkaj semajnoj tie kaj tamen havis eĉ ne la plej etan faskan pakon ĉe si. Eĉ la plej povraj indiĝenoj varbitaj de *don* Gabriel portis sian pakon kaj evidentigis tiel, ke ili ie havas patrujon, kie ili je ĉiu tempo povas montri sin.

„Vi aspektas damnite ĉifonulaj kaj terure neprizorgitaj“, diris *don* Gabriel nur tial, por diri ion en ĉeesto de la *capataces* kaj rajtigi sin antaŭ ili kontraŭ la eblaj riproĉoj, ke li kolektas fuĝintajn prizonulojn de sur la strato aŭ eĉ pendigitojn tranĉas de la galgo por ricevi virojn. Li sciis la respondon, kiun li ricevos jam antaŭe. Kaj je lia granda kontenteco li ricevis tiun respondon efektive: „Ni atendis vin, patrono, ĉi tie jam dum kelkaj semajnoj por ricevi laboron en la monterioj. Ni aŭdis, ke vi ĉi tie tramarŝos ĉimonate. Sed ni ne sciis la tagon, kaj tial ni fordonis iom post iom ĉiujn niajn belajn vestojn por havi ion por manĝi.“

„Kompreneble“, respondis *don* Gabriel, „tio estas certe

komprenebla. Mi ne povas fiksi la tagon antaŭe, kiel vi certe mem bone povas imagi. Mi jen tie jen tie ĉi estas retenata, kaj tiel malfruiĝas la marŝo. Bone, mi kunprenos vin, sed nur pro pura kompato, kiel *un muy buen cristiano*, kiel bona kristano, ĉar mi ne povus respondeci tion, ĉi tie en la sovaĝejo lasi morti iun, kiu pretas enspezi sian monon per honesta laboro. Mi penos havigi al vi laboron en la monterio, mi tre penos. Ĉu mi sukcesos, ĉu ne, mi kompreneble ne scias. La monterioj havas amasegon da laboristoj, pli ol ili bezonas. Do, en ordo, vi kunmarŝu.“

La nomojn, kiujn ili diris, kaj kiujn *don* Gabriel skribis en la liston, estis: Martin Trinidad Castelazo, Juan Mendez, Lucio Ortiz.

Don Gabriel, same tiel bona negocisto kiel homkonanto, ne lasis konfirmi la kontraktojn de tiuj tri viroj de la instancoj en Hucutsin, kiel estis lia devo. Li ne skribis kontraktojn por ili kaj tiel ankaŭ ne rigardis ĝin sia tasko prezenti la virojn en la Municipalidad. Nur tiu, kiu posedas kontrakton, povas ricevi konfirmon de la kontrakto. Li trovis ĝin pli prudenta kaj pli saĝa

rekomendi al la tri viroj restadi sur la kampadejo de la trupo ekstere de la urbeto, kaj sin ne antaŭŝovi nenecese kaj frapi la atenton. Li konis siajn laboristojn ĝisdetale kaj tial li ankaŭ sciis, ke tiuj tri viroj ne forkuros de li, ĉu kun kontrakto ĉu sen kontrakto. Kion ili faros en la monterio, se ili estos kondukitaĵ tien, ne plu interesos lin, tuj kiam li havos la komisipagon por la transdono de la viroj enpoŝe.

Kiam la trupo marŝis al Hucutsin, sidis vojrande kelkcent paŝojn antaŭ la unuaj domoj de la urbeto juna indiĝena knabino.

Ŝi estis nudpieda kaj apud si ŝi havis pezan pakon.

En la momento, kiam la unuaj homoj de la trupo venis el la vepro, eksaltis la knabino kaj kuris al monteto, de kie ŝi bone povis transrigardi la trupon, kiu kun ĝia tuta longo devis pretermarŝi ŝin.

Per rapidaj okuloj ŝi rigardis ĉiun vizaĝon, kiu videblis de la preterirantoj. La viroj, klinitaj teren pro sia pako, iris lace kaj kurbigite. Per siaj brakoj ili kovris parte siajn vizaĝojn, ĉar ili havis siajn manojn sur siaj tempioj por teni sufiĉe loze la portajn rimenojn, kiuj etendiĝis trans iliajn fruntojn, por ke iliaj tempioj ne estu tro dure kunpremitaj, kio kaŭzas fortajn dolorojn. La larĝa dura rimeno sur la frunto kunpremis la kapon pro la peza ŝarĝo, kiu pendis je ĝi, post kelkaj horoj da marŝado en la montara tereno, kvazaŭ kiel fera ringo, kiun oni lante, sed

kontinue kunŝraŭbas ju pli dure des pli longtempe daŭras la marŝo.

Tial necesis la tuta atentemo de la knabino por ekkoni la vizaĝojn de la homoj.

Pli ol duono de la trupo jam preterpasis ŝin, kaj ŝi rigardis laŭlonge de la trupo, parte kun seniluziiĝo, parte kun espero. Sed kaj espero kaj seniluziiĝo estingiĝis en ŝiaj okuloj, kiam ŝi subite rektiĝis, ambaŭ brakojn ĵetis aeren kaj vokis: „Candido, *mi querido hermano*, mia amata frato!“

Candido, trotante profunde kliniĝante kaj rigardante sur la vojon, ekskuiĝis etan momenton. Dum ono de sekundo li faris la impreson, kvazaŭ li volus halti. Sed poste li ree trotis kiel kutime. Apud li marŝis liaj du filoj portantaj pakojn kiel la patro, kaj kiel li kliniĝinte marŝante, liajn paŝojn kaj gestojn fidele imitantaj, kun la espero, ke ĉiuj viroj de la trupo rigardos ilin kiel plenvvalorajn virojn.

Kiam la knabino vidis, ke ŝia voko ne estis atentata de tiu, kiun ĝi celis, ŝi kuris kelkajn paŝojn laŭ la trupo

antaŭen, por esplori pluan fojon la vizaĝon de tiu, kiun ŝi alvokis. Kiam ŝi jam antaŭis kelkajn paŝojn, ŝi grimpis de la monteto malsupren, saltis antaŭ Candidon kaj vokis: „Candido, kara frato, ĉu vin ne konas min?“

Nun Candido rektiĝis, haltis kaj gapis al la knabino kvazaŭ li rigardus tra nebulo. Sed samtempe liaj du filoj lasis malsupren gliti siajn pakojn, kuris renkonte al la knabino kaj vokis ĝojigite: „*Tia Modesta*, onklino Modesta!“ Ĉiu el ili kaptis manon de la knabino kaj kisis ĝin.

Candido ankoraŭ restadis dum kelkaj sekundoj en sia mirigiteco, dum la trupo senzorge marŝis plu, kaj nur kelkaj el la viroj, kiuj estis plej proksimaj, rigardis supren dum kvarono de sekundo. Ili ĉiuj estis tro lacaj por interesiĝi pri io, kio ne koncernas ilin mem.

Nun Candido iris flanken kaj el la taĉmento. Li surgenuiĝis por povi lasi gliti la pakon malsupren. Tuj kiam la pako tuŝis la teron, kvikis la junaj porkidoj, kiujn li ankoraŭ tiam portis ĉe si, ĉar li ne sciis kie postlasi ilin, ĉar oni ne permesis al li iri hejmen al sia magra korteto,

paroli kun siaj najbaroj kaj amikoj kaj konfidi al ili sian havaĵon.

Li rektigis sian dorson kaj poste rigardis al sia fratino. Ankaŭ tiumomente li ankoraŭ ne tute kapablis kapti, ke ŝi tie kaŭras apud li kun karno kaj animo. Sed la ĝojo kaj ekscito de liaj knaboj, kiuj amis sian junan onklinon kun la tuta pasio, kiun sentas infanoj al familia membro, kiu laŭaĝe pli proksimas al ili ol la patrino, kaj kiu pli dorlotas ilin ol la propraj gepatroj, tute vekis Candidon kaj konvinkis lin, ke lia fratino vere tie sidas apud li.

Modesta estis la plej juna infano de liaj gepatroj. Li, kiel la plej maljuna filo, denaske speciale preferis la fratinon, kion li praktike povis esprimi, kiam lia patro mortis sekve de vundo kaŭzita de falo en abismon, kaj kiam li fariĝis la familia estro. Lia patrino mortis jaron poste je variolo kaj postlasis lin do kiel ununuran prizorganton de lia fratino. La du pli aĝaj fratinoj edziniĝis al indiĝenaj etkamparanoj, al *campesinos*, kaj vivis en ties vilaĝoj.

Estis Modesta, kiu urĝis sian fraton Candido, ke li edziĝu; sed pro ŝi li hezitis dum longa tempo.

Sed kiam Candido poste mem pensis pri tio edziĝi, elekti pecon da tero kaj fondi propran familion, li serĉis por Modesta servknabinan okupon ĉe komercisto en Jolatepec, kie ŝi ricevis nur du pesojn da salajro ĉiumonate, sed pro tio ŝi ricevis la permeson viziti sian fraton dufoje ĉiumonate. Plej ofte fariĝis kompreneble nur unu dimanĉo en la monato, ĉar la edzino de la komercisto, kiel tio okazas ĉie, ŝi ĉiam trovis kialon pretendi la liberajn dimanĉojn de la knabino por si mem,

por laŭdire nepre necesa laboro aŭ tial, ĉar ŝi devis viziti iun aŭ atendis gastojn.

Almenaŭ tiuj malmultaj dimanĉoj sufiĉis por tio, ke Modesta pli kaj pli sentis emon al sia frato kaj ties edzino. Kiam naskiĝis la unua knabo de Candido, ŝi komencis adapti sian personan vivon tute al sia frato kaj al ties infanoj. Ŝi pensis, ke ŝi entute vivas nur je la dimanĉoj en la domo de sia frato, kvankam tiu domo estis simpla memkonstruita argila kabano enhavanta nur unu ĉambron, dum la domo, en kiu ŝi servis, kompare al la kabano nomeblis palaco. Estis antaŭdireble, ke Modesta verŝajne neniam edziniĝos, nur por ke oni ne disigu ŝin de sia frato kaj de ties familio.

La lastaj homoj de la taĉmento marŝis nun tie preter la kaŭranta grupo. Post ili rajdis Epitacio, unu el la *capataces*, kiu troviĝis fine de la taĉmento kaj devis peli la postirantojn.

„*Olla*, chamulano. Ek! Ek! *Corre, corre!* Kuru! Kuru!“ li vokis al Candido. „Tuj ni estos en la *campo*, en la kampadejo. Tie vi povos kaŭri sufiĉe longe kaj varmigi viajn pigrajn postaĵajn partojn. Antaŭen, antaŭen, *adelante, adelante!*“

Li knaligis la vipon enaere kaj vokis poste al alia viro, kiu simile kaŭriĝis por ordigi sian pakon.

Candido streĉis la portan rimenon sur sia frunto kaj rektiĝis. Liaj knaboj prenis siajn pakojn. Modesta rekuris al la loko ĉe la vojo, kie ŝi demetis sian pakon, ŝi ŝovis sian kapon tra la porta maŝo, per elastaj ritmaj movoj de sperta portisto levadis siajn genuojn kaj repoksimiĝis al Candido.

„Ĉu vi iras al Hucutsin, *hermanita*, fratineto?“ demandis Candido, kliniĝinte kaj pezpaŝe trotante sub sia pako.

„Jes, frato, mi iras al Hucutsin.“

„Jen do vi trovis tie novan bonan okupon, ĉu? Hucutsin, tiel diras al mi miaj kamaradoj, estas multe pli grandega ol Chamo kaj simile tiel granda kiel Vitztan. Jen vi certe ricevos pli da salajro ol ĉi tie pagis *doña* Paulina al vi en tiu eta pueblo.“

Modesta diris nenion, ĉar ĉiuj iris nun per rapidaj paŝoj por reatingi la taĉmenton.

La trupo marŝis tra la urbo, kie ĉiuj enloĝantoj staris en la pordoj kaj antaŭ la domoj kaj rigardis la lace preterirantajn indiĝenojn kun simila ekscitiĝo kiel aliloke oni kutime gapas al tramarŝantaj soldatoj.

Tiu trupo de varbitaj laboristoj signifis bonajn negocojn por la tuta loĝantaro; ĉar ĝi estis la lasta urbeto antaŭ la ĝangalo kaj per tio la lasta okazo por aĉetoj fare de la mahagonularo. Tie la varbitoj krome ricevis sian lastan kontantan monon kiel antaŭpagon por siaj kontraktoj.

Ekde tiu momento ili ne plu vidos monon ĝis la tago, kiam ili revenos ĉi tien. En la ĝangalo oni povas aĉeti nenion kaj tial mono estas tie sen valoro. Tio estis la kaŭzo, kial la homoj elspezis nun sian tutan monon, kiun ili tie ricevis aŭ ankoraŭ portis ĉe si. Tial ne estis miraklo, ke la komercistoj de la urbeto salutis kun entuziasmo kaj varma bonfarta sento en la stomako la alvenon de la tramarŝantaj kontraktlaboristoj.

Kompreneble, la taĉmento ne haltis, sed estis kondukata al la granda kampadejo, al ŝtoneca herbejo kun magraj herboj, oriente de la urbeto. Foje alveninte sur la kampadejo, oni tiam alvokis la virojn por iri al la *cabildo* kaj stampigi de la urbestroiliajn kontraktojn. Intertempe aŭ poste ili laŭplaĉe povis promeni kaj plenumi siajn aĉetojn kaj siajn personajn aferojn.

Kiam Candido, ree marŝante en la taĉmento, kun Modesta apud si, sekvate de siaj knaboj venis al la lastaj domoj de la urbo kaj tie jam povis vidi la tomboŝtonojn kaj la vastan kampadejon, kiu troviĝis post la tombejo, li demandis: „Kie estas la domo, en kiu vi laboros? Mi pensis, ke vi laboras ĉe familo de komercisto ĉe la foirplaco.“

Ŝi eligis sonon, kiu sonis kiel ĝemeto kaj diris: „*Caray, por Jesu Christo*, la pako komencas premi. Bone, ke ni estas en la *campo*.“

Silente Candido ekbruligis fajron.

„Mi helpos al vi, frato“, diris Modesta. „Mi longe ripozis ĉe la vojo kaj mi ne estas tiel laca kiel vi.“ Ŝi tiris la kafokruĉetojn kaj la argilajn pelvetojn el la pako kaj komencis kuiri kafon kaj varmigi la fabojn kaj la tortiljojn. „Vi ambaŭ“, ŝi vokis al la knaboj, „serĉu lignon kaj alportu akvon!“

Candido, kaŭrante surtere kaj rulumante cigaron, observis sian fratinon dum kelke da tempo. Poste li ekstaris. „Mi iros al la pueblo kaj aĉetos maizon por la porkidoj. Ili malsatas kaj tial krias.“

Li serĉis kejloforman pecon da ligno, pelis ĝin per batoj en la teron, firmligis per forta ŝnureto ĉiun porkidon je la postkruroj kaj kunigis la finaĵojn per bona nodo je la fosteto. La porkidoj, kiuj dum la longa tago, pendis en formo de bulo kunsakuitaj en la sako sur la dorso de Candido, etendis siajn kruretojn, gruntis kaj kvikis pro vivoĝoj kaj komencis tuj elŝiri herbotufojn, trafosis la teron kaj mordis sin reciproke pro ĉiu putrinta radiketo, kiun ĉiu el ili elskrapis.

Kiam Candido revenis kun la maizo kaj antaŭĵetis ĝin al la bestoj, li observis ilin dum kelke da tempo, fumis sian cigaron kaj diris: „Estas damnite bonaj manĝuloj, *los cochinitos*, ili baldaŭ fariĝos grandaj kaj grasaj.“

Poste li rigardis supren kaj faris geston kvazaŭ li vekiĝus. La manipulojn de sia fratino ĉe la bivakfajro li rigardis kvazaŭ li devus peni por rememori, kie li estas kaj kiel li

venis tien.

„Pretas“, ŝi diris, „*listo*“. Tuj poste ŝi vokis: „*Muchachos, hijos!*“ al la du knaboj, kiuj iris al alia fajro, kie ili observis, kiel indiĝeno tiris la felon de leporo, kiun li ĉasis en la marŝo, kaj kiel li pretigis ĝin por la vespermanĝo.

La kvaropo sidis ĉirkaŭ la bivakfajro kaj manĝis sian simplan manĝon. Candido trinkis la lastajn glutetojn de sia kafo, prenis cigaron, kiun li rulumis antaŭ la manĝo, ekbruligis ĝin per ardanta branĉeto kaj elpuŝis kelkajn dikajn nubojn.

Modesta elŝutis la kaforekrementon kaj lavis la pelvetojn. Poste ŝi prenis el saketo tabakon kaj rulumis el maizfolio cigaredon por si.

La knaboj laciĝis kaj etendiĝis ĉe la fajro. Modestas kovris ilin per ĉifonita lankovrilo, kiun ŝi prenis el la pako de la pli maljuna el ambaŭ knaboj.

„Fariĝas malfrue, fratineto“, diris Candido meze de longa ka profunda silentado. „Eble estos pli bona, se vi nun reiros al viaj novaj gemastroj.“

„Mi povos ekiri ankaŭ morgaŭ, frato“, respondis la knabino. „Mi povas ekiri nur je tiu mateno, kiam vi ekmarŝos de ĉi tie. Certe vi ekmarŝos ene de du tagoj.“

„Jes, en du tagoj, diris *don* Gabriel al ni.“

„Mi povos iri al la novaj gemastroj tiam, kiam mi volos, frato, ĉar ili ne scias, kiam mi venos al ili, ĉu jam hodiaŭ ĉu nur en la sekva semajno.“

Candido kapjesis: „Laŭ via plaĉo, fratino.“

Denove ili silentis dum longa tempo. La nokto alvenis, peze kaj kun forto. Subite, kiel martela bato, ĝi falis malsupren. Kaj ankoraŭ nun ili ambaŭ sidis ĉe la fajro, fumis kaj mediteme rigardis la ardeton.

Ĉirkaŭ ili en ĉiu direkto brulis kaj ardetis bivakfajroj. Apud ili kaŭris la viroj, babilis, ridis, kverelis, sed la plej multaj silentis. Pli kaj pli da ili kvazaŭ kunkaŭris en sin mem aŭ kunruliĝis kiel hundoj por dormi, por teni sin varmaj sub siaj mincaj kaj truigitaj kovriloj. La nokto komencis fariĝi frideta, ĉirkaŭ la arbustoj ĉe la limoj de la kampo blovis la unuaj mincaj vualoj de ondantaj nebuloj. Nuboj surĉielis, tie kaj tie malfermŝiritaj de truoj, en kiuj brilis steloj. La pluvosezono estis proksima. De la urbetoj transsonis de tempo al tempo necertaj laŭtaj voĉoj de

homoj, kiu ŝajne estis gajaj. El angulo de la kampadejo aŭdeblis la melankolia muziko de buŝharmoniko; de la loko antaŭ la katedralo zumis iam kaj tiam melodio ero ludata per marimbo. En la vepro transe de la kampadejo perdiĝis la veaj krioj de ektimigita aŭ persekutata birdo enmeze de centvoĉa ĉirpado kaj flutado de cikadoj kaj griloj, kiuj emis geedziĝon.

La bivakfajro, apud kiu sidis Modesta kaj Candido, transiĝis en malhele ruĝan ardetadon, kiu ne disvastigis lumon. Candido kunskrapis kelkajn branĉetojn, disprompis ilin kaj ŝovis ilin en la etan ardon. La fajro eĉ pli malheliĝis kaj nur fulgis plu. Li blovis en ĝin kaj flamo kaptis sekan branĉeton, kiu ekflamiĝis kun mirigita kraketo, ĉar ĝi estas sola kaj tial ĝi tuj retiriĝis en la mordantan verdan fumon, kiu malvolonte leviĝadis kaj malleviĝadis tie kaj tie.

„Mi venis al vi je dimanĉo por viziti vin kaj la infanojn“, diris subite Modesta. Ŝia vizaĝo apenaŭ ekkoneblis, kvankam ŝi estis disigita de sia frato nur je bivakfajra larĝo aŭ je futo da tero.

Candido suĉis sian cigaron sen respondi ion.

„Laŭro, via najbaro, kiun mi demandis, diris al mi, ke vi kaj viaj infanoj estas en la karcero en Jovel. Krome li sciis nenion. Mi poste iris plu sur tiu vojo, kie mi renkontis Manuelon, kiu tagon antaŭe revenis de Jovel.“

„Manuel vidis, kio okazis al mi, ĉar li estis antaŭ „*El Globo*“, kiam alvenis *don* Gabriel kaj ordonis al mi, ke mi pretigu min por la ekmarŝo je lundo.“ Candido parolis tion kvazaŭ kiel el rememoro, kvazaŭ tio okazis jam antaŭ multaj jaroj.

„Jes, tion Manuel rakontis al mi, kaj mi sciis, ke vi ne revenos. Tial mi kuris rapide al onklo Diego kaj raportis al li. Kaj onklo Diego venis. Li zorgos pri viaj domo kaj agro, kaj li tie loĝos kun la onklino, ĝis vi revenos. Por ke via domo kaj via *milpa* kaj viaj kaprinoj kaj ŝafoj ne perdiĝu. Kuzo Emiliano transloĝiĝis nun kun sia edzino en la domon de la onklo; li facile povos zorgi pri sia kampo kaj pri tiu de la onklo. Sian dometon li fermis.“

„Tiel mi ĉion tion atendis, kiam mi kuŝis nokte en la korto

de la karcero kaj ne povis dormi kaj pensis pri tio, kio hejme okazos, se mi ne revenos.“

„Jen la ununure ebla kaj tute memkomprenebla, kion ni faris“!, parolis Modesta, kvazaŭ ŝi parolus pri reordigoj, kiuj okazas en domo, se la familio revenas de la entombigo de l' patro aŭ de l' patrino.

Estis la tono en la voĉo de sia fratino, kiu Candidon instigis diri: „Mi ĝojas, ke Marcela estas morta, nun mi estas tre ĝoja pri tio. Ŝi ne scias, kio okazas ĉi tie kaj ŝi ne vidas ĝin. Kiel malĝoja ŝi estus, se ŝi devus travivi ĉion tion kaj ĉiam pensi pri tio, ke mi devis vendi min en monterion por savi ŝian vivon. Mi ne scius, kion fari por gajigi ŝin. Ŝi tamen mortus pro aflikto kaj enkoraj suferoj.“

„Ŝi povus iri kun vi en la monterion, por esti ĉe vi.“

„Tion mi ne permesus al ŝi. Mi serĉus amikon, bonan viron, kaj dirus al li, ke li edzinigu ŝin, por ke ŝi havu protekton kaj ne estu sola. Ja kion ŝi povus fari tute sole dum tiom da jaroj?“

„Ŝi neniam prenis alian viron, frato, tion mi scias. Mi irus al ŝi, kaj ni kultivus la agrojn kaj flegus la kaprinojn kaj ŝafojn, por ke vi trovu bonstatan domon, kun grandaj kaj belaj filoj, se vi iam revenus. Ni atendus vin kaj pensus pri vi, tage kaj nokte. Ni konstruus altaron en angulo kun lampeto kaj Sankta Virgulino, antaŭ kiu ni preĝus ĉiuvespere kaj ĉiumatene por via sana reveno.“

Candido ŝovis kelkajn freŝajn branĉetojn en la bivakfajron. La fajro estis tro malgranda por varmigi ilin; kaj ĝi apenaŭ lumis. Sed ĝi disvastigis ĉirkaŭ si familieran intimecon kaj vekis en ambaŭ la bonfartigan senton de sekureco, tiel, ke ili dum kelkaj horoj forgesis sian aktualan sorton kaj siajn afliktojn. La ĉirkaŭo, la ceteraj bivakfajroj kaj la kaŭrantaj, ripozantaj aŭ ĉirkaŭvagadantaj kunuloj, kies figuroj laŭforme estis pli senkonturaj ol ombroj; krome interparoladoj, voĉoj kaj voko de tempo al tempo aŭdeblaj, ekŝvelis kaj poste en la nokto perdiĝis kiel elspiroj, kvazaŭ ili neniam estus ekzistintaj; la seninterrompa ĉirpado kaj violonado de la vepro kaj la hurletanta lamentado de la herboj en la kampadejo; ĉio ĉi unuiĝis por Candido kaj Modesta en

ununuran tonon kaj sonon kaj al ununura amaso, interne de kiu ambaŭ sentis sin solaj, kaj ligitaj nur per la komuna fajro al unu kaj sama mondo. La knaboj ekmoviĝis en la dormo kaj tiris la kovrilon pli proksimen al si. Unu el ili iom ekĝemetis, la alia babilis kelkajn nekompreneblajn vortojn en siaj sonĝoj; poste ambaŭ ree trankvilis.

Modesta tiris la kovrilon ankoraŭ eĉ pli dense sur ilin. Ŝi faris tion kvazaŭ kun patrino gesto, ne tial, ĉar la kovrilo eble tralasus fridetan blovon de vento al la malgrandaj duonnudaj korpoj de la knaboj, sed por sentigi al la infanoj en ties dormo, ke karesema mano zorgas pri ilia bonfarto.

„Morgaŭ vi komencos vian servon, *hermanita*“, diris Candido post longa silentado.

Modesta eltiris maizfolion, glatigis kaj kurbigis ĝin kaj ŝiradis je ĝi, ĝis ĝi havis la necesan grandecon. Poste ŝi ŝutis tabakon sur la folion kaj rulumis novan cigaredon. Ŝi faris tion tre lante, kvazaŭ ŝi volus produkti precipe akurate rulumitan cigaredon.

Kiam la cigaredo finfine ardetis kaj ŝi fumis kelkajn spirfojojn, ŝi lasis sinki la manon, en kiu ŝi tenis la cigaredon, sur unu el siaj genuoj kaj ripozigis ĝin tie. Ŝi rigardis preter sian fraton kaj turnis sian rigardon al la vepro, kies ombro laŭ zigzaga linio konturiĝis kontraŭ la areoj de la morna ĉielo, kiuj estis liberaj de nuboj kaj montris stelojn.

Ŝi profunde enspiris kaj diris poste: „Mi ne komencos iun servon, frato. Mi rezignis pri mia servo ĉe la ladinoj. Mi iros kun vi al monterio. Mi havas ja nun nur ununuran servon, kiu estas pli grava ol ĉio alia krom tio, kio koncernas min mem: la servo por vi kaj por viaj infanoj.“

Candido klinis sian kapon profunde kontraŭ la fajro kaj diris mallaŭte: „Tion vi ne estu farinta, fratineto. La monterioj ne estas por inoj kaj plej malmulte por junaj inoj. Kvankam mi ne povas ordoni al vi, mi ja tamen konsilas al vi iri reen. Se vi ne volas labori por ladinoj, vi bone povus loĝi en mia domo kun la onklo, ĉar mia domo estas ankaŭ via, kaj vi havas rajton labori tie.“

„La saman diris ankaŭ la onklo al mi, kaj ankaŭ la onklino

kaj ĉiuj najbaroj. Sed kiam ili ĉiuj konsilis al mi la saman, mi tamen pli kaj pli havis la senton, ke mi ne povus elteni ĝin tie loĝi trankvile kaj en paco, ke mi nun devos iri kun vi kaj la infanoj, ĉar trafis vin malfeliĉo.“

„Vi ne scias, kiel dura estas la vivo en la ĝangalo, sed eĉ pli en la monterioj. Vi estas juna knabino, kaj ĉirkaŭ vi estos preskaŭ nur viroj, kaj neniuj bonaj.“

„Ĉion ĉi oni diris al mi, kiam mi survojiĝis. Sed ĉu ĝi estis dura por vi, kiam vi zorgis por mi, kiam mi estis malgranda kaj senhelpa kaj havis nek patron nek patrinon? Kiel ĝi nun povus esti dura por mi, helpi al vi kaj esti je via flanko, kiam viaj du infanoj estas malgrandaj kaj ne havas patrinon! Iutage ni revenos, kaj se mi vidos vin ree en via domo, tiam mi estos plenuminta tiun servon, kaj vi povos helpi trovi al mi viron, kiu estas tiel bona kiel vi!“

Nenion plu ŝi diris. Ambaŭ tiris siajn lankovrilojn pli proksimen al si, fumis, rigardis al la lace ardetanta fajro kaj atendis la matenon.

La mateno alvenis heziteme, kun fridaj, malsekaj, pezaj nuboj, kiujn ĝi skuis sur sia vojo ĉagrenite tien kaj tien, kvazaŭ ili estus vestoj molestaj, sed kiujn ĝi tamen haste tirus en la vepron aŭ faligus sur la prerion, kiam aperis Suno. Sen antaŭa anonciĝo ĝi subite ĉeestis, kvazaŭ ĝi per salto estus naskita universen.

Rimarko

milpa = kultivita terpeco, sur kiu oni plantas ekz. maizon, fabojn kaj kukurbojn

Ĉapitro 04

01

„Diodamnitaj putinfiloj pigraj kaj per pedikoj kovrataj, kotaj kaj stinkantaj friponoj, vi ŝtelas el miaj poŝoj mian tutan belan, dolĉan monon malfermskrapitan sub ŝvito kaj sango kaj vezikoj kaj sidadas ĉi tie, drinkas kaj diboĉas kun putinoj, kaj ĉio por mia mono, kaj eĉ ne unu diobenita ekveturigo sukcesis al vi ene de tri longaj eternaj monatoj, de Dio donacitaj al vi, pestdifektitaj banditoj, por labori, por labori por mi; ĉar Dio kaj Sankta Virgulino vere scias, ke mi pagas al vi vian salajron, mi eĉ ne ŝuldas al unu el vi, trivitaj putinemuloj, favan centavon. Mi neniam havis ŝuldon al iu je daŭro, se li faris sian laboron laŭorde. Kaj ĉi tien mi venis post tri longaj kaj belaj monatoj, post dek kvar semajnoj aŭ ĉu estas dek kvin da ili? Kaj eĉ ne unu kurba trunketo da mahagono inda almenaŭ je mencio per prihakita silabo, estas ekvidebla ĉe la *tumbos*. Kaj mi, honesta viro, kiu mi estas, pensis, ke ĉi tie ĉe la *tombos* la mahagontrunkoj estas suramasigitaj montare alte, aŭ almenaŭ tiom alte, kiom la katedralo de Villahermosa. Kaj kion mi trovas?

Etan tavolo da mahagontrunkoj, tiel aĉaj, ke ankaŭ elmalsatigitaj formikoj altrenus ĝin por mi, kaj pli bonajn kaj pli da ili, por botelo da miela akvo. Jes ja, ĉe ĉiuj sanktuloj en ĉiuj ĉielo kaj inferoj, kion vi, diodamnitaj stratrabistoj, nomataj *capataces*, fakte ĉi tie faris? Krom diboĉi kun putinoj, kraĉadi nazmukon kaj drinkadi aŭ eterne fekadi? Ek do, diru do! Kaj ne mensogu al mi! Aŭ, ĉe Sankta Virgulino, mi batos viajn dentojn en viajn faŭkojn tiel, ke ili elglitos poste sube el viaj piedfingroj! Diodamnitaj kaj pestdifektitaj *golfos* kaj seksperfortuloj de kadavroj! He, ĉu vi fine foje respondos?!“

Ĉion tio elpafis *don* Ŝevero al siaj du *capataces*, El Picaro kaj El Gusano sen eĉ unufoje fari nodon per la lango. Li kriis tion tiel laŭte en la aeron, ke ĉiu, kiu troviĝis en distanco ĝis du kilometroj, povis bone kompreni ĝin. Kaj tiu, kiu komprenis ĝin, ne pli longe bonfartis, sed sentis, ke ie en ties stomako aŭ en ties proksimeco io tordiĝas kaj nodiĝas. Per ĉiu vorto, kiun li elkanonigis, lia vizaĝo fariĝis pli ruĝa kaj pli ŝvelanta. Eble li pensis, ke lia vizaĝo tuj krevus, ĉar li lastfine finis sian paroladon, tamen kun paroltono, kiu sendubeble ekkonigis, ke temas nur pri

provizora parolfino, kaj, ke la parolanto atendas nur la respondon de siaj du subestroj por preĝi novan, eĉ pli bonan kaj eĉ pli belan vicon de kvazaŭaj perloj el sia riĉa vorttrezoro.

Don Severo estis la plej aĝa el la tri fratoj *Montellano*, la posedantoj de la granda monterio tie ĉi kaj ankaŭ de du pluaj pli malgrandaj sur la alia flanko de la rivero. Tiu plej granda kaj plej grava el la monterioj havis la nomon *La Armonia*; la du pli malgrandaj estis *La Estancia* kaj *La Piedra Alta*.

La Armonia ampleksis tiom vastan regionon en la ĝangalo, ke necesis disdividi ĝin en kvar distriktojn. *Campos Norte*, *Este*, *Sur* kaj *Oeste*, laŭ la ĉielaj direktoj, en kiuj ili troviĝis, rigardataj de centrala punkto. La limoj de la koncesio ne estis precize fiksitaj. Eĉ ne eblus fiksi ilin korekte, ĉar la tuta tereno estis nenio alia krom ĝangalo. La proksimumaj limoj de la koncesio estis difinitaj helpe de riveroj, kies fluo kompreneble same ne estis esplorita, sed kiuj almenaŭ povis marki la terenon. De unu limo ĝis la alia eble estis sesdek ĝis okdek kilometroj, kiuj kompreneble, se ili estis marŝataj aŭ

rajdataj, almenaŭ je duono plilongiĝis, ĉar la tereno el montoj, rokoj, marĉoj, ravinoj kaj riveroj ne permesis rektajn vojliniojn.

Don Severo administris *Campo Norte*. En ĉiu el la ceteraj tri *campos* li havis certan *capataz*, subestron, kun kiu li laboris jam multajn jarojn. Jen la administranto de la *campo*, la *mayordomo*, kiu havis siavice duan *capataz* kiel *ayudante*, kiel asistanton aŭ helpanton.

La dua frato, *don* Feliks Montellano, sidis kiel kontisto en la ĉef-oficinas de la administrejo aŭ *ciudad*, urbo. La administrejo ne troviĝis en la mezo de la monterio, sed ĉe tiu limo, kie estis la plej grava rivero, riverego, kiu flosigis la mahagontrunkojn al la bordo de la maro. La administrejo tie povis observi kaj kontroli ĉiujn preterirantajn flosojn kaj tiel bone kiel eblis taksi, skribi en kontojn kaj prikalkuli. Estis ankaŭ pli facile ekde la administrejo atingi la diversajn distriktojn per *canoes*, kanuoj aŭ *cayucos*, sekve de la multnombraj flankaj riveroj kaj flosigaj sulkoj, kiuj ĉiuj havis konekton kun la riverego, dum ĉiuj aliaj ligoj daŭrigeblis ofte nur tre malfacile. Kompreneble eĉ la komunikado per kanuoj

aŭ *cayucos*, kiel oni nomis ilin en vero, neniel ĉiam estis fidinda. Sed pro multaj kaŭzoj la fondintoj de La Armonia rigardis la lokon, sur kiu troviĝis la administrejo, la tielnomata urbo, kiel plej taŭgan kaj strategie plej favoran, kiam la monterio estis establita de kompanio. La fratoj Montellano aĉetis tiun La Armonia de la antaŭa kompanio, kiam la estraro de tiu kompanio transprenis aliajn negocojn kaj tial retiriĝis el ĉiuj monteriaj koncesioj, kiujn ĝi posedis.

La tria frato, la plej juna, *don* Acacio Montellano, transprenis la administradon de la du malpli grandaj monterioj sur la transa flanko de la riverego, ĉe tio sekvante decidon, pri kiu la tri fratoj interkonsentiĝis en interkonsiliĝo.

Don Severo, por la unua, havis en sia propra *campo* Norte sufiĉe da laboro, tiel, ke li ne povis inspekti ĉiam ĉiun duan aŭ trian semajnon la ceterajn tri kampadejojn; ĉar ankaŭ la vojo al la tri unuopaj *campos* estis tiom longdistanca kaj komplika, ke rondo tra ĉiuj tri kampadejoj, se li ne kunnombris sian propran, bezonis ĉirkaŭ du, ja eĉ tri semajnojn da tempo, precipe, se li

aldone en ĉiu *campo* vizitis la *tumbos*, la tumbojn, la lokojn, kie la mahagono en formo de trunkoj kuŝis surtavoligita kaj atendis la pluvsezonon, por forflosigo sur la ŝvelantaj riveretoj kaj riveroj ĝis la riverego. Tial *don Severo* devis kontentiĝi per tio, ke li faris inspektan vojaĝon nur ĉiun trian monaton. Tia vojaĝo tute ne estis plezuro. Ĝi estis, ĝuste kaj kompreneme rigardate, puno, kiu onin, se oni unufoje pentofare eltenus ĝin, antaŭ Dio tre facile rajtigus por pretendi eviti la inferon kaj esti akceptata en la paradizo kun ladomuziko. *Don Feliks* ne povis entrepreni tiun vojaĝon, ĉar li ne rajtis forlasi la administrejon, kiu estis cerbo kaj koro de la monterio. Tie oni eldonis la laborilojn, tie estis la stokejoj por ĉio, kion la monterio kaj ties centoj da laboristoj bezonis por la laboro, tien iris la komercistoj, kaj tie alvenis la poŝto kun leteroj de la kunaĉetistoj, kun fakturoj, kun skribaj demandoj de la impostoficejoj, kun raportoj de la bankoj kaj kun la specialinformoj de la agentoj en Nov-Jorko kaj en Londono, kiuj donis konsilojn rilate la mondomerkataj prezoj, kiuj sekvajare atendeblis por mahagono.

Pro sia laborenergio kaj sia sperto el multaj jaroj pri la

ekspluato de mahagono, *don* Severo ĉiurilate pli bone taŭgis por la administrado de la laboro kaj la havigado de mahagono ol *don* Feliks. Tial li transprenis la pli krudan laboron kaj translasis al *don* Feliks la pli agrablan postenon en la administrejo.

Don Acacio, kiu je sia fora posteno same tiel nelacigeble laboris, sed eĉ pli avide kaj pli kruele mastrumis ol liaj du pli aĝaj fratoj, de kiam la Montallanoj aĉetis la monterion, tute ne havis la eblon administri ion. Eĉ ne leteron li povis sendi pro la marĉigitaj padoj. Ĉu li vivis aŭ delonge putriĝis kiel kadavro, sciis neniu en la administrejo. Ke *don* Severo aŭ *don* Feliks entute estus tre afliktitaj, se ili subite ekscius, ke la frato *don* Acacio estas murdita aŭ mortaĉis je malario, aŭ estis vorita de jaguaro aŭ de pumo aŭ pikmortigita de venena skorpio aŭ glutita de marĉo – tio ne estas certa. Se li estus lasinta nur sufiĉe da mahagono ĉe la tumboj, jen la ununura ĝojo kaj la ununura ĝuo de la fratoj Montellano, ili verŝajne ne tre bedaŭrus lian tro fruan morton, des pli tial, ĉar la gajno estus dispartigita tiukaze anstataŭ en tri partojn nur en du. Ĉar la fratoj nur la enspezadon de mono

rigardis grava kaj nenion alian surtere, eĉ ne ekzistus la plej eta kaŭzo malĝoji pro la perdo de frato.

Rimarkoj

golfos = fivagabondoj, stratbuboj, friponoj

tumbo = tumbo = la loko, kie la trunkoj estas suramasigitaj ĝis komenciĝos la pluvotempo kaj pleniĝos la *arroyos* (la sekajn sulkojn de rivereto) per alta akvo kaj la trunkoj tiam povos flosi ĝis la transportriverego

Estis tie en la *campo* Sur, kie *don Severo* inspektis kaj kie li klarigis al la *capataz* El Picaro kaj al ties *ayudante* El Gusano, al la verno, sian ŝaton kaj amon. Je la frua mateno, kun El Picaro je la flanko, li entreprenis sian inspektadan rajdon tra la *campo*, kun la celo surskribi la toneladojn da hakita mahagono, kiuj, pretaj por forflosigo estis surtavoligitaj en la diversaj mahagonaj kolektejoj de la *campo*. Ĉe ĉiu tumbo, kiun li vizitis, kaj tuj kiam li sufiĉe ekzakte taksis la kvanton de la suramasigitaj *trozas*, de la trunkoj, kun rapida transrigardo, li vokis kolere: „Kaj tio estas ĉio, kion vi havas ĉi tie, post tri longaj belaj monatoj? *Dios mio*, Dio mia, kiel tio nur eblas, dum tri monatoj suramasigi bonŝance nur proksimume manplenon da ftizaj bastonetoj? Tio estas ja peko kontraŭ Dio kaj kontraŭ ĉiuj sanktuloj ĉirkaŭ li.“

El Picaro ĉe ĉiu tumbo donis la saman respondon: „Jen mankas ankoraŭ kelkaj tumboj, *don Severo*, kie mi multe pli da *toneladas* surtavoligis“.

Sed *don Severo* asertis, vidalvide kun ĉiu plua

mahagonkolektejo, kiun ili vizitis, ke tie estas malpli ol duono de la kvanto de la trunkoj, kiel en tiu tumbo, kiun ili ĵus inspektis. Tiel pligrandiĝis ĉe ĉiu plua inspekto de la sekva kolektejo kaj ekveturejo de mahagono la kolero de *don* Severo. Tiu kolero ŝanĝiĝis en sovaĝon, kiam ambaŭ post streĉa longa tagraĵdo tute lacigite alvenis en la *oficina* en la *campo*, kaj tie trovis El Gusanon kuŝanta sur la tero, kaj tiom draste ebria, ke li eĉ ne povis grunti plu.

Don Severo tuj sesfoje vipis lin per la selovipo. Sed El Gusano ne grumblis, ĉar li troviĝis en tiu momento en alia mondo, kie suferoj kaj afliktoj estas kiel siropo.

Tiam draŝis *don* Ŝevero per la vipo sur la krudan tablon, kaj ĉiun eron de sia parolo, kiun li volis kvazaŭ substreki per forto, emfazo kaj blasfemia sakrado, por tiel doni al ĝi eternecan valoron, li akompanis per duraj vipobatoj sur la tablon aŭ sur seĝon, kiu staris plej proksime de li.

„La intestojn mi devus tiri el via kadavro per ŝnurego, al vi ambaŭ, friponoj, ĉar tia pigreco eĉ en la infero ne pardonindus.“ Li pli kaj pli koleriĝis. „Ĉe l' diablo kaj ĉe

ĉiuj hundoj, kiuj voras puson, kion vi propre faris ĉi tie en la lastaj tri monatoj? Diboĉi kun putinoj, ĉu? Drinki, ĉu? Aŭ ĉu vi ŝtopis cindron en viajn nazotruojn kaj dorlote blovis cinamon en viajn postaĵojn? Aŭ kio krome? Fine ekparolu, do!“

El Picaro staris ĉe la alia flanko de la tablo. Li estis sufiĉe atentema por uzi la tablon kiel barikadon inter si kaj la muĝanta Severo. Kaj li turniĝis tiel, ke li ĉiutempe, se la afero vere tro ekbrulus, povus eskapi tra la pordo.

„Ekparolu, kanajlo!“

„La trunkoj ĉiuj havis altajn radikojn“, diris fine El Picaro.

„Altajn radikojn! Altajn radikojn! Se mi nur aŭdas tion, mi jam fariĝas verda kaj flava sur la vizaĝo. Altajn radikojn! Kvazaŭ tio estus kaŭzo por pigri ĉi tie.“

„Ni devis konstrui platformojn, du metrojn altajn, por povi atingi la trunkojn“, defendis sin El Picaro.

„Ĉu tio eble estas nova? Tion mi devis fari dum jaroj ĉe la

duono de ĉiuj arboj, konstrui platformojn, ĉar la radikoj kaj branĉoj kreskis alten ĝis du aŭ eĉ tri metroj. Sed mi tamen de ĉiu el miaj viroj ricevis tri aŭ kvar toneladojn. Mi lasis ĉi tie du fiajn friponojn kaj donis al ili kromajn rekompensojn, preskaŭ tiom altajn, kiom ĉe *contratista*, por ke ili havigu al mi kelkajn metrajn tunojn da ligno. Du krimuloj vi estas, du banditoj, kiuj ŝtelas mian karan monon el mia sako kaj por ĝi diboĉas kun putinoj kaj drinkas. Estas po viro apenaŭ tonelado por ĉiu tago.“

El Picaro retiriĝis duonon de metro pli proksime al la pordo kaj diris: „Estas po du kaj duono da tunoj por ĉiu viro kaj ĉiun tagon.“ Li diris tion tre timida kaj eĉ pli sin senkulpiganta.

„Tenu fermita vian kotbuŝaĉon, kiam mi parolas kun vi. Du toneladojn. Du toneladojn. Kaj tio, kvankam mi komisiis vin elpremi almenaŭ kvar toneladojn el ĉiu viro. La pluvo jam komenciĝis kaj post ok semajnoj komenciĝos la flosigado, kaj kion mi havas por ekveturigo? Po unu kaj duonon de tonelado por ĉiu viro kaj ĉiun tagon. Kaj je la unua de januaro mi devos pagi sesdek mil pesojn, eĉ kontante.“ Li rigardis tien kaj tien

kun konfuzaj, ruĝiĝantaj okuloj. Lia rigardo renkontis El Gusanon. Li saltis al li kaj senkompatate tretis kontraŭ flanko de li. „Ebria, ebria kiel porko.“

El Picaro ŝajne sentis la tempon taŭga por senkulpigi sian batalkunulon. „Dum la tutaj ses semajnoj li estis eĉ ne unufoje ebria, ĉar ni havis ĉi tie eĉ ne ununuran botelon. Nur hieraŭ venis la turko kaj kunportis kelkajn botelojn. Kaj tial tio estis tute laŭnatura, ke ni trinkis gluton.“

„Gluton, ĉu? Grandegan gluton, tion mi ja devas diri. Sed kie vi havas la botelon?“

El Picaro iris en angulon kaj eltiris sub la litokadro botelon duonplenan. Li supozis, ke *don* Severo prenos la botelon kaj ĵetos ĝin al la muro, kun knalo. Sed tio ne okazis. *Don* Severo sekiĝis pro la parolado. Li kaptis la botelon, tenis ĝin kontraŭ la lumo de la malfermita pordo, skuis ĝin kaj verŝis grandegan gluton en la faŭkon.

Demetante la botelon, li grakis terure elgorĝe, kvazaŭ li volus akuzi Dion en la ĉielo, ke li, por retrovi sian pacon, estis devigita malsuprenpafi tian aĉan gorĝoŝlifilon. Li

skuis sin kvazaŭ gruntante, skuis duan fojon la botelon kaj sendis pluan gargaraĵon tra la digesta tubo.

Ŝajnis kvazaŭ la altprocenta, duone venenigita brando mildigis iom lian koleron. „Plenigu glaseton por vi, Picaro“, li diris grakante, sed milde. Sed tiu mallonge eksponita afableco tuj denove malaperis, kiam li subite memoris sin, kial li efektive venis tien.

Rimarkoj

tonelada = metra tuno = en Hispanio 20 quintales = 80 arrobas

Don Acacio sendis antaŭ tri tagoj leteron al li, la unuan kaj ununuran, por kiu li prenis la tempon sendi ĝin. La leteron li sendis ĉevale per *capataz*. *Don Acacio* skribis, ke la du malgrandaj monterioj aktuale ekspluataj de li, momente ne plu permesas laboron. Per fortaj pluvelverŝiĝoj kaj pro la speciala situo de tiuj monterioj inter montetoj kaj montoj, ili estas tiom marĉigitaj, ke oni ne povas fortreni trunkojn, ĉar la bovoj forsinkas ĝis la jugoj en la marĉo. Tio sole ne estus tiom malica, ĉar oni povus fortreni la trunkojn al la tumboj pli poste, kiam la sekeco komenciĝos. Sed kio plej malagrablas, tio estas, ke oni eĉ ne plu povas haki arbojn, ĉar la viroj perdiĝas en la marĉo. Per speco de flosiloj kaj platformoj, kiujn oni veturigis ĝis proksime al la trunkoj, li provis haki arbojn. Sed tio kaŭzis tiom da speciala laboro, ke po viro kaj tago liverblas apenaŭ tonelado ĉiutage.

Pro tiu letero *don Severo* ricevis la malgajigan informon, ke la liverado fare de la du monterioj mastrumata de *don Acacio*, kies gajnon li taksis kiel proksimuman duonon de

la gajno el la entuta entreprena produktado, estos perdita en tiu ĉi jaro. Tiu perdo do povis esti kun sufiĉa verŝajneco eĉ la kaŭzo, ke li ne kapablos pagi ĉiujn devigitajn pagojn, kiujn li akceptis, kiam li aĉetis la monterion. Tiel unu el la perspektivoj, kiujn li nun ekhavis, estis tiu, ke la antaŭposedanto de la aĉetitaj monterioj, jen forta kaj riĉa kompanio, konfiskigos la koncesiojn pro pagoproblemoj kaj repostulos ilin aŭ eĉ vendos al aliaj. Al ĉiuj ĉi reagoj la kompanio estis rajtigita laŭkontrakte, la kontrakto rilate al la proporcio malgranda partopago, kiun la fratoj Montellano efektivigis, ekskluzive estis provizita per tiaj duraj klaŭzoj kaj postuloj.

Don Severo tuj rajdis al la administrejo, al la *Ofinias Generales* por interkonsiliĝi kun sia frato *don* Feliks pri tio, kio do estas farenda. Ili ambaŭ trovis la rezulton, ke restas al ili nur unu elirvojo por savi tiun negocan jaron. Ambaŭ interkonsentiĝis pri tio, ke *don* Acacio, la plej juna el la tri fratoj, estas la plej energia, se temas pri tio elpremigi el la laboristoj eĉ la lastan ŝpruceton de ilia forto. Sed ĉar *don* Acacio skribis, ke li momente ne povas

liveri en sia regiono, tial ankaŭ dek dioj ne kapablus tion. Kaj ĉar la du pli malgrandaj monterioj ne povis liveri sufiĉe, la ĉefa monterio La Armonia devis produkti la duoblon, kaj se iel eblis la kvaroblon. En La Armonia estis sufiĉe da mahagono por egaligi ĉiujn liverajn perdojn. Necesis nur eligi la mahagonon. Por tiu tasko neniu pli taŭgis ol *don* Acacio kun forta helpo de la *capataces*, kiujn li mem edukis. Ambaŭ, kaj *don* Severo kaj *don* Feliks, sciis sufiĉe bone, ke *don* Acacio ĉe tio eble estos la ofero. Sed oni devas riski ion por povi gajni.

La sama viro, kiu alportis la leteron de *don* Acacio, kunprenis la respondan leteron. En tiu skribaĵo oni postulis de *don* Acacio, ke li venu kun sia tuta trupo al La Armonia por tie labori. Sed *don* Acacio ne estis pli stulta ol liaj du pli aĝaj fratoj. Li estis jam dum la marŝo tien, kiam li renkontis la heroldon kun la letero. La heroldo firmgluiĝis kun sia ĉevalo en marĉo kaj eble trovis tie la morton, se *don* Acacio kun sia trupo ne estus preninta la saman vojon, sur kiu venis la heroldo.

Don Acacio troviĝis ĝuste tiutempe kun siaj viroj en la ĉefa kampadejo por ricevi provizojn. *Don* Severo

antaŭrajdis tagon pli frue por noti en la *campo* Sur de El
Picaro la produktitan mahagonon.

Post kiam la *aguardiente* dum kelkaj minutoj havis mildigan efikon al *don Severo*, ĝi nun ŝajne efikis male. *Don Severo* pensis pri tio, ke por tiu ĉi jaro estas perdita ĉio, kion li esperis de la dua aliaj monterioj. De El Picaro li atendis pli ol la duoblan produktadon de tiu, kiun li tiutage trovis ĉe la inspektado de la tumboj.

„Se mi ne volus havi pli da toneladoj ol vi prezentis al mi, tiukaze mi ne bezonus du *capataces* ĉi tie; tion la *muchachos* estus farintaj sole kaj eble ili pli liverus ol kun vi ambaŭ, pigraj ostoporozuloj. Diru tion al mi, kiel vi kapablis liveri nur la duonon de tio, kion vi liveru? Vi ja certe pli dormis ol vi laboris ĉi tie.“

„Sed kion mi faru aldone, *Jefe*? Mi skurĝis ilin kiel mordemajn hundojn, tiel, ke ili apenaŭ plu havis pecon da felo sur la dorso. Sed pri tio ili baldaŭ kutimiĝis. Ju pli mi skurĝis ilin, des malpli ili liveris.“

„Mi diris tion ja antaŭe al vi, ke tiom da skurĝado ne estas helpema. Ili fariĝos obstinaj kaj sternos sin kaj faros tute

nenion plu. Kial vi ne pli ofte pendumis ilin? Tiel, kiel ni faris tion en niaj kampadejoj? Tio efikas pli bone kaj pli terurigas ilin kaj faras ilin ne ribelemaj.“

„Ni estas ĉi tie ja nur duope, El Gusano kaj mi. Se ni volus pendumi ses da ili, tiukaze tio ne estus facila. Ili rifuzas tion kaj rezistas al tio, la pli maljunaj *muchachos*. Por ĉiu viro ni bezonus almenaŭ triopon por subigi ilin.“

„Por kio vi havas la kanonon sur via postaĵo, se ili volas rezisti al tio. Aŭ ĉu vi havas ĝin nur pro plezuro kaj por ĉasi sovaĝajn meleagrojn?“

„Kiun utilon havu la kanono ĉe tio?“

„Tenu ĝin al la grimaco de tiu, kiu obstinas kiel virkapro, kaj jen foje vidu, kiel rapide vi faros lin obeema.“

„Tio estis antaŭ longa tempo, *Jefe*. Ili ridas impertinente en mian grimacon, se mi pikas mian pistolon sur iliajn ripojn. Ili rikanas kaj krias: 'Pafu, laŭsa bufo, se vi estas viro. Kial vi ne pafas? Ni ankoraŭ kaptos vin, atendu nur. Vin kaj El Gusanon.' Ili kantas nun ankaŭ eĉ tute malicajn kantojn post mia dorso, kaj nokte ili kune sidadas kaj

kantas.“

„Jen pafmortigu kelkajn, por ke ili vidu, ke tio estas serioza afero.“

„En ordo, *Jefe*, se vi diras tion tiel, mi faros tion. Estas ja ne mia mono. Kaj ili diras al mi impertinente, se mi pikas ilian felon kun la feraĵo: 'Ek, pafu, jen mankos al vi hakisto, Picaro, *picarote*, ruza fripono, tiukaze vi perdos vian krompremion kiel furzon. Jen ja la malica ĉi tie, ke ili eĉ volas, ke mi pafmortigu ilin, por ke ili ne plu devos labori!“

Don Severo diris nenion pri tio. Li paŝis en la pordon, rigardis transen al la dormkabanoj de la viroj, turniĝis, prenis la botelon kun la komiteko kaj trinkis grandan gluton. Poste li ekbruligis cigaredon.

Lastfine li obĵetis: „Morgaŭ venos *don Acacio* kun siaj *capataces* kaj kun sia trupo. Tiam ni ĉi tie foje kreos ordon, jen foje observu kiel li surhokigos la ulojn, kaj kiel ni ricevos po kvar toneladoj de ĉiu viro ĉiutage. Eble eĉ kvin.“

„Certe, *jefe*“, diris El Picaro.

„Kompreneble certe, kion do vi pensas? Ni transvivis pli drastajn aferojn, mi kaj miaj fratoj. Tio ĉi tie estas tute nenio, tio estas apenaŭ mordado de puloj, se mi pensas pri aliaj monterioj, kie nia triopo laboris.“ Li metis la botelon en sian faŭkon kaj gluglis, kvazaŭ ĝi estus trinkakvo. Kiam li demetis la botelon, lia rigardo montris al El Gusano.

„Alportu sitelon!“ li diris al El Picaro.

El Picaro alportis sitelon plenigitan per akvo. Don Severo ekstaris, prenis la sitelon kaj impete verŝis ĝin sur El Gusanon.

„Alportu pluan!“ li vokis, etendante la sitelon al El Picaro.

„Unu siteloplano ne sufiĉas, sed ses da ili ja certe restarigos lin sur liajn sifilisajn stilzojn. Kaj se li jam staros, foje brosu lian dorsoledon. Jen, prenu la mulovipon. Poste li eble ree uzeblos. Sed ne ĉi tie antaŭ miaj okuloj. Mi ne havas plezuron pri tio. Konduku lin malsupren al la sulko, por ke mi ne aŭdu hurleti lin.“

„Bone, *Jefe*.“ El Picaro ne penis alporti pluajn sitelojn kun akvo. Li ŝire tiris El Gusanon supren, metis lin sur sian dorson, portis lin al la sulko kaj trempis lin tiom profunde kaj tiom longe en la akvon, ĝis El Gusano revenis en la surteran vivon.

„Sed, *compañero*“, diris El Gusano ploreme, „vi ja ne intencas prilabori mian felon ĉi tie, ni estas ja aliancanoj.“

„Kompreneble, *puerco*, ni estas ĉi tie aliancanoj. Sed kial vi devis ĝuste tiam drinki ĝis ebriiĝo, kiam la ĉefo venis. Kiel mi reagu? Mi ja devos doni al vi decan dozon da batoj, ĉu plaĉas al vi ĉu ne. Estas pli bone, se mi mem kun mia tuta amikemo tanos vian haŭton, ol se li vokus iun el la *muchachos*, eble eĉ Gregorion aŭ Santiagon. Aliancano mia, jen vi ne havus kaŭzon por ridi, tion mi povas diri al vi.“

„Mi pensas, ke vi pravas, korfrateto. Ek do pri la kaĉo. Mi estas ja ankoraŭ tute en tranco kaj prenos ĝin facile. Sed, ĉu vi eble povos alporti antaŭe la botelon, por ke mi povu enspiri gluglan gluteton antaŭ ol vi komencos tion?“

„Tio ne estas malbona ideo, ankaŭ mi bezonas ĝin.“ El Picaro kuris al sia *oficina*, ŝoviĝis tra la malantaŭa pordo kaj plukis botelon, kiun li prenis kun si kaj je kiu li poste lasis forte suĉi El Gusanon kelkajn fojojn, antaŭ ol li komencis tamburi lian dorson.

Je la sekva tago, mallonge antaŭ sunleviĝo, alvenis don Acacio kun sia trupo en la *campo* Sur. *Don Severo* akceptis lin kun la saluto: „Ĉi tie stinkas io, io putras. Tion mi ja devas diri al vi, *Cacho*. Apenaŭ po du toneladoj je hakisto.“

„Jen ni ja fine atingis la celon en gloro, ke ni ekgrimpas nun sur la ventro kaj manĝas koton“, respondis don Acacio.

Li ne longe plu restadis ĉe tiaj senutilaj konsideroj. Spite al tio, ke li havis longan kaj malfacilan vojon, li ŝajne ne havis grandan emon pri tio ripozi aŭ sidiĝi kaj aŭskulti rakontojn.

Li vokis eksteren al la *capataces*: „Ek, pigra bando. Konstruu *jacales*! Ni ne havas perdeblan tempon. Kaj se vi ne volas kuŝi ĉiujn noktojn sub la libera ĉielo, jen nun eklaboru; morgaŭ ni ne havos multe da okazoj ĉi tie konstrui belajn vilaojn.“

La *captaces* rapidegis kiel fulmo kun la lacigitaj viroj en la ĝangalon, por haki trunkojn kaj alporti palmfoliojn por la konstruado de la dormkabanoj. Sed la nokto komenciĝis antaŭ ol eĉ nur unu kabano estis starigita. La *muchachos* premegis sin inter la tieaj laboristoj en ties kabanojn. Sed ne estis sufiĉe da loko. Multaj devis kuŝiĝi ekstere. En la nokto pluvis fortege kaj la viroj troviĝis kuŝantaj en dika ŝlimo, kiam oni krude vekis ilin por la laboro. Estis, kiel ĉiam, plej profunda nokto, kiam ili enviciĝis.

Don Acacio diris: 'Bonan matenon, viroj!' per la sekva maniero: „Ne havas sencon konstrui *jacales*, ni iros pli profunde en la ĝangalon, tuj hodiaŭ kaj nun. Ne estas tempo kuir kafen kaj varmigi viajn fabojn. Vori vian manĝon vi povos survoje. Ek, surmetu ĉiujn pakojn kaj ekkmarŝu.“

„Tiel oni faras tion!“ diris don Severo al El Picaro, kiu staris apud li en la *oficina*. „Kaj se vi estus farinta tion tiel, vi kaj la ebria porkido, nomata helpanto, tiukaze ni havus kvar toneladojn de ĉiu viro.“

„Certe, *Jefe*. Sed, se mi farus tion tiel, jen mi vespere ne plu vivus aŭ tri *muchachos* kun plumbo en la stomako kuŝus ie ĉi tie.“ El Picaro rikanis, kiam li diris tion.

„Jen ja la diferenco pri la laboro“, opiniis *don Severo*, „ekzistas *capataces*, kiuj komprenas kiel oni laborigas siajn virojn kaj ekzistas aliaj, kiuj ne komprenas tion. Vi estas unu el tiuj, kiuj ne komprenas tion kaj, kiuj neniam lernos tion. Kaj cetere, kie estas via korfrateto, El Gusano?“

„He, El Gusano!“ kriis El Picaro en la nigran matenon.

„He, *El Jefe* vokas vin!“

El Gusano rapidege alkuris kaj diris kun rapidigita spirado: „*A sus ordenes, Jefe.*“

„Ek, vi kaj El Picaro kaj la tuta pigra hordo ĉi tie, surmetu viajn pakojn kaj ekmarŝu kun don Acacio al ties distrikto.“

Ambaŭ *capataces* kunvokis siajn virojn kaj sekvis la trupon de *don Acacio*.

Estis semajnon poste, kiam alvenis *don* Gabriel kun la nove varbitaj mahagonlaboristoj en La Armonia, sur la vasta placo antaŭ la bangaloj de la administrejo.

Li havis komisionojn por novaj laboristoj el kvar diversaj monterioj, kaj estis lia plano ripozi kun sia kolono en La Armonia, kaj de tie disdividi la varbitojn al la monterioj laŭ la ricevitaj komisionoj. Sed je tiu tago, kiam li alvenis en la ĉefa *oficina*, tie ĉeestis *don* Severo. Tiu, uzante la okazon, komencis marĉandi kun *don* Gabriel. La rezulto estis, ke la tuta trupo, kiun *don* Gabriel alkondukis, restis en La Armonia, tiel, ke la ceteraj monterioj devos atendi ĝis alia agento kompatos ĝin aŭ ĝis *don* Gabriel havigos novan trupon.

Don Severo kaj Feliks rigardis la freŝajn disponigitojn kaj estis kontentaj pri tio, kion ili trovis.

La homoj, ĉiuj tro lacigitaj, kuŝadis distrite en grupoj sur la placo antaŭ la konstruaĵoj. Se *don* Severo kaj *don* Feliks paŝis al grupo, ekstaris la junaj viroj. *Don* Severo

palpadis iliajn brakojn, iliajn gambomuskolojn kaj iliajn nukojn, kvazaŭ ili estus bovoj, kiujn li intencas aĉeti.

„Kio vi estas, chamulano?“ demandis Candidon, kiam li venis al tiu grupo. Je la vestoj kaj la ĉapeloj li ekkonis la indiĝenan nacion, al kiu ĉiu viro apartenis.

„*Campesino*, etkamparano, *su humilde servidor*“, respondis Candido modeste.

„Tiukaze vi estos bona hakisto, chamulano“, diris pro tio *don Severo*.

„*A sus ordenes, Patroncito*, je via ŝatata servo, grace fava patronĉjo mia.“

„Kiu estas la ino, kiun vi havas ĉe vi? Ĉu via edzino?“

„Mia fratino, patronĉjo. Mia edzino mortis.“

„Sed la du knaboj estas viaj infanoj, ĉu?“

„*A sus ordenes*, ĉiam je via servo, patronĉjo.“

Don Severo per pugno frapetis la bruston de la knaboj kaj

palpis iliajn brakojn. „Ili bone uzeblis kiel bovoknaboj, mi pensas.“

„Pardonu al mi, mastro, grace favora patronĉjo mia, ke ĉikaze mi ne povas esti je via servo, la knaboj estas ja ankoraŭ sufiĉe malgrandaj kaj malfortemaj, ili ne povos dure labori ĉi tie en la ĝangalo. Unu el ili estas ja nur sesjara kaj la alia sep jarojn kaj kvaronan.“

„Se ili volas manĝi ĉi tie, tiukaze ili devos labori. De via manĝo postrestos nenio por la knaboj, aŭ mi devas prikalkuli al vi la duoblon por la manĝo, kaj tiukaze vi dum eterneco ne liberigos vin de via ŝuldokonto.“

„Ni povas labori diligente, ni estas fortaj, *Jefe* mia“ diris fervore la pli aĝa knabo, kiam li komprenis, ke li kaj lia frato povus esti la kaŭzo, ke ilia patro ne plu revenos hejmen.

Jen la pli malgranda iris paŝon antaŭen kaj proksimen al *don Severo*. Li levis supren kaj malsupren sian brakon, por montri la streĉitajn muskolojn.

„Palpu foje ĉi tie, patronĉjo, kiom forta mi jam estas;mi

povas labori eĉ pli bone ol mia frato, kvankam li pli aĝas ol mi, kaj mi povus labori kiel bovoknabo, tio ja bone plaĉus al mi.“ Tiam li turnis sin al sia patro: „kun via inda kaj bonvolema permeso, *tate!*“

Candido diris nenion. Li nur fermopinĉis la okulojn.

„Tio plaĉas al mi“, diris ridante *don Severo* „jen knaboj, kiajn mi ŝatas. Kaj ankoraŭ neniam damaĝis al iu, se oni frutempe komencis perlabori sian panon. Vi ambaŭ iros al la bovokampadejo kaj via patro al la hakistoj.“

Ektimigite la knaboj rigardis supren. „Ĉu ni ne restos ĉe la patro?“

„Li ne estas *boyero*, sed hakisto kaj ne povus esti kun vi en la sama kampadejo. Sed eble de tempo al tempo, hazarde, se vi estos en la sama noktkampadejo.“

Candido tiris la knabojn al si, kvazaŭ li volus protekti ilin. Li mankaresis iliajn denshararajn kapojn dum certa tempo kaj diris mallaŭte: „Kion fari, knabetoj? Li estas la mastro kaj ni devas obei.“

Don Severo iris plu al la sekva grupo.

Sed *don* Feliks haltis kaj mangestis al si Modestan, kiu retiriĝis kelkajn paŝojn en la fonon, kiam *don* Severo pridemandadis ŝian fraton kaj la knabojn. Obeeme sekvante la mangeston ŝi pli proksimiĝis al *don* Feliks. Ŝi klinis la kapon kaj krucis la brakojn sur la mamoj. Sed ŝi ne rigardis supren.

Don Feliks pikis ŝin per etendita montrofingro sur vangojn, kaj tiam li puŝis ĝin per la manartikoj de pugno kontraŭ la mentonon, por levi ĝin. Modesta evitis lin kaj klinis la kapon flanken, sen rigardi al li.

„Vi ne devas timi min, putineto. Mi ne voras knabinetojn matenmanĝe, eĉ ne tiukaze, se iliaj femuroj bone plaĉas al mi. Mi povos sufiĉe forte dispremegi ilin, se mi voluptos. Kiel vi nomiĝas?“

„Modesta, *su humilde servidora*.“

„Mi vokos vin Mocha. Kion vi faras ĉi tie?“

„Mi akompanis mian fraton ĉi tien, ĉar li estas sola kaj

pro la infanoj, patronĉjo.“

Ŝi diris tion sen levi la kapon.

„Sed kie vi volas manĝi, putineto?“

„Kun mia frato en la kampadejo.“

„Tion vi ne povas fari. Li ricevos nur porciojn por unu viro, kaj se li volas ricevi du porciojn, li devos pagi por du porcioj. Tiukaze restus nenio de la tagsalajro al li, kaj li havas ja ĉe ni ŝuldokonton kun ĉirkaŭ tricent kvindek pesoj. Li perlaboros ĉiutage nur duonon de peso, se li liveras tri toneladojn.“

„Du toneladojn, *Patroncito*, tiel legeblas en mia kontrakto.“ Candido antaŭe proksimiĝis kaj aŭdis la lastajn vortojn.

„Tio, kio legeblas en via kontrakto, nin ĉi tie tute ne koncernas, kaj vi fermtenu vian stinkantan buŝaĉon aŭ mi lasos tuj voki iun *capataz*, por ke li donu al vi la monterian saluton bonvenigan. Se vi ĝin estos ricevinta, vi scios, ke vi nur tiukaze paroligu vian grimacilon, se oni

demandas vin. Vi liveros tri toneladojn ĉiutage, kaj se vi ne atingos tion, ni ne pagos la tagon al vi; kaj se tio tiel pigre daŭriĝos dum kelkaj tagoj, vi ja spertos, kiel ni havigos tri toneladojn ĉiutage de vi. Vi povas ĝoji, ke ni ne postulas kvar toneladojn de vi. Kaj ankaŭ tio ankoraŭ okazos.“

„Sed, *Patroncito*, kun via tre bonkora permeso“, diris Candido modeste, „*don* Gabriel, la *enganchador* diris al mi, kaj ankaŭ la *presidente municipal* en Hucutsin, tie, kie ni lasis stampi la kontrakton, ke estos nur du toneladoj ĉiutage.“

„Por vi ekde nun kvar da ili, pedikohava kojoto. Kvar toneladojn. Kaj ve al via haŭto kaj al viaj ostoj, se vi liveros malpli ol kvar.“ *Don* Feliks prenis etan libron el sia ĉemizopoŝo, notis la nomon, kaj post la nomo li zigzage skribaĉis: *Cuatro Toneladas Obligacion*; kvar toneladojn, devo.

„Sed, kun peto pri via pardono...“ Candide komencis paroli denove.

Plu daŭrigi li ne povis. *Don* Feliks boksis lin tiel krude sur la vizaĝon, ke tuj densa sango gutis el ties nazo. „Mi ja diris al vi, kota kaj pedikohava mefito, ke vi tenu fermita vian babilaĉilon ĉi tie.“

Candido kaŭris surtere. Per herboj, kiujn li plukis el la tero, li ŝtopis siajn naztruojn por reteni la sangon.

Modesta staris ankoraŭ plu kun klinita kapo antaŭ *don* Feliks. La okazaĵo estis por ŝi pli doloriga ol por Candido. Sed kutimigite ekde la infaneco, ke ŝi kiel ŝiaj samkunuloj devas akcepti sen grumblado ĉion, kion la ladinoj fifaras al ili, ŝi apenaŭ moviĝis. Per neniun mienon aŭ gesto ŝi montris, kion ŝi sentis. Ŝi estis vokata al la mastro, staris antaŭ li, kaj ŝi ankoraŭ ne havis la permeson povi foriri kaj konsoli sian fraton.

Ambaŭ knaboj sidiĝis apud sia patro kaj kvazaŭ kramfe ĉirkaŭbrakis lian korpon, por forgesigi al li tion, kio okazis. La pli malgranda komencis plori kaj diris plorsingulte: „*Tate*, kara *tate*, tio ne estas kulpo mia!“

La patro mankaresis lin kaj kaj ridetis.

La pli granda knabo prenis la kalabasan trinkujon, kuris malsupren al la rivero, por alporti akvon por la patro, por ke li povu trinki kaj forlavi la sangon.

Don Feliks okupiĝis jam denove pri la knabino. Bati indiĝenon vizaĝen por li ne estis okazaĵo pro kiu li interrompus, kaj eĉ se nur dum sekundo, sian pripensadon. Eĉ, se li mortbatis aŭ pafmortigis indiĝenan laboriston, li forgesis tion post horo tute. Li multe pli bone memoris pri mortpafita antilopo aŭ pri bone trafita jaguaro ol pri pafmortigita peono.

Por laboristoj, indiĝenoj aŭ mestizoj ekzistis nek justeco nek protekto. Sankta estis nur la vivo de la diktatoro kaj de ties kunuloj. Ne nur la provon, sed eĉ la penson provi nur tuŝi la diktatoron aŭ iun el ties ministroj aŭ politikaj ĉefoj aŭ viron el la murdistaj aroj de la diktatoro oni punis per mortverdikto. Pafmortigi ribeleman indiĝenon aŭ laboriston kiel hundon, validis kiel patriota ago.

„Vi tute ne estas aĉa planteto, Mocha“, diris *don* Feliks.
„Manĝi vi devas, kaj via frato ne povos doni manĝon al vi.“

„Mi konstruos ĉi tie en la kampadejo kabaneton al mi kaj plenkreskigos la porketojn kaj kuiras manĝon por la metiistoj. Tion mi povas fari.“

La penso enspezi sian porvivon tiumaniere, subite aperis al ŝi en tiu momento. Ŝi ja sciis, ke ne estos tiel facile efektiviĝi tiun ideon. Sed ŝi ĝojis havi elturniĝan pretekston, ĉar ŝi sentis, ke *don* Feliks volis devigi ŝin al alia laboro. Ŝi ne havis kontraktdevigon, ŝi estis libera fari tion, kio plaĉas al ŝi. Tamen ŝi devis manĝi kaj en la monterio apartenis la tuta manĝo al la *compañia Montellano Hnos.*, al la fratoj Montellano.

„Tiel facila tio ne estas, putineto mia. Vi ĉi tie rajtas konstrui iun *choza* nur en tiu kazo, se mi permesos tion al vi. Kaj porkojn vi same povas plenkreskigi nur tiukaze, se mi permesos tion al vi. Manĝon vi povas kuiri por la homoj, se tion ne faras alia por ili. Sed, se vi volas labori, vi povas labori ankaŭ por mi. Estas malpli da laboro por unu viro ol por dudek da ili. Krome mi verŝajne sekvasemajne foriros por foje bone vigligi alian dormeman kampadejon kun pigremuloj. Kaj vin, putineto mia, mi kunprenos. Mi faros el vi mian kuiristinon kaj

mian servoknabinon por ĉio.“ Li kaptis ŝin je la mentono kaj puŝis la mentonon supren, tiel, ke li povis rigardi al ŝiaj okuloj. Sed Modesta rigardis malsupren.

„Se vi bone kondutos kaj ĉion faros je mia plaĉo, tiukaze vi bonfartos, ĉifonulineto. Kaj se vi ne bone kondutos, tiukaze mi defrotos vian brunan felon kaj pelos vin kiel fulmon eksteren, kaj vi rampu tra la ĝangalo en vian kotan, pedikoplenan kaj putinaĉan vilaĝon, se pli frue ne kaptos vin la jaguaroj kaj elŝiros viajn gambojn kaj mi ne scias kion plu.“

„Sed mi ne volas fariĝi via servknabino, patronĉjo“, diris Modesta mallaŭte.

„Tion decidas mi kaj ne vi, kotgrimaculino“. *Don* Feliks forturniĝis kaj sekvis sian fraton *don* Severo, kiu jam antaŭiris kaj pridemandis la lastan grupon malantaŭ ĉiuj aliaj.

Rimarkoj

a sus ordenes = Laŭ viaj ordonoj

boyero = brutpelisto, bovoservisto

campesino = etkamparano

compañia = kompanio

criada = servknabino

mocha = piulino

su humilde servidor = Je via humila servo

tate = patro (indiĝena vorto)

Ĉapitro 05

01

Estis profunda nokto, kiam la nova trupo alvenis en Camp Sur. La homoj, tute lacigitaj de la tro longa kaj tro streĉa marŝo tra la ĝangalo kaj de la vadado en la dika kaj tenaca ŝlimo, lasis fali ne nur siajn pakojn, sed ankaŭ siajn proprajn korpojn, por resti kuŝantaj tie, kie ili troviĝis. Nur duonon de horo poste ili komencis serĉi manĝon. La kuiristo diris, ke li havas nenion por ili, kaj ke tiukaze, se ili ne kunprenis ion, ili devos atendi ĝis morgaŭ, ĝis ili povos ricevi manĝon; krome li diris, ke li estas mem laca kaj, ke li nun ne havas emon labori eĉ pli, kaj li demandis, kie estas kuiristino, kiun oni promesis al li. La *capataz*, La Tumba, kiu gvidis la trupon tien, diris, ke la kuiristino morgaŭ aperos ĉe la kuiristo, ke nun ŝi estas ĉe sia frato.

La alvenintoj nun ekbruligis propran bivakfajron kaj varmigis la malmultajn fabojn, kiuj ili ankoraŭ retenis de la marŝo.

Alvenis kelkaj viroj, kiuj jam dum kelkaj monatoj laboris en la kampadejo kaj staradis ĉe la kuirejo por rigardi la novulojn, ĉar eble estas konatoj inter ili. Ili kunsidiĝis al la fajro, ekbruligis siajn cigarojn kaj observis, kiel la novuloj pretigas sian magran manĝon.

„Pro tiu manĝo vi certe ne grasiĝos“ diris *muchacho* al la grupo, al kiu li sidiĝis.

„Ni ne havas manĝon aldonan, kaj oni povas manĝi nur tion, kion oni havas“, oni respondis.

„Ĉu *don* Feliks venis kun vi?“ demandis li.

„Ne, li restis en la ĉefa kamapadejo, li devas okupiĝi pri la jungilaroj kaj prikalkuli la novajn provizojn, kiujn oni atendas ĉi-semajne aŭ en la sekva semajno.“

„Ĉu iu el vi jam estis en monterio?“ demandis nun alia.

„Mi ne“, iu lace respondis, „kaj mi ankaŭ ne pensas, ke iu alia el nia kolono jam konatiĝis al ĝi.“

Santiago, unu el la boyeros, el la bovservistoj, laŭte

ekridis. „Konatiĝis al ĝi. Damne, tio estas bone dirita.
Konatiĝis al ĝi. Dio mia, dio mia, ĉi tie vi konatiĝos kun
ĉiuj inferoj kaj kun ĉiuj diabloj.“

Post tio dum certa tempo estis silento inter la homoj. La
malnovuloj fumis kaj la novuloj atendis, ke la faboj kaj la
kafo fariĝu varmegaj. La freŝa fajro kraketis kaj ŝprucis
fajrerojn, poste ĝi brulis pli trankvila, sed kun pli da forto.

La novuloj, kiuj ĉirkaŭsidis, subite rigardis supren, kvazaŭ ili aŭdus en la ĝangalo la kraĉospiron de tigro.

„Kio estas tio, jen pli profunde en la vepro, tie transe?“ demandis Antonio, indiĝeno de Sactan, atente aŭskultante per la oreloj kiel gardema hundo.

„Ĉu vi eble celas la plorĝemetadon, la hurletadon kaj lamentadon kaj gargaron, kiu penetras el tiu arbustaĵo ĉe la rivero?“ Santiago, kiu tie sidis, levis la brovojn supren kaj rikanis, kiam li parolis.

„Jes tio estas, kion mi opinias. Ĝi aŭdeblas kvazaŭ oni turmentus bestojn, al kiuj oni fermligis la buŝojn.“

„Viro surtere!“ mokis Santiago, „kiajn delikatajn orelojn vi havas! Mi certas, ke vi povus aŭdi pulon, se ĝi dancus la *zapateado*-n sur trivita silka ŝiraĵo. El vi povas fariĝi elstarulo kun tiaj fajnsentaj oreloj. Vi aŭdis ĝuste, *muchacho*.“

„Tre ĝuste vi aŭdis“, enmiksiĝis Matiaso, „efektive, tie oni

turmentas bestojn, kaj oni fermligis iliajn buŝojn, por ke oni ne aŭdu iliajn kriojn. Ĉar ilia kriadado povus tre ĉagreni *don Acacion*, kiu ĝuste nun premas sin inter la grasajn gambojn de sia oblikve naza *Cristina*. Dio en la ĉielo! Kiom grasa la inaĉo estas! Sed certe ŝi havas molan postaĵon. Kaj li ja certe scias, kial li ĉiam prenas ŝin kun si kaj aĉetas keŝtope parfumitan sapon por ŝi, kiam la turko ĉeestas.“

„Kaj kial oni turmentas la kompatindajn bestojn tiom?“ demandis Antonio.

La malnovaj *boyeros* tiel laŭte elridis, ke ĝi sonis kiel obtuza tusado.

„La kompatindaj bestoj!“ diris Santiago. „Jes ja, la kompatindajn bestojn oni turmentas kruele, jen la kaŭzo, kial ili tiel lamentas kaj hurletas kun fermitaj buŝoj.“ Li denove ridis.

„Ne estu blankaj ŝafidoj“, klarigis poste Pedro al la novuloj. „Bestoj, kompatindaj bestoj! Ne estas bestoj, kiuj estas turmentataj tie kaj kiuj hurletas, azenoj. Estas

dudek hakistoj, *hacheros*, kiuj tie hurletas. Oni pendigis ilin je tri aŭ kvar horoj, ĉar ili hodiaŭ kaj hieraŭ kaj antaŭhieraŭ ne atingis kvar toneladojn. Kion signifas kvar toneladoj, vi, senkulpuloj kaj sensciuloj, lernos jam post tri tagoj. Du toneladoj ĉiutage estas la kutima atingo de forta kaj lerta hakisto, kiu estas forta kiel bovo. Kaj nun postulas la stinkanta hundo, nomata *don* Acacio, kvar toneladojn, kaj tiun, kiu ne atingas ilin, pendas dum duono de nokto, kunnodite ne je kvar membroj, sed je ĉiuj kvin, por ke estu forgesita nenio, kaj eĉ kun la kapo intere. Kaj aldone la moskitoj ĉirkaŭe, ĝuste tie, ĉe la marĉa koto, kaj ruĝaj formikoj, tutaj formikaj popoloj. Pri tio mi ja certe ne plu devos rakonti ion al vi. Post malpli ol semajno vi scios pli pri tio – pro propra sperto. Tiam vi estos iniciitaj en la sekretojn de monterio apartenanta al la fratoj Montellano, kaj vi estos soldatoj de la regimento de l' *colgados*, de la pendumitoj.“

Mi supozis, ke ĉi tie oni nur skurĝas homojn, tiel, kiel en la bienoj, aŭ kiel en la koncentrejoj, kien oni sendas la ribelulojn, por ke ili tie mortaĉu, ĉar ili malfermis la buŝon kontraŭ la *Jefe Politico* aŭ tial, ĉar oni erare metis

ilin en prizonon aŭ volis plendi pro monpunoj aŭ devigita laboro.“ Martin Trinidad ŝajne spertis pri tio. Li estis unu el la triopo de la ĉifonuloj, kiuj aliĝis al la kolono survoje kaj restis spite al nestampita kontrakto. Sur la tuta marŝo tra la ĝangalo, kiu daŭris tri semajnojn, tiuj tri vagabondoj apenaŭ parolis kun la kunuloj. La triopo ĉiam estis kune kaj parolis nur inter si, ŝajne sen atenti iun el la vojkunuloj. Tiumomente, je la unua fojo, dum kiu ili apartenis al la kolono, unu el ili, Martin, turniĝinte al la aliaj, parolis al ili.

Santiago rigardis lin, kun kunpinĉitaj okuloj kaj iom malfideme, kvazaŭ li rigardus ilin kun la atentemo de honesta proleto kontraŭ policaj spionoj.

„Cetere, de kie vi estas, *hombre*?“ li demandis lin.

„Yucataneco.“

„Malbenite, tio estas tre granda distanco ĝis ĉi tie. Pro kio vi venis en tiun ĉi regionon? Ĉu *fugitivo*, fuĝinto? Ĉu vi eskapis?“

„Mi fuĝis, frato, por foje diri tiel.“

„En ordo, ni foje diru tiel. Kaj se vi trifoje estos pendumita, mi akceptos ĉion, kion vi rakontos al mi. Komprenu, frateto, tiu, kiun ili ĉi tie ne pendumas kaj skurĝas, ĉe tio io ne estas en ordo. Skurĝite, damnite, vi povos hipokriti ion al ni. Sed, se vi estos pendumita, bone kaj laŭregulare pendumita, tiel kiel faras El Rasgon, La Mecha kaj El Faldon, ĉesas la hipokritado, tion akceptas neniuj, kiu ne estas tute puranime. Mi pensas, ke vi scias, pri kio temas, kion mi celas kaj kiel mi celas tion. Celso kaj Andreo ja ankoraŭ okupiĝos pri vi kaj pri viaj dukoramikoj, per pridemandado, por ke ni ĉiuj eksciu, al kiu vi apartenas. Timon konas neniuj ĉi tie, kaj en bela varmega somera nokto ni tratanĉos al vi la ĝorĝon tiel bele kaj kareseme, nur dudek paŝojn for de la dormokabano, ke vi tute ne sentos, kiel la stinkanta animo de *denunciante* fulmrapide malaperos inferen. Komprenu, tio ne damaĝos al ni. Ili ne pafmortigos nin, ĉar tion povas permesi al si neniuj, kiu volas havi de ni kvar toneladojn ĉiutage. Pafmortigito ne plu povas haki arbojn. Oni povas nur pendigi nin. Kaj pri tio ni jam tiom kutimiĝis, ke tio ne plu helpas ilin. Estis tempo, kiam oni vipis nin, kruele skurĝis nin, se ni ne havis pli ol du

toneladojn. Ankaŭ pri tio ni kutimiĝis. Tio ne plu helpis ilin, male. Tio efikis malpli kaj pli malpli ĉiun tagon. Jen la Montellanoj prezentis sian novan eltrovaĵon, la pendumadon. Tio estas kruela, terure kruela nur tiom longe, kiom oni pendas. Sekvatage oni ree povas labori kaj atingas kvar toneladojn. Oni elrampas de sia kabano tri horojn antaŭ sunleviĝo kaj laca kiel ŝtono rerampas en ĝin kvar horojn post sunsubiĝo. La pendumado tiom bonfartigas la pendigiton, ke la memoro pri ĝi, la nura memoro pri tio ankoraŭfoje devi pendi, al oni ebligos atingi kvar toneladojn, tie, kie unu tonelado jam ŝelas la felon de la manoj, kvazaŭ ĝi estus surgluita nur per gluaĵo. Sed ni estas jam proksime de la momento, kiam ankaŭ la pendumado ne plu alportos fruktojn. Celson ili jam ne plu povas kaputigi per la pendumado. Se li jam pendis kvar horojn kaj El Guapo venas por malpendigi lin, Celso kvazaŭ blekas al li: 'He, vi, fetoranta putinbubo, mi ĝuste komencas komforte bonfarti kaj estis tiel bele ekdormanta, kaj jen alrampas vi, mizera mefito, kaj ĝenas min dum mia dolĉa endormiĝo.' Celso estis la unua, kiu ne plu lasis ŝoki sin de la pendumado. Sed nun ni estas jam ses. La truko estas la sekva: Homoj povas iĝi tiaj, kiaj

bovoj kaj azenoj, kiuj ne plu moviĝas, kiom ajn longe oni vipas kaj pikas ilin, se ili nur jam evoluis en si la veran ribelospitemon.“

Martin Trinidad diris nenion. Li derompis pecon de la dura tortiljo kaj elkuleris per tio la fabojn el argila peco, en kiu li varmigis ilin. Liaj du kunuloj, Juan Mendez kaj Lucio Ortiz, prironĝis tenacan sekan viandostrion kaj trinkis krome maldensan kafon.

La viroj de la nova kolono, kiuj origine sidadis en vastaj grupoj, dum ili manĝis fabojn el argilaj potetoj kaj trinkis kafon el ladaj kruĉetoj, ŝoviĝis pli kaj pli proksime al la malnovaj *boyeros*, al Matiaso, Pedro, Santiago, Cirilo kaj Fidel, kiuj sidiĝis al la unua grupo.

Andreo, la plej inteligenta viro inter la *boyeros*, ne estis inter ili. Li estis sendita kun kelkaj knaboj al la plej granda paŝtejo, por kunpeli freŝajn bovojn kaj konduki lacigitajn kaj malbone nutritajn bovojn al tiu paŝtejo, por ke ili tie ripozu en la ferioj. La paŝtejo troviĝis ses leŭgojn malproksime je lago, kaj ĉar la plej granda parto de la vojo estis kvazaŭ marĉo, povus daŭri tri tagojn antaŭ ol li denove revenus.

„Ĉu oni pendumas la hakistojn ĉiuvespere?“ demandis Antonio.

„Kompreneble ne“, diris Matiaso. „Tiukaze ili tro rapide kaptus malarion, komprenu do, kaj tiel ili rapide eskapas transmonden. Sed ja jam nun sufiĉe da ili rapide eskapas

tiel, estas apenaŭ semajno, en kiu oni ne enskrapas du aŭ tri el ili.“

„Sed vi scias ja nenion!“ interrompis lin Pedro. Li, kiel malnovulo, havis kiel la ceteraj malnovuloj viglan plezuron pri tio paroli pri siaj spertoj kaj scioj, kiam li rimarkis, kiajn atentemajn aŭskultantojn Santiago trovis. Estis por la malnovuloj kvazaŭ festo povi paroli kun homoj, al kiuj ĉio ĉi, kion ili aŭdis tie, sonis kiel romano.

„Vi scias ja nenion!“ ripetis Pedro. „Kompreneble oni ne pendumas la hakistojn ĉiuvespere. Tiel, kiel oni ankaŭ nin, la *boyeros*, aŭ la bovoservistojn, por ke vi komprenu tion pli bone, ne ĉiuvespere pendumas. Tial ni ja sidas ĉi tie kaj povas fumi niajn cigarojn kaj rakonti al tiaj senkulpaj buboj, kiaj estas vi, trankvile fabelojn por infanoj kaj purlavi viajn fermgluitajn gapilojn.“

„La afero estas tia“, diris Cirilo, „kaj la rezulto jena – kaj tiel ni fine, tra longaj ĉirkaŭvojoj, venas al la vera ekkono de tio, kio okazas ĉi tie.“

„Ne aŭskultu, kion diras la vikario“, diris Santiago kun

gruntanta ridado. „Hodiaŭ falis jugotrabo sur lian cerbon, kaj li ankoraŭ ne povis rekolekti ĉiujn fortojn. Tial li parolas nun sen sciii pri kio. Kaj morgaŭ li estos eĉ pli stulta. Kion mi volas rakonti ĉi tie, estas tio kaj nur tio. Antaŭ kvin aŭ ses tagoj alvenis ĉi tie la plej juna el la tri Montellanoj. En lia monterio dronis la tereno, ĝi resekiĝos verŝajne nur en januaro aŭ pli poste. Tial tiu monterio mankas al la fratoj por ties liveroj. Kaj tion, kio mankas al ili, ili devas nun ĉi tie trioŭpe elvingi el ni. *Don Acacio* estas la plej malica el la trioŭpo. Printempe li marŝis en sian monterion kun okdek viroj, ĉiuj estis sanaj kaj fortikaj indiĝenoj de la bienoj, inter ili ĉirkaŭ dek inoj kaj dudek infanoj. Ĉu vi scias, kiom da viroj postrestis el la okdek, kiam li devis formarŝi de sia monterio? Tion vi ne scias. Nur dudektri el ili. Ĉiuj aliaj estas mortaj. La plej multaj mortskurĝitaj, aŭ pendigitaj ĝismorte, aliaj kaptitaj de la marĉofebro; dek glutitaj de la marĉo. Kvar eskapis kaj mortis en la ĝangalo, kelkajn mortigis serpentoj; kaj kvaropon el ili kaptis jaguaroj kaj pumoj. Duopon el ili voris jaguaroj, dum ili pendis. Kion fari kontraŭ jaguaro, se oni estas pendumita kaj ne povas movi eĉ fingron? Al trioŭpo el la dekdu inoj mankas jam

klapo en la kapo. Unu inon el ili, junan grasulinon, tiu, kies viron li pafmortigis, li alpropriigis por persona uzado, ŝi estas nun lia litkunulino. Du el la inoj fuĝis kun siaj edzoj kaj pereis kiel iliaj edzoj. Unu inon el ili li skurĝis ĝis ŝi renversiĝis, ĉar laŭ li ŝi fiagitis la edzon, ke ili kune fuĝu. Li lasis kuŝi ŝin, kaj ĉar neniu estis proksime por levi ŝin, ŝin forportis sovaĝaj porkoj kaj manĝis ŝin pecon post peco. De la dudek infanoj ankoraŭ vivas du, kaj tiuj malsaniĝis je febro.“

„Evidente sukcesa *ladino*“, diris Fidel.

„Parolu nur, se vi estas demandita, *hijito*, filo mia.“ Santiago rigardis Fidelon, kvazaŭ li krimus ion. Kaj por ke vi ne plu ĝene enmiksiĝu, prenu tiun bele rulumitan cigaron.“ Sed ne estis cigaro de Santiago. Santiago lerte tiris la cigaron el la ĉemizopoŝo de Fidel kaj transdonis ĝin al li kun gesto tia, kvazaŭ li farus donacon al li.

Fidel rigardis la cigaron, turnis kaj turnis ĝin kaj poste diris, tenante ĝin proksime al la bivakfajro: „Nu, oni rigardu foje ĉi tien, jen la viro rulumas la cigaron laŭ mia modelo. Sekve mi tamen faras ion pli bone ol vi, Santo,

alikaze vi ne tiel bele kopus miajn cigarojn.“

Serĉante li palpadis sian ĉemizan poŝon, por tie eltiri la cigaron kaj kompari ĝin kun tiu, kiu donis Santiago al li. Sed kiam li ne trovis la cigaron, li diris: „Tion mi ja devus scii antaŭe, ke vi ne fordonacas cigarojn. Estas facile fordonaci cigaron, se vi ĝin antaŭe ŝtelis el mia poŝo. Nu, ne damaĝas min. Mi ĝojas, ke neniuj, eĉ ne vi, povas imiti mian specon de elegante rulumitaj cigaroj. Neniu ĉi tie, tion kredis al mi, neniuj, kiu sidas ĉi tie, povas imiti miajn cigarojn.“

„Kaj se vi ne tuj eksilentos“, diris nun Santiago al li, „jen mi batos sur vian ŝindotegmenton, kaj vi iros hejmen en vian kabanon. Kiel mi rakontu ĉi tie ion al la honestaj kaj mense viglaj homoj, se vi ĉiam interrompas min pro viaj cigaroj. Vi scias tute bone, ke mi ne povas flari la specon, kiun vi rulumas. Sed por nun ree surseliĝi la sveltan ĉevalon, pri kiu ni parolis kaj kiu lasis fali nin en tiun merdan kaĉon, do, post kiam *don* Acacio bonŝance skrapentombigis ĉiujn homojn, aŭ pli precize dirate, la plej multajn, kaj aldone ankoraŭ sinkis lia monterio en la marĉon, li kuris rapide kiel simio ĉi tien, kun la

malmultaj viroj, kiuj postrestis de li. Survoje ĉi tien, ankoraŭ fuĝis kvin el ili, kaj nun ambaŭ *capataces* persekutas ilin por rekapti ilin. Ili ankaŭ kaptos ilin, kompatindaj uloj. Eĉ, se ili kurus kiel ajn rapide, kontraŭ ĉevaloj ili ne povus vetkonkuri. Eble ili sin pendigos aŭ tratanĉos sian gorgon, kiam ili vidos, ke oni kaptos ilin, kaj ke ili ne plu kapablos forkuri. Ne restus eĉ nur strio sana je iliaj korpoj, se oni rekondukus ilin. Kaj ĝuste tiam alvenis Acacio tie antaŭ ses tagoj aŭ iam tiam. La unua, kion li faris, estis, ke li elŝvitis bonan ideon. Li devis reakiradi tion, kion li perdis en la monterio, kiun li mastrumis en tiu jaro. Li ordonis, ke ĉiu hakisto liveru kvar toneladojn ĉiutage, kaj ke tiu, kiu liveros malpli ol kvar toneladojn ne ricevu pagon por tiu tago kaj krome oni lernigu al li, kiel oni atingas kvar toneladojn dum tago, se oni nur volas. Skurĝado ne estis utila al li, kaj li sciis, ke en tiu kazo des pli ne utilis. Tial li provis la amaspendumadon; kaj vi venas tute ĝustatempe por ĝui la muzikon de la unua amaspendumado. Ni, la *boyeros*, ankaŭ jam ricevis la novan instrukcion. Hodiaŭ matene. Li rajdas nun ĉiutage laŭ la kampoj, kie oni hakas mahagonon, kaj li ordonas, kiom da trunkoj ĉiu *boyero*

ĉiutage devas fortreni kaj surtavoligi ĉe la tumbo, se oni pagu la tagon al li. Kaj tiel, dum ni hodiaŭ vespere ankoraŭ ĉiuj ĉi tie pace kaj oportune sidas ĉirkaŭ la bivakfajro kaj rakontas al ni reciproke rakontetojn, vi verŝajne morgaŭ vespere proksimume ĉe la sama tempo povos aŭdi plorĝemeti nin en la densejo ĉe la marĉo, kaj tiam sidos la hakistoj ĉi tie kaj aŭdos nin.“

„Sed kion oni do faru kontraŭ tio?“ tremante demandis unu el la novuloj. Li devenis el sendependa vilaĝo kaj vendis sin en la monterion por perlabori monon por sia nupto.

„Jes ja, kion vi do pensas, kion oni povos fari kontraŭ tio?“ ripetis Fidel la demandon. Poste li rigardis laŭvice la virojn, kiuj sidis plej proksime al li. Li pintigis la lipojn kaj respondis mem la demandon laŭ sia maniero: „Kion oni povos fari kontraŭ tio? Tio ĉiam dependas de tio, kia speco de uloj ni estas.“

„Kion vi volis diri per tio?“ demandis alia de la novuloj.

„Li opinias nenion per tio“, diris Santiago. „Sed mi aŭdis

kanti iun *muchacho* antaŭ kelkaj noktoj. Li kantis firme en la plorĝemetadon kaj ĝemadon de la pendumitoj, kaj ŝajne ĝi trankviligis ilin.“

„Vi ja memoros, kiel la kantado estis, ĉu?“ Cirilo konis la kantadon. Sed li volis, ke Santiago kantu la kantadon en tiu momento en la ĉeesto de la novuloj.

„Kompreneble mi memoras. Tiajn kantojn oni devas aŭdi nur unufoje, kaj oni ne forgesos ilin dum sia tuta plua vivo. Tio sonis tiel: „Nia vivo fariĝis tiel malkara, ke ne kostas ion al ni murdi niajn ekzekutistojn; se ni ne plu kondutos kiel homoj, tiuj, kiuj pendumas nin, plendu pri tio.“

„Mi komprenas eĉ ne vorton – el la kanto“, diris Antonio.

Matiaso ekridis, kurte kaj dure. Preskaŭ sen malfermi la buŝon: „Ekzistas kantoj, kiujn oni ne devas kompreni kaj, kies melodio fariĝas klara, se oni faras tion, kio estas kantata en la kanto.“

Alia el la novuloj demandis: „Ĉu ili ne defendas sin, se oni kunnodas kaj pendumas ilin?“

„Ankaŭ porko defendas sin, se oni volas buĉi ĝin“, diris Procoro. „Aŭ ĉu eble ne? Kaj ĉu oni ne havas tri horojn post tio bonan pecon da viando en la poto? Komprenu, ĉi tie estas ĝuste tiel. Kion fari, se tri aŭ kvar torturservistoj ĵetiĝas sur onin? Kompreneble oni defendas sin. Tial ili suke batas onin per klabo dufoje sur la kranion, kaj se oni rekonsciiĝas, oni pendas gaje je branĉo kaj la ruĝaj formikoj rampas en la naztruojn kaj en la orelojn de la pendumito, kien tiuj torturservistoj ŝmiris grason, por ke la formikoj venu tuj armeope. Je la sekva tago oni havas tian dikan kapon kaj tian basan zumadon en ĝi, ke oni je la sekva fojo movas neniun fingron plu, se ili ree volas pendumi onin. Oni tiam ĝojas, ke ili ne ŝmiras grason en la postaĵon aŭ antaŭen, kio same tre agrablas. La moskitojn oni ricevas por nenio, sen graso. Kiel specialan delektindan frandaĵon la hunduloj verŝas al oni kruĉon da varmega kafo en la faŭkon por ke oni ŝvitu ĝis oni pensas, ke oni tuj eksplodos, kaj tiam oni foje observu, kiom da moskitosvarmoj alflugas.“

„La Mecha, tiu bestaĉo kun la oblikvaj okuloj, malkovris novan trukon, tiun eĉ vi ne konas.“ Santiago turnis sin al

la malnovuloj. „Demandu ĉi tie Procoron. Foje montru, Procoro!“

Procoro ne havis ĉemizon sur la korpo, li turnis sian nudan dorson al la lumo de la bivakfajro.

Santiago montrofingris supren-malsupren laŭ fajnaj linioj, kiuj troviĝis sur la dorso de Procoro. „Tie la fetoranta kojoto La Mecha, pendiginte Procoron, tranĉis per dorno fendojn en la haŭton, por ke moskitoj, formikoj, vermetoj, kaj la diablo scias, kion ajn insektaĉoj plu, havu ĝin pli oportune. Kion vi fakte pensas, kie vi estas ĉi tie, flavbekuloj?! Ĉu en bieno? Ĉu en viaj vilaĝoj, kie manĝas vin nur puloj kaj laŭsoj? Vi ne estas en la antaŭhalo de la infero, ĉi tie vi estas jam je la alia fino de la infero.“

„Tion vi diris tre bone, Santo“, opiniis Fidel, „je la alia fino de la infero. Jes ja, ĉe la alia fino de la infero. Prave, ĉar ĉi tie eĉ la plej furioza el la diabloj ne plu pretus partopreni kaj prefere sidiĝus sur molan seĝon, prenus botelon da komiteko kaj poste hontegus ploreme.“

Candido kaj ties fratino Modesta sidis kun grupo de samtribaj viroj je bivakfajreto, tridek paŝojn malproksime de la granda grupo, kiu estis tre vigla. La du malgrandaj knaboj dormis. Pro tro granda distanco la homoj tie aŭdis nenion de la detalaj klarigoj, kiuj haltigis la sangon en la vejnoj de la novuloj. Apud tiu fajreto oni parolis malmulte. La viroj troviĝis en afliktitita stato. Parte ili estis tro lacigitaj de la streĉa marŝo, kaj parte la timo pri la nekonataj teruraĵoj, kiuj ankoraŭ antaŭis ilin, ŝarĝis iliajn animojn; hororo estis ĉie tie, egale, kien ajn ili rigardis. Estis profunda nokto, sed la hororo proksimiĝis rampante al ili. Ĝi venis de la herbokovrata tero, sur kiu ili sidis; ĝi alrampis el la densejo, kiu ĉirkaŭis la vastan placon; leviĝante ĝi gargare proksimiĝis de la rivero. De tempo al tempo ili aŭdis simile al la granda grupo pli proksime kampadanta al la rivero, la plorĝemetadon kaj hurletadon el la ĝangalo. Se la plorĝemetado, de la vento portata al ili, fariĝis pli klare aŭdebla, ili rigardis sin reciproke per timigitaj okuloj. En siaj animoj ili sentis, ja sciis, ke ĝi estas la plorĝemetado de turmentataj homoj,

de la estontaj suferkunuloj, ke ĉiuj, kiuj tie ŝajne tiom pace kunsidis ĉe la bivakfajro, verŝajne jam postmorgaŭ vespere simile plorĝemetos, kaj ke tiam certe aliaj el la kamaradoj tie sidos kaj aŭdos, tiel, kiel ili mem aŭdas ĝin momente sen povi helpi al siaj suferfratoj.

Ili sciis, ke en la granda grupo oni klarigas kaj preparolas la plorĝemetadon en la ĝangalo, ĉar de tempo al tempo flirtis laŭte parolitaj frazoj tute aŭ parte al ili. Sed neniu el ili ekstaris por demandi la malnovulojn, kion signifas tiu mizera hurletado kaj kompaton peteganta ĝemado en la densejo. Ili ne volis esti trompitaĵoj pri sia lasta malforta espero per ekscio de la vero. Ili persvadis sin en sia pensado, ke tio ne estas turmentataj kunuloj, kiuj plorĝemetas, sed la hurletado de la vepro aŭ de miriadoj de insektoj de iu ajn speco, kiuj estigis tiujn kvazaŭ gorĝe sufokitajn ve-lamentojn.

Des pli neniu el ili iris en la densejon por mem eltrovi, kio tie okazas. Ja ankaŭ neniu el la granda grupo iris en la densejon. Nek tie nek en la bienoj nek en mornaj anguloj de kazernoj nek en policaj karceroj kaj policejoj nek en la grandaj koncentrejoj en Verakruco, Jukatano, Morelos,

Tabasko, Yalisco aŭ Michoacan estis iam konsilinda, ke laboristo scivolu kaj esploru la kaŭzon de la plorĝemetado, de la hurletado kaj ve-lamentado en veproj, en putoj, en kavernoj, en profundaj tertruoj, en volbaĵoj de disfalintaj konventoj. Pro sperto sciis laboristoj kaj peonoj, ke la scivolulo en la sekva kvarono de horo tre certe eĉ pli plorĝemetos ol tiuj, kies hurletado allogis lin, pro la deziro helpi al fratoj en bezono.

Eble estis vere nur iluzio, kion ili aŭdis. En la ĝangalo, tage kaj nokte, estis miloj de iluziaj specoj de la aŭd-rigard- kaj flarad-perceptoj, eĉ de la gusto sur la lango kaj des pli de la menso. Kaj estis en ĉiu rilato pli prudente ne paroli pri tio, ja eĉ ne menci tiu. Tiel oni povis facile imagi, ke ĉio tio okazas en fora lando, tre fore kaj eĉ multe pli malproksime de tie.

De la *oficinas* ridis kaj kriaĉis la *capataces*. De tempo al tempo kantis du aŭ tri el ili per rustaj kaj grakantaj voĉoj. De tempo al tempo eksonis la ŝrika kvikado de ebria ino. Estis nur du inoj, je kiuj kvin *capataces* devis kontentiĝi, ili kvazaŭ kuntrenis ilin de la marĉigita distrikto de *don Acacio* tien.

Ambaŭ *muchachas* estis maljunaj kaj ŝvelintaj kiel spongoj. Ili posedis nenion, ja tute nenion, kio povus eksciti iun viron ie surtere. La inoj sciis tion. Kaj ili sciis ankaŭ, ke ili alvenis en la plej lasta stacio, kie ili ankoraŭ iel povas vivteni sin. Kvankam mankis al ili eĉ ne unu malsano, kiun ili povis akiri iom post iom en sia streĉa vivo, ili tie ankoraŭ estis bonvenigataj. Neniu devigis ilin iri tien kun la *capataces*. Ili tre sopiris, ke oni perforte kunprenu ilin tien, por almenaŭ povi protesti kaj tial havi je dek centavoj pli altan prezon. Sed kiam neniu montris inklinon, eĉ ne la kotaj *capataces*, perforti kaj klarigi ilin kiel personan posedaĵon, ili ĝojis, ke *don Acacio* permesis al ili, kuniri kaj eĉ disponigis rajdoĉevalojn. Sen bestoj ili

estus marŝintaj ankaŭ perpiede. Se oni estus postlasinta ilin en la marĉa kampadejo, ne restus io alia krom petegi la lastan *capataz*-on, ke tiu pro Sankta Virgulino pro kompato pafu ilin en la kapon. Tial ili estis tre kontentaj, ke estis kelkaj viroj ĉirkaŭ ili, kiuj ankoraŭ povis uzi ilin por io, kio ajn estus, kaj kiuj tial pro tio disdividis al ili fabojn, tortiljojn kaj kafon. Ĉeokaze, tion ili sciis sufiĉe bone, tiu aŭ tiu el la viroj estos preta aĉeti por ili iun novan vestaĉon, se la turko alvenos en la kampadejo. Bonfartigis ilin de tempo al tempo aŭdi de la *capataces*: „Dank' al Dio ni havas ĉirkaŭ ni almenaŭ vin, kiujn ni povas uzi kvazaŭ kiel inojn, eĉ se estas ĝuste nur manpleno, kio de vi ankoraŭ pli-malpli bone uzeblas.“

Ne tro malofte ili havis eĉ la kontentiĝon, ke eĉ *don* Acacio troviĝis en okazo de bezono voki iun el ili, kaj plurfoje eĉ ambaŭ je la sama horo al la *oficina*.

Sed neniue el la *capataces* kaj neniue krome, kiu eble ĉeokaze faris uzon de ili, insistis pri iu rajto je privata posedo pri ili. Pri tio ĉiu hontus, kvankam ili nur malmulte hontemis. Neniam okazis inter la *capataces* pugnobatalo pri la inoj, ĉar neniue postulis privilegiojn pri

ili. Oni povas diri, ke ĉiu el ili rigardus tian privilegion kiel ofendon.

La inoj nun komencis kanti kun grakantaj voĉoj, kaj du el la *capataces* ekpartoprenis en la terure sonanta kantado.

El Guapo paŝis tra la malfermita pordo. Li ŝanceliĝis kelkajn fojojn tien kaj tien. Poste li vokis en la domon: „He, Faldon kaj Mecha, kaj vi, fetorantaj bufoj, venu.“

Fetorantajn bufojn li nomis la du malgrandajn indiĝenajn knabojn, kiuj priservis en la *oficina*.

„La lanternojn!“ li vokis al la knaboj.

La knaboj prenis du lanternojn kaj ebruligis ilin per triste fulganta kandelo, kiu staris sur la kruda tablo.

„Ni dependigu la kanajlojn. Ili pendas nun jam sufiĉe longe, alikaze ili estus morgaŭ tro kurbigitaj kaj ne povus haki“, diris El Guapo, necerte baraktante per ambaŭ brakoj.

„Ĉu ni rajtas kunveni kaj rigardi, kiel vi pendigas kaj

malpendigas la virojn?“ Unu el la inoj proksimiĝis al la pordo.

„Ankaŭ mi volonte rigardus tion“, diris la alia, suprentirante la ĉemizon, kiu estis malferma ĝis la umbiliko.

El Guapo puŝis la platan manon tiel forte sur la vizaĝon de la pli proksima ino, ke ŝi retroŝanceliĝis ĝis la transflanka vando.

„Pedikohavaj fikemaj porkinoj, vi restas ĉi tie. Kaj se mi iam ajn trovos iun el vi, putinoj, proksime de tie, kie pendas la *muchachos*, mi martelos vian kranion per miaj pugnoj, ĝis ĝi estos kaĉo. Damne, ĉe la diablo! Porkinoj, kiuj vi estas! Ĉu vi ne povas sufiĉe plenigi viajn skatoletojn, ke vi volas havi aldone eĉ teatroprezenton? Ja ne vidigu vin proksime, se vi volas vivi plu.“

Li iris al la angulo, kie nun staris la knabino, kiu volis kuniri, verŝajne por speciale delektiĝi. La ino sciis, kio okazos. Ŝi tenis ambaŭ manojn antaŭ la vizaĝo. Sed per forta brutala movo de sia maldekstra mano li ŝiris ambaŭ

manojn de ŝi malsupren kaj klake batadis la inon sesfoje tiel senkompatate transverse survizaĝen, ke ŝia nazo krevis kaj la vizaĝo kovriĝis de ŝprucanta fontanta sango.

„Ek!“ li vokis al la *capataces*. „Dependigu ilin. Ili jam sufiĉe longe balancis kiel pendumitoj.“

La tri *capataces* trairis inter la grupoj, kiuj kampadis sur la placo, sen pli interesiĝi pri ili ol se ili estus nur ĝuste herboj, kiujn ili devas preteriri.

„Kien ili volas iri?“ demandis Antonio mallaŭte Fidelon, kiu sidis apud li.

„Ili foriras por dependigi la *castigados*, la punitojn.“

„Ni ekiru kaj observu tion“, konsilis unu el la novuloj kaj suprensaltis.

Matiaso retiris lin teren. „Lasu tion, se via felo estas kara al vi. Vi devas nur proksimiĝi, kiam la *capataces* pendigas aŭ malpendigas iujn, kaj tuj vi estos en la vico. Kie oni disdonas batojn, tie ĉiam estas pli bone iri ĉirkaŭvoje, alikaze kelkaj trafos vin.“

„Atendu nur“, nelaŭte diris post tio Santiago. „Ankoraŭ iam venos la tago, kiam pendigos kaj malpendigos ilin ni. Kaj kiam ni ĝuste iros tien, kie hajlas batoj, sed tiukaze ne por ricevi kelkajn, sed por disdoni ilin. La hundoj ĉiam

forĝegas, ke oni povas skurĝi viron ne eterne. Iutage li eklernos kiel skurĝi kaj kiun skurĝi, por rehavi trankvilan animon.“

Kiam li finis la frazon, li rigardis al Martin Trinidad, unu el la tri vagabondoj. Dum kelkaj sekundoj li rigardis lin, kvazaŭ li volus esplori ties pensojn. Poste li diris: „Kial vi rigardas min tiel? Se vi estas orelumanto, jen diru do. Post kelkaj tagoj ni scios tion. Kaj tagon poste vi ne plu orelumos.“

Martin Trinidad rikanis: „Se vi ne volas, ke mi orelumu, tiukaze ne parolu, se mi sidas ĉi tie. Mi ne invitis vin. Venis vi ĉi tien al ni, kaj ne ni al vi.“

Santiago kapjesis kaj rikane larĝigis la buŝon. Lia cigaro ne plu brulis. Li ekbruligis ĝin denove per ardetanta branĉeto, kiun li tiris el la fajro.

„Morgaŭ Celso rigardos vin, la triopon, de supre ĝis malsupre“, li diris fine. „Celso havas bonajn okulojn.“

„Ni havas ses bonajn okulojn“ respondis Martin Trinidad. Liaj du amikoj ridis, kaj Juan Mendez diris: „Jes ja, ni

havas ses tre bonajn okulojn, alikaze ni eble ne estus ĉi tie. Kion diras vi, frateto?“ Li turnis sin al Lucio Ortiz. Lucio respondis: „Nia triopo vidas kiel sesopo.“

Li ŝajne supozis tion brila ŝerco, ĉar li laŭte ekridis.

„Jen ili revenas, ebriaj kiel ledorimenoj.“ Santiago kapgestis al la tri *capataces*, kiuj elvenis de la densejo, renkonte irante al la *oficina*.

„Nun ni povas iri al la *muchachos*.“ Fidel ekstaris.

Dek aliaj viroj leviĝis.

Fidel kaj du aliaj iris al la granda dormokabano kaj alportis lanternojn, kiujn ili bruligis ĉe la bivakfajro.

Poste la grupo iris al la densejo.

Surtere kuŝis ok homaj buloj. Ili estis tute kunpremegitaj en sin mem, kvazaŭ oni estus konservintaj ilin dum monatoj en malvastaj rondaj bareloj. Ĉiu surhavis ne pli ol pecon da ĉifonita lana pantalone. Ili ĝemis kaj lamentis kiel homoj, kiujn oni ŝiris el profunda dormo, kaj kiuj ankoraŭ tro lacas por tute vekiĝi. Ili ruliĝadis sur la tero kaj komencis etendi membron post membro, por ke ili ree fariĝu elastaj; ĉar la brakoj kaj gamboj spasme kuntiriĝis kaj endormiĝis.

La lazojn, je kiuj pendis la homaj buloj, la *capataces* malnodis kaj simple senzorge lasis fali la korpojn teren. La *capataces* sciis, ke la ceteraj *muchachos* helpas al siaj

kamaradoj. Ne estis la tasko de la *capataces* zorgi pri la bonfarto de la pendumitoj. Ĉu ili mortaĉas dum la pendado, kiel tio okazis ĉeokaze, aŭ ĉu ili ne mortaĉas, interesis la Montellanojn kaj ties *capataces* nur tiurilate, ke ili perdis labormanojn. Se la manoj estis tro pigraj kaj ne kapablaj havigi tri aŭ kvar toneladojn, ne estis perdo, se la viro kun la pigraj manoj mortaĉis. Aŭ li atingis kvar toneladojn aŭ oni enfosis lin teren, ĉar li eĉ ne meritis la manĝaĉon. Estas la devo de la proleto labori, kaj se li estas tro pigra por labori, li ne havas rajton vivi. For la fibubon. Estas nur superflua manĝulo malpli sur la bela tero de Dio.

La okuloj de la ekspendigitoj estis sangaj kaj ŝvelintaj. La korpo je cent lokoj inflamigis de tuberoj kaŭzataj de la piko de moskitoj kaj de la moroj de ruĝaj formikoj. Dekoj de ĉerizograndaj iksodoj kaj centoj el tre malgrandaj iksodoj tiel forte mordiĝis en la haŭton, ke ties kapoj tute enfosiĝis. Kostis penon kaj paciencon eltiri ĉiujn iksodojn tiel, ke la kapoj ne restu plu en la karno, ĉar tiukaze ekestus malicaj, malbone kuraceblaj vundoj. Kie ajn iksodo enmordiĝis, eĉ se oni eltiris ĝin poste, restis

pikvundoj, kiuj jukis dum semajno tiel terure, ke la vundito ĉiam devis grati la haŭton por trovi pacon. Ĉiu korpo estis kovrita de svarmado de formikoj, de enmurdiĝintaj kaj de tiaj, kiaj forkuris kun guteto da sango aŭ kun peceto da homa karno. En la piedfingroj kaj inter la piedfingroj troviĝis sablopuloj, kiuj metis siajn ovojn profunde en la karnon. Malgrandaj araneoj rampis en la hararon kaj pli grandaj araneoj komencis plekti retojn sur lokojn de la korpo por kapti la etajn muŝojn allogitajn de la ŝvito kaj sango de la pendumitoj. Limakoj postlasis siajn scintilantajn mukovojojn sur la nudaj femuroj, kaj la grandaj muŝoj metis siajn ovojn en malfermajn nebendaĝitajn vundojn kaŭzitajn de la laboro.

La malnovuloj trenis siajn kamaradojn, kiuj ankoraŭ estis kvazaŭ kiel en sonĝo kaj portis ilin preskaŭ ĝis la rivera bordo. Tie ili prenis ĉiun korpon sur la brakojn kaj trempis ĝin en la fluantan akvon por fridetigi la ardantajn moskitajn pikvundojn kaj por forlavi formikojn kaj araneojn. Post la korpolarado ili tiris ĉiun al la bordo kaj komencis etendi kaj masaĝi la membrojn.

„Ne estas tiom fia, se oni pendigas nin ĉi tie proksime ĉe la kabanĵoj“, diris Santiago al Antonio, kiu helpis al li rekonsciiĝi Lorenzon, viron el la pendigitaj hakistoj. „Pli malice estas, se iu tute sola, pro speciale severa puno, estas pendigita tre malproksime de la kampadejo, kie ekvoras lin sovaĝaj porkoj aŭ ĝangalaj hundoj, dum li ne povas defendi sin.“

„Alia refreŝigo, kiel diras kutime *don* Feliks, estas simile bela. *Don* Feliks eltrovis ĝin.“ Diris tion Matias, kiu kuracis alian korpon apud Santiago. „Je la dekunua matene oni prenas iun *muchacho*. Sur vasta placo, kie nek estas arbo nek tegmento, oni firme kunŝnuras lian nudan korpon kaj poste enfosas lin en la ardantan sablon, tiel, ke ankaŭ la buŝo foriĝas, tiel, ke nur la nazo, la okuloj kaj la kapsupro restas liberaj, ĉio kompreneble sub ardeganta suno. Mi povas diri al ĉiu el vi, novaj nespertaj ŝafidoj, nur tion: se vi iam tiel estos enfositaj, vi tremos kiel kapra barbeteto, se *don* Feliks diros al vi: Vi liveros hodiaŭ kvar toneladojn, aŭ ni enfosos vin morgaŭ je tri horoj. Via tuta vivo ŝajne estos tiom longa, kiom tiuj tri horoj.“

La terure kruela puno de la pendumado estis ĝuste tial tiom sukcesa, ĉar ĝi kostis tial tiom malofte vivon, ĉar la indiĝenaj viroj estis eksterordinare fortikaj kaj sanaj, kaj post la tago de la torturado plej ofte jam povis labori, kvazaŭ apenaŭ io estus okazinta al ili. La Montellanoj lernis el siaj longjaraj spertoj en la monterioj, ke la pendumado de la „pigraj uloj“, estis multe pli efika ol la skurĝado. De la pendigado kaj enfosado ne restis vundaj dorsoj, kiuj malhelpis labori. Kio postrestis kaj tiom efikis, estis la timo ankoraŭfoje devi trasuferi tiujn horojn de teruraj turmentoj. Horoj, kiuj fariĝis eternecoj plenigitaj de ĉiama hororo, ĉar en la tenebro de la nokto la pendigitoj ne povis vidi, kio proksimiĝas al ili. Kaj se proksimiĝis io minaca, ili ne povis defendi sin.

Neniu scias pli bone ol indiĝeno el la regionoj proksime de la ĝangalo, kiujn hororojn la ĝangalo kaŝas en si. Sed tio, kio faras la pendigitecon kaj sendefendecon de pendigito en la nokto, en la profundoj de la ĝangalo por la indiĝeno tiel nedirebla kaj neklarigeble kruela, estas lia nesubigebla timo pro spiritoj kaj fantomoj, lia superstiĉo pri la reveno de la mortintoj, kiujn li supozas vidi sola en

la nokto ĉie. Blankulo, transnokte enfermita en la ĉambro de teruroj de vaksfigura kabineto aŭ en tomba kelo de maŭzoleo, ne povas tiom suferi kiel primitiva indiĝeno, pendigita kaj sendefenda en la nokto en la ĝangalo kaj sen bivakfajro proksime. La Montellanoj estis sufiĉe prudentaj kaj spertaj, por ne pendumi la virojn, ekskludite de certaj duraj esceptoj, tro malproksime de la kampadejo. Se ili pendigus la virojn profunde en la ĝangalo malproksime de la kampadejo, matene neniu plu vivus. Spiritoj kaj fantomoj premsufokigus ilin. Ĉe kelkaj oni vidus eĉ la signojn de la strangolado je la gorĝo, kaŭzitaj kompreneble ne de spiritoj, sed de la eksterordinare fortaj imagoj de tiuj naturaj kaj tute needukitaj homoj.

Post kiam ĉiuj pendigitoj fine estis refreŝigitaj de siaj kamaradoj kaj oni enfluiigis varmegan kafon al ili kaj nutris ilin per varmigitaj faboj, ili leviĝis de la fajro kaj ŝanceliĝis kiel ebriuloj al la dormokabanoj por sterni sin. Tiel fariĝis nun la dekunua nokte.

Matene je la kvara venis La Mecha en la dormkabanojn kaj tretis la virojn per siaj botoj emfaze en la ventron, kiel matenan saluton. Tio per unu fojo surpiedigis ilin.

De la doloroj kaj horoj de la pendado je la pasinta vespero, ili estis ankoraŭ tiel duonsvenaj, ke ili konfuze kaj haste kaptis per nelevitaj manoj la fabojn apenaŭ varmigitajn el la poto kaj ŝovis la kaĉon en la buŝon – tiel rapide, ke ili preskaŭ sufokiĝis je la firmaj buloj. Per la alia mano ili kaptis la ladokruĉeton kun la akveca varmeta kafo kaj gargaris malsupren la fabopaston, kiu firmgluiĝis en la ezofago. Poste, ankoraŭ kun la plenŝtopita buŝo de la fabopasto, kiun ili postŝovis, ili ĵetis sian hakilon surŝultren kaj kuris, kvazaŭ kiel persekutatoj, en la ĝangalon, por atingi je la sama tago kvar toneladojn kun certeco.

Nur unu penson ili havis dum tiu tago kaj dum la sekvaj tri semajnoj: '*Por todos los Santos*, je ĉiuj sanktuloj, Dio, lasu min atingi kvar toneladojn hodiaŭ, por ke mi ne estu pendigita!'

Sed Dio estis antaŭ dumil jaroj sur la tero kaj savis ĉiujn homojn. Li forgesis la indiĝenojn.

Kompreneble ties lando ne estis konata. Kaj kiam ĝi fine estis trovita, estis la unua, kion la malkovrintoj faris, ke ili starigis krucon sur la marbordo kaj celebris sanktan meson. Je tiu okazaĵo suferas la indiĝenoj ankoraŭ nun.

„Kaj certe“, diris kelkajn tagojn poste iuvespere tute neatendite Martin Trinidad: „Dio estis surtere kaj savis la homojn antaŭ dumil jaroj. La sekvan fojon estos ni je la vico.“

„Eble“, opiniis dormeme Pedro, unu el la bovoservistoj, kiu sciis tion kaj tion pri eklezio kaj *curas*. „Eble. Sed eble ni atendos ankoraŭfoje dum dumil jaroj por fine esti je la vico.“

Pri tio lakone diris Celso sen multe brui pri tio: „Kial atendi la Savonton? Savu vin mem, frato mia, tiukaze venos ankaŭ via Savonto.“

Rimarko

cura = pastro

Ĉapitro 06

01

„Tio estas ja pompa arbo, kiun vi ĝuste hakas“, diris Celso al Candido. Ĉu *don* Cacho tiun arbon kretosignis por vi?“

„Jes, la arbo havas mian numeron.“

„Tion mi supozis. El tiu arbo, estas ĝuo rigardi ĝin, vi facile elskrapos tri toneladojn.“

Candido metis la hakilon apud si sur la teron kaj kraĉis nun forte sur la manojn. Sed antaŭ ol li ree levis la hakilon, por plu prihaki ĝin, li diris: „Multon mi ne scias pri toneladoj kaj trunkoj. Tio estas la dua arbo, kiun mi hakas. El Faldon diris al mi, ke la unuaj du semajnoj estas nur por ekzercado kaj, ke oni ne pendigos min, se mi atingos malpli ol kvar toneladojn dum tago; li diris, ke li estos kontenta dum tiuj du semajnoj pri tri toneladoj dum tago. Sed mi nun jam hakas du horojn kaj mi apenaŭ atingis la trunkon.“

Celso ridis: „Kompreneble, se vi plu gratos la arbon tiel,

kiel ekde matene, mi povas diri al vi, ke vi eĉ post kvar tagoj ne faligos laŭlonge la arbon.“

„Tion ankaŭ mi pensas, frato mia, se mi rigardas la rezulton de laboro. Mi prefere rigardu plu en la ĝangalo por trovi mian numeron je alia arbo, kiu eble faligeblos pli facile.“

„Tio ne multe helpas al vi, *hermanito*. Ĝi estas signita por vi, kaj vi devos haki lin, se ne hodiaŭ, tiukaze do morgaŭ.“

Candido rigardis Celson malesperigite. „Kion do fari? Mia hakilo estas bona kaj akra. Sed ĝi ne enmordiĝas. Estas tiel, kvazaŭ mi hakus feron. Ĝi resaltas post ĉiu bato kaj postlasas nur etan noĉon je la arbo. Jam dufoje ĝi retrofulmis gamben. Rigardu, tie, frato, kie la karno krevis. Tie la hakilo entrancis sin.“

„Vi faras tion malĝuste, koramiko mia. Tiun specon de arboj, kiel tiun, oni devas haki alie.“

Celso klarigis al Candido, ke la arbo apartenas al la malicaj esceptoj. Kompreneble tiuj esceptoj, kiel li diris, estas tiom oftaj, ke *don* Acacio aŭ la *capataces*, kiuj signis

per kredo la hakendajn arbojn, kapablas inferigi per galo la vivon de hakisto, per tio, ke ili asignas nur tiujn esceptojn al li. „Pri tio“, diris Celso, „mi havas specialan bonŝancon.“

Multaj arboj en la tropikaj arbaroj dum la kreskado kvazaŭ kunprenas supren la ĉefajn radikojn. Tiuj radikoj formas fortikajn ripojn, kiuj havas je sia ekstera finaĵo proksimume la dikon de colo; kaj ju pli ili proksimiĝas al la trunko, des pli dikaj kaj altaj ili fariĝas, ĝis ili transiras krute kaj oblikve en la malsupran trunkoparton mem. Kelkaj arboj havas sep aŭ eĉ naŭ tiajn ripojn radie elirantajn de la trunko. Tiuj ripoj, kiuj estas ja radikoj, konsistas el dura ligno, kiu estas multe pli dura ol tiu de la trunko. Se oni volas faligi la arbon per hakado, unue necesas trahaki ĉiujn ripojn antaŭ ol la hakilo povos atingi la trunkon mem. La ripoj estas ne nur eksterordinare duraj, sed ankaŭ ofte tri aŭ kvar futojn larĝaj, sendepende de la dikeco.

Candido staris embarasite antaŭ tia praarbo de la ĝangalo. Li povis antaŭvidi, ke kostos al li eble du tagojn ĝis li estos hakinta la arbon.

Celso kompreneble, unu el la plej spertaj kaj plej fortikaj hakistoj de la kampadejo, ridis pri la malespera situacio de Candido. Li vidis nur la tri toneladojn, kiujn la arbo ebligis. Por li signifis tiuj ripoj nur malgrandan malhelpon, kiun li volonte kunakceptis rilate al tio, ke la arbo mem liveros tri toneladojn.

„Tiel, kiel vi imagas tion, vi ne povas subigi la arbon“, li diris pluan fojon.

„Tion ni faros alie. Ĉe tiu arbo vi devos konstrui ĉarpentan plataĵon. Sufiĉe altan, por ke vi tuj atingu la trunkon. Ĝi devas esti tiom alta, ke vi staras super la radikoj, tiel ke vi ne devas trahaki la ripojn, sed nur la trunkon.“

„Nur por tio mi ja bezonos duonon de tago“, reiris Candido.

„Eble, je la unua fojo. Sed, se vi foje estos lerninta la trukon, estos simple. Haku al vi malgrandajn trunkojn kaj detranĉu lianojn por kunligi la trunkojn. Kompreneble ne

konstruu la plataĵon tiel, kvazaŭ ĝi sufiĉu por la eterneco. Se ĝi disprompiĝos sub vi en la sama minuto, kiam la trunko komencas fali, la konstruaĵo plenumis sian taskon. Kompreneble, ĝis tiu momento ĝi devas elteni. Cetere, atendu iom, mi helpos al vi. Por ke vi vidu, kiel oni devas fari tion.“

Candido hakis la trunketojn, dum Celso kunplektis la trunketojn kaj branĉojn. Daŭris efektive apenaŭ horon, kaj jam la plataĵo ĉirkaŭ la arbo estis starigita.

„Vi vidas ĉi tie, *hermanito*“, diris Celso, kun bonfarta sento rigardante la belan laboron, „ke vi ne havas tabulojn, sur kiujn vi povus stari oportune. Vi staras ĝuste nur sur la transversaj branĉoj, sur kiujn vi devos firmkroĉiĝi per viaj nudaj piedoj kiel simio. Se vi ne atentis, vi trarompigis kaj devos denove grimpi supren. Nu, provu do foje haki!“

Candido grimpis supren kaj komencis haki. Li ĵus faris tri batojn kaj swingoplene volis fari la kvaran, sed jen li subite falis laŭlonge de la plataĵo.

„En ordo, ke vi nun vidis, kio povas okazi al vi.“ Celso ridis. „Jen alia utila truko, kiun mi montros al vi. Kie vi havas vian lazon, kiun oni donis al vi kun la ilaro? Bone, tiun lazon ĵetu supren kaj per maŝo ligu ĝin alte super vi ĉirkaŭ la trunkon. La malsupran finaĵon ligu ĉirkaŭ vian korpon. Ĝuste, iel tiel. Kaj nun nodu tiel, ke la lazo ne estu tro malstreĉita kaj ne tro streĉita. Se vi tiam per la piedoj deglitos de trunketo, vi ne falos malsupren, sed dancos ĉirkaŭ la arbo. Se via lazo havos la ĝustan longon, vi ne pendigos vin, sed nur iom ŝanceliĝos al la flankoj, sed vi tuj ree estos je la ĝusta loko. Nodite laŭ certa longo, la lazo krome certagrade helpas al vi haki rapide kaj tute forte.“

Candido kraĉis sur la manojn kaj hakis kun bona sukceso. La hakilo tranĉis rapide en la trunkon.

„Jen vi vidas, bubo, kiel facile tio progresas, se oni scias kiel fari.“ Celso volis iri al sia laboro.

Candido haltis kaj diris: „*Compañero*, kial vi helpas al mi? Mi ja eĉ ne konas vin. Kaj eble oni pendigos vin, ĉar vi disipis vian tempon pro mi.“

„Eble“, respondis Celso. „Mi havas jam kelkajn plusajn toneladojn, mi jam plenumis mian semajnan kvoton. Mi kompatas vin, frato. Vi ankoraŭ ne kutimiĝis pri tio. Krome eble ne damaĝos al mi, se ili ankoraŭ kelkfoje pendigos min. Sciu, mi bezonas koleron. *Mucho coraje*, ege multe da kolero. Kaj pri tio helpos al mi, se mi ankoraŭ kelkfoje estos pendumita.“

„Por kio vi bezonas tiom da kolero, *compañero*?“

„Por... por kapti junan sovaĝan porkon. Mi volus manĝi freŝan kaj delikatan sovaĝan porkviandon. Kaj mi nun ree antaŭ ĉio ĉasos.“

Celso levis sian hakilon, metis sian maĉeton post la lazon, kiun li antaŭe volvis ĉirkaŭ sian korpon, kaj el sub la ĉemizo li tiris saketon. Li malfermis la saketon kaj montris ĝin al Candido. „Ĉu vi scias, kio estas tio?“

Sen grimpi malsupren de sia plataĵo, diris Candido: „Jes ja, tion mi scias. Ili estas sagopintoj el fajroŝtono.“

„Vi pravas, vi vidis tion ĝuste. Mi faris du splendajn arkojn. Per tiuj fajroŝtonoj mi faros nun ankoraŭ sagojn

al mi. Kaj, se mi havos ilin, mi havos du horojn poste ankaŭ porkon aŭ almenaŭ sovaĝan meleagron. Ankaŭ meleagro tute bone gustas. Kaj se mi havos ion bonan, mi invitos vin hodiaŭ vespere manĝi kun mi, kun viaj knaboj kaj via fratino. Kiel ŝi nomiĝas, via fratino?“

„Modesta.“

„Bela nomo. La modesta. Tio plaĉas al mi. Ankaŭ mi amis inon. Sed tiu nun certe estas edzinigita, ĉar mi ne revenis. Mi prefere ne pensu pri tio, kaj ĉasos ion.“

„Ĉu vi laboras hodiaŭ?“

„Kompreneble. Tion, kion mi devas fari, mi faras, eĉ sen profunde enspiri pro tio. Ĉu vi vidas miajn manojn?“

Li etendis siajn manojn supren al Candido.

Candido rigardis la manojn kaj poste palpis ilin.

„*Hombre*, tio ja ne estas karno, estas osto aŭ fero.“

„Certe“, diris Celso ridante. „Ili centfoje senŝeliĝis. Nun ne plu kreskas karno sur ili. Tio ĉio estas kartilago. Jen

unu el la kaŭzoj, ke mi, se mi volus, faligus ses toneladojn dum duono de tago. Sed mi ne faras tion. Mi ĉiam haltas je kvar aŭ eĉ nur je tri, se mi estas kolera. Sed fidu al mi, kamarado, se mi tuŝe karesus permane la kranion de *capataz*, jen la tuta kranio disrompiĝus kiel malnova poto.“

„Miaj manoj aspektas alie“, diris Candido. Li montris siajn malfermitajn manplatojn. La karno jam deŝeliĝis kaj la ŝiraĵoj de krevitaj sangovezikoj pendis laŭ la flankoj kiel franĝoj.

Celso rigardis ilin kun respekto. „Ĉi tie vi nun komencas ekkompreni ion gravan. Estas la aspekto de la manoj, kial oni ne postulas de vi kvar toneladojn dum la du unuaj semajnoj, kaj kial oni nek skurĝos nek pendigos vin, eĉ se vi ne atingus du toneladojn. Sed, se la manoj ree estos sekaj, la bestaĉoj trovos aliajn lokojn je vi por senŝeligi ilin.“

Celso foriris. Sed apenaŭ li forestis, li jam revenis post kelkaj minutoj. „*Compañero* mia, ĉu tio tie transe estas la arbo, kiun vi hakis?“

„Jes ja, ĝi estas. La unua, kiun mi faligis.“

„Tiun ili ne akceptos de vi, koramiko.“

„Sed mi ja senbranĉigis la arbon.“

„Oni akceptas de vi nur la pretan trunkon kaj pagos ĝin, ne la arbon. Reiru do tien kaj prihaku la trunkon ĝis la ĝusta longo de tonelado. Kaj se vi estos farinta tion, prihaku ĝin al kvarangula trabo kaj enbatu vian markon.“

„Ĉe ĉiuj diabloj!“ sakris Candido. „Tio kostos min eĉ du horojn da laboro aldone.“

„Pro via nesperto certe du horojn. Sed helpos al vi nenio. Vi devos liveri trunkojn, *trozas*. Arboj staras sufiĉe en la ĝangalo. Tion, kion la Montellanoj volas havi de vi, estas *trozas*, kaj ne arboj. Do denove okupiĝu pri la arbo. Post duono de horo certe El Faldon alvenos sur ĉevalo, kaj se li vidos la arbon tia, kia ĝi estas nun, tuj hajlos kelkaj batoj sur vin. Ke vi ne sciis tion pli bone, ne estas senkulpigo por li. Same tiel, kiel tio ne estas senkulpigo ĉi tie, ke vi ne havas sufiĉe da fortoj por la hakado. Aŭ kvar toneladojn ĉiutage aŭ pendumadon, fia porko, nomata pedikohava

indiĝeno. Kiel vi havigos la kvar toneladojn, tio estas afero via, ne la afero de tiuj, kiuj donas al vi la hundan manĝaĉon kaj de tempo al tempo kelkajn kapsulojn da kinino, ne por ĝojigi vin, sed tial, por ke vi ne tro rapide mortaĉu je malario kaj unue forlaboru vian ŝuldokonton, antaŭ ol vi estos enfosita kaj tiam povos satdormi.“

Estis fine de aŭgusto kaj *don Severo* ordonis, ke en la sekva semajno, se la pluvelverŝiĝoj daŭros, oni komencu la transportojn per flosado. *Don Acacio* kun kvar *capataces* survojiĝis por inspekti ĉiujn kampadejojn kaj por rigardi, ĉu ĉiuj pretaj *trozas* je la tumboj estas surtavoligitaj. Je lia ĉagreno li trovis, ke en la *camp Oeste* pli ol ducent trunkoj kuŝis distrite je tiuj lokoj, kie oni faligis ilin. La *boyeros* klarigis, ke ne eblis treni ĉiujn *trozas* al la tumboj, kvankam ili laboraĉis tage kaj nokte. La *trozas* enfosiĝis tiom profunde en la marĉa tereno, ke oni plenumis jam duran taglaboron, se kvar *trozas* estis trenitaj al la sulko. La viroj eĉ sin mem jungis antaŭ la trunkojn kaj tiel provis treni la trunkojn, se la bovoj pro trolaciĝo rifuzis pluan laboron.

Don Acacio kunvokis la *capataces* de la kampadejo kaj demandis ilin, kion ili fakte faris tie dum la tuta tempo. Ili senkulpigis sin per tio, ke ili unuavice devis sekvedi la hakistojn, por ke ili atingu kiel eble plej altan toneladokvanton. Sed, ke, se ili ĉiam estu post la hakistoj,

ili ne povas vadi post ĉiu jungita bovoparo, por ke ĉiuj *trozas* estu fortrenitaj. Ili diris, ke ili estas nur du viroj kaj tial ne kapablaj esti ĉie samtempe. Ili postulis de *don Acacio* foje rigardi la konstruitajn stratetojn, kie oni trenas la *trozas*, kiel marĉigitaj ili estas kaj kiel komplete estas fortreni eĉ nur unu trunkon; ĉar ĉiutage la stratetoj sinkas pli kaj pli multe, pri kio oni ne miru, ĉar oni troviĝas ja meze de la pluvsezono.

„Kompreneble, aĉa bando de pigruloj, fikemuloj kaj eternaj ebriuloj, se vi drinkas kaj dormas en la pluvsezono, tiukaze nun estas ja tro malfrue, kiam la pluvo jam ĉeestas. Kion vi do faris dum la seka sezono?“

„Estis jam dum monatoj ne multe da sekeco en nia regiono, patrono“, defendis sin El Doblado. „Ni nek drinkis nek diboĉis kun putinoj, ĉar ĉi tie estis nek *aguardiente* nek publikulinoj.“

„Tenu fermita vian kotan grimacilon aŭ mi skurĝos vin, eĉ se vi estus kiel ajn impertinenta. Mi minusos al vi ambaŭ tri monatojn, ĉu vi eble eĉ supozas, ke mi pagos salajron al vi, se vi ne laboras?“

„Tute laŭ via plaĉo, patrono“, respondis *El Doblado*. „Sed, se vi volas minusi ion de ni, eĉ se ni ne havas la plej etan kulpon, tiukaze mi kaj ankaŭ la alia, mia kunulo *El Chapapote*, iros hejmen, tien, de kie ni venis, tion mi povas diri al vi nun ankoraŭ aldone, patrono.“

„Tio ne okazos. Ja kion vi pensas?“ kriegis nun *don Acacio*. „Vi ankoraŭ devos forlabori ŝuldokonton ĉi tie.“

„Vi pravas, patrono“, diris nun *El Chapapote*. „Ni havas ankoraŭ konsiderindajn ŝuldojn. Sed mi ne lasas minusi ion. Eĉ ne tagon.“

„Tiukaze la diablo vin prenu, friponoj! Kaj en *Hucutsin* rakontu, ke mi elĵetis vin kun hurao – pro pigrumado kaj drinkado. Sed la ĉevalojn vi ne kunprenos. Rampu sur viaj brakoj kaj piedoj tra la ĝangalo, se vi nepre volas foriri, kaj iutage mi ja ie trovos viajn ostojn priironĝitajn de vulturoj. Ek, al la laboro! Kaj kunvoku kelkajn *boyeros* ĉi tien.“

Post tridek minutoj venis du *boyeros* al la *oficina*.

„*A sus ordenes, Patroncito*“, diris la viroj, kiam ili enpaŝis

tra la pordo.

„Notu bone enkape, kion mi diras al vi.“ *Don Acacio* venis al la pordo, kaptis ambaŭ virojn je la oreloj kaj tiris ilin proksimen al si. Poste li skuis ilin, kvazaŭ li volus elŝirti ties orelojn.

La viroj baraktis, kurbiĝis, kaptis per siaj manoj supren kaj firmkroĉigis je la brakoj de sia turmentanto. *Don Acacio* lastfine prenis la fingrojn de la oreloj. „Morgaŭ vespere ĉiuj ĝis nun ne fortrenitaj *trozas* devos esti je ilia *tumbo*. Se ne, jen morgaŭ estos por vi ĉiuj *fiesta* tia, kia vi ankoraŭ ne travivis ĝin. Ek, kaj diru tion al la aliaj!“

Ambaŭ viroj, sciante, ke ili rajtis nek kontraŭdiri ion nek senkulpigi sin, krucis siajn brakojn kaj kliniĝis. Kaj ambaŭ respondis samtempe: „*Si, Patroncito*, jes ja, ni faros.“

„Estas nenio alia krom pigreco, kaj vian pigrecon mi nun foje finos.“ *Don Acacio* ree iris en la kabanon, kiu estis tie la *oficina*, kaj sidiĝis al la tablo.

Ekstere komencis forte plui. Kiel torento la akvo rapide

falis teren; la loko, kie staris la *oficina* kaj la dormkabanoj, ŝanĝiĝis dum tridek minutoj al lago.

Don Acacio sendis knabon alporti botelon da komiteko el la vojaĝpako, kaj dum li varmigis sin interne, li trarigardis la laborlistojn. Ĉeokaze li ekstaris, iris al la pordo kaj rigardis, kiel la lago pli kaj pli ampleksiĝis, kaj kiam la akvo torentis eĉ en la *oficina*-n, li diris: „Diodamnita vetero!“ Poste li suĉis glutegon el la botelo, skuiĝis kaj fine vokis al la kuireja kabano de la kampadejo: „He, Pedro, kiam mi fine ricevos manĝaĉon? Kia mastrumado tio estas?“

„Tuj, *Jefe*“, vokis Pedro. „Tuj la manĝo estos preta. Nur la fajro estingiĝis dum momento kaj la kafokruĉo renversiĝis.“

„Rapidu do, mi tuj mortos pro malsato.“

Rimarko

A sus ordenes, Patroncito = Laŭ via ordono, patronĉjo

Horon poste la pluvo maldensiĝis. Sed la akvo de la lago ankoraŭ ne sinkis tute teren, kiam jam denove sekvis furioza pluvelverŝiĝo.

Kiam malheliĝis, venis la hakistoj kaj *boyeros* en la kampadejon por manĝi. La pluvo ankoraŭfoje ĉesis.

La tero en la dormkabanoj estis marĉa. Kelkaj el la hakistoj posedis hamakojn. Sed la plimulto el la viroj posedis nenion krom du bastmatoj, sur kiuj ili dormis. Ili estis tiel lacigitaj, ke post sterniĝo ili eĉ ne ekstaris tiam, kiam la kamapadejo reŝanĝiĝis en lagon kaj ili kuŝis en la akvo. La malnovaj *muchachos* kun pli da sperto, kiuj ne havis hamakon, kompreneble starigis sian dormejon sur litĉarpentaĵo kaj ili kuŝis seke, se la pluvo ne gutis tra la palmtegmento. Al ĉiuj aliaj, kiuj malpli spertis pri pluvelverŝiĝoj en la ĝangalo, restis nenio alia krom dormi en la akvo aŭ leviĝi ankoraŭ en la nokto kaj konstrui litĉarpentaĵojn.

Nur la hakistoj rajtis sterni sin por dormi, la bovservistoj,

avertitaj de la kolosa tasko, kiun ili havos dum la sekvaj dudek kvar horoj, voris nur sian manĝon kaj tuj denove ekstaris. Ili ekbruligis siajn lanternojn kaj ekmarŝis en la ĝangalon por treni trunkojn. La bovojn, post kiam ili manĝis, oni alkondukis. La viroj nur frue matene revenis por manĝi siajn fabojn kaj sian rizon. Poste ili tuj devis remarŝi al la laboro.

Posttagmeze *don* Acacio rondrajdis en la regiono. Li inspektis la stratetojn. Dekoj de la trunkoj sinkis profunde ĝis metro en la marĉon. La *boyeros*, starante ĝis la brusto en la ŝlimo, ĉiam en la danĝero esti entombigitaj sub la bovoj, laboregis kiel freneziĝinte por tiri la trunkojn al la tumboj. Ĝustatempe ĉiun duan horon dum dudek minutoj ĵetiĝis brakodikaj strioj de la pluvo teren, pli kaj pli profunde moligante la teron kaj kvazaŭ per vipobatoj ŝanĝante ĝin en tenacan ŝlimon.

„Eĉ ne duono de la *trozas* estas fortrenitaj“, kolerigite kriis *don* Acacio al la viroj, kiuj vipadis la bovojn kaj tiradis kaj skuadis kun ĉiuj siaj fortoj je la trunkoj por pene eltiri ilin el la ŝlimo kaj treni ilin pluan metron. „Eĉ ne duono el ili, kaj mi ja komandis al vi, ke ĉiuj *trozas*

estu ĉe la *tumbo*. Kion mi promesis al vi, kanaĵloj?
Gajigan *fiesta* mi promesis al vi. Vi ja havu ĝin, kun
muziko kaj danco.“

Kiel respondo aŭdeblis nur la grincado, ŝirado kaj
krakado de la jugoj kaj jungilaroj de la tirantaj bovoj, la
vokado de la knaboj paŝantaj apud la bovoj kaj pelantaj
ilin, la ĝemado de la *boyeros*, kiuj levis kun gigantaj
streĉoj la trunkojn trans ŝtonojn kaj radikojn kaj elŝiris
ilin el la marĉa tero, en kiun la trunkoj puŝiĝis; respondis
la argileca gluglado de la moligita pasteca tero, el kiu la
viroj kaj la bovoj tiris siajn gambojn aŭ krurojn, nur por
futon poste ree sinki same tiom aŭ eĉ pli profunde.

Kiam la nokto komenciĝis, venis la *boyeros* kaj ties
knaboj al la kampadejo por manĝi. Ili estis tiom lacigitaj,
ke ili eĉ ne povis kaŭri tere. Ili renversiĝis kaj ekdormis.
Sed ĉe kelkaj la malsato estis pli forta ol la laco. Ili iris
kun siaj kruĉetoj kaj potetoj al la kuirejo, por akcepti sian
manĝon.

Rimarko

fiesta = en la libro eŭfemismo por pendumado

Jen alvenis de la *oficina don* Acacio akompanata de la kvin *capataces*, kiujn li kunprenis el siaj monterioj kun si.

Li iris renkonte al la aro de viroj kaj vokis: „Ek, al la *fiesta*! Mi ja foje observos, ĉu mi povos eduki vin, pedikohavaj *cabrones*, al laŭorda laboro. Ek!“

La viroj, kutimigitaj pri ordonoj de la ladinoj tiom, ke ili pensis eĉ ne per unu cerboĉelo ne obei, ekstaris kiel sur kartonon gluitaj pentritaj soldatoj, ĉiuj tiritaj je la sama fadeno.

„Ekmarŝu, tien transen al tiuj arboj!“ komandis *don* Acacio.

Kiel startpretaj ladoludiloj marŝis la *boyeros* al la mangestita loko.

„Pendigu ĉiujn je la gamboj kaj salu la felon de tiuj pigraj friponoj“, vokis *don* Acacio al la *capataces*. „Ne estu tro hezitema, Guaopo“, *don* Acacio diris aŭtoritate al unu el

la *capataces*. „Eĉ, se kelkaj ŝiraĵoj de la fetorantaj kadavroj deŝeliĝos kaj flirtos enaere, ĝi ja postkreskos. Trankvile lasu pendu ĉiun dum horo, post kiam li ricevis sian salon, tiel, ke la haŭto suĉu ĝin kaj la salita ŝvito gutu malsupren kaj la pendigito glutu la sukcon, por ke li ne forgesu, kio estas *fiesta*. Eble li tiukaze lernos pli bone, ke *trozas* ne restu kuŝantaj transnokte.“

Pasis pli ol du horoj antaŭ ol la *capataces* pli-malpli plezuriĝis je sia vespermanĝo kaj poste fine pensis pri tio dependigi la virojn.

La viroj restis kuŝantaj sub la arboj, kie oni torturis ilin, kaj tie ili endormiĝis, eĉ sen fari provon rampi al sia dormkabano. Nek la pluvo nek la frido de la nokto ĝenis ilin.

Du el ili ne ekstaris. Ili dormadis, komencis fetori kvar horojn poste kaj oni enfosis ilin.

Rimarko

cabrones = virkaproj, fikemuloj (kiel insultvorto)

Ĉapitro 07

01

Sed inter tiuj, kiuj matene ekstaris, troviĝis Urbano kaj Pascasio, du indiĝenoj el la sama vilaĝo. Ili reciproke forlavis la striojn kaj ŝmiris grason sur ilin, kiun ili tuj post peto ricevis de la kuiristo.

Estis ankoraŭ tenebre, kiam oni vokis la virojn al la laboro. Ĉiuj ekmarŝis.

Nur malmultajn paŝojn ili iris, kiam Urbano diris al Pascasio apud si: „Ek, *hermano*!“

Kiel katoj ambaŭ ŝteliris el la trupo, kaŝiĝis post la arboj kaj rapidis reen al la kabanoj. La *capataz* akompananta la virojn ne povis vidi la malaperon en la tenebro; kaj se li vidus ĝin, li supozus, ke la viro kuras reen, ĉar ili forgesis ion.

Ili atingis la kabanojn. Tie ili jam pakis fasketojn kun seka viando, tortiljojn kaj kuiritajn fabojn. Ili kaptis la fasketojn, kuris trans la placon kaj malaperis en la

densejo.

„Ni devos deflankiĝi de la vojo kaj iri pretervoje“, konsilis Urbano.

„Nur ĉirkaŭ tagmezo ili scios certe, ke ni skuis la polvon de la piedoj“, diris Pascasio ne laŭte, kvazaŭ li timus, ke iu povus aŭdi tion. „Eble ni bonŝancos kaj ili ekscios ĝin nur je la sekva mateno.“

Je la dua tago ĉirkaŭ tagmezo, ĝuste, kiam travadantaj riveron, ili aŭdis post si la vokadon de la du *capataces*, kiuj estis postsenditaj surĉevalo, por rekonduki la fuĝantojn.

Urbano ne povis atingi la alian bordon kaj meze de la rivero estis kaptita per lazo.

Sed Pascasio estis pli proksima al la bordo kaj eskapis. Lerte li grimpis sur malalta roko supren inter la densaj arbetoj. La Mecha, persekutante lin, krude pelis la ĉevalon post li. Sed la ĉevalo ne kapablis grimpi laŭ la kruta rokobloko, kvankam la rajdisto kelkajn fojojn provis peli ĝin ĝis supren.

Pascasio nun atingis la supron de la roko. Li vidis tie, ke li povus eskapi eĉ ne tiukaze, se li grimpus malsupren sur la alia flanko kaj kaŝiĝus en la densejo. Li baldaŭ devus reiri sur la padon kaj tie la rajdistoj certe ree atingus lin.

La Mecha vokis al li, ke li glitu malsupren kaj libervole kuniru al la kampadejo.

Pascasio ne respondis. Li staris supre, atendente, kion La Mecha faros. Laŭ tio aŭ tio ĉi li devos adapti sian agadon por eble tamen eskapi ankoraŭ. Kiam li ne forlasis sian postenon, La Mecha deseliĝis kaj komencis grimpi supren laŭroke.

Rimarko

hermanito = frateto

Intertempe nun ankaŭ El Faldon atingis la bordon, pelante sian kaptiton per lazo antaŭ si. Li vidis suprengrimpi La Mecha-n laŭ la rokbloko. Samtempe li rimarkis, ke Pascasio provas malsuprengrimpi sur la alia flanko. Eble li eĉ bonŝancus kaj eble li atingus sufiĉe da antaŭeco sur la vojo. Eble li eĉ sukcesus kapti la ĉevalon de La Mecha por rajdi sur ĝi longan vojdistancon kaj poste adiaŭi sin de la ĉevalo. Estis ja malavantaĝe reteni la ĉevalon je daŭro, ĉar la hufaj premaĵoj pli simple persekuteblas ol la nudaj piedoj de fuĝantoj, kiuj postlasas spurojn nur sur argila grundo.

Kiam El Faldon rimarkis, kion Pascasio intencas fari, li firmligis sian kaptiton al arbo tiel, ke tiu ne plu povis moviĝi. Poste li kuris rapide ĉirkaŭ la rokon, kun la intenco kaptante reteni Pascasion.

Pascasio vidis tion ĝustatempe kaj rerampis ĝis la roksupraĵo, al kiu proskimigis intertempe La Mecha.

Kiam Pascasio konstatis, ke li povas fuĝi en neniun direkto,

li levis grandan ŝtonon kaj ĵetis ĝin per sia tuta forto al la kapo de La Mecha. La kranio frakasiĝis kaj Pascasio, kiu eĉ pri tio ne estis kontenta, postsaltis la malsuprenruliĝanton kaj atingis lin surtere ĉe la lasta etendaĵo de la roko. La ŝtono ruliĝis kun La Mecha malsupren kaj kuŝis mankapteble. Pascasio levis ĝin. Kaj tio, kio postrestis de la kranio, li ankoraŭ same frakasis en pecojn.

Tiam li saltis supren kaj ĉirkaŭrigardis pro sia amiko. Post kelkaj paŝoj li trovis lin kiel ligiton je arbo. Lia maĉeto falis malsupren, kiam li grimpis sur la rokon. Li komencis serĉi ĝin por povi tratanĉi la ŝnuron de sia amiko, ĉar daŭrus tro longe displekti ĝin.

Sed sur la alia flanko El Faldon rimarkis, ke Pascasio ne plu troviĝas sur la roksupro, do sekve evidente transflanke malsuprengrimpis kaj evidente jam fariĝis la predo de La Mecha.

Li rapide rekuris. Kiam li atingis la transan rokflankon, Pascasio ĝuste trovis sian maĉeton, kaj nun iris rekte renkonte al la arbo, kie lia amiko estis firmligita.

Kiam li vidis veni El Faldon-on, li resaltis al la roko. Li esperis kaŝi sin dum kelkaj sekundoj, por povi ataki El Faldon-on de malantaŭe. Ke La Mecha jam estis morta, El Faldon ja ne sciis.

Alveninte preskaŭ je la rando de la roka etendaĵo, lia rigardo falis sur la revolveron, kiun la mortigito La Mecha portis ĉezone. Se li estus pensinta pli frue pri la revolvero kaj nur poste pri sia maĉeto, li verŝajne estus venkinta. Li vidis nun la bonŝancon, kiu ofertiĝis al li, sufiĉe klare. Per rapida movo li eltiris la revolveron kaj turniĝis por iri renkonte al El Faldon. Sed kiam li turniĝis, li vidis El Faldon-on jam antaŭ si, El Faldon tenis mane revolveron.

Pascasio neniam en sia vivo tenis revolveron inter la fingroj de mano.

Li sciis nur, kaj eĉ tion ne kun certo, ke oni devos tiri malsupre la ĉanon, por ke pafo eku.

Li prenis la revolveron per ambaŭ manoj kaj premis la ĉanon. La pafo efektive ekis. Sed ĝi okazis multe pli frue ol li atendis. Tial li forgesis celi al El Faldon kaj la kuglo

fulmrapide perdiĝis ie en la densejo.

Ĉi ĉion El Faldon kompreneble ne sciis. Li supozis, ke la pafo trafos lin. Tial li atendis eĉ ne dum sekundo. Li ekpremis, etendante la revolveron al Pascasio.

La pafo trafis lin bone. Pascasio saltis supren, turniĝis flanken, ankoraŭ saltante, falis dure surteren kaj estis morta.

„Ankaŭ vin mi ja tuj devus pafmortigi kiel hundon“, diris El Faldon al Urbano, kiu, ankoraŭ nun ligite al la arbo, senhelpe devis observi ĉion ĉi .

„Kial vi tion ne faras, kojoto?“ diris Urbano impertinente.

„Al vi mi ja ankoraŭ instruos konduton, ne cidiru al mi, kota hundo.“ El Faldon levis la vipon kaj dekdufoje draŝis per ĝi transverse sur ties vizaĝon.

„Por ke vi sciu, kanajlo, kiel vi parolu al mi“, vokis El Faldon, kiam li metis la vipon ree al la zono.

Urbano, kvankam tute sendefenda, ne estis subigebla.

„Ankaŭ vin ni ja ankoraŭ kaptos ĉekolume, iutage, atendu nur!“ li diris.

„Tenu fermita vian fetorantan buŝaĉon. Enfosu nun ambaŭ. Ĉu vi eventuale eĉ pensas, ke faros mi tion?“

„Mi enfosos nur mian kamaradon, sed neniun *capataz*.“

„Tion ni ja tuj ekscios.“ El Faldon komencis senti sin neoportuna. Li ĉirkaŭrigardis kaj ŝajne atendis, ke en la sekva momento kelkaj aliaj indiĝenaj viroj, eble fuĝintaj, ŝtelire venos el post la arbustoj.

Tre atenteme li malligis Urbanon, sed tiel, ke Urbano ne povus ataki lin. Dum la indiĝeno supre ankoraŭ estis ligita ĉe la brusto, El Faldon kunligis la gambojn de Urbano tiel, ke li povis fari ĝuste nur tre malgrandajn paŝojn. Poste El Faldon iris tien, kie Pascasio kuŝis morta surtere, prenis la revolveron, kiun la ulo lasis fali kaj metis ĝin al sia zono.

Farinte tion, li eltiris sian propran revolveron, streĉis la ĉanon, kaj poste li fine malligis ankaŭ la manojn kaj la bruston de Urbano. Malfermtirinte la lastan nodon, li saltis malantaŭen, etendante la streĉitan revolveron al Urbano. „Levu la fetorantan banditon kaj portu lin inter la arbustojn post la rokon, por ke li ne kuŝu meze de la vojo.“

Dum Urbano faris tion, kion li ordonis, El Faldon staris kelkajn paŝojn post li kaj tenis la lazon tiel, ke

ĉiumomente, se Urbano ion farus, kio suspektas al la observanto, li nur devus ektiri forte la lazon por ĵeti la ligitan Urbanon surteren.

Urbano akceptis, ke li nek povas eskapi nek defendi sin. Kiam li jam portis Pascasion post la rokon, ordonis El Faldon, ke li portu nun ankaŭ la korpon de La Mecha tien. Urbano faris tion. Tiam El Faldon komandis, ke li fosu foson. Por tio li kompreneble bezonus la maĉeton. Sed El Faldon estis sufiĉe prudenta por kompreni, ke tuj, kiam Urbano havus la maĉeton ĉemane, tiu povus trahaki la ligojn de siaj piedoj en bone elektita sekundo kaj forkurus. Se li estus tre lerta, povus okazi, ke li samtempe havus ŝtonon ĉemane; kaj antaŭ ol El Faldon svingoplene levus la revolveron, jam la ŝtono flugus al lia kapo.

Tial li ordonis, ke Urbano derompu branĉon. Helpe de la branĉo Urbano fosis fosaĵon. Ĝi daŭris longe kaj fareblis sufiĉe malbone. Sed finfine la fosaĵo estis tamen fosita kaj El Faldon diris: „Enmetu La Mecha-n.“

Urbano levis la korpon, trenis lin al la fosaĵo kaj enrulis ĝin, uzante ankaŭ siajn piedojn.

„Vi certe povus fari tion iomete pli kristane“, diris El Faldon. „Li ne estas porko, kiu mortaĉis.“

„Tion Dio ja certe scias pli bone, kio li estas“, diris Urbano.

„Retropaŝu!“ komandis El Faldon.

La *capataz* iris proksime al la kadavro, deprenis la ĉapelon, sin krucosignis kaj krucosignis la mortinton. Sed ĉe tiu agado li estis tre atentema lerte teni Urbanon per streĉita ŝnuro.

Poste li volis retropaŝi kaj observi, kiel Urbano plenŝutas la fosajon, sed tiumomente li rememoris pri alia ceremonio, kiun li preskaŭ forgesis.

Neatendite li tiris la lazaron tiel, ke Urbano renversiĝis laŭlonge teren.

„Vi kuŝu tiel ĝis mi ordonos, ke vi leviĝu. Eĉ se vi levos nur la kapon, mi pafos al vi ses disfenditajn kuglojn en vian kadavron.“

Urbano ne moviĝis.

El Faldon, ĉiam observante la sternintan Urbanon per okulo, traserĉis nun la poŝojn de la mortigito. Li trovis kvar pesojn kaj dudek tri centavojn, kiujn li enpoŝigis. Poste li ankoraŭ disbukis la patronzonon kaj esploris la nudan haŭton de la ventro, por eskcii, ĉu La Mecha portas zonon plenigitan per mono sur la korpo. Li trovis nenion, la kadavro ofertis neniujn kromajn trezorojn. Per tio la grava ceremonio, kiun El Faldon preskaŭ forgesis, estis finita.

„Do, nun ekstaru, kanajlo!“ li vokis al Urbano. „Plenŝutu la fosaĵon!“

Tuj, kiam tio estis farita, El Faldon jam diris: „Ek do, la kampadejo apenaŭ plu atingeblos hodiaŭ.“

„Kaj Pascasio, ĉu?“ demandis Urbano. „Ĉu mi ne enfosu ankaŭ lin?“

„Kion do ankoraŭ?“ respondis El Faldon. „Lasu la kadavraĉon por la vulturoj kaj sovaĝaj porkoj.“

„Tion mi estu sciinta antaŭe!“ objetis Urbano. „Se mi estus sciinta tion, ke mi enfosos nur la hundidon, tiukaze mi tute ne fosintus fosaĵon.“

„Tial mi ja lasis treni vin ambaŭ tien, por ke vi supozu, ke ambaŭ estas enfosotaj. Sed la kota pedikohava fripono kuŝu plu ĝuste tie, kie li kuŝas. Li ne meritas kristanan entombigon. Ekiru do!“

El Faldon iris al la ĉevalo de La Mecha, kiun li ligis al arbo, kiam li deseliĝis por postgrimpi Pascasion sur la rokon.

„Mi ja devus posttreni vin per la ĉevalo“, diris El Faldon.
„Sed mi prefere rapidu por ankoraŭ atingi la kampadejon.
Mil diabloj! Ni apenaŭ ankoraŭ atingos ĝin en la nokto.“

Li ektiris la lazon kaj Urbano renversiĝis teren kiel fulmtrafita. El Faldon, kun la levita revolvero, iris renkonte al li kaj ĵetis kelkajn maŝojn de la ŝnuro sur liajn manojn. „Ekstaru kaj turniĝu!“ Li kunŝnuris la manojn sur ties dorso kaj poste li liberigis lin de la ŝnurligo je la piedoj. Sidigu vin nun sur la ĉevalon.“

Mallerte kiel iu, kiu neniam sidis sur ĉevalo, grimpis Urbano sur la ĉevalon. El Faldon fine devis ŝovi la revolveron al la zono, ĉar li bezonis ambaŭ manojn, siajn dentojn kaj aldone genuon, por ligi la manojn de Urbano al la selobutono.

Urbano ĉe tiu okazo, kiel ankaŭ ĉe kelkaj aliaj okazoj, kiuj ofertiĝis dum la lastaj dek minutoj, verŝajne kun sukceso povus fuĝi kaj eble eĉ superforti El Faldon-on. Li sciis bone, kio atendos lin, se oni rekondukos lin al la kampadejo. Li sciis ankaŭ, ke li tiam, kiam li ree estos en la kampadejo, verŝajne tre dolore bedaŭros, ke ne trafis lin la sama sorto kiel lian kamaradon Pascasio, kiu sentis nenion plu kaj estis libera de ĉiuj suferoj. Sed lia vivoforto malpliĝis. Lia energio preskaŭ eluziĝis. La rapida kuro tra la ĝangalo ĝis la rivero, kie oni atingis kaj kaptis ilin, foruzis la plej grandan parton de lia forto dum tiu tago. Poste sekvis la ekscitiĝo pri la ĉasado de Pascasio fare de La Mecha, kiun li travivis tiel ekscitite, kvazaŭ li mem estus tiu, kiun oni ĉasas. Post tio sekvis la morto de lia kamarado, kiu evidentigis al li, kiel senespera estus la fuĝo, se ĝi ne sukcesus tute. Tion, kio restis al li je forto ankoraŭ, li foruzis, kiam li devis fosi la fosaĵon per branĉo. Post ĉio ĉi li estis nur laca. Li troviĝis en korpa kaj anima stato tia, ke li eĉ tiukaze ne fuĝus, se El Faldon lasus rajdi lin senligite sur la ĉevalo, kaj li certe eĉ sen ligoj posttrotus El Faldonon, se tiu ordonus ĝin. Je la sekva mateno li verŝajne estus reakirinta sian tutan

vivforton kaj dezirus elkore, ke li estu batalinta pli forte por regajni sian liberon aŭ morti por ĝi.

„Ni ne povos atingi antaŭnokte la kampadejon.“ Tio estas la unua frazo, kiun li parolis, de kiam ili, troviĝante sur la retrovojo, rajdis tra la rivero, kie oni kaptis Urbanon.

Fariĝis profunda nokto. La ĉielo estis tute kovrita de nigraj nuboj. La vojo estis marĉa. La ĉevaloj nur kun peno antaŭeniĝis. Kelkajn fojojn ili deflankiĝis de la pado kaj nur kun peno retrovis la vojon. Estis ja nur la ĉevaloj, kiuj trovis lin. Sed nun eĉ la ĉevaloj mem komencis malsekuriĝi, ĉar ili hezitis post ĉiu deka paŝo kaj provis dekstre kaj maldekstre deflankiĝi survoje, kio kompreneble verŝajne okazis pro la marĉa vojo. Almenaŭ ilia konduto ekkonigis la danĝeron al El Faldon, ke li povus perdiĝi en la ĝangalo. En tiu jarsezono la ĉielo estis preskaŭ dum la tuta tago kovrita. Nur ĉeokaze Suno montriĝis, kaj se tamen, jen nur tial, por informi la ĝangalmigrantojn, ke ili ne nur perdis la vojon, sed rajdis dum dekdu horoj den la malĝusta direkto.

El Faldon decidis tial, ke je la loko, kie ili troviĝas, ili

kampados, egale kiel bone-malbone ĝi estas. Li ne devis zorgi, ke Urbano povus fuĝi, en la nokto certe ne. La saketoj kun la nutraĵoj, kiujn Pascasio kaj Urbano prenis kun si, perdiĝis en la rivero. El Faldon kaj La Mecha, kiuj ambaŭ supozis, ke ili atingos la fuĝantojn tagmeze, pensis reesti ankoraŭ en la sama vespero en la kampadejo. Tial ili kunprenis nenium manĝon krom iom da posolo, kiu delonge foruziĝis. Urbano mortaĉus en la ĝangalo, se li provus fuĝi. Sed apenaŭ pro malsato, ĉar li, kiel indiĝeno, trovis sufiĉe da plantoj, kiuj ofertus simplan manĝon al li. Sed estis longaj distancoj, kie li eĉ ne vidus junajn palmojn, kies ŝosojn li povus manĝi. Sed la manĝo sole ne estis sufiĉe da sekureco por unuopa viro por sukcese tramigri la longan ĝangalon.

Kun la helpo de El Faldon al Urbano sukcesis bruligi bivakfajron, kiu varmigis ilin, kaj apud kiu ili povis sekigi siajn vestojn malsekajn, parte de la rivero kaj parte pro la tute malsekaj arbustoj.

Sed El Faldon estis sufiĉe atentema bone firmligi Urbanon, antaŭ ol li ruliĝis en sian kovrilon kaj proksime de la fajro ekkaŭris por dormi. Pluvis kelkajn fojojn en la

nokto, kaj ambaŭ, kaj El Faldon kaj ties kaptito, ĝojis, ke lastfine mateniĝis, kaj ili povis daŭrigi sian marŝon.

Rimarko

posol aŭ *potzol* = posolo, estas trinkaĵo el fermentita maizo, komune kutima en Ĉiapaso

Don Acacio kaj *El Pechero*, unu el la liaj *capataces* ĝuste sidiĝis por manĝi, kiam *El Faldon* kun *Urbano* je la lazo paŝis en la portikon de la *oficina*.

El Faldon venis en la kuirejon.

„Kie estas *La Mecha*?“ demandis *don Acacio*.

„*Mortbatite* de baĥajonteko.“

„Kaj la baĥajonteko?“

„*Mortpafite* de mi, kiam li pafis sur min.“

„Do du viroj perditaj, *capataz* kaj peono. Vin mi ja certe ne ankoraŭfoje elsendos, se denove iu forkuros de ĉi tie. Tio neniam okazis al mi en ĉiuj miaj laborjaroj, ke mi perdis krom eskapinta *muchacho* ankaŭ mian plej bonan *capataz*. De mi neniam iu eskapis. Mi ĉiujn kaptis kaj rekondukis, ankaŭ se mi devis postrajdi du aŭ tri tagojn al ili. Vi do rekondukis nur unu viron el ili?“

„Si, Patron.“

„He, vi, foje envenu!“ vokis *don* Acacio sen leviĝi tra la pordo eksteren.

Urbano venis al la malfermita pordo. Liaj manoj ankoraŭ estis ligitaj.

„Do, vi volis forŝteliĝi, ĉu? Tio estas ja stranga. Vi volis priŝteli min.“

Don Acacio deŝiris pecon de la tortiljo kaj trempis ĝin en la saŭcon, kiam li diris tion.

„Mi ne volis ŝteli, *Patroncito*.“

„Vi ŝuldas al mi ja ankoraŭ cent kvindek pesojn, kaj se vi forŝteliĝis sen forlaborado de viaj ŝuldoj, vi ja volis ŝteli mian monon. La kaptado kaj rekondukado kostas al vi cent pluajn pesojn por via ŝuldokonto.“

„Si, *Patroncito*.“

„Via kara *compañero*, kiel li nomiĝas, ha, mi rememoras,

Pascasio, ŝuldis al mi cent kaj dudek pesojn. Vi forkuris de li; li mortaĉis kaj ne plu povos forlaborigi siajn ŝuldon. Ankaŭ tiujn cent dudek pesojn mi nun ŝarĝos sur vian konton.“

„Si, Patroncito.“

„Mia bona helpanto, La Mecha, ŝuldas al mi cent tridek pesojn. Kiel li povas tiom ŝuldi al mi, mi apenaŭ povas klarigi al mi mem. Sed ĉiam li drinkis kaj ĉiam li diboĉis kun putinoj, kaj eterne tie dudek pesojn kaj ĉi tie dudek pesojn por francaj piloloj, por ke li povu kuracigi sian servistan bubon por ĉio, kiu ree kaj ree forkuris de li, sed neniam sufiĉe malproksimen forkuris, por fine estis lasata en paco de li. Vi kulpas, ke mia fervora *capataz* mortaĉis kaj nun estos manĝita de sovaĝaj porkoj, kaj tial ankaŭ liaj ducent tridek pesoj ŝarĝos vian konton. Kiom ĉio ĉi estas kune, mi nun ne volas elkalkuli. Mi ĝuste manĝas, kaj tial mi ne volas havi kapdolorojn. Sed tion mi povas diri jam nun al vi, kiel vi nomiĝas? Urbano, tion mi povas diri al vi: antaŭ ol vi estos forlaborinta vian ŝuldokonton, mi estos maljunulo kaj vi same. Sed tio ne estas problemo por mi, la ŝarĝo estas sur konto via.“

„Si, Patroncito.“

„Iru transen al la *cocina de los obreros*, al via kuirejo kaj donigu al vi vian manĝon. Poste atendu. Se mi digestis kaj bone dormetis, tiam ni ambaŭ foje interparolos tre serioze. Nur inter ni. Domaĝe, ke La Mecha, la *cabrón*, kiu li estis, mortaĉis. Li estis la ĝusta viro. La strioj sur via haŭto ja eĉ nun ankoraŭ ne sekiĝis de la *fiesta* antaŭ tri noktoj. La Mecha kaj El Faldon pendigis vin nur je la gamboj kaj tanis viajn kadavrojn. Mi pendigos vin je la piedfingroj kaj mi ankoraŭ ne scias kie krome, kaj tiam ni foje observu, kio postrestos de via felo, se mi estos preta pri vi. Vi ne forkuros ankoraŭfoje de mi, *muchacho*. Ĉe la diablo, Estacho, pigra hundido, nomata kotokuiristo, kie do troviĝas la bifesteko?“

„*Orito, Jefe!*“ vokis la kuiristo el la eta kabano, kiu staris tre proksime de la oficina.

„Ĉu vi komprenis, kion mi diris al vi, aŭ ĉu vi parolas nur indiĝenlingve?“ demandis *don* Acacio Urbanon.

„*He, intendido*, mi komprenis ĉion, *Patroncito*.“ Urbano

respondis tiel, kvazaŭ ĉio, kio estis tie dirita al li, ne koncernus lin.

„*Con su permiso, Patroncito*“, kun via permeso“, li diris. Li faris riverencon kaj iris eksteren.

La kuiristo malligu viajn naĝilojn“, postvokis Acacio al li. „Vi ja nun ne forkuros.“

„*No, Patroncito*“, aŭdeblis Urbano, dum li malaperis.

Rimarkoj

baĥajonteko = indiĝeno el regiono *Bachajón Celta*
orito (ĉiutaga lingvo) = *señorito* = mastreto, ĉefĉjo

„Tio fariĝis ja nun tute klare ribelo“, diris *don* Acacio al El Pechero kaj al El Faldon, kiu nun same eksidis ĉe la tablo kaj komencis manĝi per kulero. „Miaj fratoj ambaŭ estas tro molkoraj. Ili lasis fari al ĉiuj *muchachos* tion, kio plaĉis al ili. Tial neniuj mahagono estas surtavoligita, neniuj *capataz* scias, kion li devas fari; kaj je Kristnasko en Villahermosa surstrate ni ĉiuj almozpetos la indiĝenajn kamparanojn pri centavo, ĉar ni donis la tutan monon, kion ni perlaboris dum multaj jaroj tiel terure streĉe kaj dure, al la pedikohavaj indiĝenoj, por ke ili povu ebriigi sin per drinkado kaj poste, kiam ili venos ĉi tien, kaj labori eĉ ne iomete kaj promeni en la ĝangalo kaj mortbati per kutima ŝtono la malmultajn ankoraŭ uzeblajn *capataces*, kiujn mi persone edukis por mi. Nu, ĉi tie mi ja ankoraŭ kreos ordon. Tiu bonkoremo al la pedikohavaj bastardoj daŭras jam sufiĉe longe, kaj, se ili nun eĉ forkuras kaj ekribelas, jen mia pacienco estas elĉerpita. Mi nun foje per fortika balailo balaos la sterkoplenan stalon, ĝis ĝi estos pura. Ankoraŭ hodiaŭ mi komencos tion.“

Li parolis ĉion ĉi ne dum unu seninterrompa parolado, sed maĉis la manĝon inter la frazoj. Ĉiam, kiam li paŭzetis por postŝovi pecon de la bifesteko aŭ postsendi komitekon, iu el ambaŭ *capataces*, kiuj kunsidis ĉe la tablo, sentis sin devigita konsenti per '*Si, Jefe!*', por sciigi lin tiel, ke ili tute samopinias kun li; ja neniam estis permesite al ili havi propran opinion. Sed pro tiuj konsentaj komentoj ili eble povis persvadi sin, ke ili havas ion por diri kaj por kunkontrakti. Tio estis balzamo por ilia animo kaj ili sentis sin superaj al la peonoj, kiuj eĉ ne havis la rajton diri, ke jes, sed simple nur la devon obei, eĉ, se oni komandus al ili ligi ŝtonon al la piedoj kaj salti en riveron. Sklavoĵ havas nur unu virton, kaj tiu estas obei, kaj ili havas nur unu rajton, nome tiun, konsideri la opinion de sia mastro kaj majstro kvazaŭ diro de Dio. La sklavo, kiu nek konas tiun virton, nek pretendas tiun rajton, vivas fuŝitan vivon; se tian oni turmentas kaj mortigas, tiukaze estas bravaj agoj, kiuj meritas laŭdohimnojn.

Manĝinte, Urbano sidis sub la tegmento de la laborista kuirejo, kaj laca kaj en obtuza humoro. Li estis irinta en la dormkabanon, kie li ankoraŭ trovis la provizon, kiun li kaj Pascasio postlasis tie, ĉar ili devis paki siajn fasketojn tiel facile, kiel tion permesis ankoraŭ iel la bezonoj de longa marŝo tra la ĝangalo. Li trovis ankaŭ tabakon kaj rulumis cigaron al si.

Tie sub la tegmento de la kuirejo li do kaŭris kaj fumis. Ĉeokaze li parolis kelkajn vortojn kun la kuiristo kaj ties edzino, kiu helpis al la kuristo. Ju pli longe li sidis tie kaj atendis, ke *don* Acacio vokos lin por elpeli de li en senatestanta parolado estontajn pensojn pri fuĝo, des pli kreskis lia timo. Se *don* Acacio aŭ El Faldon aŭ iu alia *capataz* tuj estus traktinta lin per pugnoj aŭ skurĝo, kiam li estis rekondukita en la kampadejon, li kuŝus tiumomente surtere aŭ fridetigus la striojn sur sia haŭto ĉe la rivero aŭ verŝajne jam denove fortrenus trunkojn. Eble. Tiun 'eble' li ripetis kelkajn fojojn al si, dum li rigardis la fumnubojn de sia cigaro. Sed eble ja ne.

Sed esplori aŭ imagi, kion tiu 'eble ja ne' povus esti, tio fariĝis malfacila por li. Li ekhavis la penson, eskapi de tiu interparolado kun don Acacio. Dum momento li pensis pri tio ankoraŭfoje fuĝi. Kvankam li sciis, ke tiu fuĝo ankoraŭ multe malpli sukcesus al li ol la lasta, kiam li havis Pascasion kiel kamaradon, li trovis en la penso pri denova fuĝo certan esperon pri liberigo. Ĉifoje li defendus sin kun lia tuta forto, li atakus la persekutantojn per ŝtonoj aŭ klabo, ne por fuĝi, kio estus tute sensperspektiva, sed por ke oni pafmortigu lin, tiel, kiel tio okazis al Pascasio. Se li estus pafmortigita, don Acacio ne plu povus damaĝi al li, kaj kio okazus kun sia korpo, povus esti tiel indiferenta al li, kiel estis certe indiferenta al Pascasio, kiu sendube ne sentis ion, ĉu tigro lin manĝas, ĉu porkoj aŭ ratoj prironĝas lin, ĉu muŝoj metas siajn ovojn en liajn pafvundojn. Pripensante, kiel Pascasio eble sentas nun, kun malgaja malĝojo, ke li perdis sian plej bonan kamaradon, li ekhavis la ideon, ke tute ne havas sencon vivi. Por kio vivi? Por turmentiĝi cent jarojn en la ĝangalo, nur por forlabori sian ŝuldokonton, ĉu? Kaj por havi la perspektivon esti batata ĉiusemajne, aŭ, kio estis pli terure, pendigata, nur, ĉar li

spite al ĉiu streĉo ne povus atingi, kion oni postulis de li? Hejme en lia vilaĝo liaj nutraĵoj ne estis tre grasaj kaj malofte sufiĉaj. Sed tie ĝi estis pli malbona ol ĉio, kion oni antaŭĵetis en lia vilaĝo al la hundoj.

La *oficina* tie, la bangaloj de *don* Acacio kaj de la *capataces*, tiel, kiel la kuirejo kaj la kabanoj de la *muchachos* troviĝis sur alta bordo de la rivero. De la loko, kie Urbano sidis, li ĝuste ankoraŭ povis vidi trembrili la preterfluantan akvon de la rivero proksime de la transa bordo. Drivis derompitaj branĉoj en la argila akvo. Kien ili torentis, Urbano ne sciis, ĉar neniu el la *muchachos* sciis ion pri la riverfluo. Neniu cerbumis pri tio.

Sed, kiam Urbano postrigardis la fluantan akvon, li ekhavis la penson, ke tie, kien fluas la akvo, devas esti paco kaj, ke tie verŝajne troviĝas belaj vilaĝoj ĉe la bordoj, kie loĝas homoj – homoj bonkoraj kaj kun amo al ĉiuj siaj najbaroj. La rivero torentis rapide antaŭen, ĝiaj ondokrestoj ŝaŭmis, ĉar ili evidente ne sufiĉe rapide atingis la malproksimajn vilaĝojn ĉe la rando de la ĉielo, kie estis paco kaj bonkoreco.

Antaŭ du semajnoj *muchacho* dronis en la rivero. Li surtavoligis kun aliaj *muchachos* trunkojn ĉe la bordo. Kiam li staris supre sur la trunkoj, por tiri supren la sekvan trunkon, kelkaj *trozas* komencis malsuprenruliĝi, kaj la viro ruliĝis kun kelkaj rondaj trunkoj, kiuj sekvis lin, malsupren de la bordo kaj falis en la riveron. Li ne povis naĝi, li fordrivis sur la akvo kaj estis ĵetita en kirlantajn vorticojn. Je la sekva tago oni trovis lin morta, mejlon malproksime, apud la bordo, kie la korpo kaptiĝis en kroĉiĝintaj branĉoj.

Urbano helpis eltiri lin. Li rememoris nun, kiel paca estis la vizaĝo de la viro. Eĉ ne spuro de la hororo kaj timego, kiel ili montriĝis en la vizaĝoj de la muchachos, kiuj mortis dum la pendado aŭ post kruela skurĝado, estis videbla en la vizaĝtrajtoj de la droninto. Certe li jam de malproksime ekvidis tiujn pacemajn vilaĝojn, al kiuj la rivero rapidis.

Urbano ekstaris flegme. Li iris ĝis la bordo kaj serĉis pezan ŝtonon. Tiel mediteme li enpensiĝis, ke li ne laŭte parolis al si mem.

„Se mi ligos la ŝtonon al mia gambo, mi sinkos rapide; tiam ĉio estos finita, kaj *don* Acacio ne plu povos skurĝi min.

En tiu momento li aŭdis voki *don* Acacion. „He, vi, kie vi estas? Ĉi tien venu! Nun ni foje iom interparolos!“

Urbano pro tio tute forgesis, kion li volis fari por si mem. Li tiom al kutimiĝis obei, ke li finis ĉiun propran penson en tiu momento, kiam la komando de mastro urĝis lin.

Dum li kuris rapidpaŝe al la *oficina*, li vokis: „*A sus ordenes, Patroncito*, je via servo!“

Don Acacio havis cigaredon inter la lipoj, kiam li paŝis el la *oficina*. Li vidis, kiel Urbano rapidis al li. Li lasis knali muloskurĝon, kiu disfranĝiĝis pro tro ofta uzado. Dum li paŝis trans la placon, li volvis la maŝon ĉirkaŭ lian manartikon.

Urbano renkonte proksimiĝis.

„Do, kaj nun ni foje estu dum certa tempo nur inter ni, baĥajonteko. Por ke vi lernu, ke oni ĉi tie ne forkuru ĝis kiam oni forlaboris ankaŭ la lastan centavon de sia ŝuldokonto.“

De la *oficina* aŭdiĝis la fajfado de eroj de la valsomelodio „*Sobre las Olas*“. *Don Acacio* turniĝis kaj ekvidis, ke lia Chinita, kiel li nomis sian litkunulinon, sidas sur la kruda baraĵo de la portiko kaj movas siajn nudajn gambojn tien kaj tien, dum ŝi fumas cigaron.

„Proksimiĝu iom kun via afero, Chulito!“ ŝi vokis al sia lita prilaborulo. „Estas tiom malofte, ke oni havas ĉi tie

plezuron, kaj mi kvazaŭ mortas pro enuo.“

„Tenu fermita vian impertinentan fi-buŝon, ek do, eniru!“ vokis *don* Acacio, „aŭ mi tuj poste ankaŭ vin traktos tiamaniere.“

„Eĉ ne tio ĉi tie estas permesata al oni, nu, mi certe baldaŭ forlasos vin“, diris ĉagrenite la ino. Sed ŝi iris tamen en la internon de la bangalo.

„Ni foriĝu de ĉi tie, venu“, diris *don* Acacio al Urbano. „Ni ne bezonas spektantojn ĉe la afero, kiujn ni ambaŭ devos plenumi. Ni iru malsupren al la rivero, kie neniu povos aŭdi nin.“

La vojo al la bordo ne estis tro longa, sed tamen sufiĉe longa, ke la pensoj de Urbano centfoje povis ŝanĝiĝi. Li sekvis *don* Acacion kaj vidis je ties manartiko la svingatan skurĝon. Kelkajn fojojn li ekflaris la spiradon de *don* Acacio, kaj li sentis strangan naŭzon, ĉar la elspiroj forte odoris laŭ *aguardiente*. Urbano mem trinkis kutime *cañe*, ĉiam, se li havis okazon; kaj, se li havis monon, li ankaŭ trinkis ĝis ebrieco, kiam li ankoraŭ estis en sia

vilaĝo. Sed neniam antaŭe li sentis tiom da naŭzo pro elspiroj de iu kiel en tiu momento. Tiuj elspiroj estis kvazaŭ sufokige plenigitaj per *aguardiente*. Tiuj flarkaptitaj elspiroj de *don Acacio* ne vekis la sopiron pri *aguardiente* en li, sed male instigis en li ĵuron, neniam denove trinki brandon en sia vivo. Iel tiel, kiel fumanto povas rezigni pri la fumado, kisinte junulinon, kiu ĉiutage stivas la fumon de tuta cigaredopakaĵeto en sian polmon. Ili iris malsupren sur la borda deklivo. La dika muloskurĝo svingiĝadis antaŭ la okuloj de Urbano, kaj ĝi strange konturiĝis antaŭ la preterfluanta akvo de la rivero. Estis lia sento, kvazaŭ la skurĝo distranĉus la riveron, kiu haste rapidis al la pacemaj vilaĝoj de liaj revoj.

Sed per tio samtempe vekiĝis en li la doloriga memoro pri la nokto, kiam li, pendigita kun dekduo da siaj kamaradoj je la piedoj, senkompate estis skurĝata, ĉar li ne kapablis fortreni ĉiujn trunkojn dum la postulita tempo. Tio okazis antaŭ ĝuste nur tri tagoj. Tiu kruela skurĝado estis la kaŭzo, kial li kaj Pascasio fuĝis. Ĉar ili ne pretis elteni tian skurĝadon je dua fojo. La strioj sur lia korpo estis

ankoraŭ freŝaj kaj ankoraŭ ne kuracitaj. Kaj subite li ekhavis teruran timon pro la novaj battoj, kiuj falus sur la malnovajn vundojn kaj dolorigus lin; doloroj, pri kiuj li pensis, ke li ne transvivus ilin. Tiu timo ŝanĝiĝis interne de sekundo al despero, kiu donis al li kuraĝon tian, kian li ankoraŭ neniam sentis, kiu al li estis tute fremda, tiel, kvazaŭ ĝi ne apartenus al li.

Rimarko

cañe = alhoholaĵo

Ĉirkaŭ dek paŝojn for de la bordo staris larĝa arbotrunko, kiu aŭ pro granda aĝo aŭ pro la oftaj tagoj, dum kiuj ĝi staris tute en la ĉirkaŭa akvo, perdis forton kaj vivon. Eĉ ne unu verda folieto montriĝis sur la branĉoj, kiuj per distorditaj gestoj malgaje kaj fantome pikis en la liberan aeron. Krom tiuj mortaj arboj sur longa distanco de la bordodeklivo ne videblis alia arbo. Nur malaltaj arbustoj kaj arbustaĵoj, kiuj timeme firmtenis sin en la sablo kaj aspektis tiel, kvazaŭ ili ne transvivus la sekvan altan akvon, tie kaj tie ĉi kroĉis sin kiel hazarde falinte al la deklivo.

„Iru tien, al la arbo!“ komandis *don* Acacio. „Tie mi reguligos la aferon kun vi, baĥajonteko, tie ni estos tute solaj inter ni, sen atestantoj kaj sen la sensaci-avida gapado de la putinoj, kiuj pensas, ke ĉio ĉi tie estas por ni pura ĝojo kaj ripozo, kaj ke ni havas monon tiom, kiom hundomerdon.“

Urbano preteriris *don* Acacion kaj proksimiĝis al la arbo.

„Damne kaj malbenite *que chinguen tu matricula*; jen ni ja forgesis tiun *cabron*, la *chingando de mecate*, tiun fikeman fian lazon. Vi ja ne restos staranta sur viaj du lambastonoj, se mi ne firmligos vin. Kuregu supren kaj alportu lazon al mi!“

Urbano suprenkuris sur la deklivo, uzante ĉiujn brakojn kaj piedojn. Du minutojn poste li jam reaperis kun la lazo ĉemane. Survoje malsupren li ekhezitis subite. La akvo de la rivero tiel pace preterfluis. Neniu turmentis kaj neniu batadis ĝin. La nuda arbotrunko aspektis nedireble malgaja, ja senespera. Urbano kunpinĉis la okulojn ĝis ili ekdoloris. Li memoris pri la kruela skurĝado en la nokto, kiam ŝprucadis pecoj de la sanganta karno kaj la haŭto de iliaj najbaroj saltis en la buŝojn de la viroj, se ili tenis ilin malfermitaj, por ĝemi dolore suferante. Nur la novuloj kriis terure, la malnovuloj ĝemetis kaj ĝemis nur dum la batado. Estis kontraŭ la moro, kiu regis inter iliaj samsortanoj, krei aŭ peti pri indulgo. Por tio ili estis tro fieraj, eĉ kiel sklavoj. Ili ĝemis kvazaŭ por si mem, kaj tion, kion ili ĝemis por si mem, estis malamego. Ju pli ili suferis, des pli ili malamis, kaj ju pli ili malamis, des

malpli da doloro ili sentis kaj des pli sunece iliaj animoj sentis, se ili pensis pri tio, ke iutage, eble en iu fora tago, sed tamen fine iam, ili venĝos ĉiun skurĝobaton kaj ĉiun pendadan tempon, eĉ, se ili pereus pro tio.

Kiam Urbano hezitis dum sekundo kaj vidis la larĝan trunkon, li pensis, ke tia sama trunko post dek minutoj estos fi-makulita per la sangantaj pecoj de lia karno. Li kunpinĉis la lipojn, kaj la okulojn li kunpinĉis ankoraŭ pli forte.

Nun li malproksimis nur ankoraŭ dek paŝojn de la arbo. Sin apogante al la arbo, staris *don* Acacio, rulumante novan cigaredon al si. Tri paŝojn for de la arbo kuŝis granda ŝtono, iom pli granda ol la kapo de viro.

Urbano gapis al la ŝtono. Li memoris pri sia amiko Pascasio, kiu levis tian ŝtonon kaj frakasis per ĝi la kranion de sia persekutanto La Mecha. Sed samtempe la ŝtono rekondukis lin al la pensoj, kiujn li havis antaŭ ĉirkaŭ tridek minutoj, kiam li revis pri pacemaj vilaĝoj, al kiuj rapidas la akvoj de la rivero. Liaj manoj konvulsie moviĝis, kvazaŭ ili volus ordoni lian volon. Li kliniĝis iom

por levi la ŝtonon; li pensis, ke li rapide kuru al la rivero, ligu la piedon dum la kurado per la lazo, tiam volvu la alian finaĵon al la ŝtono kaj kuru tiom longe en la riveron, ĝis li perdos la grundon sub si.

„Mi devos fari tion, mi devos fari tion nun, ankoraŭ en tiu ĉi sekundo“, li diris al si mem, dum lia spiro haltis kaj li hezitante proksimiĝis al la bordo. En la sekva sekundo estus tro malfrue. Li devas fari tion tuj. Se li faros tion tuj, la malgaje aspektanta arbo ne estos fie makulita per lia sango kaj de liaj elŝiritaj karnopecoj.

Li elpuŝis la longe retiritan spiron per „*Si, ahora! Jes, nun!*“

„Kion vi diras?“ demandis *don* Acacio. „Finfine vi ja nun revenis kun la lazo. Starigu vin kun via vizaĝo al la arbo, kaj levu la manojn supren.“

Don Acacio ekbruligis la novan cigaredon, kiun li ĵus rulumis. Laŭ la bordo blovis vento, kiu ŝanĝiĝadis seninterrompe. *Don* Acacio jam ekbruligis tri fadenojn, sed ĉiun la vento tuj estingis, se fadeno tuŝis la cigaredon.

Li sakris. Li provis pluan fojon, kaj denove estingiĝis la kandleto. Nun li reiris paŝon de la arbo, kvazaŭ li volus liberigi la lokon por Urbano. Dum li faris la paŝon, li tenis ambaŭ manojn konkave antaŭ sia vizaĝo, interne de la manoj tenante la freŝe ekbruligitan fadenon. Li rigardis per siaj okuloj rekte al la fino de la cigareto kaj al la tremanta flameto, kiu tre penis ree vojaĝi kun la vento, sen plenumi antaŭe sian devon.

Urbano, etendante la lazon, vidis la svingatan grandan skurĝon je la manartiko de *don* Acacio.

Sen intenci tion, eĉ sen pensi pri tio, li puŝis nun *don* Acacion per la pugno de sia libera brako al la arbo, tiel, ke ties kapo malantaŭe kunpuŝiĝis rapide kun la trunko.

Dum eta momento Urbano miris pri sia ago, sed same tiel rapide li tute ekkonis, ke nun jam estis tro malfrue ne fini tiun nekonscian agon.

Tio estis ribelo. Por tiu pugnobato oni lasus pendu lin ĝismorte, kaj tiel, ke li havus la plej terurajn dolorojn antaŭe.

La timo pro tiu kruela torturado, kiu atendis lin, estis pli ol ĉiuj aliaj pensoj kaj sentoj la kaŭzo, ke li sin nun vidis devigita daŭrigi la komencitan agon ĝis la efektiva fino.

Rimarkoj

mecate = ŝnuro, lazo

que chinguen matricula (eŭfemisme) = Fiku viajn patrinojn!

Don Acacio ankoraŭ nun tenis la konkave formitajn manojn antaŭ la vizaĝo, ĉar la cigaredo fine ekbrulis. Ankoraŭ ne konsciigis al li, ke Urbano puŝis lin kun sia tuta forto. Laŭ sia unua percepto li pensis, ke Urbano stumblis, ĉar li glitis piede en sablotruon kaj tial falis kontraŭ lin. Se li tuj estus kompreninta, pri kio temas, ankoraŭ en la sama sekundo, li eble povintus savi sin.

Sed Urbano agis tiel fulmrapide, kiel tio eblas nur al indiĝeno, kiu staras sur nudaj piedoj kaj kies manoj kaj brakoj lertiĝis en la eterna batalo kun kampo kaj ĝangalo tiel, ke ili ne faras misan kapton, se ili foje ekmoviĝis. La instinkto centfoje pli rapide kaj pli sekure gvidas ilin ol la volo de tiu, al kiu ili apartenas.

Je sia propra korpo Urbano hieraŭ lernis, kiel viro povas ligi alian viron al arbo, sen tio, ke la viktimo povas malhelpi, se la viro, kiu havas la lazon, antaŭas per sekundo.

En la sama momento, kiam *don Acacio* kunpuŝiĝis kun la

arbo kaj la konkavajn manojn ankoraŭ havis antaŭ la vizaĝo, tiuj du manoj jam estis kunnoditaj kaj firmligitaj al la arbotrunko.

Nur nun *don* Acacio konsciiĝis, kio okazis. Li puŝis per boto kontraŭ la antaŭenmetita kruro de Urbano. Sed Urbano antaŭvidis tion, ĉar tio estis la ununura movo, kiun *don* Acacio ankoraŭ povis fari. Rapide li kliniĝis kaj rapide malantaŭen movis sian abdomenon. Tiel la boto ja trafis lian gambon, sed ne povis renversigi lin.

Dum li kliniĝis, li jam same rapide kun la lazo saltis ĉirkaŭ la arbon kaj jam metis maŝon ĉirkaŭ kruron de *don* Acacio. Li fermtiris la maŝon kaj en la sama sekundo komencis ankoraŭ supre ĉe la manoj kaj malsupre ĉe la kruroj fari nodojn kaj meti la sekvan maŝon ankoraŭ en la sama sekundo ĉirkaŭ la kolon de *don* Acacio kaj firme ligi ĝin al la trunko.

Nun *don* Acacio fine sciis, ke li estas perdita. Li povus promesi la tutan monterion kiel donacon al Urbano por tiel elaĉeti sian vivon; sed la indiĝeno ne akceptus tion. Urbano estis multe tro sperta por fidi de ladino eĉ nur

vorton.

Kelkaj proletoj en alia lando fidas al policisto, se la policisto promesas al li tute ne venĝi sin je li, se li estos helpema al la policisto. Sed indiĝenaj proletoj en tiu rilato havas multe pli kaj pli da seniluziigaj spertoj ne nur pri policianoj kaj diktatoroj, sed ankaŭ pri ĉiuj tiuj, por kiuj ili laboras, kaj kun iliaj helptrupoj kaj agentoj.

Por la sorto de Urbano estis jam egale, ĉu li enliberigos *don Acacion* aŭ ĉu li mortigos lin. Pro tio *don Acacio* dubis eĉ ne dum sekundo, ke Urbano la agon, kiun li komencis, finfaros. Eĉ ne estus espero, ke li saveblus, en tiu kazo, se *capataz* irus hazarde sur la deklivo malsupren. Antaŭ ol helponto sufiĉe proksimus, jam estus frakasitaj la kranio aŭ la gorĝo de la katenito.

Tamen, spite al sia malespera situacio, *don Acacio* ne perdis la kuraĝon. Li ne petis pri kompato, tiel, kiel la indiĝenoj ne petis iam pri kompato aŭ indulgo, se oni pendigis aŭ skurĝis ilin.

Kvankam li persone neniam skurĝis Urbanon aŭ eĉ nur

unuvoje tretis postaĵen, kiel li tion faris laŭplaĉe kun ĉiuj viroj, kaj kvankam li tute ne atentis Urbanon kaj ne konis lin ĝis tiu momento, ĉar tiu ja apartenis al la kampadejo de *don Severo* kaj *don Acacio* nur en la aktuala tago konatiĝis al li, ĉar Urbano estis fuĝanto, je kiu li intencis ekzerci avertantan ekzemplon, li ja sciis tamen, ke li estas tiu el la tri fratoj, kiun ĉiuj viroj plej malamas, inklude de la *capataces*. Li ne mirus, se iu el la viroj, kiuj jam per si mem estis impertinentaj, kiel speciale la chamulano Celso kaj la *boyero* Santiago, la *boyero* Fidel, aŭ iu, kiu estis tiel inteligenta kiel la *boyero* Andreo, embuskus lin ie en la ĝangalo kaj inside mortbatus lin. Sed, ke tia timema kaj timigita vermeto, kia estis Urbano, lin nun havas ĉe la nuko, kaj, ke li estos murdita de ties manoj, tio ĉagrenis kaj kolerigis lin tiom, ke li kapablis tute forgesi la senesperan situacion, en kiu li troviĝis.

Lia buŝo ankoraŭ ne estis fermita per ŝnuro. Kaj tiun li nun uzis. Ne por voki pri helpo. Ĝis la lasta tago de sia vivo li hontus, se li krius pro kota kaj pedikohava indiĝeno pri helpo. Li ne plu povus esti unu el la mastroj tie; ĉar ĉiu *muchacho* dorse postridus lin, kaj la

capataces, se ili ebrios, verŝajne eĉ kapablos meti lin en inaĉajn vestojn por havi plezuron kaj diros „Dolĉa karulino“ al li. En la monterioj estis aŭtentikaj viroj. Kaj nur aŭtentikaj viroj havis tie valoron kaj tie uzeblis. Dolĉaj karulĉoj kaj palvizaĝaj friponetoj, kiuj devas elpensi perversajn skurĝadojn kaj torturadojn, kiel postajfikuloj elpensas ilin por havi ian sanan volupton, troviĝis tie sur perdita posteno, tiel, kiel lita cimo sur la dorso de testudo, kiu enfosiĝis en sablon.

„Damnita putinfilo de pedikovoranta hundino, kian penson vi elŝvitis en via ŝtipkapula kranio?“ kriis *don Acacio*. „Vi ja eble ne pensas, ke mi ne povus moviĝi, ĉar vi ĉi tie bindis min al la arbo kiel kartonviron, ĉu? Atendu nur momenton, fetoranta hundo, mi ja montros al vi, kiel mi deŝiros min. Kaj tiam vi, ja jam, ĉe l' diablo, povos komenci sonorileti pri la lasta beno de Sankta Virgulino. Do, liberigu min nun, sterkulo, aŭ ĉu mi ĉi tie ankoraŭ atendu ĝis Pasko?“

Urbano ektremis. Li ektimis. Kvankam li sciis kaj vidis, ke li bone kaj fidinde firmligis *don Acacion*, li tamen timis, ke *don Acacio* eventuale povus liberigi sin per iuj magiaj

kaj supernaturaj fortoj. Li sentis sin kontraŭ li kiel kontraŭ pumo, kiun li kaptis kaj katenis, sed kiun li opiniis kapabla disŝiri la katenojn per siaj lastaj provizetoj da forto kaj kolero kaj poste salti sur lin.

Dum kelkaj sekundoj li paŝetis tien kaj reen. Nur kelkajn paŝojn malproksime li vidis la preterfluantan akvon, kiu lavis laŭflue la sablajn bordojn.

Don Acacio denove kriis: „Ĉu vi nun liberigos min aŭ ne, hundo?!”

Urbano saltis nun preskaŭ ĝis la trunko kaj rapide tiris la revolveron el sub la zono. Li neniam havis revolveron enmane kaj ne sciis, kiel uzi ĝin. Li tenis ĝin en ambaŭ manoj, celante al la korpo de *Acacio*. Li manipulis je la armilo, sed la pafo ne ekis, ĉar la ĉano de la revolvero ne estis streĉita.

„Kaj tia idiota brutobesto, tia stinkanta kota bestaĉo volas pafmortigi min!” vokis *don Acacio*. Tiam li ekridis furioze, kiam li denove tiregis je siaj ŝnurligoj kaj konstatis, ke li ne povos liberigi sin.

Urbano ĵetis la revolveron vaste arke malproksimen de si,
kiam li ekkonsciis, ke li ne povos uzi ĝin.

Supre, en la *oficina* kaj en la bangalo, kaŭris ambaŭ *capataces* kaj la kunulino de *don* Acacio. Kelkaj fragmentoj de la voĉsonoj de *don* Acacio ŝvebis tra la aero ĝis supren al ili. Sed tion, kion ili aŭdis, estis mallaŭta kaj ne sinsekva.

El Faldon diris al El Pechero, kiu sidis kun li en la portiko: „Li kaptas ja nun tiun *muchacho* draste je la kolo, mil diabloj. Mi ne volus kaŭri en lia felo. Aŭskultu nur, kiel Cacho kriegas al li.“

„Mi foje gapos, kvazaŭ kiel en seksbudo tra la fenestreto, malsupren“ diris la ino, „eble mi ja povos vidi iom.“

„Tion vi prefere ne faru, *señorita*“, konsilis El Faldon, „*don* Cacho povas fariĝi tre malagrabla, se li spektos vin ĉe tio. Ni ne ŝatas tion ĉi tie. Tion *don* Cacho ja diris al vi.“

„Nu, do, eĉ la plej etan distron oni ĉi tie ne rajtas havi“, respondis la ino kun ĝemo. „Mi dezirus, ke mi prefere

estus ree en mia bona domo en El Carmen. Tie la vivo estas pli gaja.“

„Ankaŭ ni estas ne pro plezuro ĉi tie, *señorita*, pri tio vi fidu min“, diris enuigate El Pechero. „Ĉe l'diablo, mi nun enlitiĝos. Frumatene je la tria mi ree devos eliĝi. Eterna Sanktulino, ankaŭ mi volonte scius, kial la sorto gvidis min en tiun sovaĝejon, kie oni havas nenion alian krom enpigitan alkoholon en la boteloj, kiu krome estas rara kaj multekosta.“ Li oscedis kaj iris en la bangalon, kie la *capataces* havis siajn litojn.

En tiu ĉi momento akuta krio aŭdiĝis de la rivero. Sed neniu ĉi tie en la *oficina* interesiĝis pri tio. El la densejo iris nun Trinidad, unu el la tri vagabondoj. Li estis survoje al la *oficina*, por ŝanĝi en la ilarokabano hakilon por nova.

Li aŭdis krion kaj iris poste ĝis la rando de la deklivo. Atinginte ĝin, li kuŝigis sin kaj rampis surtere plu, por ke oni ne vidu lin de malsupre. Ne estis ago saĝa iri proksime al loko, kie oni disdonas batojn. Kaŝite post arbustaro, li ŝovis memgardeme la kapon trans la randon

de la deklivo. De tie li kapablis longe distance transrigardi
la bordon.

Urbano levis la ŝtonon kaj iris renkonte al *don* Acacio.

„Tion vi ne faros, hundido!“ vokis *don* Acacio.

„Ne“, diris Urbano koncize. „Tion ne, estus tro bone por vi. Tro bonus por ladino, kiu ne havas animon.“

Urbano lasis fali la ŝtonon. *Don* Acacio elspiris profunde.

Tiam Urbano turnis siajn okulojn al io en la rivero, kion *don* Acacio ne povis vidi, ĉar ties vizaĝo celis al la deklivo, kaj ĉar li ne multe povis turni sin pro la ligitaj kolo kaj kapo. Li vidis nur, ke Urbano rikanis kaj liaj okuloj ekmontris metalan glimadon.

La viro levis la ŝultrojn kaj iris kvazaŭ surpiedfingre en la riveron, laŭ maniero, kvazaŭ li volus surprizi kaj kapti beston. Eble serpenton.

Sed estis alia afero. En la akvo drivis deŝirita arbusto, kiu surhavis fingrolongajn, fere durajn dornojn. La arbusto rapide drivis proksimiĝante kaj poste komencis

malproksimiĝi.

Tiel, kvazaŭ li volus kapti suprenflugintan fiŝon, Urbano saltis al la rapide drivanta arbusto. Li kaptis ĝin ĝuste en tiu momento, kiam ĝi ree komencis fornaĝi de la bordo por esti fortirita de vortico.

Urbano tute eltiris la arbuston kaj proksimiĝis kun tiu malseka gutanta kreskaĵo al *don* Acacio. Li etendis la arbuston al ties okuloj.

„Ĉu vi vidas la dornojn, *verdugo*, malica ekzekutisto?“ Li pintigis la lipojn kaj rikane montris siajn dentojn.

„Ek, liberigu min, ĉe Sankta Virgulino!“

„Mi liberigos vin post minuto, *verdugo*“, diris Urbano, dum li derompis branĉeton de la arbusto. Poste li prenis la branĉeton tiel en la manon, ke la plej forta dorno inter la fingroj de lia pugno longe elstaris.

Kun larĝa rikano li diris, la dornon tiom proksime etendante al la vizaĝo de *don* Acacio, ke tiu pikis en vangon de li: „Per tiu ĉi dorno mi trapikos viajn du

naŭzajn okulojn. Vi neniam denove pendigu aŭ skurĝu iun, *muchacho* kaj neniam plu vi vidu Sunon kaj neniam plu la vizaĝon de via patrino.“

„Ĉu vi freneziĝis, *muchacho*?“ kriis *don* Acacio, paliĝante vizaĝe.

„Ni ĉiuj, ĉiuj *muchachos*, estas frenezaj. Vi frenezigis nin. Nin ĉiujn.“

„Por tio soldatoj pafmortigos vin. Oni dehakos por tio la kapon de vi.“

„Neniu pafmortigos min. Neniu dehakos mian kapon. Neniu skurĝos min por tio. Eĉ pri via venĝo mi trompos vin. Bestaĉa ekzekutisto. Ĉar mi iros tie en la riveron, kie vi serĉu min. Sed tiam mi ne plu sentos la pendumadon.“

„Ĉe Sankta Virgulino, *muchacho*, ne faru tion! Vi iros en la inferon, *muchacho*. Ne faru tion, ĉe ĉiuj Sanktuloj!“
Don Acacio tiam fine komencis paroli pli milde.

Urbano, kvazaŭ li timus, ke li eble povus fariĝi ankoraŭ ekdubema, aŭ, ke ankoraŭ en tiu sekundo iu povus helpi

al *don* Acacio, rapide pikis puŝegante al *don* Acacio.

Don Acacio kriis terure. Ne estis dolora krio, sed krio pro hororo. Estis la unua hororo, kiun *don* Acacio sentis en sia vivo.

Tuj, eĉ sen enspiri antaŭe, Urbano pikis duan fojon en la okulojn de *don* Acacio. Akveca sango gutis el la okulkavoj, kaj *don* Acacio klinis la kapon, ĉar la sango komencis guti en lian buŝon. Li ekmurmuris: „*Madre Santisima, Madre de Nuestro Señor* – “

Urbano rigardis supren. Li rimarkis la kapon de viro, kiu ne moviĝas, sed nur rigardas al li.

Per rapidaj fingroj Urbano malnodigis la ŝnuron, kiun li portis kiel zonon por kunteni sian ĉifonitan blankan lanpantalonon. Li levis la ŝtonon kaj ŝovis ĝin en la pantalonon. Poste li ree surmetis la ŝnuran zonon kaj firmtiris ĝin. De la malsupren pendanta lazo, per kiu li katenis *don* Acacion, li rapide disvolvis fadenon, tramordis ĝin kaj ligis ĝin sub la ŝtono ĉirkaŭ la koksojn.

Jam dum la kunnodado, li kuris en la riveron. La vortico

kaptis lin kaj turnis lin plurfoje ĉirkaŭ sin mem, longe
antaŭ ol li atingis la mezon. Lia kapo nur unufoje
reaperis. Tiam li malaperis.

Kiam Urbano ne plu aperis, grimpis Martin Trinidad atenteme laŭ la deklivo malsupren. Memgardeme li iris al *don* Acacio kaj rigardis lin dum certa tempo.

Li ĉirkaŭrigardis kaj rimarkis la revolveron, li levis ĝin kaj ŝovis ĝin antaŭe en sian pantalonon. Denove li tre proksimiĝis al *don* Acacio. Atenteme li disbukis lian kartoĉzonon.

Don Acacio diris nenion. Ŝajne li ne sentis, ke iu estis je lia korpo.

Kun la kartoĉzono, kiun li simile ŝovis en la pantalonon, Martin Trinidad kuris tre rapide laŭ la dekliva piedo sufiĉe longe antaŭen, ĝis kiam li konvinkiĝis, ke neniuj povas observi lin.

Li elprenis la kartoĉzonon, ĉirkaŭrigardis kaj enfosis ĝin. Poste li ankoraŭfoje kuris kvindek paŝojn, rigardis la lokon, kie li haltis, por ne forgesi ĝin kaj enfosis la revolveron.

Farinte tion, li suprenrampis la deklivon, grandan distancon for de la unua kabano li reaperis kaj iris al la ilarkabano, relevante sian hakilon survoje tien.

La knabo en la ilarkabano vokis El Faldon-on, por la transdono de la nova hakilo.

„Kie estas la malnova, kiun vi redonu?“ demandis tiu Martinon.

„Jen, ĝi kurbiĝis ĉi tie.“

„Kompreneble“, diris El Faldon, „tion mi ja jam supozis. „*Made in Germany*. Tio estas germana hakilo, malkara kiel hundomerdo sur strateto kaj senvalora kiel distretita alumetoskatolo. Jen, prenu ĉi tiun. Ĝi ja ne estas nova. Sed ĝi estas el Usono. Tiu ne kurbiĝos kaj la klingo ankaŭ ne saltos el la tenilo. Per la germana vi eĉ ne povus trahaki molan fromaĝon, eĉ tiukaze ĝi ankoraŭ kurbiĝus. La vera fatraso. Aĉetite de la antaŭa kompanio, kiu mastrumadis ĉi tie. Estis perfektaj azenoj, al kiuj oni povis kroĉi ĉiun fiaĵon. Ili komprenis nenion pri hakiloj kaj nenion pri maĉetoj. Tial ili ja devis malkonstrui ĉi tie

kaj nun benkerotas. Kiom vi hakis hodiaŭ ĝis nun?“

„Mi ne pensas, ke fariĝos tri tunoj hodiaŭ.“

Rimarkoj

Made in Germany = Produktite en Germanio

benkeroti = ne skriberaro, sed E-vortludo el benko kaj roto, ĉar originale germane estas „*bankerott*“, sed devus esti „*bankrott*“.

Eldoninte la novan hakilon kaj enskribinte ĝin en la liston, El Faldon ankoraŭ dum certa tempo restadis en la *bodega* kaj inspektis la stokon. Tie estis knabo, kiu tie ordigis ĉion, aŭ, se li ne havis alian por fari, priŝmiris la hakilojn per graso, por ke ili ne rustiĝu, kaj frotadis lazojn kaj rimenojn, por ke ili ne kovriĝu per fungoj kaj ne ŝimu. El Faldon, por ankaŭ en tiu rilato ne pigri, diris al li: „Tio estas ja diodamnita kotmastrumado kaj fiaĵo. Mil diabloj, kion vi fakte faras ĉi tie la tutan tagon? En ĉiuj anguloj kreskas fungoj, kaj la feraj grimpohokoj estas tiaj rustaj, ke ili aspektas maldikaj kiel alumetoj. Mi sendos vin per la grimpohokoj sur altan arbon, por ke vi rompu vian nukon. Tiam vi ekscios, kion tio signifas, ke oni konservadu ilin en graso.“

„Ja kion mi faru kontraŭ la fungoj, *Jefecito*? Pluvas senĉese kaj nenio sekiĝas. Kaj, se mi ne ricevas grason en liveroj, per kio mi do priŝmiru ĉion?“ defendis sin la knabo.

„Tenu la buŝon fermita kaj ne parolu eĉ kontraŭdire, se

mi ion parolas al vi, aŭ mi polurosin vian grimacon.“

El Faldon iris al la pordo, iom staris tie kaj vidis, ke komenciĝos post kelkaj minutoj nova kaj abunda pluvelverŝiĝo. Li ĝojis, ke li ne devis esti en la subĉiela kampadejo, sed je tiu tago servis en la *oficina*.

Li promenis sen hasto transen al la bangalo. Meze de la vojdistanco li haltis. „*Caray*“, li diris ne laŭte al si, „Cacho hodiaŭ ja detale unktas la ulon. Tiuj nun jam pli ol tridek minutojn estas ĉe sia privata plezuro.“ Li turnis sin al la deklivo kaj intencis promeni ĝis la rando por rigardi tie, kiel la afero de ambaŭ disvolviĝas. Sed poste li tuj ekpensis: „Kial tio koncernu min, kiel li detiras lante la felon de li? Mi ĝojas, ke li ne vokis min por fari tiun laboron. Mi estas sufiĉe laca ĝisoste kaj je miaj membroj.“

Falis kelkaj gutoj, kaj tuj poste la pluvelverŝiĝoj jam torentis tiom furioze teren, ke El Faldon, kvankam li malproksimis de la bangalo nur ĉirkaŭ dudek paŝojn, tamen tute malsekiĝis.

Li paŝis en la portikon kaj skuis la akvon de siaj ĉapelo kaj

ĉemizo. „Jen la sekvo, se oni okupiĝas pri aferoj, kiuj tute ne koncernas onin.“

La pluvelverŝiĝo fariĝis ĉiun minuton pli forta kaj pli vipanta. El Faldon subite havis strangan senton.

Restadante en la portiko, li iris ĉirkaŭ la domo al ties riverflanko. Dum certa tempo li rigardis transen al la rando de la deklivo kaj atendis, ke tuj post sekundoj aperos *don* Acacio super la rando. Li ja certe tute malsekiĝis, kaj ne supozeblis, ke li ankoraŭ nun traktas Urbanon.

„Malbenita pluo, mi nun ja fine tamen devos rigardi, kion ambaŭ tiom longe faras tie malsupre“, li diris, vokante internen, kie sur unu el la litoj sternis sin la kunulino de *don* Acacio kaj trafoliumis trivitan gazeton, por trovi linion, kiun ŝi mem ankoraŭ ne povas reciti, ĉu antaŭen, ĉu malantaŭen.

El Faldon prenis sian guman surtuton de lignofosteto en la vando, ĵetis ĝin sur sin, ŝovis la kapon tra la supra fendo kaj surmetis la malsekan ĉapelon.

Alveninte je la dekliva rando, li vidis, ke ne Urbano, sed don Acacio staras ligite al la arbo. Li ekkonis tion je la vestoj, ke povis esti nur don Acacio. Ties kapo kliniĝis sur la bruston. La malhele bruna, longa hararo, abunde saturita per akvo, pendis de li kaj kovris grandan parton de lia vizaĝo. Li skuis je siaj kvazaŭkatenoj, sed plu nur per etaj fortoj. Verŝajne li jam dum tridek minutoj penis liberiĝi.

El Faldon aŭdis raŭkan vokadon: „Pechero, Faldon, je ĉiuj inferoj, kie vi kaŝiĝas, *flojos*, damnitaj pigruloj?!“ La pluvo kaj la distanco malhelpis la aŭdeblon de la voko en la *oficina*.

Kun longaj saltoj la *capataz* kuris sur la deklivo malsupren.

„Finfine venas ja unu el vi, pigraj friponoj. Vi drinkadas tie supre kaj lasas min en la manoj de tiu sovaĝulo.“

El Faldon rapide lin malligis kaj kaptis lin je la ŝultroj, por ekmovigi la kunkurbigitan korpon. En tiu momento retrofalis la hararo de lia vizaĝo.

„*Por la Madre Santisima, Jefe*, kio okazis al vi ?“ El Faldon krucoŝignis sin certe sesfoje pro hororo.

„Nu, kio okazis? Iru diablen kaj ne demandu sensencaĵojn. Miajn okulojn li elpikis, tiu kanajlo, kaj forkuris. Sed ni ja kaptos lin. Kaj ĉifoje ni ja instruos lin. Ek, ĉiuj *capataces* kaj ĉiuj ĉevaloj, persekutu lin. Kaj tuj nun. *Que chinguen todas las madres*, mi estas tute senvalora, uzebla plu por nenio.“

Dum li parolis, li palpis per la dekstra mano al la kokso, kie li supozis sian revolveron. Li palpis ekscitite je sia zono. „*Que chingue este cabron*, kie estas mia kanono? Eĉ ne la patronkartoĉo estas ĉi tie. Ĉu ĝi eble kuŝas ie proksime sur la sablo?“ Li palpdis per siaj piedoj la teron.

„*No, Jefe*“, diris El Faldon. „Ĉi tie videblas nek *pistola* nek zono.“

„Tiukaze tiu damnita hundido kunprenis ankaŭ mian revolveron kaj la kartoĉojn.“

„Ŝajnas tiel, *Jefe*, ĉi tie proksime mi vidas nenion. Li

acidigos nian vivon per tiu pistolo ĝis la kaptado kaj certe li provos brulmarki nin per ĝi.“

„Ĉu vi eble eĉ timas pedikohavan kotan indiĝenon? Mi sufokos lin per miaj nudaj manoj, tuj post lia alkonduko.“

„Tre malproksime de ni li ne povas esti, *jefe*. Mi certas, ke ni kaptos lin dum horo. Dum tiu pluvo li ne povas transiri la sulkojn, la marĉo retenus lin.“

Dum tiuj paroloj El Faldon kondukis *don* Acacion al la *oficina*, kie li tiris lin al seĝo.

La knabino alvenis kaj kriis: „Ve, kompatinda *muchacho*, ho ve, kompatinda *hombre*. Mi ne forlasos vin, nun ne plu! Tiuj sovaĝuloj. Ne estas kristanoj, sed barbaroj kaj paganoj.“

Kolerigite ekkriis *don* Acacio: „Tenu fermita vian diodamnitan fetorantan buŝaĉon, seksmatraco, kaj lasu min fine en paco pri via naŭza larmaĉo. Mi havas sufiĉe da aliaj zorgoj!“

„Sed, *amorcito mio*, mi volas ja nur konsoli vin“, diris la

ino kaj komencis plori.

„Mi ne bezonas vian konsolon, iru en la inferon kaj fikigu vin de kiu ajn. Foriĝu, kota fekfikulino!“

La ino rampis en la apudan ĉambron, ĵetis sin sur la liton kaj provis plorĝemeti kaj ploregi, sufiĉe laŭte, por ke *don* Acacio aŭdu ĝin.

„Faldon!“ kriis *don* Acacio kolere.

„*Si, Jefe*. Mi nur pretigas ĉi tiun bandaĝon.“

„Elĵetu la molestulinon tra la pordo, por ke mi ne plu aŭdu hurleti ŝin. Ĵetu ŝin en la riveron, por ke ŝi foriĝu de ĉi tie, kiel eble plej rapide.“

Li ekstaris kaj serĉis la komitekobotelon.

Li palpadis tien kaj tien kaj trovis ĉiun objekton en la kabano en alia loko, ol li supozis laŭ memoro. Tio eĉ pli kolerigis lin. „Kie, ĉe l' diablo, estas la didamnita botelo kun la sterkosuko?“

„Ĉi tie, *Jefe*.“ El Faldon tenis la botelon jam permane kaj donis ĝin al *don* Acacio. Tiu eltiris la ŝtopilon per la dentoj kaj metis la botelon al la buŝo kaj glutis tiel, ke eĉ ne guto postrestis. Poste li vaste arke ĵetis la botelon per ĉiuj siaj fortoj al la vando, ne zorgante pri tio, ĉu li eble trafos iun.

„Kion mi ne povas gluti, tio estas“, li kriis, ekscitite palpante piede tien kaj tien, „ke tia kota kaj pedikohava bandito, tia bruna bestaĉo subigis min. Tion mi ne povas gluti. Pro tio mi pereos.“

Li puŝis per la kapo forte al la vando, kaj tuj poste li stumblis pro seĝo, kiu baris lian vojon, kaj falis laŭlonge planken. Sen pripensi tion, kion li faras, li saltis supren kaj puŝis la kapon al angulo de la tablo. „Sankta Virgulino pardonu al mi!“ li kriis, pli kaj pli koleriĝante, „sed mi estas uzebla por nenio plu, por nenio plu!“

„*Tranquilo, Jefe*, trankviliĝu“, diris El Faldon. Li venis kun kelkaj strioj de blanka ĉemizo ĉemane kaj kun pelvo kun akvo, en kiun li verŝis *aguardiente*.

„Sidiĝu, *Jefe*, jen la seĝo, tuj malantaŭ vi, mi bandaĝos viajn okulojn.“

Don Acacio etendis brakon malantaŭen, kaptis la seĝon kaj frakasis ĝin surplanke. „Kiel bandaĝo ankoraŭ helpu al mi?!“ li kriis furioze. „Kun ĝi vi estu veninta tridek minutojn pli malfrue. Nun mi ne plu bezonas ĝin. Ŝovu ĝin en vian postaĵon.“

Li laŭpalpe ŝovis sin en la ĉambron, kie li havis liton kaj kie kuŝis sur la dua lito lia kunulino kaj plorĝemetis.

„Ĉu vi, diodamnita putino, ankoraŭ nun ĉi tie estas? Ĉu mi ne diris al vi, ke vi dronigu vian sifilisan kadavron en la rivero, por ke vi ĉi tie ne baru la vojon?! Ekkuru kaj subite, putino!“ Li levis pugnon kaj proksimiĝis al la lito.

La knabino kliniĝis kaj glitis el la kabano eksteren, sentio, ke lia pugno trafis ŝin.

Li rimarkis, ke ŝi eskapis de li. Per tio li nur des pli konsciiĝis, kiel senhelpa li estas.

„Mi eĉ ne plu povas bati la vizaĝon de la putino, se ĝi

meritas tion. Kaj sub tiaj cirkonstancoj mi restu vivanta? Mi uzeblas por nenio plu. Eĉ kota putino povas pripisi min, kaj mi devas toleri tion. Ankaŭ hundoj pripisos min, se mi staros ĉe arbo kaj atendos, ke iu konduku min. Por nenio plu uzebla, por nenio plu. Kaj ĉio ĉi nur pro pedikohava baĥajonteko!“

Li palpis sin reen al la pordo.

„Kion vi ambaŭ tie flustras?“ li elvokis en la unuan cambron, kie El Faldon kaj la ino mallaŭte interkonsiliĝis, kiel ili povas trankviligi kaj enlitigi lin. La knabino, bone komprenante lian furiozadon, ne estis ofendita. Ŝi serioze intencis esti nun helpantino al li.

„Ĉu vi jam kuŝas sur ŝi?“ vokis *don* Acacio kolerigite, celante El Faldonon. „Kompreneble, mi uzeblas ja por nenio plu. Kaj en la sama ĉambro, kie estas mi, vi ambaŭ diboĉseksumas. Kaj mi povas fari nenion kontraŭe. Vi ambaŭ ridas impertinente al mia vizaĝo, malfidelaj kanajloj, jen tio, kion mi havas ĉirkaŭ mi.“

„Sed *cachito, amorcito mio*“, diris la ino mole kaj

kareseme, „mi amas vin kaj forlasos vin neniam, se vi volas.“

„Pro favoro kaj kompato, putino!“ vokis don Acacio. „Mi ne bezonas vian kompaton, kaj eĉ ne volas ricevi ĝin kiel donacon. Kie estas la botelo?“

„*Mi vida*“, diris la ino, „vi trinkis jam sufiĉe. Ĉu vi ne volas sterni vin? Venu, mi helpos al vi!“

„Ne tro proksimiĝu, aŭ mi premsufokos vin, bufino!“

„En ordo, premsufoku min!“ proksimiĝante diris la ino.
„Premsufoku min, se tio plaĉas al vi. Ĉi tie mi estas!“

Don Acacio aŭdis, kiel ŝi proksimiĝas kaj ĵetis al ŝi la pordon al la vizaĝo, tiel, ke li restis sola en la dormĉambro. De interne li metis la trabon transverse al la pordo.

La ino kaj *El Faldon* orelumis apud la pordo kaj aŭdis, ke li iris al la lito kaj sidiĝis.

„*Gracias, Santísima*“, Dankon, *Dipatrino*, flustris la ino,

„li kuŝiĝas. Se li eldormiĝos, li komencos kutimiĝi al tio kaj rigardos ĉion tion kun aliaj okuloj.“

El Faldon gluglis gorĝe.

La ino pliboniĝis: „Mi celas diri, ke li fariĝos tiam pli trankvila kaj komprenos, ke homo povas vivi ankaŭ tiel kaj esti sufiĉe feliĉa.“

Ili retiriĝis de la pordo kaj komencis reordigi la ĉambron.

„Vi nun certe devos rajdi al *don* Feliks, *Señor*“, diris la ino, „kaj heroldi tion al li, aŭ, ĉu *don* Severo estas pli proksima?“

„*Don* Feliks estas en la ĉefa kampadejo, kaj de ĉi tie tiu estas pli proksima. Sed hodiaŭ estas jam tro malfrue. Neniu Luno kaj ĉio marĉas. Mi firmgluiĝus. Sed tuj morgaŭ matene...“

En la litoĉambro knalis pafo.

El Faldon trarompis la pordon. Ili trovis *don* Acacion kaŭrantan antaŭ la lito kaj kun paftruo en la kapo.

„*Por Jesu Cristo!*“ terurigite vokis la ino. „Kiel li havigis la revolveron al si? Mi ja tiel zorgeme atentis, ke ne pendu ie revolvero en la *oficina*.“

El Faldon puŝiĝis je kesto, kiu ĉirkaŭe estis metale garnita per lado, ĝi staris malfermite apud la kunkaŭrata *don* Acacio. En la kesto estis leteroj kaj dokumentoj, kelkaj libroj kaj kelkaj monsaketoj. Estis ankoraŭ du pluaj revolveroj en la kesto, ambaŭ ŝarĝitaj. Kaj aldone ses kartonskatoletoj kun kartoĉoj.

„Tial do li sidiĝis sur la liton“, diris la knabino. „Nur por eltiri la keston al si kaj preni la revolveron. Mi ja ne povis scii, ke li konservas en ĝi revolverojn. Mi neniam trafosis liajn aĵojn, tiom longe, kiom mi konas lin. Kaj mi nun jam dum du jaroj estas ĉe li. Vi povas fidi al mi, *señor*, mi amis lin.“

Ŝi surgenuiĝis, karesis lian vizaĝon, kisis lin kaj helpis El Faldon-on surlitigi la kadavron.

„Mi amis lin“, ŝi ripetadis. „Mi amis kaj amis lin, de kiam mi lin konis.“ Ŝi komencis larmi ĵetiĝis surgenuen antaŭ

la lito kaj kisis liajn manojn.

El Faldon estis elirinta.

Fine ŝi rekuraĝiĝis, alportis akvon kaj mantukon kaj komencis lavi la vizaĝon de *don* Acacio. Ŝi krucis ties manojn sur lia brusto, deprenis la krucon, kiun ŝi portis sur la brusto kaj metis ĝin al liaj manoj. Poste ŝi ŝovis la liton en la mezon de la ĉambro, serĉis kelkajn kandelojn, starigis ilin ĉepiede kaj ĉekape de la mortinto tiel, ke ili elstaris de malsekaj terbuloj, vualis per nigra tolo sian kapon, ŝovis seĝon proksime al lia lito, sidiĝis, prenis de la vando rozarion, kaj plorante kaj plorsingulte komencis preĝi, la perlojn senpenseme nombrante.

Rimarkoj

amorcito mio = karulĉjo mia

caray = fulmotondro

mi vida = koramata mia

flojos = pigruloj

Ĉapitro 08

01

Don Severo kaj don Feliks venis por entombigi sian fraton. Oni enterigis lin en la sama *cemeterio*, en kiu oni enterigis ankaŭ la *muchachos*, kiuj mortis en tiu kampadejo. La diferenco en tiu kazo estis nur tiu, ke la monteto ricevis pli grandan krucon ĉirkaŭatan per forta kaj hermetike fermita barilo, por ke la kadavron ne trafosu porkoj. Por ŝirmi lin eĉ pli, oni metis pezajn ŝtonojn sur la monteton kaj ĉirkaŭ la monteto.

Alveninte en la *oficina*, *don Severo* unue demandis: „Ĉu la *muchachos* vidis, kio suferigis *don Acacio*?”

„Ne“, respondis *El Pechero*, *El Faldon* kaj la ino, „kaj neniu el ni parolis al iu el la *muchachos* pri tio.“

Ke *don Acacio* mortis, eksciis la *muchachos* vespere en la kampadejo pere de la kuiristo kaj de ties edzino. Sed la kuiristo ne sciis ion pli detalan pri tio, kaj ankoraŭ en la sama nokto ekestis onidiro, ke *don Acacio* kaj lia *mujer* havis kverelon, ke ŝi kaptis revolveron, kiu tuj ekpafis kaj

trafis *don* Acacion, kiam tiu provis forpreni la revolveron de ŝi.

Don Severo vespere venis al sia frato kaj al la ino kaj al ambaŭ *capataces*: „Tenu fermitaj viajn buŝojn pri tiu afero. Povas fariĝi por ni ĉiuj tre danĝere, se la *muchachos* ion ekscios pri tio. Tia afero infektigos. Kaj ne nur eblas, sed certe atendeblas, ke tiukaze, se la *muchachos* ekscios la veron, tiu aŭ tiu el ili kiel simio kopios tion. Mi ankaŭ povas diri al vi, ke mi ricevis leterojn, kiuj vere ne tre agrable legeblis de mi. La gazetojn, kiujn mi ricevis kun la lasta poŝto, malkaŝas nenion kaj estas tre memgardeme skribitaj. Ili povas diri ja nur tion, kion la olda kaciko sur la trono permesas presi al ili. Li komandas ja ne nur la tutan landon, sed des pli ĉiujn gazetojn kaj librojn. Sed la leteroj jam tre pensigas min. Kaj, kvankam ankaŭ la gazetoj parolas nur per aludaj vortoj pri tio, legeblas tamen sufiĉe inter la alineoj. Jen tri lernejestroj arestitaj kaj senditaj al la koncentrejo en Verakruco aŭ al Jukatano; jen du profesoroj kondukitaj en la kazernon de regimento, kaj poste oni neniam denove aŭdis ion pri ili. Kaj jen denove

ĉiuj viroj kaptitaj en vilaĝeto en Morelos aŭ de la *rurales*, de la federacia polico, aŭ de la korpogvardio de l' olda kaciko. Dudek kaptitoj el la prizonuloj laŭvice nombrite kaj je la foirplacaj arboj pendumitaj meze de la vilaĝo. Jen fervojtrajna elreliĝo, jen bombo eksplodis en la kaldrono de ŝipo, jen bombo eksplodis en la policejo en Puebla, en Monterrey malkovrita tuta ĉaro plena de flugfolioj, kiuj postulas renversi la diktaturon kaj revolucion, kaj la posedanton de la ĉaro, kiu eble tute senkulpis, oni tuj pafmortigis. Ĉio ĉi estas en la lasta poŝtaĵo. Kaj mi ne devas esti profeto por povi diri al vi, ke la fotelo de la oldulo ŝanceliĝas. Se ĝi renversiĝos, brulos la tuta respubliko. Kaj, ĉar en ĉiuj ĉi jaroj neniuj lernis pensi memstare, ĉar tio estis malpermesita, la respubliko brulos nun tiom longe, ĝis ĉio estos terenbruligita kaj ni ĉiuj kun ĝi, ĉar neniuj povis interparoli kun alia pri siaj pensoj, kaj se oni estas jam for de la buŝumo, ĉiu imagas, ke nur li posedas la ĝustajn ideojn, kaj ke ĉiuj ceteraj estas nur azenoj, kiujn li devos mortbati, por ke li restu prava.“

Don Feliks tuis kaj diris: „Bone kaj ĝuste, *hermano*, tio

ĉio estas bela, kion vi diras al ni, sed la plej multan el tio ni ja jam eksciis, kiam ni estis la lastan fojon en Villahermosa kaj tie aĉetis la monteriojn.“

„Prave“, konfirmis *don* Severo. „Sed ĝi komencas fariĝi pli serioza, kaj mi havas la impreson, ke nun rapide okazos la granda tumulto. Tial mi volas al vi ĉiuj konsili, speciale al vi, Feliks, kaj al vi, Picaro, kaj al vi, Gusano kaj Pulpo, ke vi ĝuste nun iom delasu de tro da insisto. Ne tiel dure traktu la *muchachos*. Jen io enaeras, kio ne plaĉas al mi. Ke Pascasio atakis La Mecha-n kaj mortbatis lin, kaj ke Urbano eĉ senhonte krimis al *don* Acacio, tio estas damnite malica afero. Tion antaŭ duono de jaro neniu eĉ nur kuraĝis fari, eĉ fingron ili tiam ne levis. Kaj nun ili eĉ atakas kaj mortbatas vin. Tute honeste dirite, karaj, ni sidas sur barelo plena de dinamito. Unu fajrero eksplodigus nin ĉiujn ĉielen. Tiukaze restus de neniu el ni eĉ nur hareto. Tio devos eki nur en unu bieno, kaj sufiĉas, ke nur kelkaj viroj venos ĉi tien, kaj tiukaze ni ĉiuj povos ĝoji, se ni havos tempon, fari la saman, kion Cacho hieraŭ antaŭmontris al ni.“

„Bone, *Jefe*“, diris El Picaro, „sed kion ni do faru? Ĉu eble

forkuri?“

„Kompreneble ne, azeno. Ĉu vi eble pensas, ke ni povus lasi ĉi tie nian monon kaj foriĝi? Ĉi tie kelkaj miloj da toneladoj pretas por forflorigado, kaj vi ja ne pensas eble, ke ni faris ĉion tion nur pro pura amo, por povi doni antaŭpagojn al pigraj indiĝenoj, ĉu?“

„Tiukaze do simple diru al ni, kion vi postulas de ni, *don Severo*“, diris El Faldon.

„Tion mi ja jam diris. Traktu ilin dum la sekvaj semajnoj iom pli memgardeme. Se iu ne povos atingi kvar toneladojn, tiukaze kontentiĝu pri tri aŭ du. Vi kriadu plu kun via tuta korpa forto, kiel kutime. Sed provizore neniun batu, neniun pendigu kaj neniun katenu per ŝnuroj kaj tiel plu. Ja revenos la tempo, kiam ni kroĉos kvar toneladojn al ili. Post la forflorigado. Intertempe repuriĝos la aero en la lando, kaj eble oni pafmortigos la nanon Madero. Li apenaŭ povas transrigardi kutiman tablon, tia liliputano li estas. Sed eble ĝuste tial, ĉar li estas tiel malgranda, li sukcesis meti al lia moŝto prezidanto tian varmegan fajron sub la fotelon, ke la olda

bubo sur la trono saltadas kvazaŭ, kiel pikita de vespo en la postaĵon.“

„Kial li ne enprizonigas lin?“ demandis *don* Feliks.

„Kial? Kial? Li ja retenis lin jam dum ses monatoj en prizono. Ĉu helpis lin? La malgrandulo per tio gajnis la centoblon da amikoj, kaj estas homoj, kiuj nun adoras lin. La oldulo devis enliberigi Maderon. Alikaze liaj kunuloj minacis eksplodigi la fervojpontojn kaj verŝi sur tutajn stratojn petrolon por ekbruligi ĉion. Kion lia moŝto faru, se en ĉiu angulo iu kaŭras kun plena skatoleteto da alumetoj aŭ dinamitbombo, por kiu la ministoj liveras la materialon? Mi ne scias kaj ne kuraĝas pensi, kio okazus al ni ĉi tie, se ni bezonus dinamiton por eksplodoj.“

„Ha!“, vokis El Chapapote, „vi estas ekscitita, *don* Severo, pro via frato, ke oni faris tion al li. Sed tiel rapide ni ne lasos timigi nin.“

„Tion por vi mem decidu laŭplaĉe, Chapapote. Vi havas nenion, kion vi povus perdi ĉi tie, krom via kotŝmirita kaj flikita pantalono. Sed estas alie pri ni, pri mi kaj mia

frato. Ni riskas en la negoco ĉi tie nian tutan monon, ĉion, kion ni dum dek kvin jaroj da dura laboro perlaboris kun peno. Almenaŭ vi scias nun, kion mi celas. Dum la sekvaj semajnoj iomete liberigu la bridon. Kaj tiel do estu! Ĉu komprenite!?”

Don Feliks alportis du botelojn kaj enverŝis, por doni al la kunveno pli afablan fasadon.

Don Severo ekstaris kaj iris transen al la bangalo.

„Kion vi nun faros, Aŭrea?“ li demandis la vidvinon. „En tiu sezona tempo vi ne povas ekvojaĝi. Vi firmkroĉiĝus kun la bestoj en la ŝlimo. Neniu vestfadeno fariĝus seka je vi, nek je hela tago, nek nokte. Eĉ la riverojn vi ne povus travadi. Ili estas ĉiuj altnivelaj kaj forŝirus vin kiel pajlotigon.“

La ino kuŝis sur la lito. Ŝia vizaĝo jam ŝvelis de la plorado kaj la okuloj inflamiĝis.

Ŝi rektiĝis kaj sidiĝis sur la litorandon. „Mi ne scias kion fari. Al mi ĉio estas indiferenta, mi estas nur malgaja.“ Ŝi denove ĵetiĝis sur la liton kaj komencis ree larmi, premante la manojn sur la vizaĝon.

„Tiel multe spektakli vi vere ne devas“, konsolis ŝin *don Severo* siamaniere. „Vi ja ambaŭ ĉiutage dufoje aŭ trifoje reciproke batis vin kaj alkriis. Ĉu ne?“

„Jes, tio pravas“, diris Aŭrea plorsingulte kaj blove

purigis al si la nazon per naztuko. „Ni eterne interbatadis. Sed mi amis lin. Kaj ankaŭ li min amis. Mi scias tion. Li promesis al mi kunpreni min al Hispanio kaj tie edzinigi min, se iam li havos pli da mono ol reĝo sur trono.“

Don Severo altiris seĝon. „Ankaŭ tion vi ne scias tiel certe, ĉu li ne tamen elbalaus vin ankoraŭ je la unua tago, se li alvenus en Villahermosa. Sed estas nun sencece longe paroli pri tio, kion li farus kaj kion ne. Li estas en tombo kaj ni ne plu perdu tempon pri li. Mi diros al vi la sekvan.“

Li pli proksimiĝis al ŝi surseĝe kaj tiris ŝian kapon al sia brusto, mankaresante ŝian hararon.

La ino ĉesis plorsingulti. Bonfartigis ŝin senti iun, al kiu ŝi povas apogi sin.

„Mi diros al vi la sekvan, Aŭrea“, ripetis *don Severo*. „Sola vi ne povos resti ĉi tie. Vi falus nur en la manojn de iu el la *capataces*. Ili estas fiuloj. Aŭ, ĉu eble iu el ili plaĉas al vi?“

„Eĉ ne por kraĉi sur iun!“

„Tiukaze vi devos fari nenion alian krom iri kun mi.“

„Aŭrea forgesis sian malgajon dum kelkaj sekundoj. „Sed, *don Severo*, vi havas ja jam du *mujeres* ĉe vi.“

„Ĝuste. Sed tie, kie mi povas zorgi pri duopo, mi ankaŭ povas zorgi pri triopo. Aŭ ĉu eble ne?“

„Eble, *don Severo*. Sed la du aliaj *muchachas*, kiujn vi havas, elŝiros mian hararon.“ Ŝi blovis denove en sian naztukon.

„Tio dependas nur de vi, ĉu iu elŝiros vian hararon aŭ ne. Ĉu ne?“

„Certe, *don Severo*. Vi estas la mastro ĉi tie, kaj kion vi ordonas, tion oni faras.“

De tempo al tempo ŝi ankoraŭ plorsingultis, sed ŝi estis repaciĝonta kun sia sorto. Ja kiun sencon havus longe funebri? La vivo estas multe tro mallonga por funebri pri iu, kiu ne povas reveni. Mortu kaj ankoraŭ je la sama tago estu forgesita. La vivantoj ne povas zorgi pri vi, se vi forŝteliĝis por eldormi. Kaj kion vi perdas hodiaŭ, neniu

morgaŭ povos redoni al vi; ĉar morgaŭ vi estos tagon pli aĝa. Ĝojojn oni devas ĝui, se ili ofertas sin al oni. Ili ne renkontas onin je dua fojo en la sama belo kaj freŝo. Kiel ino kun granda vivosperto Aŭrea sciis, ke inoj povas disipi malpli da tempo je forpasinta kaj je formortintoj ol viroj; ĉar la tempo de inaj ĝoĝoj kaj ĝuoj estas malpli longa, kvankam pli riĉa.

Tial diris Aŭrea per sorten submetita voĉo de obeema ino: „Se vi ordonas tion, tiukaze mi certe devos veni al vi kaj fari, kion vi deziras.“

„Mi ordonas nenion al vi, Aŭrea“, li diris post tio kun delikata aludo de patra protekto.

Ŝi jam forlasis lian bruston, sidiĝis ree tute sur sian liton kaj komencis ordigi sian hararon. Tiu farado donis al ŝi samtempe la okazon pripensi ĉion, sen veki en *don Severo* la impreson, ke ŝi rapide elkalkulas, kiujn avantaĝojn ŝi povus havi ĉe tiu komerco.

„Mi scias, ke vi ne ordonas tion al mi, *don Severo*.“ Ree ŝi plorsingultis. Ŝi ne povis permesi al si tro rapide kaj tro

evidente forĵeti la vidvinan vualon por *don Severo*. Tio malpliigus ŝian prezon. Kaj pri sia prezo ŝi pensis ekde la sama momento, kiam *don Severo* venis por paroli kun ŝi. Ke la prezo ne esprimeblis en mono, ŝanĝis nenion pri la fakto, ke tamen estis prezo. Ino, kiu ne havas prezon kaj ne scias fiksi prezon por si, viro taksas ĉiam tro malkare.

„Kvankam vi ne ordonas tion al mi, *don Severo*, mi ja tamen ne havas alian elekton. Forvojaĝi mi ne povas, ĉar la marĉo min firmtenus. Sekve mi ja devas resti ĉi tie kaj uzi vian bonecon. Sed mi esperas, ke vi ne traktos min kiel servistinon, *don Severo*, ĉar via frato, kvankam ni ĉiutage kverelis, ĉiam traktis min kun deco kaj respekto. Mi estas el bona familio, mia patro estis fabrikisto kaj komercisto.“

„Vi scias tre bone, ke mi opiniis tion ne tiel. Vi havas pli bonan edukadon ol tiuj du, kiujn mi havas ĉe mi. Mi nur ne povas forsendi ilin momente, ĝuste pro la sama kaŭzo, ĉar la ĉevaloj ne sukcesus. Alikaze mi sendus ambaŭ ankoraŭ hodiaŭ al la diablo. Sed sciu, Aŭrea, ke vi plaĉis ĉiam al mi, ekde la unua tago, kiam mi vidis vin kun Cacho. Ĉiam vi plaĉis al mi, pli bone ol iu alia. Sed mi ne

povis diri tion al vi, ĉar vi ja estis kun Cacho, kaj mi ne volis ĉi tie kverelon, kiu taŭgus por nenio bona. Do, nun vi scias tion, kaj vi venos nun kun mi en mian kampadejon.“

„Bone, *don Severo*, jen mi ja nun certe devos iri kun vi.“
Ŝiaj larmoj jam ne plu fluis. Ŝi tuŝetis sian vizaĝon per la malseka poŝtuketo, kiun ŝi trempis en akvon. Ŝi tre penis aspekti bone kaj freŝa, tiel, kiel decas al ino, kiu ĵus sciiĝis, ke ŝi gajnis la plaĉon de viro, kiu posedas ĉiujn kapablojn malhelpi, ke ŝi mortu pro malsato, nek en tiu nek en alia senco.

Don Severo malfermis la pordon kaj elvokis. „El Faldon, helpu al la *señorita* ĉe la pakado. Morgaŭ matene, *muy tempranito*, tre frue, ni ekrajdos. Vi zorgu pri la muloj kaj havigu servoknabon por akompano.“

El Faldon okulumis al la ceteraj *capataces* kun sufiĉe klara impertinenta gesto al la ĉambro, kie troviĝis Aŭrea kaj *don Severo*.

Estis domaĝe, ke *don Feliks* kunsidis ĉe la tablo. Alie la

capataces svingoplene prezentus inter si festparolojn,
kiuj gutus pro disŝprucita suko, tiel, kiel verŝita mielo sur
prilekita mango.

Minuton poste *don Severo* envenis, ferminte la pordon de
la dormĉambro post si.

„Ŝi ankaŭ kun mi povus iri“, diris *don Felikso*

„Ŝi povus. Sed kun la megero, kiun vi havas ĉe vi, tio ne
bone sukcesus kaj morgaŭ ni havus novan entombigon,
pro unu el via triopo, eble eĉ pro du. Vi scias tion ja plej
bone, *hermanito*.“ *Don Feliks* enverŝis la enhavon de
glaso kaj remetis ĝin brue sur la tablon kaj diris: „Vi
pravas, Severo. Estas pli bone tiel, kiel vi intencas tion.“

Ĉiuj *capataces*, aŭ almenaŭ la *mayordomo*, la estro de ĉiu distrikto, estis kunvokitaj al la kampadejo por ĉeesti ĉe la nova asignado de la distriktoj kaj labortaskoj, kiuj pro la eksigo de *don* Acacio fariĝis necesaj.

La regionon Nordo, kiun gvidis ĝis tiam *don* Severo, li kunigis nun kun la regiono Okcidento kaj ankaŭ kun granda parto de la regiono Sudo, por malŝarĝi *don* Felikson, kiu, tiel, kiel ĝis nun, ankaŭ plu respondecis pri la administrado. Tiuj regionoj, kiujn *don* Severo transprenis, estis apenaŭ esploritaj. Kaj ili postulis tial la tutan atenton kaj laboron de tre sperta viro.

En la administrejo nun multaj taskoj ne plu plenumendis, ĉar pro la pluvperiodo ne plu alvenis poŝto. Tial *don* Feliks povis transpreni tiujn distriktojn de la regiono Nordo, Oriento kaj Sudo, kiuj sufiĉe proksimis al la urbo, do, al la administrejo. Krome *don* Feliks transprenis ankaŭ tiujn novajn distriktojn, kiuj troviĝis sur la alia flanko de la riverego kaj en tiuj ĉi semajnoj estis esplorotaj.

Kompreneble *don* Feliks ne ĉiam povis explore migradi en la regionoj, ĉar en la administrejo baldaŭ aldoniĝis novaj kaj gravaj taskoj, kiuj ne konfide transdoneblis al *capataces*, ĉar ili apartenis al la plej gravaj taskoj, kiuj plenumendas en monterio, se la kompanio ne volas trasuferi perdojn. La monteria urbo troviĝis ĉe la bordo de la ĉefa riverego. Ĉiuj *trozas*, kiuj apartenis al la kompanio, preterflosis ĉi tie kaj tie estis kontrolataj. Kaj kun la komenco de la pluvsezono, tie fariĝis vere vigle.

En la monteria urbo estis la la ĉefkvartalo de la flosistaj grupoj, kiuj devis reguligi la flosadon sur la rivero laŭflue kaj kontraŭflue. Estis ties tasko eviti ŝtopiĝojn de la suramasiĝantaj trunkoj, kaj se ili tamen okazis, fini ilin per disigo de la trunkoj.

Je multaj lokoj la trunkoj firmkroĉiĝis en arbustaĵoj aŭ en la rulŝtonoj de multnombraj akvofaloj, kiujn la rivero enhavis, kaj tiel baris la vojon al la postirantaj amasoj de drivantaj *trozas*.

La disŝovado kaj dispuŝado de la amasigite retenitaj *trozas* estis ĉiam danĝera laboro. Centfoje pli danĝere ol

en riveroj de netropika speco. La viroj grimpadis inter la surtavoliĝintaj trunkoj, por trovi tiujn *trozas*, ofte estis nur unu el ili, kiuj kaŭzis ŝtopiĝon, por ree enfluigi la trunkojn. Dum la viroj ankoraŭ manipulado per hoko kaj skuado por deigi la trunkojn, ĵetiĝis al ili subite gigantaj akvaj amasoj kaŭzitaj de gravaj pluvelverŝiĝoj meze de la ĝangalo, kiuj katapultis tutajn montojn de senradikitaj nekontroleblaj arbogigantoj kun tondranta muĝado kaj kun la fortego de lavango kontraŭ la trunkamasigoj. La suramasigitaj trunkoj brue kunpuŝiĝis kaj kvazaŭ ŝutkovrigis la virojn, kiuj en tiu momento kiel formikoj penis kontraŭ granda lignostako deigi kaj suprentiri la trunkojn el la akvo. Se la viroj, kiuj vidis la alvenon de la granda akvofalo, ne estis sufiĉe lertaj, tiukaze ili estis puŝitaj kaj premitaj inter la falantaj kaj amasiĝantaj trunkoj, kaj antaŭ ol ili povis elturniĝi kaj elserpentumi, la kranio de ĉiu el ili estis jam frakasita, gamboj kaj brakoj rompita, aŭ ili estis frotitaj en kaĉon. Eĉ, se ili eskapis de la falantaj kaj kunamasiĝantaj *trozas*, okazis, ke ili tiel senelirvoje kaj kvazaŭ kirlite miksiĝis inter la fluantaj lignoamasojn, ke eĉ, se ili estis bonaj naĝantoj, la rivero kunŝiris kaj dronigis ilin, antaŭ ol ili

trovis eĉ nur truon, tra kiu ili povus fuĝi. Ke el kvindek viroj, kiuj flosigis la trunkojn, dudek perdis sian vivon, okazis ne malofte. Ducent mejloj pli malproksime ĉe la riverego, kie estis vilaĝoj kaj urboj kaj kie motorboatoj uzeblis, estis dimanĉa plezuro flosigi trunkojn. Sed fari tiun belan kaj agrablan laboron, estis permesata al neniuj laboranta viro de la monterio. Ili devis reiri en la profundojn de la ĝangalo, longtempe antaŭ ol la riverego atingis la unuan vilaĝon. Tie aliaj laboristoj, plej ofte regionaj loĝantoj, povraj indiĝenaj kamparanoj kaj memstaraj profesiaj kanuistoj, laborante tagsalajre aŭ pagate laŭkvante, transprenis la kaptadon de la trunkoj kaj la konstruadon de la flosoj. Ĉirkaŭ dek mejlojn malproksime laŭ la fluo sur ambaŭ bordoj troviĝis rajdantaj viroj kun fusiloj kaj revolveroj, kiuj gardis por malhelpi, ke eventuale *muchachos* de la monterioj uzas la trunkoflosigadon por atingi tiujn vilaĝojn kaj urbojn por eskapi. Nokte neniuj povis fuĝi. Tion sciis la gardistoj. Tial ili nur dum heleco bone devis gardi en siaj postenoj. Nokte fuĝantoj ne povis naĝi inter la trunkoj aŭ kuri sur la trunkoj, kaj la bordoj, kiuj estis dense kovrataj per ĝangalo, kaŝis tro multajn danĝerojn por povi fuĝi sur ili.

Iuloke la fuĝantoj iam ree devis aperi sur la pado, kaj tuj, se ili nur proksimiĝis al vilaĝo, ili falis en la manojn de gardantoj.

Kiam *don Severo* tie alvenis en la ĉefkampadejo, mankis ankoraŭ proksimume kvar semajnoj ĝis la tago, kiun li kaj *don Feliks* fiksis kiel la unuan flosigan tagon. Kvankam nun apenaŭ pasis tago sen tio, ke falis pluraj fortaj pluvelverŝiĝoj, la pli malgrandaj riveroj, *barrancas*, *esteros* kaj *arroyos*, kiuj etendiĝis sur la vasta regiono de la monterio, kaj en kiuj la *trozas* staple amasigite kuŝis, tamen ankoraŭ ne havis sufiĉe da alta akvo, por povi ekflosigi la trunkojn ankaŭ el la plej malproksimaj loketoj kaj anguloj de la monterio. La tero de la sulkoj unue devis esti tiom saturita per akvo, ke la tero fariĝis argila kaj nepenetrebla antaŭ ol la akvo estis sufiĉe alta por povi flosigi la trunkojn.

Sed ju pli longe *don Severo* devis atendi kun la ekflosigado, des pli da toneladoj intertempe estis hakitaj. Kaj povi liveri kiom eble plej multe da toneladoj, estis la ununura zorgo, kiun li nun havis.

Pri la sama zorgis ankaŭ *don* Feliks.

La decido, estontece malpli draste trakti la *muchachos*, estis forgesita jam tri tagojn post la kunveno.

Ne nur ĉiuj *capataces*, el kiuj ja ĉiu ricevis kontante bonan komisian rekompencan por ĉiu tonelado liverita de la propra distrikto, sed ankaŭ *don* Feliks kaj *don* Severo lasis hajli siajn batojn sur hakistojn kaj bovistojn post kelkaj tagoj kun la sama freŝo kaj duro, kiel ili faris tion antaŭe. *Don* Acacio kaj lia sorto estis forgesitaj antaŭ ol la vermoj komencis delektiĝi je li. Kiu sciuj, ĉu efektive tiel fie vundis lin *muchacho*? Eble *don* Acacio nur eraris. Verŝajne faris tion iu fripona *capataz*, kiu sentis sin tro forte tretita sur la piedfingrojn, aŭ de kiu li forprenis inon, kiam tiu ne povis esti en la *oficina*, sed devis esti ĉe la arboj. *Don* Acacio ofte entreprenis tiajn flankajn amaferojn. Tion sciis *don* Severo kaj *don* Feliks ĝisdetale.

Ek, laboregu do! Kvar toneladojn ĉiutage de ĉiu viro! Ili povos satdormi, se ili estos forlaborintaj sian kontrakton kaj poste en sia pedikohava vilaĝo kultivos maizon kaj bredos porkojn.

Capitro 09

Dum plena semajno Celso ĉiutage oferis horon aŭ du horojn por helpi al Candido, ke li atingu kvar toneladojn.

„Vi ne devas fari tiom multe por mi, *compañero*“, diris Candido ofte. „Vi perdos vian tempon kaj ili skurĝos vin, kaj ĉio nur pro mi.“

„Ne afliktiĝu pri tio, frato. Ni estas ja el la sama tribo. Ĉu ne?“

„Certe. Ni estas najbaroj kaj ambaŭ chamulanoj.“

„Nu, komprenu, jen kaŭzo, kial ni estas kamaradoj. Sed eble mi havas ja ankoraŭ alian.“

Candido ridis kaj demetis sian hakilon. Li ekbruligis cigaredon. Tiam li ree ridis. „Vi ne devas demandi, fraĉjo, *hermanito*. Mi povas diri al vi, ke ŝi ne havas alian viron. En la lasta nokto ni parolis pri tio. Ŝi diris al mi, ke ŝi tre ŝatas vin. Kion vi do volas ekscii ankoraŭ? Vi scias ja tre bone, ke io tia inter tiaj kiaj ni ne okazas dum unu tago. Sed ŝi, Modesta, tre ŝatas vin.“

„La nomo tre bone plaĉas al mi.“ Celso embarasite rigardis teren. „Mi ne povas pensi pli belan al mi.“

„Tion vi nun jam diris plurfoje al mi. Kaj antaŭ ol vi diris tion la unuan fojon, mi ja jam sciis, kion vi celas. Vi estas bonvena al mi, kaj mi estas certa, ke vi estas eĉ pli ol nur bonvena al Modesta.“

Candido levis sian hakilon kaj rekomencis labori.

Vespere, post la manĝo, Celso rulumis kelkajn cigaredojn por si, ŝovis ilin en la ĉemizan poŝon kaj grimpis malsupren al la rivero. Li sidiĝis en la akvon kaj montris nur la kapon plu por povi fumi. En la akvo li sidis, por ke la iksodoj, kiuj boriĝis en lian haŭton kaj kiuj estis tro etaj por elpiki ilin unuope, mortu. La akvo samtempe fridetigis la ardantajn moskitajn pikvundojn kaj la mordaĵojn de la ĉevalomuŝoj, kiujn lia korpo kaptis pro la laboro de la tago. La insektoj en la pluva sezono precipe emis vori, kaj kio estis eĉ pli terura, ili tiam ĉeestis en miloble pli granda kvanto ol en aliaj tempoj. La fumado de la cigaredo, dum li troviĝis en la akvo, gardis lin kontraŭ la moskitoj, kiuj tie ĉe la rivera bordo zumis en densaj svarmoj, kaj kiuj ŝatis la vesperojn same tiel, kiel la homoj, kiujn ili atakis.

Celso ne estis la ununura *muchacho*, kiu sidis en la rivero por ripozi. Je ambaŭ flankoj de li kaŭris viroj, solaj aŭ en grupoj.

Li apenaŭ kvin minutojn tie pasigis, kiam Martin

Trinidad sidiĝis apud li en la akvon.

„He, Celso“, li diris, „donu al mi vian cigaredon por ekbruligado.“

„Kial vi ne ekbruligis ĝin antaŭe, antaŭ ol vi iris en la akvon?“

„Ĝi estingiĝis.“

„Cetere, de kie vi venis, *compañero*?“

„Vi estas ĉi tie la ununura, Celso, al kiu mi diras tion. Mi venas de Pachuca. Tie, kie estas la multaj arĝentaj minejoj. Mi estis tie lerneja instruisto.“

„Lerneja instruisto, ĉu? Kaj nun ĉi tie en la monterio, ĉu?“

„Mi tro malfermis mian buŝon. Aŭ pli ĝuste dirate, mi disvastigis la veron tie inter la ministoj, plej ofte la patroj de la knaboj, kiujn mi havis en la lernejo.“

„Kian veron?“ demandis Celso suspekteme.

„La veron pri la diktatoro kaj pri popolaj rajtoj, kaj ke

neniu homo, kiel ajn prudenta li eble estas kaj kiom ajn li imagas esti la stiristo kaj gvidanto de popolo, havas la rajton subigi la opinion, la pensojn, la parolon, la volon de la homoj. Ĉar ĉiu homo havas la rajton diri, kion li pensas; kaj ĉiu homo havas la devon instrui ĉiujn aliajn pri tio, ke ili estas regataj malbone kaj je sia propra malavantaĝo, se li scias, kie la malbono serĉendas kaj kiel ĝi ŝanĝeblas. Ankaŭ, se la homo eraras aŭ malpravas, tamen restu la rajto al li diri tion, kion li pensas, kaj kiel laŭ li io fareblus pli bone.“

„Tion vi tie en Pachuca diris al la ministoj, ĉu?“ Celso rigardis lin de la flanko. Sed estis tro malhele por precize ekkoni la vizaĝtraĵojn de la parolanto.

„Mi diris al ili eĉ pluan. Mi diris al ili, ke ili ne iru en la minojn kaj ne laboru, por ke la minposedantoj nenion enspezu. Mi diris, ke ili postulu pli da salajro, kaj ke estu permesate al ili fondi sindikatojn, por elbatali siajn postulojn kiel grupoj, ĉar unu sola ne povas atingi ion. Unu viron oni pafmortigas aŭ metas lin en prizonon aŭ skurĝas lin ĝismorte. Sed, se ili ĉiuj postulas la samon kaj solidaras pri siaj postuloj, tiukaze oni ne povos pafmortigi

ilin, ĉar ja neniuj postrestus por labori kaj eligi la arĝenton el la tero. Kaj, se la minposedantoj volas havi arĝenton, tiukaze ili do devas doni al la *mineros* tion, kion la *mineros* postulas – aŭ ili ne laboru.“

Kaj kion la *mineros* diris, kiam vi klarigis tion al ili?“

„Ili ne iris al la laboro. Tiam venis soldatoj kaj dekopon el ili pafmortigis. Kaj poste la *mineros* ree laboris, ĉar ili ne havis sindikatojn, kiuj povus kunigi ĉiujn *mineros*.“

„Sed vin ili ne pafmortigis, ĉu? Tio estas stranga, ĉu ne ankaŭ por vi?“ Celso fariĝis denove misfidema.

„Ne, min ili ne pafmortigis. Ili trenis min en la kazernon, ĉar oni skurĝis minlaboriston tiom longe, ĝis kiam li diris, kiu flustris al ili tiajn pensojn en la kapon. Jen ili trenis min en la kazernon kaj diris, ke mi havu ĝin ne tiel bone esti pafmortigita kiel la dek *mineros*, kiuj ne sciis tion pli bone, ĉar mi ja tentis ilin. Dum tri tagoj ili turmentis kaj skurĝis kaj torturis min. Se unu el la serĝentoj estis laca, venis alia kaj atakis min kiel rabobeston. Morgaŭ, se estos hele, mi montros al vi la centojn de cikatroj, kiujn mi

havas sur mia tuta korpo. Ili ĉiam postulis, ke mi krii: 'Vivu *don* Porfirio!', sed tion mi ne faris, ĉar mi hatas la kacikon kaj deziras lian morton. '*Abaja*, Porfirio!', mi kriis, se mi povis nur malfermi la buŝon, kaj: '*Que muere el Tirano! Abajo los Aristocratas!*' kaj '*Viva la Revolucion de los Proletarios!*' mi kriis. Ĉiam, kiam mi kriis tiel, ili kraĉis en mian buŝon aŭ draŝis min per siaj skurĝoj.“

Celso demandis: „Kaj poste vi skuis la polvon de viaj piedoj, ĉu?“

„Ne, eskapi mi ne povis, kiel fuĝi kun miaj disbatitaj membroj? Ili ŝtopis min kun eble cent aliaj viroj, instruistoj, studentoj, fabriklaboristoj kaj kamparanoj en fervojvagonon. Poste ni retroviĝis sur ŝanceliĝema ŝipo, kie ni estis pakitaj en nian propran merdon, sen lumo kaj sen aero. Tra lukso ili ĵetis ŝimantajn tortiljojn al ni, pro kiuj ni pugnobatalis, ĉar la tortiljoj estis vere tro malmultaj kaj ni malsategis. Ankaŭ kuiritajn fabojn el kaldrono oni verŝis sur nin, kiujn ni devis kapti perbuŝe, sed kiuj firmgluiĝis sur niaj kapoj kaj sur niaj ĉifonvestoj, kiuj falis parte planken inter niajn gambojn. Per niaj

ungoj ni gratis ĉiun fabon el la koto kaj manĝis ilin de la pedikohavaj kaj nelavitaj kapoj de niaj najbaroj, ĉar ni malsatis. Ni ne ricevis akvon, sed ili verŝis siajn pisositelojn sur nin. Poste ni alvenis en la koncentrejon en Jukatano, kie ni laboris sur la sisal-agavokampoj kaj devis konstrui stratojn. Kvardek viroj jungitaj antaŭ pezaj rulumaj stratcilindroj, kiujn apenaŭ dudek ĉevaloj trenus tra la ŝlimo, kaj jen oni eĉ skurĝis nin sub ardanta suno, kiu estis dekfoje pli varmego ol ĉi tie sub la verdaĵo de la ĝangalo. Ĉiutage dek el ni mortis, ili mortis pli rapide ol muŝoj. Ankaŭ inoj estis inter ni, oni skurĝis kaj turmentis ankaŭ ilin, enjungis ilin antaŭ la stratrulumoj kiel la virojn. Inoj de la tekstilaj fabrikoj de Orizaba. Tie el ĉiuj, kiuj rifuzis labori ĝis ricevo de pli alta salajro, ĉiu deka viro estis elektita en la vico kaj poste pafmortigita, ĝis ĉiuj remarŝis en la fabrikon kaj kiel puno ricevis malpli da salajro.“

„Kaj kiel vi do fuĝis el la koncentrejo de Jukatano?“
demandis Celso.

„Iutage ni mortbatis kvar policianojn, ili ĉiuj estis nur flavbekaj buboj kaj timmerduloj. Kiam ni jam mortbatis

ilin kiel mordemajn hundojn, ni forkuris kiel simioj. Tridek el ni. La aliaj *muchachos* tro timis kaj ne forkuris kun ni. El la tridek granda kvanto estis rekaptita, kelkajn el ili mortpafis la postrajdantaj *rurales*, kiuj persekutis nin. Aliaj dronis, kiam ni transnaĝis riveron. Sed ni, la triopo Juan Mendez, Lucio Ortiz kaj mi, ni estis sufiĉe prudentaj forlasi la ĉefan straton kaj iri sur propraj vojoj. Ni alvenis en Campeche, kaj tiam fine proksimiĝis al tiu regiono, el kiu vi devenas. Tie ni renkontis *don* Gabrielon, la *enganchador*-on, kiu aperis al ni kiel protektanĝelo kaj, kiu kunprenis nin en la monterion. Ĉi tie serĉas nin neniun.“

Celso subridis. „Tio estas bona ŝerco de vi, *compañero*. 'Ĉi tie serĉas vin neniun'. Certe ne! Ĉar, kiel vi intertempe ja certe jam rimarkis, vi ne eskapis. Vi revenis en la saman prizonon, ĝi nur ne nomiĝas koncentrejo de Jukatano, aŭ la mortovalo de Verakruco, sed monterio La Armonia. Aŭ ĉu vi ekkonis diferencon?“

„Jes“, diris Martin Trinidad, „mi ekkonis diferencon. Estas ĉi tie pli aĉe ol en Jukatano. Tie ni laboris bone kaj malbone. Ĝuste tiel, kiel ni povis, je la pezaj cilindraj

rulumoj kaj ĉe la surŝutado de la vojoj. Dura laboro, multe da batoj kaj aĉa manĝo. Sed ĉi tie ĉiu devas atingi siajn kvar toneladojn por si mem. Kaj la pendumadon ili ankoraŭ ne eltrovis en Jukatano. Krome oni zorgis ĉiam pri du aŭ tri dekoj el ni precipe bone, por prezenti ilin, kiam alvenas usonaj ĵurnalistoj, kiuj aŭdis antaŭe sovaĝajn onidirojn pri kruelecoj.“

„Kiu estas ĉiu el la du kunuloj, kiuj fuĝis kun vi?“
demandis Celso.

„Juan Mendez estis serĝento ĉe la infanterio en Merida. Nun li estas dizertulo.“

„Kial dizertulo?“

„Iu kapitano estis ebria kaj nokte revenis en la kazernon. Juan havis pli junan fraton en la sama kompanio, li servis dum la unua jaro. Li gardis en la stalo ĉe la muloj de la mitrala sekcio. La kapitano tute ne apartenis al la stalo. Sed tamen li envenis, ŝanceliĝadis kaj insultis. Jen li deglitis sur la malsekaj mulomerdaĵ buloj kaj falis sur ilin. Li alvokis la gardiston, la fraton de Juan, vangofrapis lin

kaj tiris lin al plenigita akvositelo. Tie li trempis la knabon tiom longe en la akvon, ĝis kiam la povra knabo estis morta. La kapitano estis vokita antaŭ milittribunalon. Ĉio, kio okazis al li, estis, ke li perdis monatsalajron kiel punon. Kiam li iris du tagojn poste preter stalpordo, saltis Juan Mendez al li kaj kriis: 'Vi murdis mian plej ŝatatan fraton.' Ĉar la tribunalo ne punis vin, punos vin mi, por ke ree estu justeco surtere.' Kaj antaŭ ol la kapitano povis defendi sin, Juan Mendez jam tratanĉis lian gorĝon. Lucio estis kaporalo, suboficiro, en la sama bataliono, kaj intima amiko de Juan Mendez. Ĉar ambaŭ kiel libervoluloj fariĝis membroj de la regimento kaj ambaŭ trairis ĉiam kune bonan kaj malbonan, Lucio ne lasis lin en la kaĉo, kiam Juan devis skui la polvon de la piedoj. Li diris, ke li tute same estus transmondiginta la kapitanon, se li estus havinta la okazon por tio, ke li tial fakte tiom kulpas kiom li, kaj, ke li iros kun li. Tial ili kune dizertis, tiel, kiel ili aliĝis kune la regimenton. Nedisigeble kiel *Kristo y la Cruz*. Ni renkontiĝis en Tabasko, kaj kiam ni trovis, ke ni havas la samajn ideojn, ni decidis, ke ni kune vojaĝu kaj atendu, kio okazos al ni.“

Tiumomente diris Celso: „Kial vi rakontas tion ĉion al mi? Kial tio koncernu min?“

„Tute simple. Ĝi koncernas vin tiel, kiel nin. Jen, kial mi rakontas ĉi tion al vi. Mi scias, ke vi havas la samajn pensojn kiel ni. Kaj mi pensas, ke ni jam ne tiom malproksimas de tio.“

„De kio malproksimas?“

„De la tago, kiam ni reordigos ĉion. Kiam ni foje komencos per tio, ke ni pendigos kaj ĉesos esti pendigitaj. Ne supozu, ke mi estis sola en Pachuca. Kaj tion, kio mankis al mi je konoj, tion mi lernis en Jukatano. Eĉ, kvankam oni neniam sciis, ĉu la najbaro metita dekstren aŭ maldekstren sur petaton apud vin estis sendita por orelumi vin kaj poste flustri la aŭditan al la *rurales*. Tie, kie oni metis tiom da miloj de homoj en koncentrejojn, en mortovalojn, en prizonojn, kaj ĉiujn pro la sama ideo, la lando jam flamiĝemas. Mi scias ankaŭ tute bone, kvankam ĉiuj gazetoj kontestas tion, ke en la nordo la lando jam ekflamiĝis kaj brulas kaj ke, la *Cañdillo*, la olda kaciko, kiu nomas sin savanto kaj protektanto de la nacio,

plenigis jam siajn pantalonojn pro timo ĝis la rando. Li eĉ ne plu kuraĝas iri sur strateton sen tio, ke kvindek specialaj korpogardistoj ĉirkaŭas lin. Kiu sciu? Eble jam nun, kiam ni parolas pri tio, la neanstaŭebla, kiel li nomiĝas, estas eksigita kaj rampis sub la liton. Ju pli kruela estas tirano, des pli li estas fi-mizera timleporulo, se li foje ricevis puŝon sur la nukon. Mi legis librojn, grandan amason da libroj, Celso. Fidu al mi. Kaj mi legis multe pri revolucioj kaj ribelo. Estas ĉiam la sama afero. Tiraneco daŭras dum certa tempo, ĉiam nur limigitan tempon, kaj se ĝi plej brutale kondutas, ĝi estas plej proksima al sia renversiĝo.“

„Domaĝe, Martin, ke mi ne povas legi“, diris Celso. „Mi povas ĝuste nur skribi mian nomon, kaj eĉ tiun sufiĉe malbone.“

„Eble mi povas helpi al vi, kaj al kelkaj aliaj *muchachos*, lerni legi kaj skribi.“

„Certe vi povus tion, kaj kiel volonte mi farus tion, tion mi ne povas diri al vi. Oni sentas sin tiel stulta en la mondo, se oni ne povas legi kaj skribi. Se ni havus nur tempon,

nur iomete da tempo, tiukaze ni povus fari multon kaj multon lerni, kio estas utila al ni kaj ĝojigus nin. Andreo, mia kamarado, *boyero*, bone povas legi kaj skribi, kaj li ofte diris al mi, ke en libroj estas troveblaj tiel mirinde belaj historioj, kiujn neniuj povus rakonti. Sed nur por tiu, kiu povas legi, vekiĝas la libroj kaj ekvivas; kaj por tiu, kiu ne povas legi, libroj estas nur kungluitaj paperfolioj. Andreo estas la *muchacho*, kiu instruis min, kiel skribi mian nomon. Sed Andreo plej ofte dormas en alia kampadejo por esti proksima al la bovoj. Kiam li revenas en ĉi tiun kampadejon, tiam estas malfrue kaj ni estas lacaj. Tempo estas tio, kio mankas al ni. Nur iom da tempo kaj malpli da dura streĉiga laboro. Por ke ni povu pensi foje ankaŭ pri ni mem kaj ne nur gapi al la tero antaŭ ni aŭ alikoken kiel bovoj, kiuj maĉas kaj maĉas kaj gapas kaj gapas kaj tiras kaj tiras, kvazaŭ ili ne scius, kion fari aldone, krom forpeli per la vosto la muŝojn de si. De tempo al tempo mi pensas, ke ni vivas pli aĉe ol bovoj. La bovoj eble ne scias tion pli bone, sed ni scias, ke ĉio povus esti pli bona, ĉar ni vidis vilaĝojn kaj urbojn kaj aliajn homojn, kiuj ne vivas tiel aĉe kaj ne estas tiel needukitaj kiel ni.“

„Mi volas diri al vi aferon ankoraŭ tute novan, Celso, aferon, kiun scias nur mi kaj neniu alia.“

Celso ree provis esplori la vizaĝtraĵojn de sia najbaro sidanta apud li en la rivero. Sed estis tro malhele. Li suĉis forte je sia cigaredo, kiu eklumis kaj prilumis mallonge la vizaĝon de Martin. Martin ĉirkaŭrigardis, ĉu eble iu alia viro esats tro proksime kaj eble eĉ povus aŭdi, kion li intencis diri.

Li ŝovis sin pli proksime al Celso: „Kion ili diris tie supre en la *oficina* pri la malbonŝanca akcidento de *don* Acacio, estas mensogita.“

„Kion vi volas diri per tio, ke ĝi estas mensogita?“

„La afero okazis alie. Ili nur ne volas, ke ni sciu la veron. Ili terure timas, ke ni povus imiti tion.“

„Kion imiti? Ekparolu do. Neniu aŭdas nin, kaj se jes, mi batas lin tiom sur la fi-buŝon, ke li dum tuta semajno ne plu povos malfermi ĝin.“

„Pascasio kaj Urbano fuĝis, tion vi scias. Sed kion vi ne

scias, tio estas, ke Pascasio, kiam li estis kaptota, La Mecha-n mortbatis per ŝtono, kaj ke El Faldon poste pafmortigis lin, ĉar Pacasio kun revolvero atakis lin. Urbano rakontis tion ĉion al la edzino de la kuiristo, kiam li sidis tie kaj devis atendi, por ke *don* Acacio povu skurĝi lin. Kaj kion tiam Urbano faris, kiam *don* Acacio malsupreniris, tion vidis mi kaj neniu krome. Kiam *don* Acacio ne memgardis, Urbano saltis al li, fermŝnuris lin al la arbo tie transe kaj elpikis liajn okulojn, per dorno.“

„Ĉu vere? Ĉu tio estas certa?“

„Mi vidis tion de ĉi tie supre, kiam mi alvenis por ŝanĝi mian hakilon en la *bodega*. Kaj post kiam tio okazis, ligis Urbano grandan ŝtonon al sia pantalono kaj iris en la riveron, kie li tuj dronis. Tion ili supre ne scias. Ili pensas, ke li fuĝis denove. Kaj duopo persekutas lin. *Don* Acacio kvazaŭ freneziĝis, ĉar li ne plu havis okulojn, kaj tial poste sin mem pafmortigis.“

„Ĉu vi vidis tion?“

„Ne, sed Epifanio, la knabo, kiu servas en la *oficina* kaj en

la bangaloj. Li vidis tion, tra fendo, ne kiel *don* Acacio pafmortigis sin, sed tuj, kiam li aŭdis la pafon, li kuris tien, al la fendo kaj vidis, kiel *don* Acacio kaŭris antaŭ la lito kun la revolvero en mano. Poste ili malfermrompis la pordon, ĉar li riglis la pordon per trabo.“

Celso fajfis kelkajn fojojn. Poste li diris: „Ha, Martin Trinidad, tio estas gajiga, tio plaĉas mi.“

„Tio ankoraŭ ne estas ĉio, kion mi scias.“ Martin ŝoviĝis ankoraŭ pli proksime al li kaj parolis nun tute mallaŭte plu. „Tiu tie supre pensas, ke Urbano forprenis la revolveron kaj la zonon kun la kartoĉoj de *don* Acacio, kaj ke li fuĝis. Tiel tio ne estas. Urbano ja certe eltiris la revolveron kaj ĵetis ĝin flanken. Sed li lasis kuŝi la revolveron, ĉar li ŝajne ne sciis, kiel uzi ĝin. Li estis tro stulta. Kiam Urbano jam iris en la riveron, mi kuris fulmrapide malsupren, levis la revolveron kaj dekroĉis la kartoĉozonon de *don* Acacio, kiu ja ne plu povis vidi.

„Vi havas la revolveron kaj la kartoĉojn, ĉu?“ Celso demandis mallaŭte, sed ekscitite kaj raŭke.

„Jes, mi havas la revolveron kaj la kartoĉojn. Mi ĉion enfosis en la sablon. Imagu, Celso, per tiu ĉi revolvero povos ni, vi, mi, Juan Mendez kaj Lucio Ortiz, fari multon.“

„Ĉu ili ambaŭ scias, ke vi havas la revolveron?“

„Neniun vorton. Vi estas la ununura al kiu mi diris tion. Ni povus nun tute bone eskapi.“

„Tion ni povus tute bone. Sed mi pensis centfoje pri tio. Helpus al mi nenion, se mi forkurus. Ĝi ankaŭ al vi ne helpus. Ni ĉiuj devos forkuri, ĉiuj je la sama tago, kaj ĉiuj ni devos ĵuri, ke ni neniam permesos repeli nin kaj preferu mortos ol denove veni ĉi tien. Plej bone estus, ĉiujn ĉi tie, kiuj ne estas *muchachos*, mortbati. Se ni lasos vivi ilin, ŝanĝiĝos nenio. Jen ĉio restos tiel, kiel antaŭe, kaj iutage ili nin ĉiujn havos ree en la kaptilo. Nur unu kaj ĝusta afero helpas. Unuopulo povas ŝanĝi nenion kaj fari nenion. Ni ĉiuj devas fari tion, kaj samtempe, aŭ tute ne. Mi centfoje povis forkuri, sola, aŭ kun Andreo aŭ Santiago kaj Fidel kaj Matiaso, kun ĉiuj ĉi ĝustaj *muchachos*. Sed ni ĉiam denove kaj denove diris al ni, ke

ni devos neniigi ĉiujn monteriojn, ĉion detrui, ĉion ĝistere bruligi, mortbati ĉiujn *patrones* kaj *capataces*, alikaze tio ne havos sencon. Se ni solaj irus, tiukaze ni estus poste nur malĝojaj, ke ni ĉiujn tiujn *muchachos*, la malfortajn kaj la malgrandajn kaj la stultajn, ĉi tie postlasis en ilia mizero. Ni estas la fortaj, vi kaj mi kaj Andreo kaj via Juan kaj via Lucio. Ni devas helpi al la aliaj, kiuj ne estas tiom fortaj. Kun la helpo de la malfortaj kaj timemaj kaj pro timo dentklakantaj kaj obeemaj la patronoj povus restariĝi, kaj se ili estos restariĝintaj, ili tiam ankaŭ denove povos regi nin, kaj pli terure ol antaŭe. Nin, kiuj ni supozis nin tiom fortaj.“

„Vi estas multe pli saĝa ol mi supozis antaŭe, Celso.“

„Ne pensu, ke mi elpensis ĉion ĉi sole. Mi estas forta, sed la elpensado por mi estas peno. Tion ni ĉiuj kune elpensis, Andreo, Pedro, Santiago kaj ĉiuj, kiuj vidis pli de la mondo ol nur sian vilaĝon kaj nur la bienon, kie ili naskiĝis. Kaj nun ankoraŭ vi aldoniĝas, lerneja instruisto kaj du soldatoj, kiuj same tiel pensas kiel ni. Vi al ni vere mankis. Vi devas nun pensi pri tio, kiel ni komencu tion kaj kiam. Domaĝe, ke Urbano sin dronigis. Damnite, tiu

estis vera ribelulo, tia, kia ni bezonas ilin. Tio ĝis nun
neniu kuraĝis, ŝtelire proksimiĝi al patrono kaj elpiki ties
okulojn. Mi ne scias, ĉu mi ekkuraĝus tion. Sed eble
tamen. Dependas de tio, ĉu vi precize atingis la punkton,
kiam vi diras al vi, tio estis ĉio, kion mi ankoraŭ iel povis
elteni ĝis nun, sed nun fariĝis jam unu bato tro, kaj tial mi
nun ekatakos, tute indifere, kiom kostos al mi, nur por
fine fari finon al tio.“

Martin Trinidad maĉadis la restaĵeton de sia cigaredo, elkraĉis ĝin kaj leviĝis ĝemante el la akvo.

Celso trempis sian kapon profunde en la akvon, gargaris brue, sputadis ĉiudirekte, viŝis la gutantan akvon el la longa hararo kaj el la vizaĝo, li ekstaris, rektiĝis, etendis la brakojn longe antaŭen, refaligis ilin, dum certa tempo ankoraŭ tretadis kaj baraktiĝis en la akvo. Poste li iris renkonte al la sabla bordo. „Mi sentas min kvazaŭ spongo de la longa sidado en la akvo. Sed mi certas, ke eĉ ne unu iksodo plu vivas, ĉiuj pikvundoj de moskitoj fridetiĝis, kaj tio, kio ankoraŭ postrestis de la lasta pendumado en formo de ŝvelintaj strioj, ree kunkreskis.“

Kiam ambaŭ surgrimpis la bordan deklivon, diris Martin Trinidad mallaŭte: „Vi kompreneble diru nenion pri tio, kion mi rakontis al vi, Celso, eĉ ne al Andreo. Al Juan kaj Lucio mi ne parolis pri tio. Nur vi scias tion. Ĉiuj *muchachos* ĉirkaŭ ni supozu, ke ni estas stratvagabondoj aŭ punkaptitoj, aŭ kion ajn ili eble krome pensas pri ni. Mi volis nur atingi, ke vi sciu, pri kio temas en nia kazo,

kaj, ke ni pensas kaj celas tute la saman, kion vi pensas kaj celas. Iru vi plu vian vojon kaj ni nian, kaj publike ni ne konas nin. Kaj se la danco ekos, vi scias, ke mi protektos vian dorsan flankon, se vi staros en la fronto, kaj ke mi prenos la fronton, se vi protektos la dorsoflankon. Kaj, se nia triopo, Juan, Lucio kaj mi kondutos tiel, kvazaŭ ni starus flanke de la *patrones*, jen sciu, ke mi protektas la dorsflankon kaj starigos la kaptilon. Eble tio daŭros du monatojn, eble eĉ ses da ili. Sed mi scias, ke tio ne daŭros tutan jaron. Ekstere en la lando ardetas, kaj en ĉiuj anguloj lekas jam la unuaj flamoj alten. Tio estis la plej grava, kion mi volis diri al vi. La militkrio nomiĝas: „*Tierra y Libertad!*“ Teron kaj liberon! Kaj krome: „*Abajo la dictadura!*“ For la diktaturon!“

„Ne tiel laŭte, frateto“, diris Celso mallaŭte. „Ne tiel laŭte jam nun. Ankoraŭ ne. Sed, se ni iam krios el plena brusto '*Libertad*', tiam manku eĉ ne unu viro al ni!“

Kaj same tiel, rapide respondis Martin Trinidad: „Ni bezonas nek flagojn nek standardojn. Kion ni bezonas, estas nur medolo en la ostoj. „*Tierra y Libertad!*“

„*Tierra y Libertad!*“ respondis Celso kiel Bonan-nokton-saluton.

Ĉapitro 10

01

Estis je la sekva vespero, kiam *don* Feliks venis al la kabano, kie manĝis la homoj. La kabano konsistis nur el palmtegmento starigita sur trunkoj. Vandojn tiu manĝosalono ne havis. Se forte pluvis kaj la homoj sidis sub la tegmento kaj manĝis, ili devis sidi unu apud la alia, por ke ili ne fariĝu malsekaj, se la pluvo de la flankoj vipis internen. Tablojn kaj benkojn la manĝejo ne havis. Ĉiuj laboristoj kaŭris surtere kaj starigis siajn kafokruĉetojn kaj manĝopelvojn inter siajn krucitajn gambojn. Ke la indiĝenaj laboristoj pli bone sidus sur benkoj kaj ĉe tabloj, pri tio la mastroj, la *patrones*, ne cerbumis kaj ne disipis sian tempon pro tio. Se gazetisto pro malbonŝanco iel retroviĝus tie, kio kompreneble en mil jaroj ne okazas eĉ unufoje, kaj se li vidus tiun manĝosalonon, en kiu manĝis la indiĝenoj, kiuj liveras la tutan belan mahagonlignon, kiu en la salonoj kaj en la konferencejoj de la bankoj faras tian bonan impreson, kaj se la gazetisto mirus pri tio, ke tia mirinda mahagonligno povus havi rilaton al la mizero de la viroj, *don* Severo dirus tion, kion

ĉiuj aliaj *caoba*-produktantoj diris jam antaŭ li: 'Tiuj, ĉu? La pedikohavaj indiĝenoj, ĉu? Tiuj kotaj porkoj, kiuj tiom stinkas? Tiuj volas havi tion tiel, ili kutimiĝis pri tio manĝi sur la nuda tero kiel porkoj. Ili tute ne povus sidi sur benko aŭ antaŭ ĝusta tablo. Ili rampus sub la tablon por povi vori sian manĝaĉon. Tiel, kiel ili ankaŭ ne povas manĝi per tranĉilo, forko aŭ kulero. Se ili ne havus fingrojn, ili lekus sian manĝaĉon de la tero kiel hundoj.'

La *patrones* dirus tion per la sama paroltono kaj la sama konvinko, kiel faras la grandaj fabrikestroj en la civilizitaj landoj, se la kotŝmiritaj laboristoj ĉiutage impertinente postulegas purajn lav- kaj baninstalaĵojn en la fabriko, kaj eĉ kun varmega kaj frida akvo. 'Baninstalaĵoj ne necesas por laboristoj, kiuj produktas luksajn aŭtomobilojn. Por kio baninstalaĵo kun varmega kaj frida akvo, se oni volas produkti motorojn? Akvo kaputigas la elegante elboritajn cilindrojn de centĉevalpova motoro. Sekve ĉiu baninstalaĵo estas aĉa kaj tial do ankaŭ la pedikohavaj indiĝenoj ne bezonas benkojn kaj tablojn en la manĝosalono; kaj murojn la manĝejo tute ne bezonas, ĉar la aerfluo estas pli bona, se muroj ne limigas ĝin.'

Don Feliks paŝis sub la tegmenton, li ĉirkaŭrigardis inter la viroj kaj diris fine: „Vi, Candido, kaj vi Tomaso, kaj vi, Castulo, kaj vi kaj vi“ – ĉe tio li faris gestojn al pluraj viroj – „vi leviĝu, tuj nun, kaj ektransiru al la alia flanko de la rivero, kie vi komencos labori du laŭfluaĵajn mejlojn for de ĉi tie en la nova regiono. Rapidege manĝu, kaj poste prenu viajn pakojn! La kanugvidistoj pro vi ne sendormu dum la tuta nokto.“

La alvokitaj *muchachos* haste glutis sian manĝon kaj troitis al la dormkabanoj por ordigi siajn pakojn kaj prepari sin por la transveturo.

Candido sendis siajn du knabojn por ke ili serĉu la porkojn, kiuj tie en la kampadejo libere vagadis kaj sian manĝon mem devis serĉi. *Don* Feliks jam kelkajn fojojn menciis, ke li buĉigos la porkojn pecon post peco por si mem, ĉar ili grasigis sin sur lia tereno kaj tial estas lia propraĵo.

Modesta helpis al sia frato kunŝnuri la pakojn.

Don Feliks iris leĝere al la kabano, kie Candido kaj

Modesta troviĝis.

„He, *muchacha*!“ li vokis al la ino, „kial vi ne restas ĉi tie en la kampadejo? Vi povas labori ĉe mi en la domo. Transe en la nova kampadejo ĉie estas nur sovaĝejo. Jaguaroj kaj grandaj serpentoj. Eĉ ne unu kabano estas jam konstruita. Hodiaŭ kaj morgaŭ vi devus dormi sub libera aero aŭ almenaŭ nun, ankoraŭ en tiu ĉi nokto konstrui tegmentojn, ĉar certe ree pluvegos. Restadu prefere ĉi tie, knabino.“

„*Muchas gracias, Patroncito*“, respondis ĝentile Modesta, „*yo prefiero quedar con mi hermanito*, mi prefere volas resti ĉe mia *hermanito*, ĉe mia frato. Multan dankon.“

„Laŭ via plaĉo, *muchacha*. Mi nur volis oferti al vi pli bonan. Se vi morgaŭ ŝanĝos vian opinion, venu trankvile al mi. Sed longan tempon mi ne atendos.“ *Don Feliks* reiris al la bangalo. Kiam li preteriris la kuiriston, li diris fihumore: „Se oni ofertas al tiuj kotporkulaĉoj pli bonan, ili ne volas havi ĝin kaj preferas vivi en sia feko. Ili ne kutimiĝis al pli bona.“

„*Es cierto*“, konformis la kuiristo, „tiel estas.“ Li lernis, ke oni vivas plej facile en la mondo, se oni tiun, kiu havas la potencon, konsentas pri ĉio ajn. Tiukaze oni neniam povas erari, kaj oni ĉiam havas sian manĝon. Oni ankaŭ neniam pendigis aŭ skurĝis lin, nur ĉeokaze *don* Feliks suke vangofrapis lin. Sed tion li akceptis kvazaŭ kiel amikecan geston.

Celso de sia laboro venis al la manĝejo. Li ĉirkaŭrigardis. Ne trovinte Candidon, li iris en ties dormkabanon.

„Do, la patrono sendis vin sur la alian flankon?“

„Jes“, lace respondis Candido. „Sed kion fari kontraŭ tio?“

„Estas damne sovaĝe tie transe. Ĉio estas ankoraŭ nova. Neniu loko estas senarbustigita. Vi devos kuŝi dum la unua nokto en la vepro. Zorgeme tiru la moskitajn retojn super vin. Atendu, Modesta, mi kunŝnuros tion.“

Ambaŭ knaboj alpelis la porkojn, kiuj terure kvikis, ĉar ili pensis, ke venis ilia lasta horo, por liveri ŝunkojn kaj rostitajn dikajn haŭtojn.

„Mi helpas al vi transen“, diris Celso.

„Fariĝos tre malfrue por vi“, respondis Candido. Sed li tamen ĝojis, ke li ricevos tiun helpon.

„Eble post la transflosigado ankaŭ mi venos en la novan kampadejon“, opiniis Celso.

„Ĉu vi volonte vidus tion, se mi ree estus en la sama kampadejo kun vi? Estis ja tiel agrable ĉi tie, kiam ni vidis nin preskaŭ ĉiutage.“

„Kompreneble estus bone, se ni estus en la sama kampadejo.“ Candido nun sian fratinon demandis: „Vi certe pensas la saman, *hermanita*, ĉu?“

Modesta diris nenion.

Tiam Celso ekkuraĝis elkore: „Ja ankaŭ vi certe ŝatus tion, se ankaŭ mi estus transe, ĉu?“

„Jes. Tre volonte“, ŝi diris koncize kaj kliniĝis profunde al la pako, en kiun ŝi tiel zorgeme kunmetis sian katunrobon, kiun ŝi ŝovis en tiu momento profunde sub aliajn aĵojn por konservi ĝin seka, se pluvos dum la transveturo.

„Tion mi volis aŭdi, Modesta“, diris Celso kaj ridis.

La unua ŝarĝo de homoj jam atingis la alian bordon. Kaj la du kanuoj kun la viroj, kiuj gvidis ilin, revenis. Laŭ la fluo tio iris rapide, sed movi la kanuojn kontraŭ la fluo daŭris longan tempon, ĉar la rivero pli kaj pli ŝvelis kaj fluis diable rapide kaj forte.

La kanuoj, aŭ kiel la *muchachos* nomis ilin, la *cayucos*, estis longaj kavigitaj trunkoj, sed ne pli. Nur la *cayuquero*, la kanua gvidisto staris sur ĝi, dum ĉiuj aliaj, kiuj troviĝis en la kanuo, kaŭris sur la planko de la trunko. La kanuo je la flankoj ŝanceliĝis sufiĉe nesezure, ĉar la formo de la trunko ne estis ŝanĝita. La kanuisto devis esti tre lerta kaj sperta viro, por konduki tian kanuon trans rapide fluantan kaj ŝvelintan riveregon, sen turniĝi ĉirkaŭ si mem kaj ĉion, kio enestas, ĵeti en la akvon.

Candido, Modesta, ambaŭ knaboj kaj Celso atendis ĉe la bordo la revenon de la kanuo, kun kiu ili transriveriĝu. La pakoj kuŝis apud ili, kaj la knaboj retenis la porkojn helpe de lazoj.

La bestoj fariĝis jam sufiĉe grandaj, tiom grandaj, ke ne eblis plu al Candido eĉ nur du el ili porti sur la dorso. Kion fari kun la bestoj, ne estis tute klare al Candido. Ili fariĝis kvazaŭ amikoj de li, ĉar ili ligis lin laŭ tre surtera maniero kun lia eta korto, por kiu ili origine estis aĉetitaj.

Antaŭ ne longe li parolis pri tio kun la kuiristo, kiu volis aĉeti la porkojn por bona prezo. La kuiristo diris al li, ke li povus pagi por la mono, kiun li ricevus por la porkoj, sian tutan ŝuldokonton, kaj, ke tiam estos permesate al li libere foriri laŭplaĉe. Sed de alia *muchacho* Candido aŭdis, ke tiel rapide, kiel li imagas tion, li ne povos liberigi sin, eĉ tiukaze, se li ne plu havos ŝuldojn sur sia konto, ĉar la kontrakto temas ne nur pri la ŝuldokonto, sed ankaŭ pri fiksita tempo, kaj, ke tial ne nur forlaborendas la ŝuldokonto, sed ankaŭ la fiksita tempo. Kompreneble, en tia kazo, post finiĝo de la kontrakttempo, li povus teni kontante surmane konsiderindan sumeton. Eble. Sed por la unua li eĉ ne pensis pri tio adiaŭi siajn porkojn. Li timis nur, ke *don* Feliks simple ordonos buĉi ilin kaj donos tiam al li nur kelkajn ridindajn pesojn, kiujn li povus minusi de la

ŝuldokonto.

Candido kaj ankaŭ Celso, ambaŭ, ekbruligis siajn laborlanternojn por povi montri al la revenanta *cayuquero* la lokon ĉenorde, kie li albordiĝu.

La lanternoj tre fulgis kaj nur lumetis. Estis plenluno. Sed ĝi ne videblis tra la dikaj nuboj. Nun eĉ pluvetis striope. Apenaŭ du paŝojn antaŭen la atendantoj kapablis rigardi.

La unua *cayuquero* subite aperis kun sia ŝanceliĝema arbo kvazaŭ kiel fantomo.

Candido sursaltis kaj vokis Celson kaj la knabojn, ke ili ĵetu la pakojn al li.

Sed jen diris la *cayuquero*: „Vi ne eniru en tiun ĉi kanuon, vin veturigos Felipe, kiu tuj alvenos. Li estas proksime malantaŭ mi. Li ja sufiĉe drinkis kaj tial li staras iom oblikve sur siaj piedoj, sed li transveturus la kanuon ankoraŭ en dormo kaj kun du kovritaj okuloj. Multe pli bone ol mi. Mi devas veturigi tuj du aliajn *muchachos* kaj ankoraŭ devos ŝarĝi mian kanuon ĝis renversiĝo per hakiloj, damnita jungilaro, ŝlifŝtonoj kaj

mi ne scias, kion El Faldon ankoraŭ surŝarĝos aldone al mi. Ankaŭ El Faldon krome sursidiĝos en la kanuo. *Ola*, jen Felipe ja jam alvenas kiel fulmo, kiel Satano post pastoro.“

Rimarkoj

cayucos = kanuoj

cayuqero = kanuisto

Ola = interjekcio de entuziasmo

Felipe estis multe pli ebria ol Celso supozis laŭ la parolado de la unua *cayuquero*. Felipe ŝanceliĝadis en la kanuo, jen dekstren jen maldekstren, kaj eĉ tiam li ne povis teni ĝin trankvila, kiam la beko jam boriĝis en la sablon.

„*Por Dios!*“ li vokis. „Kia diodamnita vetero! Supre malseke kaj malsupre malseke kaj neniuj fadeno seka.“ Li havis ĉe si knabeton, kies tasko estis, ĉe la albordiĝo salti el la kanuo kaj tiri ĝin sur la sablon. „Kuru supren kaj alportu la botelon“, li vokis al li. „Mi devas enverŝi gluton aŭ mi frostmortos.“

„Ĉu vi eble eĉ volas transveturigi nin, tia ebria, kia vi estas?“ demandis Celso. „Vi ja eĉ ne povas stari sur viaj piedoj.“

„Kiu estas ebria? Ĉu vi, kota chamulano, vere volas diri al sperta *cayuquero*, ke li estas ebria? Ebria, ĉu mi? Kiu veturigas ĉi tie kanuojn, ĉu vi aŭ mi?“

„Vi“, diris Celso.

„Prave. Tenu do fermita vian buŝaĉon. Ĉu vi nun emas surkanuiĝi aŭ ne?“

Candido pene ekkuraĝis. Li diris al Celso: „Atendu do, mi iros al la patrono kaj demandos lin, ĉu povos veturigi nin alia kanuisto.“

„Vi veturos kun la *cayuquo*, kiun mi asignis al vi“, kvazaŭ albojis *don* Feliks Candidon, kiam tiu staris humile en la pordo de la bangalo, post kiam li klarigis, ke Felipe estas tiel ebria, ke li apenaŭ povas plu stari sen renversiĝo. „Kiu ordonas ĉi tie, chamulano?“

„*Usted, Patroncito!*“

„Nu, ne timleporu, egale kiom ajn ebria Felipe estas, li estas tamen la plej bona *cayuquero*, kiun ni havas ĉi tie. La alia, Pablo, ne drinkas tiom multe, sed li konas la riveron ne je duono tiel bone kiel Felipe.“

„*Patroncito*, kun via permeso, ĉu ni povos transveturi morgaŭ matene?“ Candido ankoraŭfoje provis eviti la

veturon kun Felipe.

„Tio ne eblas. Tiukaze ni perdus dekdu horojn da laboro. Vi estos veturigataj nun kaj fino! Pablo devas veturigi la jungilarojn kaj hakilojn de la aliaj *muchachos*. Ja kial vi trenadas tutan vilaĝon kun vi? Ĝuste pri tio ja temas, kial mi bezonas nur por vi tutan kanuon. Ek do! Foriĝu! Mi alvenos morgaŭ matene transen. Nu, venu al mi, jen, trinku grandan gluton.“

Candido prenis la glason kaj enverŝis la enhavon per unu movo. Ĝi bonfartigis lian stomakon.

Li diris: „*Gracias!*“ Poste: „*Con su permiso!*“ kaj foriris.

„Mi provis tute vane, Celso“, li diris, kiam li alvenis ĉe la bordo.

„Tion mi sciis antaŭe. Estas jam ĉio en la *cayuquo*. Sidiĝu malantaŭe. Ĉio naĝas ĉi tie en la kanuo. La knaboj elĉerpis la akvon, sed kiel ĝi fariĝu seka, se seninterrompe pluvas?“ Celso stivis la tutan pakaron en la *cayuquo*. Modesta sidis en la mezo, la knaboj proksime de ŝi. Ili firmtenis la porkojn per lazoj. Modesta portis la pakon,

kiu entenis ŝian robon kaj kelkajn aliajn vestaĵojn, sur la sino.

Candido eniris, li grimpis trans la pakojn kaj porkojn kaj kaŭriĝis malantaŭe sur la planko de la trunko. Li tenis sian lanternon alte. Proksime ĉe liaj piedoj staris Felipe, kiu tenis la longan rudrostangon en la mano. Li estis fihumura kaj unuavice, ĉar la knabo falis kun la botelo kaj elverŝis kvaronon de la enhavo, kaj tial, ĉar la surŝarĝado daŭris tro longe. Estis la lasta veturo, kiun li havis tiutage, kaj li volis fini ĝin rapide. Ĉe ĉiu pako, kiun Celso surŝarĝis kaj ĉe ĉiu porko, kiu surkanuiĝis, li kriaĉis, ke li ne estas *cayuquero* por veturigi porkojn kaj kia mastrumado tio estas entute, ke viro ĉi tie kuntrenas sian tutan familion, porkojn, bovinojn, kokinojn, idojn kaj inojn, kaj ĉu ĝi ne estas sufiĉe da hontego, ke li venas sola kaj lasas sian familion hejme en paco.

Celso donis al la kanuknabo sian lanternon. „Ensaltu, knabo, mi depuŝos la kanuon. Por vi ĝi estus tro peza kun la ŝarĝo.“

Celso apogis sin per siaj ŝultroj al la kanuo kaj ŝovis ĝin

tiel, ke ĝi glitis sur la malseka sablo en la akvon.

Felipe volvis brakon ĉirkaŭ la longan stangon, eksidigis ĝin sur la grundo kaj dum Celso saltis en la kanuon, la primitiva veturilo rapidiĝis kaj malaperis en la gargaranta malhelo.

Felipe faris du pluajn fortajn puŝojn, kaj la kanuo estis kaptita de la meza torento kaj ekpafiĝis en la akvokirladon. Sed Felipe retenis ĝin lerte, antaŭ ol ĝi ekkirladis, kaj Candido kaj Celso pensis, ke ili certe sufiĉe ridinde kondukis, kiam ili tiom timis la akvon.

La kanuo moviĝis tre rapide antaŭen. Felipe devis nur tie kaj tie iom piki la stangon en la grundon por teni la veturilon en la mezo de la fluo, kie ĝi moviĝis plej rapide. Li volis fini la veturon tiel rapide kiel la fluo ĝin ankoraŭ permesas iel. Se estis tia fluo en la rivero, kiel en tiuj tagoj, evitis la kanuistoj restadi en la mezo de la fluo, ĉar tio estus tro danĝera. Se kanuisto perdus eĉ nur dum sekundo la kontrolon pri sia kanuo, ĝi estus ĵetata tien kaj tien, la fluo trafus ĝin je la larĝa flanko kaj ĝi ruliĝus kiel trunko ĉirkaŭ si mem, tuj dekfoje. Ĉio, kio enestus, falus en la akvon, homoj kaj la pakaĵoj. Por eviti tian renversiĝon, la *cayuqueros* restadis proksime de la bordoj kaj gvidis la veturilon tiel, ke ĝi ĉiam restis en la trankvilaj kaj mallrapidaj flankaj fluoj. Jen tiu trankvila bordofluo estis jen ĉe la maldekstra bordo jen ĉe la dekstra flanko, ĉiam laŭ la kurbiĝoj de la rivera vojo. Estis nun la tasko de la kanugvidistoj veturigi la kanuon sekure de unu bordoflanko al la alia, por ĉiam povi sekvi al la plej trankvila fluo. La transveturado de la rivero postulis ne nur grandan lertecon, trankvilon kaj sperton de la

cayuquero, sed des pli tre bonajn sciojn pri la rivero, ties fluoj en ĉiu jarsezono, ties akvokirloj kaj verticoj, malaltaj benkoj kaj rulŝtonoj. La *cayuqueros* komencis sian karieron kiel knabetoj, kiujn la sperta *cayuquero* kunprenis kiel helpantojn kaj kiujn li instruadis dum tio.

Kvankam la veturigado de la kanuoj estis jam en hela taglumo sufiĉe malfacila, ĝi fariĝis en la nokto kompreneble eĉ multe pli komplika. Sed la maljunaj kanuistoj konis la riveron tiel bone, ke ili, per palpado de la longa gvidista stango sur la grundo ĉiam sciis, sur kiu loko de la rivero ili troviĝas. Kaj estis ĝuste, ke tiaj spertaj kanuistoj, eĉ tiukaze, se ili estis ebriaj, lerte sciis gvidi sian veturilon. Kompreneble ebrieco ne estas laŭnatura stato de homo, ĉe kiu oni neniam povas antaŭdiri kun certeco, kion tia homo faros en subita kaj neatendita okazaĵo.

Felipe, pro sia nebuleca stato, sentis sin nekredeble kuraĝa. Krome li estis mestizo kaj rigardis de tre supere malsupren al la nesciantaj indiĝenoj, kiuj malmulte estis indaj je lia estimo. Kvankam li estis pli bruna ol Candido kaj lia hararo same tiel nigris kaj dratsimilis kiel tiu de

Celso, li rigardis sin tamen en ĉiu rilato almenaŭ samranga al la ladinos. Oni ne tradraŝis lin, kaj kiel tre lerta *cayuquero* kaj kiel konstruinto kaj posedanto de du kanuoj, li validis kiel memstara metiisto en la monterio, kun la rajto ebriiĝi, kiam plaĉas al li, kaj kiam li havas monon por tio. La timema plendado de Candido, kiu timis la akvon, kaj kiu eĉ kuraĝis peti *don* Felikson, ke li sendu lin nur matene en la novan kampadejon kaj ne jam en la nigra nokto, faris la kanuiston Felipe nur des pli kuraĝa kaj des pli entreprenema. Li volis foje montri al tiuj kotaj kaj pedikohavaj chamulanoj, kion kapablas vera *cayuquero* kaj kun kia rapidego li scias gvidi kanuon eĉ en la nokto kaj sur ŝvelanta rivero. Tiuj pedikohavaj chamulanoj foje ekhavu vere respekton pro la kapabloj de Felipe.

Kaj tial li puŝis la kanuon mezen de la plej forta fluo tiel, ke ĝi avancis antaŭen kiel motorboato en konkuro. La kutima veturo daŭras ĉirkaŭ duonon de horo, sed li intencis prui, ke la veturo fareblas dum dek minutoj.

Sed la kanuo estis multe tro rapida por povi teni la pruan per la peza stango en la laŭlonga fluo. La fulmrapida

veturo daŭris nur tri aŭ kvar minutojn, kiam la pruo kunpuŝante kun rulŝtonaro subite turniĝis flanken. Proksime je la flanko de la malalta rulŝtonaro la fluo fariĝis, malvastigite de la katarakto, duoble tiom forta ol antaŭ la rulŝtonaro. Kaj tiel, dum la kanufinaĵo ankoraŭ treniĝis trans la rulŝtonaron, puŝis la forta katarakto, kiu rande de la rulŝtonaro antaŭenĵetiĝis per duobla forto, la pruo pli rapide flanken ol la malalta benko permesis sekvi la kanuan finon.

Per eksterordinare lerta movo de la stango Felipe kapablis levi la kanufinon de la rulŝtona benko. Sed li faris tion, sekve de sia ebrio, kiu obtuzigis lian juĝforton, kun pli da forto ol necesis. Tial la kanufino rapidis je duono pli maldekstren ol estis bone, por movi ĝin en la sama direkto, kiun la pruo, kaptita de la fluo, jam celis.

Felipe antaŭvidis tion, kio do neeviteble sekvos. Tuj li ĵetis la stangon baborden, por ree devigi la kanufinon en la fludirekton. Sed li atingis la grundon kvaronon de sekundo tro malfrue. La fino ne sufiĉe frutempe ŝanĝis la situon, la forte falanta fluo batis alte kontraŭ la larĝan flankon de la kanuo kaj plenigis la veturilon ĝis la rando

per akvo. Felipe, kiu ne staris firme sur siaj piedoj, ŝanceliĝis kaj falis en la akvon. Malbonŝance la kirlanta kanuo tiam ankoraŭ aldone puŝiĝis je giganta praarbara arbo, kiu zigzage petoladis en la rivero, kaj tial la kanuo ruliĝis kiel kuglo.

Nur Felipe kapablis naĝi. Sed li pensis nur pri si mem. Li kriis: „*Al la orilla!* Al la bordo!“

Candido, Celso, Modesta, la knaboj kaj la porkoj, ĉiuj kriis, kaj ĉiuj baraktis en la akvo. La tenebro ne lasis ekkoni, kie estas la bordo. Sed kaj Candido kaj ankaŭ Celso, rimarkis, kiam iliaj lanternoj ankoraŭ fulgis, ke ili estis pli proksime al la dekstra flanko de la rivero ol al la maldekstra. Kaj ili ankaŭ bone observis, kiom profunde la stango pikiĝis en la riveron kaj tiel konstatis, ke sur la dekstra flanko troviĝis sablobenroj kaj malalta rulŝtonaro, kiu certe etendiĝis ĝis la bordo.

Kiam Candido tenis sian buŝon sufiĉe alte super la akvo, li vokis siajn knabojn. La pli malgranda respondis apud li, kaj Candido povis kapti lin ĉe la ĉemizo.

Celso vokis Modestan kaj Candidon. Li haste kaptis Modestan je ŝia jupo kaj tiris ŝin post si, vokante Candidon: „*Al la derecha!* Al la la dekstra bordo!“

La regiono, de kie Candido kaj Celso devenis, ofertis ne multe da okazoj por lerni naĝi. Ekzistis tie nek lagoj nek profundaj riveroj. Sed la indiĝenoj, se ili falas en profundan akvon, plaŭdigas sin el la akvo kiel faras tion la hundoj, de kiuj ili lernis tiun specon de naĝado per observado. Indiĝeno ne havas ŝuojn kaj la minca kaj la trivita katunpantalono kaj la same trivita ĉemizo neniel malhelpas lin je tio teni sin sur la akvo kaj tie bone-malbone moviĝi kvazaŭ padele.

Ili atingis la bordon, sed kompreneble ĉiu je alia loko. Per laŭta vokado ili kuntroviĝis. Ankaŭ Felipe fine alvenis. Ĉar li nun sobriĝis, li ne komprenis, kiel tio povis okazi.

„Ĉe Sankta Virgulino“, li vokis ĉiam denove, „tio ne okazis al mi en mia tuta ĝisnuna vivo. Mi ja jen kaj jen renversis diodamnitan kanuon, sed tio okazis en la longe etenditaj sovaĝaj akvoj, neniam ĉi tie. Tion certe kaŝe kaŭzis la diablo. Aŭ unu el vi chamulanoj fi-sorĉis tion al mi.“

Ili nun ĉiuj kolektiĝis. Eĉ la kvar porkoj ĉeestis, ĉiuj ankoraŭ postrenante la lazojn ĉe malantaŭaj kruroj. Ankaŭ la hundeto, kiu sekvis Candidon de lia vilaĝo, bojetadis kaj skuadis plezurigite la akvon el la pelto.

Kompreneble, ĉiuj pakoj estis perditaj.

Modesta, elvringante sian lanjupon, subite ĉirkaŭrigardis kaj demandis: „Celso, ĉu vi havas Angeliton ĉe vi? Nian etan anĝelon?“

„No, mi ne havas lin ĉi tie. Ĉu li ne estas ĉe vi, Candido?“

Candido respondis ekscitite: „Mi supozis, ke li estas ĉe vi, Modesta, aŭ kun Celso.“

Tuj ili ĉiuj komencis krei: “Angelito! Angelito! *Donde estas?* Kie vi estas, Angelito?“

De la rivero aŭdiĝis nur la gargarado kaj kirlado de la renversiĝanta akvo.

Ĉar Felipe ne revenis, sciis *don* Feliks en la kampadejo, ke certe okazis io nekutima. Li sendis frue matene Pablon kun la *cayuco*. Pablo trovis la kanupereulojn sur la bordo, ŝarĝis ilin kaj veturigis ĉiujn al la nova kampadejo, kie la *muchachos* jam komencis starigi novajn kabanojn.

Celso reveturis kun Pablo al la ĉefa kampadejo, kie *don* Feliks akceptis lin.

„Kion vi tie transe serĉis? Nun vi alvenas kaj perdis duonon de tago. Vin mi ne sendis en la novan kampadejon.“

„Mi helpis al Candido, pro liaj pakaĵoj, *Patroncito*, ĉar li havas la familion.“

„Kaj ĉi tie vi havas vian laboron kaj neniun faras ĝin. Candido ja jam plenkreskiĝis, li povus iri sola la malmultajn paŝojn al la nova kampadejo.“

„Li eĉ perdis sian malgrandan filon“, diris Celso.

„Kial li ne atentis pli bone? Cetere, neniŭ diris al li, ke li kunprenu siajn infanojn ĉi tien. Ili estas uzeblaj por nenio. Ek, al la laboro! Kaj vi liveros viajn kvar toneladojn kiel kutime. Por viaj promenaj veturoj mi ne pagas vin – mi pagas nur tion, kion vi transdonas al mi. Kaj kion vi liveru al mi, tio estas kvar toneladoj.“

„Si, *Patroncito*.“

Don Feliks ree sidiĝis al la matenmanĝo kaj diris al ambaŭ *capataces*, kiuj kunsidis ĉe la tablo: „Jen mi ja denove pravis, ke mi sendis Pablon transen kun la jungilaroj kaj la hakiloj. Se estus estinte la drinkema kojoto Felipe, tiukaze niaj jungilaroj kaj hakiloj nun kuŝus en la rivero. Cent kvindek pesoĵ en la akvo. Jen la afero plej bela, kiu povus trafi nin! Dum la lastaj du semajnoj eĉ ne venis poŝtrajdisto ĉi tien, kaj des malpli turkokaravano. Nu, kie estas la kanajlo, la delirulo Felipe?“

Unu el la *capataces* respondis al li: „Li ekveturis kun Pablo, por surhokigi sian kanuon.“

„Tiukaze ili provos surhokigi ĝin dum tri semajnoj. Kaj eĉ tiam ili ne kaptos ĝin.“

Candido laboris, manĝis, kuŝiĝis por dormi, leviĝis, iris labori, manĝis, denove kuŝiĝis, ree leviĝis, hakis siajn arbojn, revenis al la kabanoj, kaŭriĝis kaj rigide gapis teren. Li apenaŭ parolis.

Ĉiumatene kaj ĉiuvespere li iris al la bordo kaj rigardis la fluantan akvon, kiu fordrivigis lian Angeliton. Kaj ĉiam, kiam li revenis de la laboro, li ĉirkaŭrigardis en la kabano kaj rigardis Modestan sen parolo. Modesta sciis, kion li deziris trovi, kiam ajn li paŝis en la kabanon, laca kaj elĉerpita de la dura laboro.

Kvar tagoj tiel pasis. Jen li diris je la vespero mallaŭte al Modesta: „Fratineto, je la bordo estas surmetita la kanuo de Pablo. Se estos profunde en la nokto, ni ekveturos.“

„Kien ni veturos, frato?“ ŝi demandis kun paroltono, kvazaŭ ŝi dubus je la saneco de liaj sensoj.

„Mi ne plu povas restadi ĉi tie. Ili murdis mian malgrandan Angelinon. La unuenaskiton de Marcelina ili

murdis al mi. Ni reiros en nian hejmon. Mi sopiras hejmen, Modesta, al mia kampo, al mia maizo, al mia hejmo, kiun mi konstruis. Mi ne povas resti plu ĉi tie. Mi devas iri hejmen.“ Li diris tion, kvazaŭ li diris tion en la pasintaj tagoj milfoje al si, ĉiam la samajn vortojn, eterne ripetante ilin. Sen iam ajn ŝanĝi la penson.

„Ĉu ni kunprenu la porkojn, frato?“

„Kompreneble. Kion vi supozas, Hermanita? Kial mi postlasu la porkojn ĉi tie? Ankaŭ ili hejmsopiras, tiel, kiel la hundeto. Ankaŭ vi hejmsopiras, mi scias tion.“

„Kaj Celso, ĉu?“ ŝi demandis.

„Celso scias, kie mi estas hejme, kaj kie li trovos vin. Li diris tion al mi, sed mi ne parolu pri tio, ke tiukaze, se tiu knabino, kiu estis promesita al li, prenis alian edzon, kiel li supozas, li tiukaze volonte volus, ke vi prenu lin. Li postsekvos nin, fratineto.“

Modesta lavis la argilajn potetojn kaj diris: „Ili kaptos lin.“

„Eble“, respondis Candido. „Sed mi ne povas resti plu ĉi tie. Mi devas foriri. Kaj, se ili kaptos min, mi ĉiam denove provos fuĝi, ree kaj ree. Mi ne plu povas resti ĉi tie. Ĉi tie ili murdis mian Angelinon.“

„Li falis en la akvon, frato.“

„Jes. Sed ne estis la volo de *Madre Santísima*. Estis la volo de la patrono, de tiu diablo. Kial li ne lasis veturi nin en la taga helo? Kial li ne lasis veturi nin kun Pablo? Ĉar li malamas la knabojn kaj volis mortigi ilin. Mi scias tion. Li diris centfoje al mi, ke ili laboru, aŭ alikaze ili ne havus la rajton ĉi tie esti kun mi, la infanoj de Marcelina, kiun murdis la kuracisto, ĉar mi ne tuj havis la monon.“

„Laŭ via ordono, frato. Ni ekiru.“

„Atendu ĝis ĉiuj *muchachos* dormos. Pelu jam nun kun Pedrito la porkojn al la bordo. La *muchachos* pensos, ke ni nur volas doni akvon al ili.“

En la sekva nokto Candido, Modesta, la malgranda Pedro, la porkoj kaj la hundeto ekveturis.

En la du lastaj tagoj pluvis nur tre malmulte. La rivera nivelo sinkis kaj ĝia fluo estis trankvila.

Pli poste en la nokto leviĝis malkreskanta Luno. Nuboj migris nur unuope sur la ĉielo kaj tial estis lumo sur la rivero.

La stangon por la kondukado de la kanuo Pablo prenis kun si supren en la kabanon, en kiu li dormis kun la *capataz* kaj la kuiristo. Candido sciis, ke li ne povus konduki la kanuon per la rigida stango. Tion oni devas lerni dum longa ekzercado. Tial li posttagmeze hakis tri mallongajn palisojn, el kiuj unu estis tiom larĝa kaj tiom dika, ke ĝi uzeblis kiel padelo. La palisoj estis nur ok futojn longaj kaj ne tre dikaj, ili estis facile manipuleblaj laŭ tiu maniero, kiel li pensis tion. Li ne iris longan distancon en la riveron, sed ĉiam restis proksime de la bordoj, kie li ĉiam trovis grundon kun la mallongaj palisoj

kaj povis konduki la kanuon, tiel, kiel li elpensis. Pakojn, kiuj donus al la *cayuco* tro grandan pezon, li ne plu posedis. Per saketo farita el ĉemizo, kiun li tiris de sia korpo, li portis fabojn, tortiljojn kaj pakaĵeton da posolo ŝparita en la lastaj tri tagoj. De amiko el la *muchachos* li ricevis ŝtalon, fajroŝtonon kaj pecon da meĉo por povi ekbruligi fajron. Lia tranĉilo, kiun li portis en kruda leda ingo je la zono, ne perdiĝis de li. Per ĝi li povus skulpti lancojn, per kiuj li povus surpiki fiŝojn por rosti ilin aŭ por manĝi ilin nekuiritaj. Ĉe la bordoj li povus kapti grasajn lacertojn kaj junajn testudojn; ĉeokaze li ankaŭ per katapulto el basto povus ĉasi akvobirdon. Tiom despera la fuĝo ne estis. Kio mankis al li, estis nur *cayuco* kaj iom da scio, kiel oni veturigu ĝin.

Kun malmulte da peno ili veturis sur la rivero laŭ la fluo. Kvaronhore Luno heligis ilian vojon. Je ambaŭ bordoj leviĝis la densaj kaj malhelaj vandoj de la ĝanĝalo. De la bordoj aŭdiĝis kantado kaj ĉirpado, kiu vivigis la nokton. De tempo al tempo kvakis granda kolonio de grandaj ranoj kaj ĉeokaze supersonis la kantadon de la ĝangalo la plendanta krio de ektimigita birdo. En ĉiuj direktoj trans

la riveron migris la hastaj ombroj de noktobirdoj kaj de *murciélagos*, de vespertoj. Pedrito dormis kun la kapo sur la sino de Modesta. Kontraŭ ŝia dorso apogis sin la varma korpo de unu el la porkoj.

„Frato“, diris Modesta duonlaŭte al Candido. „Kiom longe ni vojaĝos per la *cayuco*?“

„Mi mem ne scias tion, fratinjo. Post certa distanco plu sur la rivero sekvos la altaj akvofaloj. Tie ni ambaŭ devos tiri la kanuon el la akvo kaj preterporti ĝin de la akvofaloj. Poste denove estos akvofaloj, kie ni ne plu povos porti la kanuon pro la rokoj. De tie ni devos migri en la direkto al la sunsubiroj por atingi nian hejmon. Ĉion ĉi diris al mi *muchacho*, kiu konas la riveron, ĉar li estis en la antaŭa jaro ĉe la flosistoj.“

„Sciu, frato, jen io, kion mi ne komprenas. Se estas tiel facile fuĝi per *cayuquo*, kial la *muchachos* tiukaze ĉiuj restas en la monterio?“

„Ĉar ili ne havas kanuon, aŭ ĉar ili timas la riveron, aŭ ĉar ili pensas, ke ili ne povas veturigi kanuon.“

„Eble estas tiel, frato“, diris Modesta. Sed tion, kion ŝi efektive pensis, ŝi ne diris.

Je la mateno *don* Feliks vokis al El Chapapote kaj El Guapo: „Glutu vian kafon malsupren, kaj poste iom da fajro sub la postaĵon! Vi iros transen al Las Champas, al la nova kampadejo. Kunkonduku la ĉevalojn. Rastu la regionon, signu la arbojn per kruco, kaj nombru, kiom da ili ni havas tie transe, proksimume. Felipe veturigis vin.“

La inspektistoj prenis siajn selojn kaj pakojn kaj ŝarĝis ilin sur la kanuon. El Guapo kunprenis sian „ŝrotkanonon“, ĉar li sciis, ke en la nova kampadejo certe estos ĉaseblaj bonaĵoj, ĉar tie ankoraŭ neniam iu hakis arbon. Tiom longe, kiom la *muchachos* ne estos profunde en la ĝangalo kaj forpelos per sia ĉasado kaj kriadado ĉiujn antilopojn kaj porkojn, estos tie abunda predo, kiun ili certe bezonos, ĉar la manĝaĉo komenciĝis fariĝi damne malofta kaj enua, ĉar la pigra di-damnita pagano, nomata turko, kun sia mizera kolportistobutiko ne travenis. Eble li ankaŭ kunportos kelkajn trivitajn avinojn. Kvankam ili ĉiuj estas nur fi-putinoj, estus ja tamen io nova.

Tiu saĝa parolo al El Chapapote estis tute komprenebla

kun sia tuta vero; sed li bedaŭris nur, ke li ne havas ŝrotpafilon, kaj krome ne povas komenci multon per trivita avino, eĉ se ŝi estus eltenebla, ĉar li aktuale havas estaĵon en la hamstrorado, kiu faras sufiĉe da problemoj al li.

Estis plezurigaj rakontoj, per kiuj ambaŭ distris, kiam ili veturis en la kanuo. Iliaj ĉevaloj sen seloj postnaĝis tenataj je longaj lazoj dekstre kaj maldekstre de la *cayuco*.

Ili ankoraŭ estis malproksime ĉirkaŭ kvindek metrojn de la albordiĝejo de la nova kampadejo, kiam ili vidis tie kuri Pablon tien kaj tien, kvazaŭ kiel pikita de tarantulo, li insultis kaj baraktis per ambaŭ brakoj. „Mia *cayuco* estas ŝtelita! Damne, kiu ŝtelis mian kanuon? Se mi kaptos la hundon! Mi faros kaĉon el li. Mia kanuo forestas.“

Felipe puŝis sian kanuon sur la sablon kaj diris: „Vi ne tiris ĝin supren, vian kanuon, kaj nokte ĝi fordrivis. Kulpo via!“

„Kulpo mia? Ne parolu galimation, se vi scias nenion. Jen

rigardu, kie mi surmetis ĝin nokte. Tion vi povas ekkoni je la sablo. La akvo estas malalta, kiel tiukaze tiu diodamnita fiaĵo de putinema *cayuco* drivu for?“ Poste turnante sin al ambaŭ *capataces*, li vokis: „Kaj damne, mi ankaŭ scias, kiu ĝin havas. La chamulano, kiu estas ĉi tie kun sia tuta pedikohava familio kaj aldone kun tuta grego de porkoj, li forveturis per ĝi.“

„Ne parolu ŝtipkapulaĵojn“, respondis El Chapapote. „Kiel la chamulano forsagu per via kota *cayuco*. Tiu ja eĉ ne scias, kiel akvo aspektas de interne. Kaj tiukaze li estus eĉ ekveturinta per via *cayuco*, ĉu? Prefere plenigu pro timo vian pantalon, sed tenu vian buŝon fermita.“

„Do, se vi scias tion pli bone, jen serĉu foje la chamulanon kaj lian *muchacha*. Kie ili do estas? Ĉi tie en la kampadejo ili ne estas, kaj ne antaŭ la arboj. Ankaŭ la knabo ne ĉeestas, kaj ne liaj porkoj. Tiujn li ĉiujn kunprenis. Do, foje serĉu lin. Se vi tenos lin ĉekolume, vi ekvidos ankaŭ mian kanuon proksime de li.“

La du *capataces* suprengrimpis borde kaj posttiris siajn ĉevalojn. Supre ili renkontis El Faldon-on. „Ĝuste!“ li

diris. „La chamulano forveturis kun la vaporŝipo. Akceptu ĝin aŭ ne. Sed li forestas. Kaj vi venis ĝustatempe por kapti lin.“

„Tiukaze nenio alia restos al ni.“ El Chapapote puŝis sian kunulon. „Kion vi diras, Guapo? Ek, post ilin! Ni povos poste nombri la arbojn. Sed unue ni ŝovu ion en nian stomakon. Matene ni rapide verŝis ĝuste nur gluton da ranca kafo en la gorĝon. Feliks ĉiutage fariĝas iom pli freneza. Sed de kie ni prenu la toneladojn, se neniuj kreskas, damne. Mi ne povas kreskigi iujn, kaj se mi povus, mi estus delonge milionulo kaj ne devus turmenti min ĝis sufokiĝo kaj persekuti pedikohavajn chamulanojn, kvazaŭ mi estus olda mamnutristino. Ĉu la mizera hundomanĝaĉo nun foje fine estas preta aŭ kiam?“

„Nu, unue ni malpenigu glaseton, por ke la faboj estu pli bone lubrikitaj.“ El Faldon eltiris botelon kaj ĉiuj suĉis dum momento forte je ĝi por festi la matenon.

„Vi sekvu nin per via *cayuco*, Felipe“, diris El Chapapote. „Mi kaj El Guapo rajdos je la dekstra bordo laŭflue.“

„Tiel tio ne funkcias“, opiniis Felipe. „Per la *cayuco* ni neniam kaptos ilin. Ili antaŭas kontraŭ ni tutan tagon. Sed mia kanuo ja ne estas kanonŝipo. Kaj eĉ, se ni atingus ilin, ni ankoraŭ tute ne havus ilin ĉekolume. Ili saltos en la akvon, la ŝtelita kanuo sagos for kaj ni neniam rekaptos ĝin, aŭ post certa tempo la karibaj indiĝenoj eltiros ĝin kaj ekveturos per ĝi. Vi rajdas multe pli rapide ol mi povus sekvi per mia *cayuco*. La rivero sinuas longe etendiĝante kaj sennombreble ofte. Mi konas ties fluon sufiĉe bone. Ĉiujn tiujn longajn sinuojn vi simple povos eviti per rekta rajdado kaj tiel vi baldaŭ multe antaŭos la chamulanon. Li tute ne scias manipuli kanuon. La aĵo certe almenaŭ ĉiun dekan minuton ŝoviĝos sur rulŝtonaran benkon aŭ en malaltaj lokoj sur la sablon. Kaj cetere, mi tute ne povus veturigi mian kanuon laŭflue. Mi devas reiri al Feliksĉjo. Li celas veturigon kontraŭflue, por rigardi la forflosigadon.“

Tio estis ĝusta. *Don* Feliks donis al Felipe la ordonon reveni kun la *cayuco*, ĉar li volis inspekti la tumbojn. Sed en tia kazo, se kaptendas fuĝintoj, Felipe ja povus agi foje kontraŭordone. Lia efektiva kaŭzo, kial li ne volis veturigi

la kanuon, estis tiu, ke li timis renkonti Candidon en la rivero, dum la *capataces* estis ankoraŭ tro malproksime por povi helpi al li. Candido, kiel ĉiu fuĝanto, ne hezitus mortbati lin, por ne fariĝi kaptito.

Por la fuĝo de Candido estis favore, ke ne pluvis dum la lastaj tri tagoj. Tial la rivero estis malpli kuntirega kaj malpli profunda. En kuntirega rivero Candido, nesperta pri la kondukado de *cayuco*, ne dumlonge veturigis la kanuon. Sed tiel favore, kiel estis la nepluvado por Candido, tio estis nun ankaŭ por liaj persekutantoj.

Se estus pluvinte dum tiu semajno tiel forte kaj seninterrompe, kiel kutime okazas en tiu tempo, ĉiuj padoj en la ĝangalo estus marĉigitaj. La ĉevaloj en multaj lokoj ne nur ĝis la genuoj, sed eĉ ĝis la selo sinkus en la ŝlimon. Dum longaj distancoj la persekutantoj devus iri piede kaj devus posttiri la bestojn, ĉar la pezo tro profunde premus ilin malsupren kaj ili ne plu povus elbaraktiĝi. Vastaj ĉirkaŭvojoj necesus, por eviti la tro inundatajn bordojn kaj la vastajn marĉojn proksime de la rivero. Duono de la riveraj kurbiĝoj tiukaze estus eviteblaj per rekta rajdado.

Sed nun la grundo, kvankam ne tute libera de ŝlimo, estis tamen sufiĉe dura je sia surfaco, tiel, ke ambaŭ *capataces*

dum longaj distancoj rapide povis rajdi antaŭen. La akvo de la rivero sinkis kaj dum kilometrolongaj distancoj eblis rajdi sufiĉe rapide je la sabla bordo, kaj dum aliaj longaj distancoj en la malalta rulŝtonara grundo de la rivero mem. La rivero, kiel ĉiuj aliaj praarbaraj riveroj, larĝiĝis dum du aŭ tri kilometroj tie, kie la tereno estis ebena. Je tiaj larĝaj lokoj la akvo estis tre malprofunda kaj fluis vere profunde nur en ellavitaj sulkoj, kiuj transalteblis. En tia malferma rivera grundo la rajdistoj ofte dum kvin kilometroj povis galopi, ĉar la grundo, konsistanta el sablo kaj ŝtonetoj, estis firma.

Ju pli da kurbiĝoj la rivero havus, des pli da kurbiĝoj la persekutantoj povus eviti, kaj des pli malgranda devus fariĝi la antaŭo, kiun Candido origine havis. La rivero fluis nun, malmulte pelata de la urĝantaj akvoj, nur malrapide. La rajdistoj kapablis nun dum kvaronhoroj trifoje pli rapide rajdi ol la *cayuco* de Candido moviĝis en la rivero.

Candido, ne sciante tion pli bone, estus kaptita en ĉiuj cirkonstancoj je la unuaj akvofaloj de la rivero. Tiel facile, kiel li pensis tion al si, nesperta pri tiu laboro kaj sen la

kunhelpo de plua tre fortika viro ĝi ne estis porti tian pezan kanuon sur la longa rokeca vojo ĉirkaŭ la akvofalojn. Li devus haki trunkojn por pluruligi sur ili la kanuon. Kaj se li ne trovus derompitajn trunkojn, li ne povus haki ilin per sia tranĉilo. Simple postlasi la kanuon kaj simple provi sian pluan vojon sen ĝi tra la ĝangalo, tute ne eblis. La persekutantoj sciis, kie li devos atingi la ĝeneralan padon pli frue-malfrue, por ĉirkaŭiri la lagojn kaj marĉojn kaj trovi la travadejojn en la riveroj.

La persekutantoj devis nur atendi ĉe tiuj enfluejoj en la vojaĝpadon de la karavanoj, ĝis ili alvenos. Ĉio ĉi estis aferoj, kiujn Candido ne sciis. Kaj ĉiuj ĉi aferoj estis, kiuj faris fuĝon el la monterioj tiel senespera. Celso, kiu certe elkore deziris al Candido kaj Modesta ĉion bonan, konsilis certe al ili per ĉiuj siaj persvadaj artifikoj ne entrepreni la fuĝan provon, ĉar li sciis pro sia longa restado en la monterioj, ke fuĝprovo ne sukcesus, ne povus sukcesi. La maloftaj esceptoj de sukcesa fuĝo en cent provoj plej ofte eĉ plialtigis la prezon por la fuĝinto per daŭra nekuracebla malsano.

Mankis ankoraŭ du horoj ĝis sunsubiro, kiam El Guapo diris: „Jen roĝo kaj ombra arbo, ĉi tie ni povos transrigardi la riveron de la alta bordo. Ni restadu ĉi tie dum duono de horo, kirlo nian posolon kaj rulumu al ni cigaron.“

„Tio estas bona ankaŭ por la *caballos*“, respondis El Chapapote. „La ĉevaloj bezonas foje trankvilan spiradon.“

El Chapapote havis la moknomon Peĉo tial, ĉar la haŭto de lia vizaĝo kaj de lia korpo havis grandajn kotajn makulojn, kiuj aspektis kiel griza peĉo, per kio ili perfidis lian devenon el la bordaj regionoj de la Pacifika Oceano en la sudo de Meksiko.

Ili ankoraŭ kirlis per montrofigro la posolon en la fruktoŝeloj, kiam subite El Guapo ekvokis, rigardante al la kontraŭdirekto de la fluo: „*Caray, ya viene la Familia Santa!* Jen ja alvenas la sankta familio sur la oceana vaporŝipo!“

Kaj efektive, la *cayuco* lante moviĝis laŭflue de la rivero;
la pruo neseke kondukata, en la akvo vostumis tien kaj
tien, kvazaŭ la kondukisto ne estus certa, kien li volas
veturigi sian ŝipeton.

Rimarko

caballo = ĉevalo

Candido, Modesta kaj la knabo sidis sur la planko de la veturilo. Nur malmulte pli ol kapo kaj kolo de la triopo montriĝis super la kruta rando de la *cayuco*.

El Chapapote kaj El Guapo metis sian ŝelon sur la plankon, sufiĉe atente, por ke ne perdiĝu parto de la enhavo. El Guapo prenis la ŝrotpafilon de la selo. El Chapapote tiris sian revolveron el la ingo kaj streĉis la ĉanon.

Pro iu kaŭzo henis unu el ambaŭ ĉevaloj, kiu staris kun la piedoj en la rivereto enfluanta en la riveron.

En la sama momento rimarkis la enestantoj de la *cayuco* ambaŭ *capataces*.

Candido volis nun rapide turni la kanuon kaj konduki ĝin al la alia bordo de la rivero. Sed la sulko de la rivero pliprofundigita de la enfluanta rivereto, estis pli proksima al la bordo, kie staris ambaŭ rajdantoj.

Antaŭ ol la kanuo estis apud la persekutantoj, jam kriis El

Guapo: „Konduku la kanuon ĉi tien, chamulano, aŭ mi pafos al vi!“

Ĉu Candido provis ĝin kaj la kondukado ne sukcesis aŭ ĉu la fluo ne permesis al li, la persekutantoj ne povis scii: la kanuo ne proksimiĝis, sed moviĝis pli en la riveron.

El Guapo pafis sian ŝroton. Li volis trafi la akvon antaŭ la pruo, kiel avertsignalon. Sed la plej granda parto de la ŝarĝo trafis la kanuon.

Pedrito tuj poste ekhurletis plendante, ke li estas trafita. Li leviĝis parte kaj lasis pendi la maldekstran brakon kiel naĝilon malsupren.

Nun ankaŭ El Chapapote pafis per sia revolvero kaj El Guapo ŝovis novan ŝrotkartoĉon por leonĉasado en sian revolveron. Li denove celis per la ŝrotpafilo al la *cayuco* kaj vokis: „Alvenu, chamulano, aŭ ĉe *Madre Purísima*, mi pafos vin kaj ĉiujn en pecojn!“

El Guapo kuris kelkajn paŝojn sur la deklivo malsupren, staris kun la piedoj en la akvo, celante la streĉitan revolveron al la *cayuco*.

La sanganta brako de la knabo prenis de Candido ĉiun kuraĝon fari lastan desperan provon daŭriĝi sian vojaĝon. Li vidis, ke la *capataces* minacis lin serioze. Ili denove pafus kaj tiel longe pafus, ĝis kiam ĉiuj en la *cayuco* estus aŭ mortaj aŭ grave vunditaj, ne nur lia filo, sed ankaŭ Modesta.

Li vokis: „*Vengo. No mas balazos, Jefecitos, per la Virgencita!*“ Mi jam venas. Ne plu pafu, pro Sankta Virgulino!“

Sukcesis al li konduki la kanuon al sablobenko de la rivero, kie la veturilo firmpinĉiĝis. Li eliris, ellevis la knabon, kaj tiam li ekvadis, ĝis la koksoj en la akvo, renkonte al la bordo, kun la knabo sur la brako kaj sekvata de Modesta. Liaj kvar porkoj gruntante paŝetis ŝanceliĝeme post li. Kaj alveninte je la bordo, iliaj buŝoj tuj ekfosis la grundon, dum la bastarda hundeto, skuinte la akvon el la felo, ĝoje kaj ludeme ĉirkaŭsaltis la grupon.

Ĉapitro 11

01

„Ne nur eskapi vi volis, chamulano, vi volis eĉ ŝteli la kanuon“, ŝrike kriis *don* Feliks al Candido, kiam oni kondukis lin al li por la verdikto. *Don* Feliks ordonis, ke Candido, lia knabo kaj la fratino, kaj ĉio, kion li havas, estu kondukata al li, por ke li foje povu montri mem je ekzemplo, kiel oni traktu kontraktrompintojn.

„Tio fariĝas ja nun ĉi tie jam daŭra kutimo, la fuĝado kaj la posta rezistemo“, li kriis kolerigite al Candido, kiu humile staris antaŭ li. „Ribelemo kaj ribelo ĉi tie en la monterio, ĉu? Ĉu estas tiel?“ li kriis.

Proksime de li staris kvar *capataces*. El la kabanoj venis la metiistoj kaj en la pordoj de la brandotavernoj staris viroj kaj inoj. Sed neniu kuraĝis proksimiĝi.

„Kaj vi, eta putino, ankaŭ vi volis fuĝi, ĉu?“ diris *don* Feliks kaj pli proksimiĝis al Modesta, suprenpuŝante ŝian mentonon. „Sed nun vi ne plu eskapos de mi. Mi bezonas

ion junan kaj verdan.“

„*Perdonenos, Patroncito, por Dios Santo!*“ petegis

Candido: „Pardonu al ni ĉifoje, patronĉjo mia, pro Sankta Dio. Ni certe denove ne faros tion. Mi havis tiom da hejmsopiro, pro mia kara filo, kiu estas morta en la rivero. Kaj mi esperis trovi lin ie tie en la rivero, kie li eble savis sin. Sed mi lin ne trovis. Pardonu al mi, patronĉjo!“

Pedrito, la knabo, bandaĝita per ĉemizoĉifono, kiun Modesta deŝiris, komenciis plori, kiam li aŭdis petegi sian patron al la mastro. Li surgenuiĝis kaj levis siajn manojn, premante ilin plate reciproke unu al la alia, tiel, kiel li lernis tion de sia patrino, se oni preĝas en preĝejo antaŭ la bildo de Dipatrino. „Pardonu al ni, kara dolĉa ĉefĉjo, ni certe kaj ververe neniam denove faros tion. Ni estis nur tiom malĝojaj, pro mia kompatinda frateto.“ Li konfuzis la vortojn kaj parolis parte en la cocila kaj parte en mallerta hispana.

„Tenu fermita vian grimacotruon, Chamaco!“ diris *don* Feliks kaj forte batis lin per la vipo, kiun li antaŭe apogis dekstramane al la kokso, transverse de la vizaĝo tiel, ke

sur ĝi ekmontriĝis larĝa sangostrio.

Candido, skuante sian kapon, kvazaŭ li ne povus kapti certan hororon rapide proksimiĝantan, surgenuiĝis kaj levis preĝante siajn manojn tiel, kiel Pedrito faris tion. Li ne plu pensis pri si. Li pensis nur pri tio, kiel helpi al la knabo.

Nun ankaŭ Modesta surgenuiĝis. Ŝi klinis profunde la kapon kaj movadis la longe kaj plate kunpremitajn manojn en la alto de sia frunto supren-malsupren, kvazaŭ ŝi preĝus kun ardo sen laŭta parolo antaŭ figuro de sanktulo. Fine ŝi ŝajne trovis la vortojn, ĉar ŝi komencis murmuri: „*Misericordia, Patroncito!*“ Sed ŝi parolis tiom mallaŭte, ke certe nur Candido komprenis ŝin.

Ŝi estis nudapieda kaj havis nenion sur sia korpo krom hejmteksita jupo el nigra kruda lano. Ŝiaj gamboj estis nudaj ĝis la genuoj, kaj ŝiaj brakoj ĝis la kubutoj. Sed ŝi kunkaŭris nun tiel, pro sia humilo kaj sia petegado pri kompatato, ke nur ŝia kapo kun la longa kaj taŭzita nigra hararo elstaris de la truita lanbulo.

„Eĉ pardonon vi celas, pedikohavaj fiaj kotuloj?“ vokis *don* Feliks kaj kroĉis fortan baton al Candido, kiu trafis lin nur sur la profunde klinitan dorson. Candido akceptis la baton sen movo. Li atendis pluajn batojn.

„Ĉiutage ĉi tie estas ribelemo kaj ribelo!“ kriegis *Don* Feliks kaj koleriĝis ĝis ruĝiĝo. Li batis Candidon je dua fojo: „Vi ĉiuj pli impertinentiĝas ĉiutage, vi kantas eĉ ribelajn kantojn malantaŭ mi en la nokto. Tio ankoraŭ mankis ĝis nun. Sed ankoraŭ la mastro estas mi ĉi tie. Kaj mi estos plu la mastro. Kaj eĉ, se mi pro tio devus mortaĉi kaj vori mian propran merdon. Mi estas la mastro. Kaj vin, pedikohavaj bastardoj, mi instruos, ke vi ne forkuru, kiam plaĉas al vi. De mi neniuj forkuros plu, tion mi ĵuras al vi ĉe ĉiuj sanktuloj.“

Li ĉirkaŭrigardis kaj serĉis iun el la *capataces*: „He, Gusano!“

„*A sus ordenes, Jefe!*“ El Gusano alsaltis kun longaj paŝoj.

„Eltiru vian tranĉilon!“

El Gusano portis en kruda leda ingo fortan ĉastranĉilon je

sia zono.

„Fortranĉu de tiu hundeca chamulano la orelojn!“ li komandis.

Esploreme kaj hezitante El Gusano rigardis vizaĝen al *don* Feliks.

„Ĉu vi ne obeas, se mi komandas ion al vi, kojoto, aŭ ĉu mi ankaŭ vin ekstraktu?“ Don Feliks ĵetis sian manon kun la vipo alte enaeren.

El Gusano saltis al Candido kaj tuj poste ĵetis ties orelojn kun gesto de naŭzo vaste for de si.

Candido, ankoraŭ nun surgenue kaj profunde kliniĝinte, ne defendiĝis. Kiam la malhela abunda sango sur la kolo fluis malsupren, li movis nur la kapon por malhelpi la glutadon de ĝi.

„Kial vi ne manĝaĉas vian propran sterkosukon?“ vokis *don* Feliks. „Vi manĝas ja ankaŭ viajn proprajn laŭsojn kaj grasigas vin per ili. Jen vi povas manĝaĉi ja ankaŭ vian propran pusan sterkosukon, kanajla chamulano.“

Li forte tretis Candidon per piedo tiel, ke li renversiĝis sur siaj genuoj. Lante li rektiĝis denove kaj provis rampi iom malantaŭen.

„Gusano!“ vokis *don* Feliks denove. „Kie vi estas, he?“

„*Aqui, Jefe, a sus ordenes.*“ El Gusano proksimiĝis kaj paŝis flanken de sia mastro.

„Ĉu vi ne sufiĉe rapide povis denove eningigi vian tranĉilon?“ kvazaŭ bojis *don* Feliks al li.

„Ankaŭ de la knabo la orelojn for!“ li komandis koncize.

„Mi volas vidi, ĉu mi povos reordigi kaj retrankviligi la kampadejon. Ek, antaŭen, fortranĉu la longajn orelojn de la bastardo, kiel suveniron.“

Kiel jaguaro saltis tiumomente Candido supren kaj ĉirkaŭbrakis sian knabon. „Kanajlo, ree surgenuen!“ ekhurlis *don* Feliks, „aŭ ĉu mi fortranĉigu ankoraŭ la nazon de la knabo kaj dehakigu liajn fingrojn? Tio fine foje helpus.“

Candido ankoraŭ nun ĉirkaŭbrakis sian filon:“

Patroncito, Jefecito, por la Santisima, ne mian knabon, fortranĉu miajn nazon kaj manojn, sed ne al mia knabeto.“

„Viajn manojn, ĉu? Tio plaĉus al vi. Sidiĝi kaj laborigi aliajn por si, ĉu? Viajn ungojn mi bezonas, sed ne la orelojn de via putina filo. Ek, Gusano, aŭ ĉe Dio en la ĉielo, mi deŝirigos ankaŭ viajn viŝĉifonajn orelojn!“

El Gusano tretis per siaj botoj Candidon kun ĉiuj siaj fortoj en la stomakon, tiel, ke la indiĝeno renversiĝis kaj disiĝis de sia filo dum sekundo. El Gusano kaptis lin per longe etendita mano kaj kaptis brakon de la knabo.

Sed nun Modesta ekhelpis al li. Per unu salto ŝi ekstaris, kaptis la knabon, kaj forkurante trenis lin kun si.

Sed El Pulpo, unu el la plej brutalaj inter la *capataces*, staris malantaŭ ŝia dorso. Li krude tiris la knabon el ŝiaj manoj kaj puŝis lin al El Gusano tiel, ke li longe etendite stumblis kaj falis antaŭ ties piedojn.

Tuj Modesta ĵetiĝis sur la knabon kaj kovris lin laŭ ties tuta longo.

Don Feliks kliniĝis, kaptis ŝian nukon per forta mano kaj rapide tiris ŝin supren al si.

„Nur ne timu, sovaĝa putineto mia, viajn orelojn kaj nazon mi ne detranĉos. Tiuj al mi tro bone plaĉas. Vi venos al mi, putineto mia, kaj malfermos por mi viajn stilzojn.“

„Ĉion laŭplaĉe, *Patroncito*, ĉion, kion vi volas. Tute je via servo, *Patroncito*. Sed ne la kompatindan knabon, ne la kompatindan etan knabon.“ Ŝi surgenuis kaj kroĉiĝis al *don* Feliks.

„Tion vi esus devinta diri pli frue, putineto. Nun estas jam tro malfrue. Kaj kion mi volas havi de vi, tion mi prenos de vi ankaŭ sen via oferto.“

Modesta, ankoraŭ surgenuie, turnis sian rigardon, kiam ŝi aŭdis diri *don* Felikson, ke estas jam tro malfrue.

Surgenuie ŝi rampis al la knabo, levis sian lanveston tiel, ke ŝia korpo nudiĝis ĝis la koksoj kaj kvietigis la sangon, kiu jam fluis sur la vangoj de Pedrito.

„Kaj tiel“, kriis *don* Feliks nun tiom laŭte, ke ĝi aŭdeblis sur la tuta vasta kampo de la *oficinas*, „kaj tiel okazos estontece al ĉiu ĉi tie, kiu provos fuĝi de ĉi tie aŭ ribeli, aŭ nokte kanti impertinentajn ribelajn kantojn kaj kraĉos impertinentajn parolojn. Mi estas la mastro ĉi tie kaj mi estos plu la mastro, kaj ĉi tie oni laboru, nenion krom laboru. Por tio vi ĉeestas. Por labori kaj por nenio alia. Diboĉi kun putinoj, drinki kaj komandi mi povas mem. Por tio mi ne bezonas helpon de iu ajn. Ne forgesu tion!“

Li tiris sian kartoĉzonon je truo pli firme al la ventro, ŝovis la ingon de sia pistolo iom pli proksime al sia dekstra mano kaj poste iris kun lantaj kaj memcertaj paŝoj al la bangalo, survoje ekbruligante cigaredon al si, dum li kontente kantis ion al si mem.

Je la vespero li vokis la kuiriston al si kaj diris: „Vi ja konas la chamulanon, tiun kun la fortranĉitaj oreloj, kiu volis fuĝi kaj ŝtelis kanuon. Diru al li, ke li ne plu havas rajton je siaj porkoj. La porkojn oni buĉos en la sekva semajno, por ke estu pagataj la kostoj, kiujn kaŭzis lia kaptado al mi. Por kio li bezonas porkojn? Li estas mem sufiĉe da porko.“

„Tiukaze mi fine povos foje antaŭmeti al vi bonaĵon, patrono“, respondis la kuiristo ridante.

„Venu al mi, jen, prenu bone surmetitan gluton.“ *Don* Feliks ŝovis la botelon al li.

„*Mil gracias*, Patron. Vi estas tre bonkora, tre bonkora. Milfojan dankon!“

Okazis je la sekva tago – ankoraŭ dum la antaŭtagmezo.

Candidon oni jam resendis al la nova kampadejo. Sed Modesta kaj la knabo pro la ordono de *don* Feliks devis postresti en la centra kampadejo. *Don* Feliks klarigis tion per tio, ke li diris, ke la fratino tentos fuĝi Candidon. Se ŝi ne estas ĉe li, li ne forkuros, sed unue venos al la centra kampadejo por kunpreni ŝin. Aldone li ordonis, ke Modesta helpu al la kuiristo. Krome ŝi ricevis la komision ĉiutage purigi la bangalon, en kiu loĝis *don* Feliks. Por ĉiuj ĉi laboroj Modesta ricevu du realojn ĉiutage kaj la manĝon, ĉar laŭ li tie neniuj rajtas manĝi kaj vivi, kiu ne laboras. Ankaŭ la knabo laŭ li ja estis jam sufiĉe granda por perlabori sian manĝaĉon. „Li nun ja pli rapide lernos“, aldonis Feliks, „kaj pli bone lernos, ĉar li nun pli bone povas aŭdi, de kiam liaj oreloj estas metitaj flanken. Li entute ĝoju, ke neniuj plu povos tiri ilin.“

Celso laboris ĉe la arboj. La regiono, en kiu li laboris kun ok pluaj hakistoj, malproksimis ĉirkaŭ unu kaj duonon da horoj piede de la *oficinas*. La vojdistanco forprenis tro multe da tempo de ili. Tial la viroj provizore starigis etajn kabanetojn, kie ili dormis, kaj de kie ili nur dufoje ĉiusemajne iris al la ĉefkampadejo por akcepti novan manĝon, interŝanĝi hakilojn aŭ por denove ŝlifi ilin.

La gravaj septembraj pluvoj estis komencontaj kaj post malpli ol tri semajnoj komencu la flosigado. Ili komenciĝos unue en tiuj regionoj, kiuj estas pli malproksimaj de la ĉefaj riveroj kaj kie la altaj akvoj pli rapide malaperas teren, kaj kie tial la akvo ĝuste nur tri aŭ kvar tagojn ŝvelas kaj sufiĉe fortas por povi flosigi trunkojn. La regionoj, kiuj estis pli proksimaj al la malgrandaj kaj grandaj riveroj, ankoraŭ havis tempan provizon, ĉar tie la akvo dum dek, ja dekdu da semajnoj estis sufiĉe alta por flosigi trunkojn.

Fariĝis ekstreme varmege kaj preme. En la densa ĝangalo, kie Celso kaj ties kunuloj nun laboris, la aero

estis malseka, peza kaj sufokiga. Ju pli proksimiĝis tagmezo, des pli malfacila estis por la viroj teni sin rektaj kaj ĉe tio eĉ dure labori. En la malfermaj prerioj la pluvotempo estas la plej bela kaj plej freŝa jarsezono. Sed ju pli longe daŭras la pluvotempo en la ĝangalo, des pli proksimiĝas la mallonga periodo dum tri aŭ kvar semajnoj, en kiu dum dudek kvar horoj sesfoje ĵetiĝas akvotorento teren, kiu plenigas la teron per du aŭ tri futoj da akvo, la estado de la homoj kaj bestoj, kiuj kutimiĝis al la kunvivo kun homoj, fariĝas infera turmento. La turmento por homo estas jam sufiĉe granda, se tiu troviĝas sub tegmento kun malfermitaj pordoj en ĉiuj kvar vandoj, balanciĝanta sur hamako, fumanta, kaj povas dormemi. Sed se la homo, eĉ se li estas indiĝeno kaj kiel indiĝeno kutimiĝis al la ĝangalo, dum tiuj semajnoj devas streĉe labori, tiukaze la turmento dum lia ĉeesto estas obligita dekfoje.

La grundo, dense kovrata per la softaj tavoloj de putriĝantaj plantoj kaj folioj, ne plu kapablas sorbi akvon kaj tralasi ĝin. La akvo ne plu moviĝas kaj nur per vaporigo estas eltirebela. Sed la ardantaj sunbriloj, kiuj,

tuj, kiam pluvelverŝiĝo estas finita, denove urĝe penetras tra la nuboj kaj dum surprize mallonga tempo solvas ilin, ne atingas la tersurfacon, kie staras la vastaj flakoj de alta akvo. La ĝangalo estas supre en la pintoj de la praarboj tiel dense kunkreskata kaj kunteksata, ke nur hazarde, se brizo trairas sur ĝi, trabaraktiĝas kelkaj perditaj sunbriloj. La pluvo de la pasinta semajno donis al la ĝangalo tiom da kreskoforto kaj bonstateco, ke ĉirkaŭe troviĝas densa teksaĵo de verdaj plantoj kaj folioj. La tero post kelkaj tagoj kovriĝas per dika arbustaĵo, sub kiu malaperas ĉiuj padoj. Neniu venteto penetras en la densejon.

Tiel regas sub la kunkreskiĝinta tegmento malseka, sufokiga varmego. La ŝvito torentas de la homaj korpoj. La aero estas tiel malseka, ke ĝi povas sorbi eĉ ne guteton de la ŝvito, kiel ĝi faras tion tiel bonfartige kaj tiel voleme en malferma tereno, kie blovas en la ombro de ĉiu arbo agrabla brizo, estigita per la eterna interŝanĝo de la varmego aero kun tiu, kiu ne estas trafata de la sunbriloj. En la ĝangalo fluas la ŝvito seninterrompe en la okulojn kaj trans la vizaĝon, kaj ĉiu dua mankapto servas al la

forviŝado de ŝvito, ĉar ĝi kaŭzas bruladon de la okuloj kaj pli malbonigas la vidadon.

Tiu bolanta malsekeco sub la densa foliara tegmento, dum oni staras ĝis la koksoj en la malseka verdo, kaŭzas, ke homo fariĝas tute obtuza kaj peza. Estas kvazaŭ oni havas pezan ŝtonon sur la nuko, ŝtonon, en kies interno kirliĝas gasoj, kiuj intencas trarompi la eksterajon. Oni volus forkuri. Sed kien ajn oni turniĝas, ĉie estas la sama densa foliara tegmento, la sama sufokiga, premega kaj varmega malsekeco, la sama kunpremiteco de la spiro.

Ĉi ĉio kapablas senfortigi homon, obtuzigi liajn sensojn kaj prirabi tiun de ties juĝkapablo. Ĉiun baton, kiun faras la *caoba*-viro per sia peza hakilo kontraŭ la dure fera ligno de la faligenda arbo, ŝajnas al li esti la lasta, kiun li ĝuste ankoraŭ kapablas plenumi, kaj tia estas lia perceptado: antaŭ ol li svingigos la hakilon por la sekva bato, li renversiĝos, senzorgeme pri tio, kio povus okazi al li. Sed per tio la turmentoj de la homo ankoraŭ ne estas elĉerpitaj. Ju pli profunde la naturo troviĝas en la pluvsezono, des pli naskkapablaj fariĝas ĉiuj ĉi bestoj, reptilioj kaj insektoj, por kiuj la pluvsezono estas la

releviĝa festo. Moskitoj svarmas kaj pikas la tutan jaron en la ĝangalo. Ili ŝajne neniam mortas aŭ pasas. Se iuj el ili finas sian vivokuron, la novaj estas jam naskitaj. Sed nun, en la pluvsezono ili venas ne kiel svarmoj sed kiel armeoj. Sango estas rara, sed la plej ŝatata frandaĵo por tiuj eterne malsataj armeoj. Kaj ili venas en la formo de ĉiuj specoj, kiujn bestaĉa infero iel povis eltrovi, por ŝarĝi per tiu aĉa plago la vivon de la homoj surtere tiel, ke la paradizo fariĝas strebinda al ili. Kaj venas la etaj nigraj muŝoj, kiuj je ĉiu mordovundo postlasas sangovezikon, kiu kaŭzas neelteneblajn dolorojn; kaj ili venas en tiaj grandaj svarmoj, ke oni havas post horo kvincent tiajn sangovezikojn tie, kie la haŭto estis nuda, aŭ kie ĝi estis kovrita per maldika ŝtofo. Kiel densaj buloj venas krome la grandaj mordomuŝoj, grandaj kiel krabroj, sed voremaj kiel junaj ratoj. Ju pli da moskitoj kaj muŝoj svarmadas, des pli multiĝis grandaj kaj malgrandaj araneoj, skorpioj kaj miriapodoj, kiuj estigas abscesajn vundojn sur la haŭto. Serpentoj, kiuj ŝajne nur atendas, ke la nuda piedo de indiĝeno tre proksimiĝu tien, kie ili kaŝiĝas embuske en la profunda verdo sur la tero. Kaj firmkroĉiĝinte sur fortaj branĉoj, ripozas jaguaroj kaj pumoj, kiuj fortiĝis kaj

petoliĝis pro la bona kaj abunda nutrado, ili embuskas, ke sub la branĉo aperu knabo, kiu devas atenti sian laboron, kaj tial ne havas la tempon rigardi supren. Salti sur knaban nukon la jaguaro ŝajne rigardas kiel bonvenan sporton, kiu promesas al li bonan kaj ne ĉiutagan manĝon, sed al la knabo signifas tio eble heroan, eble hororigitan adiaŭon de Tero.

Dum la pluvsezono por la *muchachos* apenaŭ eblis labori ĉirkaŭ tagmezo. Ili tiukaze disipis tro da forto, duoble tiom da forto, kiom kostis en la matenaj horoj aŭ posttagmeze, por plenumi tiun laboron.

Tial ili faris kutimon el tio, antaŭ la matena krepusko, kiam ili iris al siaj laborlokoj, trinki nur kafon kaj manĝi kelkajn tortiljojn, dum ili manĝis pli longe nur tagmeze. Tiel ili povis eviti sian duran laboron en la plej neelteneblaj horoj de la tago.

Tie en la *campecito*, kiun la *muchachos* nomis *El Palo Caído*, ĉar tie fulmo faligis praarbaran arbogiganton, kaŭris sur seka loko antaŭ fajreto Celso, Martin Trinidad, Juan Mendez, Lucio Ortiz, Casimiro, Paciano,

Encarnacion, Roman. Ĉiuj ĉi viroj estis *hacheros*, hakistoj. Du el ili sidis apud la fajro kaj manipuladis la kafokruĉojn kaj pelvojn, en kiuj ili varmigis rizon kaj fabojn. La ceteraj kaŭris proksime, kelkaj fumante kaj aliaj longe etendiĝinte dormetante, ĉiuj atendante la manĝon. Pro strangaj kaŭzoj troviĝis en ĉiu grupo unu aŭ du *muchachos*, kiuj preferis kuiri por la aliaj. Kaj tion ili rigardis kiel same tiel bonan ripozon kiel dormadon.

Matene Celso sukcesis per ŝtono ĉasi konsiderinde bone elkreskintan arbolacerton. Lucio senhaŭtigis ĝin, kaj oni kuiris ĝin nun sur la fajro por plibeligi kaj plinutrigi la magran manĝon.

Rimarko

campecito = (kuntekste: senarbejo)

Celso fumis dum certa tempo, malpli pro emo ol pro tio haladzigi la aeron por moskitoj. Nun li kuŝis kun longe etenditaj membroj, ripozante kun la kapo sur dika, freŝe hakita trunko, kelkajn paŝojn for de la fajro, kaj ronkante kun profunda bonfarto.

Sed per subita movo li levis sian supran korpoparton, rektiĝis duone, ĉirkaŭrigardis kaj vokis al la *muchachos*: „Jen iu vokas min. Sed kiu do estas?“

Paciano, kiu fumis, rigardis al li, ĉirkaŭrigardis kaj diris: „Neniu vokis vin. Mi aŭdis nenion. Vi sonĝas, knabo. Kiu voku vin ĉi tie? El Pasta, la pastvizaĝulo, estis jam antaŭ horo ĉi tie, por signi arbojn. Tiu ne revenos antaŭ vespero. Se li efektive venos. Vi sonĝis.“

„Ronku ankoraŭ duonon de horo plu“, diris Lucio ridante, dum li turnis la nudan lacerton je bastono. „La *iguana* jam bonodoras, sed ĝi estas ankoraŭ tro ledeca, pensas mi. Mi vokos vin, kiam ĝi estos preta.“

Celso ŝajne ne ekkontentis. Misfideme rigardante al ĉiuj flankoj en la profunde sukan verdon de la ĝangalo, li plurfoje rigardis ĉien. „Mi vetas, ke mi aŭdis voki iun mian nomon. Damne, mi aŭdis tion tute klare, kvazaŭ tio estus ĉi tie apud mia orelo.“

Li ankoraŭfoje ĉirkaŭrigardis, ŝovis la trunkon pli oportuna al si, sternis sin denove kaj provis ree ekdormi.

Apenaŭ li fermis la okulojn, li ankoraŭfoje leviĝis kaj saltis supren: „Diru, kion vi volas, sed min ree iu vokis. 'Celso! Celso! Celso, kie vi estas?' Ja ne mankas klapo en mia kapo. Kaj mi supozas, ke estis *mujer*, iu ino, kiu vokis min.“

Lucio kaj Paciano ridis nun laŭte. „*Mujer do*, ja rimarku . Li aŭdas voki iun *mujer* lian nomon. Certe vi bezonas iun. Tial vi nun jam aŭdas voki la inojn endorme. Kial vi ne iras al la onklino, por ŝprucigi vian sukron? Poste vi ree povos dormi kaj ne plu aŭdos inajn vokojn, kiam vi dormas.“

Celso haltis. Neniu povi konvinki lin, ke li ne aŭdis sian

nomon. Li levis sian cigaron, kiun li metis apud la trunkon, iris al la fajro kaj ekbruligis ĝin, li enspiris kelkfoje la fumon, paŝis tiam al la fajro kaj iris iom en la verdaĵon.

Subite li prenis sian cigaron el la buŝo kaj reaŝskultis. „Sed, *muchachos*, jen mi aŭdis ĝin nun tute precize. Estas ino, kiu vokas mian nomon.“

Paciano rektiĝis el sia kaŭranta situo kaj diris: „He, Celso, mi supozas, ke ankaŭ mi nun aŭdis ĝin. Jen iu vokas. Kaj mi pensas efektive, ke estas *muchacha*. Jen! Jen ĝi ree aŭdeblas.“

Ankaŭ Paciano saltis nun sur siajn piedojn.

„Ĝi certe aŭdeblas el tie, el trans la densejo“, diris Celso, ree streĉe aŭskultante. „Kunvenu, ni foje rigardu iom pli proksime tie.“

Ambaŭ, Celso kaj Paciano, kuris kun rapidaj paŝoj laŭ la direkto, el kiu, kiel ili supozis, aŭdeblis la voko. Per fortaj vaste svingiĝantaj brakoj ili baraktiĝis tra la densa arbustaĵo.

Ili faris ne pli ol cent paŝojn, kiam ili ambaŭ haltis tute subite. Bone aŭdeble kaj nun tute proksime ili aŭdis la voĉon de la knabino. „Celso, kie vi estas? *Donde estas?* Celso! Celso!“

„*Aqui, estoy aqui!*“ vokis Celso kun potenca voĉo, tenante siajn manojn kiel paroltubon, vokante laŭ tiu direkto, el kiu venis la voko.

Tiam kuris ambaŭ, tiel rapide, kiel la densejo ĝin ankoraŭ permesis, al la voĉo.

Ili ne kuris longe, kiam la verdaĵo antaŭ ili malfermiĝis kaj Modesta staris antaŭ ili, per ambaŭ brakoj liberigante al si vojon tra la arbustaĵo.

„Modesta!“ vokis Celso mirigite. „Ja kio, kio okazis al vi?“

Modesta malaperis tuj ĝis la kolo en la verdaĵo, kiam ŝi vidis Celson kaj Pacianon proksime antaŭ si.

„*No tengo vestido*“, ŝi vokis timeme. „Mi estas senvesta. Mi kovris min nur per verdaj branĉoj kaj lianoj.“

Celso tiris de si la ĉifonitan ĉemizon, kiun li havis surkorpe, kaj kiun li uzis nur, kiam li ripozis, ĉar la ĉifono protektis lin kontraŭ moskitopikoj. Li ĵetis la ĉifonaĵon al Modesta. Ne estis multe da ĉemizo, sed ĝi sufiĉis por kovri ŝin tiom, ke ŝi ekkuraĝis elveni.

„Donu ankaŭ vian ĉemizaĉon, Pacĉjo“ diris Celso al sia kunulo, kaj sen longe atendi, li jam tiris ĝin malantaŭen trans ties nukon. Tion, kion Paciano nomis ĉemizo mia, estis nur la duono de tiu, kiun Celso surhavis.

Celso kondukis Modestan al tiu loko, kie la *muchachos* restadis kaj atendis la manĝon.

„De kiam vi vagadas ĉi tie en la *selva*, Modesta?“
demandis Celso, kiam la knabino kaŭriĝis.

„Dum longa tempo, *mucho tiempo*. Mi ne sciis, kie mi trovu vin, Celso. Mi vidis iun *muchacho* proksime de la konstruita strateto por la trunkoj, kaj tiu diris al mi, ke li pensas, ke vi laboras sur la *Palo Caído*. Sed li ne sciis, kie estas tiu *campecito*. Li montris al mi nur proksimume laŭdirekte. Sed mi trovis neniun. Kaj tiam mi alvenis ĉe nove hakitaj trunkoj. Jen mi pensis, ke vi eble estas proksime, kaj tial mi vagadis ĉirkaŭe, jen en tiu direkto, jen en tiu, ĉiam vokante vian nomon. Mi estas nun jam preskaŭ sen voĉo. Kion mi nun faru, Celso?“

„Diru do fine, kio okazis al vi. Ĉu Candido denove fuĝis? Aŭ kio alia okazis?“ Celso urĝis ŝin por ekscii, kial ŝi sola kuris en la ĝangalon, nur provizore vestata per verdaj folioj. Delikata aludo de tio, kio eble okazis aŭ kio minacis

ŝin, ekformiĝis en li. Sed li deziris aŭskulti la tutan veron, ne pro scivolo, sed por ekscii, kiel li povos protekti ŝin kaj kontraŭ kiu.

„Hodiaŭ matene, estis ankoraŭ tre frue, vokis min *don* Feliks el la kuirejo, kie mi dormis, kaj kie mi nun helpu al la kuiristo kaj al lia edzino ĉe la laboro.“

Modesta ne sciis, kiel kaj kie komenci la historion.

„Sekve la kuiristo forpelis vin, ĉu?“ demandis Celso.

„Ne, ne la kuiristo. Tiu estis bona al mi kaj donis al mi eĉ du belajn petatojn, sur kiuj mi povis dormi, ĉar mi ne havis petaton, niaj ja ĉiuj falis en la akvon.“

„Estis do la edzino de la kuiristo, ĉu?“

„Ne, ankaŭ ŝi ne. Mi devas iom pripensi kiel estis. La *patroncito* vokis min, ke mi venu al li kaj ordigu lian liton. Kaj kiam mi alvenis ĉe li, li kaptis min kaj ĵetis min sur la liton. Mi defendis min kaj disgratis lian vizaĝon. Sed jen mi ekvidis botelon sur la tero. Per mia dekstra mano, kiun li ne povis firmteni, ĉar li havis manon je mia

kolo kaj la alian sur miaj gamboj, mi povis kapti la botelon, kaj kiam li subite per rapida movo volis ŝoviĝi sur miajn gambojn, mi levis la botelon kaj batis ĝin sur lian kapon. Jen li lasis min, mi forglitis de sub li kaj tuj fuĝis tra la pordo. Sed mian jupon mi ne povis kunpreni, ĉar ĝi estis tiel malnova, ke ĝi disŝiriĝis en la mezo kaj la *patroncito* sidis kun genuo sur ĝi. Mi surhavis plu nur ĉemizon, ankaŭ tute disŝiritan kaj tre mallongan. Sed mi forkuris tamen.“

„Sed li havas ja du *muchachas*, la *patroncito*“, diris Roman.

„Ili ne ĉeestis. Kaj kiam mi forkuris, la *patroncito* persekutis min kaj staris sub la tegmento kaj kriis: 'Haltu, aŭ mi pafos!' Sed mi ne haltis; tial li pafis dufoje aŭ trifoje. Mi ĵetiĝis teren. Li ne trafis min. Tiam mi aŭdis lin proksimiĝi kaj saltis surpieden. Kaj tiam li kriis: 'Mi kaptos vin, putino. Kaj poste mi firmligos vin sur la liton. Vi ne plu gratos min. Kaj se mi estos preta kun vi, mi detranĉos de vi ne la orelojn, sed la nazon. *Por Madre Santísima*.“

„Tion li farus“, diris Juan Mendez.

„Mi ekstaris kaj ektimis. Mi volis reiri al li, por ke li ne detranĉu mian nazon, sed li iris al la *choza*, kie loĝas la capataces, kaj vokis El Gusanon, ke li kaptu min. Sed El Gusano estis ĉe la ĉevaloj. Kaj tiam la *patroncito* vokis malantaŭ mi: „Ne nur vian nazon mi detranĉos, *bruja*, sed mi ankaŭ ordonos, ke oni firmligu vin nuda al arbo, dum tri tagoj kaj tri noktoj, ĉi tie meze de la placo. Vi neniam denove kuraĝos bati min per botelo. Tiumomente la kuiristo paŝis el sia *jacalito*; li diris al mi: '*Muchacha, corre*, kuregu kiel fulmo, sed ja ne lasu kapti vin'. Mi demandis lin rapide, kien mi kuru. Li respondis, ke estas tute egale, ke estos por mi pli bone, ke la jaguaroj voros min ol Feliksĉjo. Kaj tial mi do kuris ĉi tien.“

Rimarkoj

bruja = sorĉistino

corre = kuregu!

choza = kabano

selva = praarbaro, sovaĝejo, ĝangalo

La *muchachos* diris nenion poste.

„Celso, vi ja helpos al mi, ĉu ne?“ demandis Modesta, rimarkante, ke neniuj el la viroj sciis, kion fari tiukaze.

„Ni povus kaŝi ŝin“, konsilis Encarnacion.

„Vi estas stulta. Kie ni kaŝu ŝin?“ respondis Lucio.

„He, Celso“, diris subite Roman kun mallaŭta voĉo „jen ja alrajdas El Gusano el la densejo. Mi pensas, ke li jam vidis nin.“

„Celso!“ tiumomente vokis tre timigite Modesta, kiu aŭdis, kion Roman diris. „Celso, protektu min. Helpu al mi!“

La ino ne atendis ĝis ricevo de la la petata helpo. Per salto ŝi surpiediĝis kaj forkuris plena de timo al la alia flanko de la densa arbustaĵo.

El Gusano nun estis proksima kaj ĝuste ankoraŭ vidis

eskapi la inon, kiun rekonduki li estis elsendita de *don* Feliks.

Pro la densa, kunkreskinta arbustaĵo ne sukcesis al li, rapide postrajdi ŝin. Sed li sekvis ŝin tamen.

La *muchachos* saltis surpieden por vidi, ĉu li kaptos ŝin. Modesta pro sia timo forkuris tiel haste, ke ŝi stumblis kaj kaptiĝis en la arbustaĵo. Tuj El Gusano sur la ĉevalo estis apud ŝi kaj kaptis ŝiajn hararojn.

„Ekstaru! Mi nur deprenos la lazon por firmligi vin, por ke vi ne ankoraŭfoje forkuru de ni.“ Li deruligis la lazon kaj ligis ĝin ĉirkaŭ la korpon de la ino.

La ino estis tute elĉerpita, kaj rezignis pri ĉia rezisto. Estis ŝia sorto, ke *don* Feliks rajtas trakti ŝin laŭplaĉe. Tiun sorton ŝi ne povis eviti.

El Gusano trenis ŝin malantaŭ si kaj revenis al la viroj. Tie li haltigis sian ĉevalon por certa tempo, li eltiris tabakon, rulumis cigaredon kaj diris al Celso, kiu plej proksimis al lia ĉevalo: „Donu al mi fajron!“

Celso transdonis ardetantan branĉeton al li.

El Gusano bonfarte elblovetis kelkajn nubetojn da fumo.

„Kion vi tie rostas sur la bastono?“ li demandis.

„Arbolacerton, *Jefe*“, respondis Lucio.

„Bastardoj! Kiel kristano povas manĝaĉi tian *iguana* sen vomu pro naŭzo. Porkuloj vi estas.“ Li elblovis denove kelkajn nubetojn, tordis la buŝon al larĝa rikano, gestis perkape malantaŭen, kie li tenis Modestan per la lazo, kaj diris, vaste ataŭenŝovante la dentojn: „Jen frandaĵo por Feliksĉjo hodiaŭ vespere. Pli bonas ol *iguana*. Kaj se li estos fikinta ŝin kaj ŝin elbalaos, transprenos ŝin mi. Li jam promesis ŝin al mi – tion, kion li postlasos. Nu, ankoraŭ sufiĉe da karno estos je ŝi. Mi prenos ŝin ankaŭ sen nazo.“

Li ridis tondrante. Poste li tiklis la flankojn de la ĉevalo kaj la ĉevalo komencis formarŝi. El Gusano tiris forte la lazon por vigligi la inon. Li faris tion intence tiel, kvazaŭ li trenus bovidon post si.

Modesta, ne atendinte la subitan movon de la lazo,

renversiĝis laŭlonge. El Gusano tiris pluan fojon kaj eĉ pli forte ol antaŭe.

La ino provis leviĝi. Kiam Modesta surgenuiĝis, ŝi rigardis al Celso. Ŝiaj okuloj ne akuzis lin. Ŝi sciis bone, ke Celso, tiel, kiel ŝia frato, kaj kiel ĉiuj homoj, estas tiel senhelpa kiel ŝi.

Sed Celso vidis en ŝiaj okuloj obtuzan malĝojon, kiu ekscitis lin pli ol akuzo aŭ malestimo povus fari.

Konfuzite li turnis sian rigardon de ŝi. Sed jen trafis lin la okuloj de siaj kunuloj, kiuj ĉiuj tie staris kaj rigide gapis al li.

Martin Trinidad kunpinĉis la okulojn kaj samtempe la lipojn, dum li faris bruan spirtiron tra la nazo, kiu ŝajne kunpremiĝis.

Ĉio ĉi daŭris nur du aŭ tri sekundojn.

Celso glutis aŭdeble. Tiam li kliniĝis kvazaŭ li volus fari panteran salton, kaj dum li rektiĝis, li elpuŝis tian ŝrike akran krion, ke la ĉevalo de El Gusano suprensaltis kaj

eksagis kvazaŭ jaguaro persekutus ĝin. Sed la ĉevalo metis siajn antaŭpiedojn sur marĉan lokon. Ankoraŭ nun en paniko ĝi provis elŝiriĝi, sed malhelpis ĝin la lazo, al kiu Modesta estis ligita, kaj kiu, kiam Modesta renversiĝis, glitis sub tiun trunkon, sur kiun Celso metis sian kapon, kiam li ronkis.

El Gusano tuj denove havis la ĉevalon sub sia komando. Li tiris ĝin forte kaj rapide per la bridiloj supren. La ĉevalo baŭmis kaj turniĝis por liberigi sin el la marĉa truo, pro kiu ĝi stumblis, kaj por preni alian vojon.

Kiam ĝi turniĝis kaj El Gusano ĉiujn siajn pensojn koncentris al la besto, Celso ĉe lia flanko saltis supren kaj ĉirkaŭbrakis kun ambaŭ brakoj la korpon de la rajdisto, kiu, tirita malsupren de la ŝarĝo de Celso, glitis el la selo.

Li apenaŭ tuŝis la grundon, kiam Celso jam troviĝis sur li kaj batis per siaj pugnoj ties vizaĝon. El Gusano skuis sin kaj provis levi sin kun siaj botoj por puŝi ilin en la stomakon de Celso.

Sed antaŭ ol El Gusano surpiediĝis, Celso falis flanken

sen liberigi sian viktimon, kiun li nun tenis ĉe la gorĝo. Ambaŭ batalis sur la tero kaj rulis jen sur ĉi tiun flankon jen sur la alian.

El Gusano bluiĝis survizaĝe. „Delasu, fripono!“ li ĝemis, la vortojn pli glutante ol elpuŝante.

Celso serĉante palpadis la teron por trovi ion, kion li povus uzi kiel armilon.

Juan komprenis, kion celis Celso. Li levis dikan branĉon kaj forte batis El Gusanon sur la kapon. La manoj de la *capataz* fariĝis necertaj kaj komencis zigzagadi en la aero por trovi iun tenilon. Sed Juan ne perdis tempon. Li denove levis la branĉon kaj draŝis ĝin pluan fojon sur la kapon de El Gusano. Kaj poste la batoj sekvis tiel rapide kaj tiel suke, ke Celso fine delasis sian viktimon kaj flankensaltis, ĉar la kranio de El Gusano estis jam frakasita.

„Mi kantis ĝin ja jam sufiĉe longe al vi, Gusano“, diris Celso, nun tute rektiĝante kaj etendiĝante. „Centfoje mi kantis tion al vi. Kaj mi plenumas tion, kion mi promesis.

Kaj mi faras tion, kion mi kantis.“

Per larĝa mano li viŝis sian vizaĝon, forviŝante ŝviton kaj sangon.

Poste li turnis sin, iris al Modesta, malligis ŝin kaj demandis ŝin softe kaj mallaŭte: „Ĉu vi estas vundita?“

„Ne“, ŝi diris tute proksime de li, „mi ne havas vundon. Sangas nur miaj gamboj kaj piedoj de la arbustaĵo. Sed mi treege timas, Celso.“

„Ne timu plu, Modesta. Nun ni ne povos retropaŝi. Ekde nun ni ĉiam devos paŝi antaŭen. Nun ni kreos novan ordon, ĉi tie kaj ĉie. He, *muchachos*, kion vi diras?“ li demandis laŭte la virojn.

„Ĉie!“ vokis Roman.

„Ĉu ankaŭ en la bienoj? Ĉu ankaŭ la peonoj?“ demandis Paciano, kiun oni vendis de bieno al la monterio.

„Ankaŭ la peonoj ordigu ĉion“, konfirme diris Martin Trinidad. Poste li laŭte vokis: „*Tierra y Libertad!*“

Kaj ĉiuj *muchachos* respondis per ununura krio: „*Tierra y Libertad!*“

Celso turnis la korpon de El Gusano per piedo tiel, ke li kuŝis sur la vizaĝo.

Li kliniĝis kaj disbukis lian zonon kun la kartoĉoj, je kiu pendis la revolvero. „Martin“, li vokis, „vi ja havas revolveron kaj kartoĉojn. Nu ankaŭ mi havas revolveron, venu al mi kaj montru kiel ĝi pafigeblas kaj kiel oni ŝarĝas ĝin.“

„Tion mi instruos al vi dum kvin minutoj“, respondis Martin.

Roman diris: „Ni nun certe devos enfosi la kanajlon, antaŭ ol ni iros al la kampadejo.“

„Nenion ni enfosu ĉi tie!“ vokis Juan Mendez. „La sovaĝaj porkoj voru la kadavron.“ Poste li turnis sin al Martin: „He, ĉu vi rajdos sur la ĉevalo aŭ ĉu mi?“

„Vi estas serĝento, tial vi rajdu sur ĝi. Se ni havos ankaŭ la aliajn ĉevalojn kaj mulojn, ni ĉiuj povos rajdi“, respondis Martin Trinidad.

„He, venu al mi ĉiuj ĉi tien!“ vokis nun Celso. „Ni nun foje pripensu kaj priparolu tion, kion ni faros ekde nun.“

„Ĝuste, ni faru tion“, oni respondis al li.

„Ne ĉi tie“, diris Celso, „ne ĉi tie, kie la kadavro baldaŭ komencos feteri. Tien, pli transen, ni iru. Ankaŭ vi, Modesta. Ankaŭ ino devos ĉeesti.“

Modesta nur kapjesis, ŝi tiris la ĉemizoŝiraĵojn ankoraŭ pli malvaste al si kaj sekvis kun la aliaj al tiu loko, kiun Celso asignis per gesto.

La *muchachos* ĉiuj kune kaŭriĝis en cirklo, kiel ili kutime faris, kiam ili hejme kunvenis en siaj vilaĝoj aŭ en bieno aŭ sur korto de kabano de amika viro por paroli pri siaj aferoj.

Celso tuj ekparolis: „Tio nun komenciĝis. Nun ni ne plu povos retiriĝi. Por tio, ke ni tanis la felon de tiu bestaĉo, kaj tiel, kiel li jam delonge meritis tion, nin ĉiujn atendus tristaj tagoj, se ni nun cedos. Li pendumigus ĉiun el ni kaj de ĉiu detranĉus la orelojn, pro ribelado. De kiam Urbano tiel bele senlumigis la okulojn de Cacho, ili ĉiuj fariĝis *loco*, ĉiuj frenezaj. La vero estas, *muchachos*, ke ili havas jam tute plenigitajn pantalonojn, pro la malbenita timo. Kaj, ĉar ili tiom timas, ili hufobatas nun dekstren kaj maldekstren kaj fariĝas tiel brutalaj, ke ili ne plu scias, kion fari. Ĉu vi volas, ke ili fortranĉu ĉiujn viajn orelojn? Kaj eble eĉ viajn nazojn, ĉu? Kaj eĉ la fingrojn? Kaj poste ankoraŭ pendi?“

„Tion vi, azeno, ja ne devis demandi nin“, ridante vokis Lucio.

Kaj ĉiuj *muchachos* komencis kunridi.

Ankaŭ Celso ridis, kiam li komencis paroli plu. „Tion mi scias. Sed ĉu vi ĉiuj volas iri hejmen? Al viaj edzinoj, al viaj patroj, al viaj kampoj?“

„Jes, tion ni volas!“ vokis la plej multaj viroj.

Tiumomente ekkriis Martin Trinidad, saltante surpieden kaj pikante la brakojn aeren: „Ne, *burros* kaj bovoj, tion vi ne vere celas kaj tion vi ne celu. Prefere mi pafos ĉiun el vi teren. Kaj ankaŭ vin fine, Celso, ne gapu min tiel rigide, ĉar mi diras tion al vi. Diboĉi kun putinoj vi povos pli malfrue. Kaj ankaŭ viaj kampoj ne perdiĝos. Neniu el ni iros hejmen. Neniu el vi, kaj neniu el tiuj *muchachos*, kiuj ploraĉas kaj veplendas ĉi tie en la monterioj. Neniu iros hejmen, tiom longe, kiom mi staros sur miaj piedoj. Ni atakos nun la bienojn kaj mortbatos la bienulojn kaj la *mayordomos*. Kaj ni mortbatos ĉiujn *rurales* kaj la policianojn kaj la *federales*, kiuj krucos nian vojon. Ni nun enordigos ĉion. Ĉiuj peonoj devos esti liberaj. Ĉiu kaj ĉiuj. Kaj ĉiu havu sian pecon da tero, kiun li povos kultivi por si mem kaj en paco. *Tierra y libertad!* Teron kaj liberon!

Tero, kiu apartenas al vi, al ĉiu peco da tero, ĉar sen tero ne estos libero por vi, sen tero ne estos libero por iu ajn homo. Kaj, se ni ne mortbatos la bienulojn kaj la *mayordomos* kaj la *federales* kaj la *rurales* kaj la korpogardistojn kaj ĝendarmojn kaj urbestrojn kaj *Jefes Politicos* kaj policianojn, ni neniam havos liberon. Se ili vidos alveni nin, ili rampos surgenue antaŭ vi kaj petegos pri sia vivo. Sed ne havu kompaton al ili. Se vi trankvile okupiĝos pri via laboro, ili revenos, tiam ili rekolektos fortojn, kaj tiam ili forĝos vin al ĉenoj pli duraj ol kiam ajn antaŭe. Mortbatu viajn malamikojn! Kaj mortbatu ĉiujn, kiuj povus fariĝi viaj malamikoj! Kompato al ili estus perfido al vi ĉiuj, al ĉiu el vi, al ĉiu, al ĉiuj, al viaj maljunaj patroj, al viaj patrinoj, al viaj edzinoj kaj fratinoj, al viaj infanoj kaj al ĉiuj viaj infanoj, kiuj ankoraŭ ne estas naskitaj.“

„*Bravo, camarada!*“ kriis Celso kaj Paciano samtempe. „*Bravo, Martin, vi diras tion, kion ni pensas!*“ kriis entuziasme la ceteraj viroj kaj saltis supren.

„Tuj ek do, *muchachos!*“ kriis Martin Trinidad. „Ne lasu estingiĝi la fajron. *Viva la Rebellion! Viven los Rebeldes!*“

„*Viva la Rebellion!*“ kaj „*Que viven todos los rebeldes!*“ vokis la *muchachos*.

Ili prenis la hakilojn kaj maĉetojn kaj intencis tuj ekmarŝi al la *administracion*, por balai la stalon.

„Haltu, haltu, *muchachos!*“ diris Celso per laŭta voĉo.
„Unue ni interparolu ĉi tie kelkajn minutojn pri tio, kion ni faru kaj kiel ni faru. Se ni nun ĉiuj kvazaŭ freneziĝinte sturmus la *oficinas*, ni farus rapidan finon al tiuj, kiuj nun tie estas. Sed en ĉiuj anguloj de la *selva* estas *capataces* ĉe la *muchachos*, kiuj scias nenion pri ni. La *capataces* povos kolektiĝi kaj ataki nin de malantaŭe. Ili ĉiuj havas pistolojn kaj ĉevalojn kaj rajdos al la aliaj monterioj kaj alvokos helpantojn. Tiel tio ne irus. Tiukaze ni ne povus gajni, sed oni mortbatus ĉiun el ni. Tio ne utilis. Se ni volas havi teron kaj liberon, ni devos vivi kaj la aliajn mortbati.“

Martin Trinidad vokis: „*Oiga, muchachos*, aŭskultu, Celso pravas. Ni sidiĝu denove kaj interkonsiliĝu. Tion, kion ni nun ĉi tie bone interkonsilos, pri tio ni pli poste ne devos pente lamenti. Diru, Celso, kiel vi pensas pri la

afero.“

Celso proponis, ke ĉiuj viroj tuj iru al la *boyeros*, kiuj trenadis trunkojn proksime de la sulko Mono. „Tie estas niaj plej bonaj kamaradoj kun la plej bonaj koroj kaj animoj, tie estas Andreo, tie estas Fidel, kiu iam batis al tiu ĉi kadavrulo sur la buŝaĉon, tie estas Santiago, kiu timas nek la diablon nek Felikson, tie estas Matiaso, kiu nur atendas la okazon povi tratanĉi la ĝorĝon de El Doblado, ĉar tiu tiel fie logis lian amikinon al seksumado, kaj tie estas Cirilo, Pedro, Sixto, Procoro. Kune kun tiuj *boyeros* ni devos timi neniun. Kun tiuj ni povos konkeri la tutan ĝangalon kaj ĉiujn bienojn. Se ĉiuj *hacheros*, kiujn ni havas ĉi tie en la monterioj estus tiaj, kiaj la *boyeros*, amikoj amikoj, ni povus konkeri la tutan landon por ni, kaj neniu tirano povus malhelpi tion.“

„Nu, ek do al la *boyeros*!“ komandis Martin Trinidad. „Vi, Juan, grimpas sur la ĉevalon, kaj kiam vi renkontos iun, iliestas ja ĉiuj disaj, jen sendu ilin al la trunkejo de la sulko Mono.“

„Kaj, se mi renkontos iun *capataz* sur la vojo, kaj, se li

vidos min sur la ĉevalo, kion mi diros tiukaze?“ demandis Juan.

„Jen diru, ke la patrono sendis vin kaj ke vi serĉu Andreon kaj Santiagon; ili iru al la administrejo.“

„Kion ankoraŭ?“ demandis Celso. „Ankoraŭ senkulpigi sin, ĉu? Jen, prenu la revolveron. Tenu ĝin antaŭ vi je la selo, kaj se iu *capataz* renkontos kaj haltigos vin, jen simple klaku la revolveron. Vi ja scias kiel pafi. Kaj, se li ne estos sata jam je la unua klako, tiukaze klaku duan fojon – kaj ĉifoje pli bone. Jen, prenu ankaŭ la kartoĉzonon. Nur ne hezitemu nun. Aŭ ni balau tute kaj ĝispure aŭ tute ne. Mil damnojn! La ludado havas nun finon. Aŭ ili aŭ ni. Kaj, ĉar ni jam komencis, ili unue devos transmondiĝi. Se ni volas vivi, jen ili unue devos mortaĉi. Ek, antaŭen, Juan! Post duono de horo ni estos transe ĉe la sulko.“

Rimarkoj

federales = federaciaj trupoj

mayordomos = administrantoj

rurales = *Guardia Rural*, sub diktatoro Porfirio Diaz federacia rura kavaleria kaj ĝendarma polico, neregularaj helptrupoj

Ĉapitro 12

01

Kiam la *muchachos* alvenis ĉe la sulko Mono, atendis jam la *boyeros* kaj ties knaboj, la *gañanes*. La knaboj kondukis timeme. Ili manipulis ĉe la bovoj kaj jungilaroj, ĉar tiukaze, se aperos *capataz*, ili povus estigi la impreson, ke ili estas senkulpaj. Ili timis la batojn, kiujn ili ricevus, se la afero, kiun ili komprenis nur parte, malsukcesus.

Sen kalkulado de la knaboj tie kunestis tiumomente pli ol dudek *muchachos*. Sed en ĉiu kvaronhoro alvenis plua bovpelisto kun siaj bovoj kaj kun trunko al la trunkejo, kaj la nova alveninto estis instruata pri tio, kio okazis intertempe.

La viroj decidis marŝi al la administrejo; sed fari dum tio sufiĉe grandan ĉirkaŭvojon, por viziti survoje tiom da laborejoj kiom eblos, por ke ĉiuj hakistoj kaj bovpelistoj, kiujn ili renkontos, povu aliĝi al la marŝaĉmento.

La hakistoj portis kiel armilojn siajn hakilojn, kelkaj

krome maĉetojn. La *boyeros* havis nur maĉetojn. Sed ili prenis kun si ankoraŭ la ferajn hokojn, kiujn ili forigis de la tirĉenoj, por doni al ĉiuj tiuj viroj, kiuj havis neniun armilon, almenaŭ tiujn manen.

„Tio estas nur la komenco“, konsolis Juan Mendez la kunulojn. „Ĉe la komenco sufiĉus eĉ bastonoj, ŝtonoj kaj ŝtonĵetiloj. Kiam la danco vere komenciĝos, ni faros tiel kiel faris la *campesinos* kaj peonoj en Morelos, kiam ili sturmis je la unua fojo la sukerplantejojn kaj la sukerfabrikojn. Ili nur ridis, kiam alvenis la *rurales* kaj la federaciaj trupoj.“

„Sed kial ili ridis?“ demandis Cirilo.

„Vi estas ja lamulo, vere, tio vi estas, ke vi tiel stulte demandas. Ju pli da soldatoj atakis ilin, des pli da armiloj ili ricevis. Ĉiu soldato kaj ĉiu ĝendarmo kaj ĉiu policano havas ja karabenon, kaj ĉiu oficiro aldone revolveron. Estas simple, se oni mortbatas la soldaton kaj la policanon, oni poste povas forpreni lian karabenon aŭ lian revolveron. Kaj kompreneble ankaŭ ĉiujn kartoĉojn, kiujn li havas, kaj la botojn kaj entute ĉion, kion li

surhavas. Tio estas ja tre simpla, tiel oni faras ribelon kaj tiel ribeluloj havigas armilojn al si.“

„Ĉu la *campesinos* de Morelos gajnis la revolucion?“
demandis Santiago.

„Kompreneble ne. Tiam ankoraŭ ne“, respondis nun Martin Trinidad anstataŭ Juan Mendez. „Sed ili eksonoris la unuan sturmon. Ili kaj la *campesinos* de Tlaxcala, gvidata de la indiĝeno Juan Cuamatzi. Kaj tiu unua sturmsonorado estis la plej grava dum la tuta diktaturo. Nun scias ĉiuj peonoj kaj ĉiuj kamparanoj, ke ribelo fareblas, kaj, ke la tiranoj kaj diktatoroj vundeblas kaj venkeblas. Antaŭe ili kredis, ke neniuj povas fari ion kontraŭ la diktaturo, ĉar ĝi estis metita kaj difinita de Dio. Kaj ĉar oni ĉiam preĝis, ke ĝi daŭros mil jarojn. Atendu nur, la sekvan fojon gajnos ankaŭ la peonoj de Morelos kaj des pli tiuj de Tlaxcala. Kiu sciu? Sed eble ili nun jam ekflamigis ribelon en la tuta federacia ŝtato Morelos, en tiu ĉi horo, kiam ni ankoraŭ staras kaj pripensas ankoraŭ kiel agi. Ni aŭdas ja nenion, kio okazas ekstere en la lando.“

„Ĉe la infero, damne, kia kunsido okazas ĉi tie?“ kriis koleriĝinte El Doblado, la *capataz*, kiu rajdis en tiu momento kun El Tornillo ĉi tien al la tumbo.

La *muchachos*, aŭ certe la pli granda parto el ili turnis sin timigite al ili. Sed ili staris plu kaj eĉ ne iomete faris la impreson, kvazaŭ ili tuj volus ekiri al siaj enjungitaj bovoj por turni ilin al mala direkto por altreni novajn trunkojn.

„Ĉu vi ne aŭdis, kanajloj, kion mi demandis vin?“ kriis El Doblado denove. „Kia kunsido estas ĉi tie? Vi pigrumas kaj ripozas dum la hela tago, kvankam ni komencu en la sekva semajno la forflosigadon. Ek, al la laboro!“

La knabetoj kaj du hezitemaj *boyeros* ekiris al la bovoj por okupiĝi pri la enjungitaj bovoj.

„Haltu, *cobardes*, malkuraĝaj dentklakaj leporuloj!“ vokis Celso. La forirantoj sendecidite haltis meze de la vojo.

„Ja kio estas ĉi tie?“ kriegis nun El Doblado, la vipon, kiun li tenis permane, firme kroĉante. „Ĉu *huelga*? Ĉu

striko? Aŭ ĉu eble eĉ ribelo, *un motin*?”

„Ĝuste, kojoto“, kriis nun Santiago Rocha, „ĝuste divenite, tio estas *motin* kaj *mitin*, do mitingo de ribeloj, por ke vi, rato, sciu tion kaj ne havu fmalĝustan opinion.“

El Doblado paliĝis. Li hakis en la flankojn de sia ĉevalo kaj provis retroeviti kelkajn paŝojn. Sed la ĉevalo ne ĝuste komprenis la signalon. Ĝi dancetis dekstren kaj maldekstren antaŭ la *muchachos*. El Doblado fariĝis eĉ pli malcerta. Kun vaste malfermitaj okuloj li rigardis al la viroj, kiuj minace ĉirkaŭstaris kaj evidente atendis geston, kiu donu al ili la signalon al ago.

El Tornillo, la alia *capataz*, ne estis tiel timige encirkligita de la viroj kiel El Doblado. Per unu salto li povis liberigi sin de la minaca situo kaj skui la polvon de la rajdobotoj. Sed li pripensis rapide, ke estos pli bone por li, se li restos proksime de El Doblado, malpli tial por protekti lin ol por gardi sin mem. Ĉar postlasi la alia subestron en soleco tie kaj savi sian propran haŭton, povus ekhavi malagrablan turnon por li, se tio malkaŝiĝus kaj la aliaj subestroj ekscius la veron. Lastfine estis egale, ĉu oni buĉus lin tie

aŭ pli poste fare de la koleregaj *capataces*.

Dum la ĉevalo de El Doblado ankoraŭ karakolis kaj ne sciis kion fari, ekhavis ties rajdisto subite teruran timon. Li volis eltiri la revolveron, sed li havis dekstramane la vipon je ledorimeno ĉirkaŭ la manartiko. Tiu rimeneto kaptiĝis je la revolvera kolbo kaj El Doblado tiradis kaj tiradis je ĝi. Jen Matiaso ĵetis bastonon inter la antaŭajn piedojn de la ĉevalo. La ĉevalo baŭmis, kaj dum ĝi baŭmis, saltis Fidel de malantaŭe sur El Doblodon, kaptis la manon, kiu havis la revolveron, firmkroĉiĝis al ĝi kaj tiris El Doblodon el la selo.

Nun vidis El Tornillo, ke la situacio fariĝis tre serioza. Li turnigis la ĉevalon por eskapi. Sed la movon rimarkis Cirilo, kiu tenis hokon en la mano. Li svingis la hokon supren kaj tiris la ĉevalon je malantaŭkruro supren. La ĉevalo hufobatis, kaptiĝis per la piedoj en arbustaĵo, stumblis kaj falis. Ĝi tuj denove rektiĝis kun El Tornillo, kiu ankoraŭ sidis en la selo.

Sixto kliniĝis pro ŝtono. Sed li ne sufiĉe rapide trovis iun. Li trovis pecon de disrompita jugotrabo. Li saltis ĝis la

ĉevalo kaj draŝis la trabon kun tuta forto kontraŭ ŝultro de El Tornillo. Tiu turniĝis por defendi sin aŭ por eviti la batojn. Tiumomente de alia flanko sur lin saltis Pedro, kiu per unu mano tiris la bridilon al alia flanko kaj per la alia mano kaptis El Tornillon ĉe la zono kaj surterigis lin per tri fortaj subitaj movoj.

Tridek sekundojn poste ambaŭ *capataces* estis finitaj. Fidel, kiu havis El Doblado antaŭ si, prenis branĉon kaj batis lin per ĝi tiom longe sur la vizaĝon ĝis ĝi estis tute nereconebla. Kvazaŭ freneziĝinte, li kriis ĉe tio seninterrompe: „Jen mia garantiaĵo, jen mia garantiaĵo, ke vi ne plu turmentos inon, vi inon ne plu turmentos.“

Kiam Fidel fine rektiĝis kaj per lasta piedtreto sur la vizaĝon de la mortbatito finis sian venĝon, diris Martin Trinidad: „La pistolo kaj la kartoĉoj apartenas al vi, *muchacho*, vi meritis ilin.“

Poste li turnis sin al la viroj kaj, montrante per unu mano al la kadavro de El Tornillo, kaj per la alia al la morta El Doblado, li vokis kun konvinka voĉo: „Jen! Jen vi vidas ĝin! Tiel vi ricevos viajn armilojn, *muchachos*! Ĉiun

revolveron, kiun vi prenos al vi tiel, valoros duoble por vi. Ĉar ĝi mankos al via malamiko, kaj havos ĝin vi. Kaptu la kanajlojn inside, se alie ne eblas al vi. Kaptu ilin de antaŭe kaj de malantaŭe. Kaptu ilin en malhelo aŭ en hela tago. Kaptu ilin, se vi kaŭras surtere kaj kaptu ilin, se vi kaŭros surarbe. Sed kaptu ilin, damne! Se vi volas fari revolucion, jen faru revolucion, kaj faru ĝin tute aŭ ĝi turnos sin kontraŭ vi mem kaj frakasos vin.“

„Hombre!“ vokis Andreo, kiu ĵus alvenis tie ĉe la *tumbo* kun sia bovoparo, altrenante trunkon, sen scii, kio intertempe okazis. „He, *hombre*“, li diris ankoraŭfoje admire, “vi ja scias bone kaj bele paroli. Nu, kiun profesion vi havas?”

„Tion mi jam delonge diris al Celso, kio mi estas kaj kiu. Instruisto. Lerneja instruisto, kiu ne povis esti flatulo kaj postaĵlekulo, sed kiu volis esti sincera viro. Lernejinstruisto, simpla lernejinstruisto, ankoraŭ nun. Sed pli poste, kiam estos paco en la lando, paco pri la tiranio kaj la diktatoro, se vi ĉiuj havos teron, kaj liberon, tiam mi sukcesos instrui je la universitato la novan homon. Tial mi estas nun ĉi tie kun vi, ĉar mi ne povas kliniĝi, kaj ĉar mi ne povas saluti tiun, kiun mi malestimas; kaj ĉar mi volas havi liberon por vi kaj por mi. Ja fidu min, tio ne estas libero, se oni devas saluti tiun kaj tion, kion oni ne povas saluti; kaj tio ne estas libero tie, kie oni ne rajtas diri tion, pri kio oni pensas, ke ĝi nepre estu dirita. Por vi la tero, kiun vi kultivas. Mi ne

celas teron. Mi volas nur instrui. Mi volas havi nur la liberon instrui tion, kion mi pensas saĝa kaj ĝusta.“

„Sed, *hombre!*“ diris Andreo entuziasme, irante renkonte al Martin kaj kaptante manon de li. „Tio estas ja tio, kion ankaŭ mi celas, kaj pri kio mi ĝis nun neniam konsciis, ke ankaŭ mi celas tion. Precize la sama. Ja neniuj diris tion iam al mi, ke ankaŭ mi celas tion. Mi tiom ĝojas, ke vi diris ĝin al mi.“

Martin skuis la etenditan manon de Andreo. „Vi plaĉas al mi, *muchacho*. Do, Andreo vi estas. Vi estas multe pli juna ol mi. Mi certe duoble tiom aĝas. Sed tio ne ludas rolon ĉikaze. Mi pensas, ke ni estos bonaj amikoj.“

„Tion mi esperas, Profesor.“

„*Si, buen, amigos, muy buen amigos*, kaj tiom longe, kiom vi volos, amiko. Sed ni forgesu nun la belan. Nun ni estas en la batalo. Ni ne malvenku, bubo. Ni venku aŭ ni pereos. Vivi plu sub tiu homa hontego estus krimo kontraŭ la lando. *Ahora tu ers soldado y yo soy soldado, soldados de la revolucion*. Ambaŭ ni estos nun soldatoj

de la revolucio, nenio alia kaj nenio plu, nur soldatoj de la revolucio, kiu ne havas oficirojn kaj gvidantojn. Nur soldatojn. *Un abrazo, muchacho*, kaj tiam ni ekmarŝu.“

Tiumomente vokis Celso: „Nun ne estas tempo por longaj ĉirkaŭbrakoj. Tion vi povos fari pli poste. Ek do, por fari foje ordon en la administrejo. He, Modesta, venu ĉi tien! Vi marŝos nun ĉiam je mia flanko. Vi estas mia fidela *soldadera*.“

„Jes, certe, Celso, tio plaĉas al mi“, respondis la ino sen multaj vortoj.

„Por vi ni trovos la plej belajn vestojn en la administrejo. Kaj kiam ni tie havos ordon, ni transloĝigos Candidon kaj la knabon ĉi tien.“

„Tio fariĝos ja detala reordigo“, diris Martin Trinidad, paŝante apud Celso. „Mi unue foriros por elfosi mian revolveron kaj la kartoĉojn. Ĝi estas la plej bona *Automatic* en la tuta ĝangalo.“

Rimarkoj

Aŭtomatic = marko de revolvero

Un abrazo = unu ĉirkaŭbrako

Fajfante kriante jubile, vokante kaj kantante, marŝis nun la taĉmento, irante laŭ la planita ĉirkaŭvojo tra la laborejoj de la regiono al la ĉefurbo de la monterio.

Tri viroj rajdis sur ĉevaloj. Tri aliaj havis revolverojn. Du viroj rajdis antaŭ la taĉmento, kaj unu rajdisto sekvis la taĉmenton kiel endorsa protekto.

Pri plano kiel ataki la administrejon pensis neniu.

Ili fidis pri sia revolucia agoforto, kiu, se ne bremsite de palvizaĝaj fi-politikuloj, ankoraŭ neniam en la mondohistorio lasis en kaĉo aŭtentikan revoluciulon.

La marŝanta taĉmento kreskis pro la ĉirkaŭvojo je sesdek viroj.

Mankis ankoraŭ horo ĝis sunsubiro, kiam ili alvenis en aŭdodistanco de la administrejo. La multnombraj hundoj, kiuj troviĝis en la urbo, ekbojis kaj ekhurlis.

Don Feliks antaŭ duono de horo revenis de sia rajdista inspektado kaj trovis en la *oficina don* Severon, kiu venis por priparoli kun sia frato kaj la *capataces* la lastajn detalojn por la forflosigado.

Kiam ili aŭdis la bojadon de la hundoj, diris *don* Feliks: „Ĉe la diablo, kio okazas tie? Ĉu oni ĉi tie tute ne havas trankvilon por priparoli ion? Oni devus dronigi la tutan gregon. La hundoj utilas por nenio.“

La hundoj ekbojis eĉ pli laŭte, kaj *don* Feliks paŝis malvoleme en la portikon, prenis bastonon kaj ĵetis ĝin sur la ripojn de la hundoj, kiuj plej proksimis al la *oficina*. La hundoj ekhurlis mizere kaj kaŝiĝis, sed

senhalte graŭlis kaj bojis plu.

„Verŝajne tuj alvenos la turko kun sia karavano“, opiniis *don Severo*, kiam *don Feliks* revenis en la administrejon.

„Tio estas tute neimagebla“, diris El Chapaote, „li dronus en la riveroj. Ili tro alte ŝvelis. Verŝajne survoĵiĝis bovoj de la paŝtejo kaj venas nun ĉi tien, pro la murdomuŝoj.“

„Povas esti“, opiniis *don Feliks* kaj trinkis gluton.

„Chapapote, vi diris al la *capataces*, ke ili ĉivespere ĉiuj venu al la administrejo, ĉu?“ demandis *don Severo*.

„*Seguro, Jefe.*“

Don Severo kaj *don Feliks* ekokupiĝis pri la listoj kaj legis ilin atenteme por havi superrigardon pri la proksimuma kvanto de la multaj trunkoj, kiuj estis surtavoligitaj ĉe ĉiu el la multaj forflosigejoj.

Morgaŭ vi ricevos ĉi tie damne elegantan porkaĵorostaĵon“, diris subite *Feliks* al *don Severo*.

„De kie vi havas la porkojn?“

„De la chamulano, de kiu mi forprenis ilin.“

„Ha jes, de tiu kun la knabo kaj la ino, ĉu?“

„Tiun mi celis. Li estas en la nova kampadejo. La *muchacha* hodiaŭ matene eskapis de mi. Tiu friponino. Sed mi ankoraŭ kaptos ŝin.“

Don Severo ĝemis. „Tiuĵ inaĉoj, tiu diodamnita kanajlaro. Kiom da ĉagreno ni havas pro ili! La tri inoj ĉe mi ĉiutage kvinfoje interbatalas. Al unu el ili apenaŭ plu restis tufo da haroj, tiom da haroj la du aliaj elŝiris de ŝi. Unu el ili certe baldaŭ mortos kaj ni ree havos entombigon, ĉe Dio, damne. Kaj ĉio pro la karitato, ĉar ili ne scias kien turniĝi nun en la pluvotempo.“

„Karitato, ĉu?“ elkrevis de *don* Feliks. „Karitato. Ne provu ŝuti pistitan cinamon sur la rizon. Karitato, hahaha, mi tuj eklekos pro ridado.“

„Se vi scias tion pli bone, tio glitas de mi kiel pizo de la muro. Mi nomas ĝin karitato, kaj tion mi diros plu. Aŭ ĉu

vi eble pensas, ke mi ne scias, kio estas deco kaj civiliziteco? Ĝuste vi instruu tion al mi, ĉu? Vi ja eĉ ne ĝuste povus blovi vian nazzmukon en tuketon, la muko trairus tamen inter viaj fingroj. Kaj tamen vi volas diri ion al mi pri karitato. Donu la diodamnitan botelon al mi. Vi havas ĝin dum la tuta tempo je via kolo kaj mi pro vi malsekiĝu kaj haste kaptu aeron.“

Rimarko

seguro = certe

La *muchachos* haltis en sia marŝo, kiam ili ekvidis tra la arboj la unuajn kabanojn de la vasta placo de la administrejo. Unuopaj hundoj de la *ciudad*, kiuj supozis sin precipe kuraĝaj, saltis al ili. La hundoj, kvankam kutimiĝintaj al la viroj sentis laŭ sia instinkto, ke la virojn ĉirkaŭas io nekutima. Kutime iris la *muchachos*, se ili revenis de sia laboro, sen hezito kaj sen halti kiel kolektiĝinta grupo al siaj dormkabanoj. Tiu nekutima konduto estis la kaŭzo, kiu instigis la hundojn kondukti, kvazaŭ grego de sovaĝaj bestoj ekatakus la monterian urbon.

„Atendu ĉi tie mallonge je mi“, diris Martin Trinidad al la *muchachos*, kiuj staris plej proksime de li. „Mi nun elfosos mian mirinde belan *Automatic*, la kartoĉojn kaj la elegantajn magazenojn Ni certe tuj uzos la ĉarman aĵon.“

Daŭris nur kelkajn minutojn ĝis li revenis. Li tenis alte la pistolon kaj montris ĝin al la ĉirkaŭantoj. „Mi povus kisi la mitraleton kiel inon, tiom mi enamiĝis en ĝin. Kaj *por Jesu Cristo y la Virgencita*, mi ne povas fari ĝin alie.“ Kaj

efektive li ŝmace kisis la pezan kvardekkvin-kalibran tiel, kvazaŭ li volus manĝi ĝin pro volupto.

„Mi volus nur scii, ĉu ĉiuj *capataces* ĉi tie estas en la administrejo?“ diris Celso. „La kuiristo diris al mi, ke *don Severo* venis kun siaj *capataces*, ili hodiaŭ kaj morgaŭ volas fari la planojn por la forflosigado. Kion vi pensas?“

„Mi supozas, ke ili ankoraŭ ne ĉiuj kolektiĝis“, respondis Andreo. „Tiu de la nova kampadejo certe ankoraŭ ne estas ĉi tie.“

„Ŝajnas al mi, ke ili ĝuste alvenas tie malsupre, mi vidis alremi ilian *cayuco* de supre. Kaj, se mi bone rigardis, sidis en ĝi la *capataces* de la nova kampadejo“, diris Martin Trinidad kaj aldonis: „Oni povas erari pri tio neniam, ĉu ili estas *capataces* aŭ ne, pro la pantalonoj kaj ĉemizoj, kiujn ili surhavas.“

„Vicente!“ Andreo vokis al la junulo. „Vi kuras rapide, estas malgranda kaj korpe lerta. Vi iom ŝteliru antaŭen kaj atentu, kiam la *capataces* alvenos. Kaj kiam ili malaperos en la *oficinas*, venu al mi kaj raportu tion.“

La junulo foriĝis kiel kato caŝata de hundo. Martin Trinidad diris: „Ni foje interkonsiliĝu militiste. Vi, Juan, kaj vi, Lucio, estas ekzercitaj soldatoj. Vi prenu de ĉi tie dek *muchachos*, kaj tuj, kiam Vicente revenos kun la sciigo, vi komencu ĉirkaŭiri la ĉefadministrejon de la riverflanko, tiel, ke neniuj en tiu direkto povos fuĝi. Tuj pafu, se iu volos fuĝi, kaj pafu tiel, ke li ne plu faros paŝon sur tiu ĉi tero. Ni, la ceteraj, okupos la mezon de la placo antaŭ la *oficinas*. Je ĉiu pado, kiu enĝangaliĝas, estas nur tri tiaj, bone kaŝe posteniĝu du viroj en la densejo. Tuj, se *capataz* alvenos, kaptu lin. Ataku per viaj maĉetoj. Starigu vin tiel, ke tiukaze, se iu eskapos, li devos ektroni al la *oficinas*, kie li supozos trovi helpon. Li ja ne scios, kio okazas ĉi tie. Kaj ĉiujn *muchachos* revenantaj nun por manĝi, vi tuj retenu kaj sendu ilin en la mezon de la placo ĉi tien, kie estas ni.“

Vicente alsaltis: „La *capataces* estas ĉi tie. Ili ĝuste iras transen al la *oficina*.“

„Ek do!“ komandis Martin Trinidad al la malgranda grupo, kiu havis la komision malhelpi la evitadon de la okupatoj al la rivero kaj eble eĉ la fuĝadon per *cayuco*.

La proksimaj hundoj ĉesis boji, kelkaj sekvis la trupon, kiu foriris por okupi siajn postenojn.

La *muchachos* de tiu borda trupo grimpis ankoraŭ en viddistanco de la unuaj kabanoj malsupren de la borda deklivo kaj iris laŭborde ĝis la alto apud la *oficinas*. Tie ili grimpis supren la deklivon, disvastiĝante sur longa linio. Ili rampis preskaŭ ĝis la supra rando, kie ili ŝovis la kapojn super la deklivon nur tiom, ke ili povis vidi la placon kaj la konstruaĵojn. Kiam ili trovis sian pozicion laŭorde, Secundino aŭdigis la plendantan vokon de kojoto – kaj tiel lerte, ke sur la placo kelkaj hundoj lasis tenti sin ekkuregi kiel fulmo por ĉasi la laŭŝajnan kojoton.

„Ili okupis siajn postenojn“, diris Celso. Li diris ĝin sen precipa ekscitiĝo, sed liaj okuloj kaj naztruoj pruvis, ke lia pumpanta koro batas forte, tiel, kiel al ĉiuj aliaj.

Nek li nek iu alia el la *muchachos* iam en sia vivo ribelis aŭ nur kontraŭdiris ion al sia mastro, ja eĉ ne gardis la vizaĝon perbrake, se oni bategis transverse sur ĝin per vipo. La mastroj, la *cachupines*, la hispanoj, la ladinoj kaj *chinos blancos* kaj la germanaj kafoplantistoj estis la dioj, kies volon rezisti estis tiel nenatura al peonoj, al indiĝenoj, ke ili eĉ ne povis pensi tian agon. Se ili ion tian, kian kontraŭon entute kuraĝis diri, tiukaze estis nenio alia krom humila petado pri kompato pri nemeritita graco. Ekzistis nur dioj kaj mutaj servistoj. Kiel sub ĉiu alia diktaturo, estis tiel des pli tie, je unu flanko profundigita per rasomalestimo kaj rasoglorigo kaj aliflanke pro kvarcent jarojn daŭrinta brutale entreprenita subigo de ĉia sopira aludo pri edukado. Kiu ne estis dio, povis esti nur obeema sklavo. Inter ambaŭ klasoj ne estis aliaj estaĵoj, escepte eble de bonaj rajdoĉevaloj.

Sed kiom ajn brutale kaj senkomplete homoj estas

subigitaj, kiom ajn eble sukcesas stultegigi ilin per pompaj diroj, per la svingado de buntaj flagaĉoj kaj per la tondrado de timbaloj kaj tamburoj, oni ĉiam kaj ĉie atingas limon, kie nek perforto nek brutaleco nek dia majesto, nek promesoj nek glorado de herooj havos plu iun sukceson. Ĉar la vivo fariĝis senvalora; ĉar la homo, kiom ajn aĉe li eble pensas pri si mem, tamen pli postulas de la vivo ol nur manĝi kaj naski kaj labori por la dioj kaj por tio eĉ devi flate laŭdi ilin kiel idolojn. Se la subigito kaj torturato eksentas, ke lia vivo fariĝis tiom besta, ke ĝi ne povus fariĝi pli besta, tiam la limo estas jam trapasita kaj la homo perdas ĉian prudenton kaj agas kiel besto, por regajni sian homan indon.

Kio tie okazis, kaj kio sub samaj cirkonstancoj ĉie surtere okazas aŭ devas okazi, ne estas metebla sur la fakturon de la *muchachos*, sed sur la fakturon de tiuj, kiu kreis tiujn rilatojn kaj al kies bonfarto tiuj rilatoj estis favoraj. Ĉiu vipobato sur homon estas sonorilegobato, kiu anoncas la pereon de la potenco, sub kiu tiu vipobato estas farita. Veon al la skurĝitoj, kiuj povas forgesi batojn! Kaj trifojan veon al tiuj, kiuj ne batalas por tio venĝi la batojn.

Rimarko

chachupines = hispanoj, hidalgoj

Ĉapitro 13

01

Kvankam al ĉiuj *muchachos* subite la gamboj fariĝis pezaj, kiam ili eksentis, ke nun venos tuj la vorto por la sturmo antaŭen,.tamen ĉiuj havis la saman opinion, ke neniuj retroevito plu eblus. La pontoj post ili estis forrompitaj. La murdigo de la tri *capataces* lasis al neniuj plu iun alian vojon malferman krom tiun,.kiun ili devis iri. Ĉu al la venko, ĉu al la perejo – tio ne plu estis la temo. Ili devis marŝi, egale kien ili iros, kaj egale kiel kaj kie finiĝos la sturmo.

Tial la strange kunprema kaj glutiga sento, kiun ili ĉiuj havis, kelkaj en la stomako,.kelkaj en la gorĝo, aliaj ankore, daŭris nur kelkajn sekundojn.

Kiam Celso laŭte vokis: „*Adelante, rebeldes!* Antaŭen, ribeloj! *Tierra y libertad!*“ ili ne plu iris, sed saltis antaŭen kiel gregoj de sovaĝaj ĉevaloj, sed ne kvazaŭ oni ĉasus ilin, sed multe pli kvazaŭ ili kurus kiel soifantoj al akvo, kiun la plej antaŭaj en la sama sekundo iel ekflaris.

Sen scii tion kaj sen intenci tion, ili gajnis per tiu atakema sturmado jam duonon de la batalo. Se ili estus alvenintaj lante, *don Severo* kaj *don Feliks* pensus, ke la *muchachos* venis al ili, ĉar okazis io eksterordinara, eble tertrarompigo kun la malapero de certa kvanto de viroj aŭ subgrundiĝo de rivereto, kiu estis grava por la forflosigado aŭ la neatendita derompigo kaj ekdrivo de alte tavoligita amaso da trunkoj, aŭ la apero de grupo de jaguaroj en unu el la kampadejoj. La Montellanoj tiukaze komencus paroli kaj demandi, kio okazis. La *muchachos*, kiuj ne kutimiĝis pri parolado, kaj eĉ malpli ekzerciĝis pri intertraktadoj aŭ eĉ interkonsiliĝoj kun la patronoj, ekkonfuziĝus kaj ne sciis, kion diri, kion postuli kaj kiel postuli. Ĉu la fino estus alia, tio tamen pridubindus. Ili estis en situacio, en kiu nenio alia plu akcepteblis krom la libero.

Don Severo staris en la pordo, kun la dorso al la libera placo, kaj parolis en la administrejon. Kiam la *muchachos* vokante kaj kriante sturmis sur la placon, li turniĝis al ili, sed komprenis, ĉar ili parolis plej ofte indiĝene, nur kelkajn vortojn kaj frazojn.

„*Por Dios*, kio tio estas?“ Li vokis tion ne al la *muchachos*, sed al sia frato kaj al la *capataces* en la *oficina*, kiuj ĝuste celebris „sian lastan unktadon“ antaŭ la vespermanĝo kaj ankoraŭ tenis la glasojn enmane.

Don Feliks kaj ĉiuj *capataces* per unu salto rapidis en la portikon.

Don Severo paŝis ĝis proksime de la balustrado kaj vokis: „Kio do estas? Kial vi ĉiuj venas ĉi tien? Vi ankoraŭ devus labori dum horo. Ankoraŭ ne malhelas.“

„*Perro!* Fi-hundo!“ vokis iu el la amaso.

„*Cabron!* Putinido!“ kriis alia.

„*Que chinguen todos sus madres, cabrones!*“

Poste la kriado kaj vokado fariĝis ĝenerala, preskaŭ sen tio, ke certaj vortoj plu estis kompreneblaj. Sed tio, kio ankoraŭ orele kapteblis, estis ĉiam teruraj insultvortoj de la plej fia speco.

Don Severo turnis sin parte al la *capataces* kaj demandis:

„Kio ekscitas ilin?“

„Hundofikulo! Porkofikulo! Azenfikulo!“ La vokoj kvazaŭ ekhajlis. La *muchachos* ne tre proksimiĝis al la ĉefkonstruaĵo, kie la viroj staris nun ĉiuj unu apud la alia ĉe la balustrado de la portiko.

„Ĉu vi denove faris ion nedecan?“ misfideme demandis nun *don Severo* sian fraton.

„Tute nenion. Kion mi estu farinta nedecan? En la lastaj tagoj ni pendumis neniun kaj neniun skurĝis. Ekde la entombigo de Cacho, kiam vi diris, ke ni traktu ilin iom pli indulge, ni fitraktis neniun plu.“

Pri tio diris El Faldon: „*Con su permiso, Jefe*, kio estas pri la chamulano kaj ties knabo, mi pensas, ke li nomiĝas Candido aŭ simile, ĉu?“

„Ĉu tiu? Li eskapis. Sed oni ne pendumis lin. Ankaŭ ne skurĝis lin. Cetere, li tute ne estas ĉi tie. Li estas en la *campo nuevo*.“

„Sed jen lia fratino“, diris El Faldon.

„Kial koncernu min lia kota kaj pedikohava fratino? Al tiu mi damaĝis neniel. Tiu hodaŭ matene forkuris. Bone. Sed kial tio koncernu min?“

„Tiukaze mi, ĉe ĉiuj sanktuloj, ne scias, kion ili ĉiuj celas ĉi tie.“ *Don Severo* staris dum certa tempo kaj ĉirkaŭrigardis. „Damne kaj fajfite je tio, ĉe la virkapra sako kaj ovoĵ, jen endorse ni havas ja pluan tian bandon!“

Li ekrigardis la virojn, kiuj venis de la deklivo kaj fermiglis la malantaŭan fuĝvojon.

„Mi pensas, *Jefe*“, diris *El Chato*, ke io ne estas en ordo.“

„Tenu fermita vian fi-buŝon, azeno kaj ŝtipkapulo, tion mi ja vidas mem, ke io ne estas en ordo. Se la fi-porkuloj nur ne tiom idiote kaj konfuze vokus kaj fine iu dirus ion, kion kristano povus kompreni. Mi aŭdas ĉiam nur *cabrones* kaj *chingados*.“

„Tio estas ĝuste la suspekta“, interrompis lin *don Feliks*.

„Ili certe celas ĉi tie kelkajn *capataces*. Al ni la *muchachos* neniam parolus laŭ tiu maniero. He!“ Li turnis sin al la *capataces*: „Ekparolu! Kiu tiurilate faris

sian propran kaĉon? Centmilfoje mi diris al vi, ke vi lasu ties inojn en paco, se ili havas inojn.“

El Faldon serĉadis inter la *capataces*. „Sed kie estas El Doblado? Tiun mi ne vidas.“

„Lasu lin en paco. Tiu certe estas survoje por veni ĉi tien“, respondis El Chato.

„Kial vi tiel suspekte demandas pri El Doblado?“ Don Severo turnis sin al El Faldon.

„Li havis certan intencon pri ino, kiun *muchacho* kunprenis ĉi tien. Li ĵetis ŝin sur la litorandon, perforte.“

„Tiukaze okazas tute ĝuste al la fiulo, se ili mallongigas lian amorilon. Li lasu la inojn en paco. Estas ja sufiĉe da putinoj ĉi tie ĉemane, tiel, ke ĉiu povas havi sian plezuron.“

Don Severo levis manon kaj atendis, ke la *muchachos* tuj eksilentos, ĉar li volas paroli.

Sed lia bela manleva gesto perdis sian magian efikon. La *muchachos* kriegis nur des pli laŭte.

„Hundido, putinfilo, porkofikulo, rajdisto de kojoto, mangolekulo.“ *Don Severo* eksentis kiel la propra gesto fariĝis ridinda. Ĝi ŝajnis al li subite infaneca kaj malserioza. Li apogis ambaŭ manojn sur siajn koksojn kaj ŝovis dum tio sian bruston antaŭen, kvazaŭ li volus komenci gigantan paroladon.

Ununura krio sonis kontraŭ li: „*Abajo los cachupines! Al fierno los ladinos!* La hispanojn for, la *patrones* foriĝu inferen!“

Don Severo perdis nun je la unua fojo la koloron en la vizaĝo. Li rigardis al sia frato, kiu lante retroevitis al vando de la domo. Li rigardis dekstren kaj li rigardis maldekstren kaj rimarkis, ke ĉiuj *capataces* turniĝadis

kiel vermoj kaj provis atingi unu el ambaŭ malfermitaj pordoj, kiujn la domo havis ĉe tiu flanko.

Sed *don Severo* ne retroiris. Li restis staranta antaŭ la balustrado, kiu finiĝis en la alto de lia zono. Kelkajn fojojn li malfermis la buŝon kvazaŭ li volus ekparoli. Tiam li subite ne plu sciis, por kio li uzu siajn brakojn kaj manojn, ĉar li rapide movis ilin laŭ sia korpo sen scii, kie lasi ilin. Finfine li ŝovis ilin ambaŭ antaŭen, tiel metante unu manon sur la alian, en la mezon sub la ventro. Aspektis tiel, kvazaŭ iu *Venuso* volus gardi ion, kion la artisto ne povis fiksi sur ŝi, ĉar mankis al la artisto la kapablo fari ĝin kiel la naturo. Pro tiu pozo aspektis *don Severo*, ĉar li estis ja tuta viro, eksterordinare ridinda – kiel embarasita lernanto, kiu estis malkovrita je sola plezuro. *Don Severo* sentis pluan fojon, kiel senhelpa li aspektas kun tiu pozo, kiam unu el la viroj kriis: „Tenu lin firme, putinfilo, por ke ĝi ne forflugu de vi.“

Brua ridado de la *muchachos* sekvis; unu el ili superkriis ĝin per la rimarko: „Ĝi ne forflugos de vi, *cachupin*. Vi ne plu bezonos ĝin hodiaŭ nokte.“ Kaj alia tiel laŭte, kiel iel eblis, kriegis interen. „Vi ne plu bezonos ĝin, vi estos tiam

tro frida.“

Lastfine *don* Severo sukcesis kapti momenton de aŭdateco. Li vokis: „Kion vi do celas, *muchachos*?“

„Ni iros hejmen! Ni ne plu laboros! Ni volas havi liberon! Ni liberigos ĉiujn peonojn en la bienoj kaj ĉiujn *muchachos* en ĉiuj monterioj! *Tierra y Libertad!*“ Ĉion tion ili vokis sovaĝe pelmele. Nur ĉe la lasta voko unuiĝis ĉiuj voĉoj.

Nun *don* Severo tute paliĝis. Li retroiris duonon de paŝo, turnis la kapon al sia frato kaj diris: „Nun mi scias, pri kio temas. Jen la krio, kiun havas la revoluciuloj. *Tierra y Libertad!* Legeblas tiel en la leteroj, kiujn ni ricevis. Ĉe la diablo, kiun ni do ricevis ĉi tie, kiu poste ĉion subfosis? Neniu el niaj *muchachos* aŭdis tion antaŭe. Ili ne ricevas leterojn kaj gazetojn. Devas esti iu, kiu scias legi.“

„Certe Andreo, unu el la *boyeros*“, diris ne tre laŭte El Chato.

„Tiu ne estas“, obĵetis El Faldon. „Li estas trankvila kaj forlaboras por sia patro la ŝuldojn. Mi pensas. ke li estas

tiu, kiu havas la inon el Chamula je sia flanko. Celso li nomiĝas. Li estas la plej impertinenta ĉi tie. Oni apenaŭ povus batadi lin. El Gusano diris al mi, ke li supozas, ke estas Celso, kiu nokte ĉiam kantas malantaŭ li kaj El Picaro. Cetere, kie estas El Gusano?“

Ĉiuj turniĝis malantaŭen, serĉante ĉiun alian.

Don Feliks malfermis la buŝon. Raŭke li diris: „Jen mankas ja du el la *capataces*.“

„Tri el ili“, plibonigis El Faldon.

„*Oiga, Muchachos!*“ vokis nun *don* Severo, metante sian tutan spirforton en sian voĉon: „Aŭskultu, buboj, vi forflosigu ĉiujn trunkojn, kaj, kiam ili ĉiuj estos forflosigitaj, vi rajtos iri hejmen. *Palabra de honor!* Je mia honoro!“

„Ni fekas sur vian diodamnitan honorvorton. Ĝi sufokigu vin, hundido!“ kriis kiel la unua Celso, per sia fortika voĉo supersonante la tumulton. La voko sonis kiel trumpetblovo, kiu hastis balaante trans la placon. Kaj poste li profunde enspiris kaj hele eltrumpetis: „Fekon

sur viajn diodamnitajn trunkojn! Per viaj malbenitaj *trozas* ni hejtos al vi la inferon, bestaĉo, fi-jaguaro. Kvar toneladojn, ĉu? Kvar toneladojn, ĉu? Elgratu ilin per viaj putinaj ungegoj, putinfikema *cachupin* kaj hundido de vila putino!“

Tio estis tro por *don* Severo. Se estus eble, li estus tuj diskrevinta, tiel kolerege ruĝa li fariĝis survizaĝe, kiam li kriis: „Laŭskovrita kota bastardo, nomata laŭsmanga chamulano, tion vi kuraĝas diri al patrono via? Ĵetigu vin sur viajn pusajn genuojn detruitajn de ostmoliĝo, hundido!“

Dum li ankoraŭ elkriante elsputis la lastan duonon de la frazo vorton post vorto, por doni al ĉiu sono kiel eble plej grandan efikon, li samtempe eltiris rapide la revolveron kaj pafis sur Celson. Celso kliniĝis kiel fortranĉite. Sed samtempe hajlis certe almenaŭ deko da ŝtonoj sur *don* Severon, ĵetitaj de la *muchachos*, kiuj, vidinte eki ties koleran vortkanonadon, tuj sciis, per kiu heroa gesto li finos sian sakran paroladon. Ĉar pluraj ŝtonoj trafis lin duonon de sekundo pli frue ol li povis ekmovi la ĉanon de sia „mitralo“, la pafilo perdiĝis alte super la *muchachos* en

la arbokronoj de la praarbaraj gigantoj, kiuj ĉirkaŭis la vastan placon.

Don Severo, renversita de la trafintaj ŝtonoj, kuŝis sur la planko de la portiko. Sed li ne estis obtuzigita. Des malpli li rezignis pri tio batali. Li tratiris denove la ĉanon kaj la pafo trairis la latojn de la balustrado.

Ĉu li trafis iun aŭ ĉu li trafis iun per la pluaj pafoj, kiujn li ekirigis, li ne sciis.

Dum la malmultaj sekundoj, kiuj sekvis post la unua pafo, ĉio okazis tiel rapidege, ke li sciis precize nur tion, ke li pafis sepfoje per sia *Automatic*. Kaj eĉ tion li sciis nur tial, ĉar li havis sep kartoĉojn en la magazeno kaj tiam subite la kartoĉujo falis malsupren.

Sed kiam tio okazis, la *muchachos* ankaŭ tuj poste estis en la *oficina*. Ili sturmis grupope enen, ekde la placo kaj ekde la deklivo. Neniu el ĉiuj tiuj, kiuj havis revolveron, pafis eĉ nur unu pafon. Per kugloj ili ne kapablis trankviligi sian eksciton. Ili batadis tiom longe sur la *capataces* per ŝtonoj kaj pugnoj, ĝis tiuj estis nur

ununura bulo. Kaj tuj, se iu renversiĝis, ili saltis sur lin kaj tretadis perpiede sur iliajn vizaĝojn kaj la ripojn, tiom longe, ĝis la korpoj ne plu moviĝis.

Kiam la *muchachos* sturmis ĝis la *oficina*, la ununura, kiu eltiris revolveron, estis *don* Feliks.

La *capataces* sekvis fidele la malnovan saĝon: „Se li havas la potencon, li ŝprucigas batojn bestaĉe; sed se la vento turniĝas kaj la potenco transiris al la viktimo, li plenigas sian pantalonon fekkaĉe.“ Kiel ĉasataj ratoj ili kaŝiĝis en la *oficina*, trarompis la pordojn kaj provis, eĉ sen nur tuŝi siajn revolverojn, eskapi al la ĉevaloj. Ili provis tion. Sed neniuj sukcesis. Eĉ ne unu el ili trovis iun *muchacho*, kiu helpus. Oni disstamfigis kaj distretadis ilin ĝis iliaj korpoj estis kvazaŭ kaĉo. Tion, kio postrestis, la *muchachos* tiris kaj trenis reen al la *oficina*.

Poste kelkaj *muchachos* vagadis kaj pelis hundojn kaj porkojn al la *ofina*, en kiu kuŝis la kaĉigitaj *capataces*. Kiam ili kunhavis sufiĉe da hundoj kaj porkoj en ĝi, ili riglis kaj fiksis la pordojn tiel, ke la bestoj ne povu fuĝi kaj kontentigi sian malsaton ekstere.

Don Feliks eltiris sian revolveron kaj li sukcesis pafi en gambon de *muchacho*. Sed en la sama momento la *muchacho* jam saltis al li, lin kroĉante ĉirkaŭbrake tiris teren. La dua pafo kaptiĝis supre en la plafono. Kaj tio estis la lasta pafo, ĉar tuj la *muchacho* post luktado forprenis la *Automatic-on* de li. La venkinto saltis supren, svingadis la pistolon super si en la aero kaj vokis: „Nun ankaŭ mi havas pistolon, kaj eĉ unu el plej belaj.“

Don Feliks malrapide provis surpiediĝi kaj rampis dum tio al la angulo formita el mallonga vando de la portiko kaj vando de la konstruaĵo.

Sed la *muchacho*, kiu forprenis la pistolon de li, saltis per unu fojo reen sur lin, tiel, ke *don* Feliks kvazaŭ ŝtopite estis premita en la angulon.

Per sia maldekstra mano la *muchacho* tenis la gorĝon de *don* Feliks kaj sian dekstran, kiu firmkroĉiĝis al la pistolo, li levis nun, por ke li povu bati per sia tuta forto sur la kranion de *don* Feliks.

La unua bato ne trafis bone, ĉar *don* Feliks kun la brako,

kiun li povis liberigi, retenis la baton.

Sed kiam la *muchacho* nun duafoje levis manon, kriis iu malantaŭ li: „*Hermano mio, manito!* Ho, frato, frato mia, ne mortbatu lin!“

Capitro 14

La viro turniĝis kaj vidis stari Modestan je kelkaj paŝoj post si.

En la sama momento alvenis Celso, kiu ĵus helpis ĉe tio tute fermi la pordojn de la *oficina*, kie la hundoj kaj porkoj komencis brui. Li paŝis proksime al la dorso de Modesta. Nur dum sekundo lia vizaĝo montris certan ekmiron. Tiam li ŝajne ekkomprenis. Ŝi estis ja de lia raso kaj de lia tribo. En la sango li sentis, ke Modesta agis kiel ordonis tion ŝia praa instinkto pri justeco kaj harmonio pri ĉio ĉi, kio estas kaj okazas surtere.

„Frato, frato mia! Ne mortbatu tiun viron!“ ŝi vokis denove, kiam la *muchacho* ankoraŭ tiam sidis sur sia viktimo kaj ekhezitis. En la krio de la ino troviĝis forta tono de ekstazo tia, kian aŭdas tiuj viroj nur malofte.

Dum sia ĉiutaga vivo, dum sia tiom dura batalo pri kaj kun la estado, ĉu tie en la monterioj ĉu en la bienoj ĉu en iliaj sendependaj vilaĝoj estis eksplodoj de ekstazo pli maloftaj ol eĉ riĉa manĝo. Kaj riĉaj manĝoj estis tre raraj.

Pli kaj pli da viroj, fininte aliajn „ordigojn“ intertempe venis en la portikon, kiu plenigis sin tiom rapide, ke la postsekvaj *muchachos* devis restadi ekstere, ĉar en la portiko ne plu estis loko.

Modesta staris ankoraŭ tie, je precize la sama loko, de kie ŝi faris la unuan vokon. Tio estis en la mezo de la longa portiko, kiu troviĝis ekstere de la *oficina*, sed kiu etendiĝis tute kovrita de la tegmento kaj en kiu kutime la *patrones* kaj *capataces* balanciĝis en siaj hamakoj aŭ kartludis, se ili ne havis urĝan laboron, plej ofte dum la varmegaj tagmezaj horoj, sed ĉiam vespere. Ofte ili eĉ dormis en la portiko en la hamakoj aŭ sur la krudaj litoj, kiuj, se ne pluvis, aŭ se la noktoj ne tro fridis kaj nebulecis, estis metitaj tien en la koridoron. Ke ili ne ĉiam dormis en portiko, aŭ tie aŭ en unu el la *oficinas* aŭ en unu el la bangaloj, havis diversajn kaŭzojn. Parte pro la gravaj malsanigaj nebuloj de la nokto aŭ de la frua mateno. Krome pro la vagado de hundoj, porkoj, jaguaroj, pumoj, serpentoj aŭ ĉiuj ajn aliaj bestoj, inklude de vermoj de la ĝangalo, kiuj sufiĉe ofte molestis la dormantojn en portiko.

Inter Modesta kaj la angulo, en kiu *don* Feliks kaŭris buliĝinte, kaj kie la *muchacho* kaŭris sur li, troviĝis krome neniuj aliaj. Ĉiuj aliaj *muchachos* kunŝoviĝis malantaŭ ŝia dorso aŭ staris tie en densaj grupoj ekstere de la portiko ĉe la dekstra flanko.

Ekde la momento, kiam Celso ordonis ekmarŝi, ĝis la momento, kiam *don* Feliks kaŭris en la angulo, defendante sin per siaj brakoj kontraŭ la atako de la *muchacho*, pasis nur ĉirkaŭ tridek minutoj. Estis ankoraŭ hela tago, mankis tridek minutoj ĝis sunsubiro. Sed la ĉielo estis kovrita kaj certe atendeblis denove grava pluvego en la nokto.

Modesta ankoraŭ nun ne portis ion sur sia korpo krom ambaŭ disŝiritaj ĉemizoj, kiujn Celso povis doni al ŝi. Ŝi estis nudapieda. La ĉemizojn ŝi volvis ĉirkaŭ la korpon tiel, ke ili lasis liberaj ŝiajn gambojn ĝis supren al la koksoj. Por povi uzi tiujn ĉemizojn kiel veston, ŝi devis ja meti kaj faldi ilin laŭ la sama maniero kiel faras tion la najbaroj de ŝia tribo, la indiĝenoj de Vitstan.

Ŝiaj piedoj kaj gamboj estis disgratitaj kaj kovritaj per

centoj de sange krustigitaj vundoj, kiujn la knabino ricevis, kiam ŝi kuregis kiel sovaĝulino tra la ĝangalo. Ŝiaj brakoj, nudaj ĝis la ŝultroj, same kovriĝis de gratitaj krustaj vundoj, tiel, kiel ŝiaj gamboj, kies karno estis dura kiel firma korko. La ĉemizaj ŝiraĵoj estis supre volvitaj ĉirkaŭ la mamojn tiel, ke ili apenaŭ kovris ŝiajn junajn etajn mamojn, sed lasis liberaj la ŝultrojn ĝis la unuaj delikataj randoj de la mamoj.

Ŝia longa, profunde nigra kaj dure vilaa hararo pendis kaose de ŝia kapo. Ĝi estis tute taŭzita kaj aspektis tiel, ke horoj de plej zorgema kombado necesus por reordigi la hararon. Sed kun la pakaĵoj, kiuj perdiĝis dum la malĝojiga *cayuco*-transveturo, ankaŭ foriĝis ŝiaj kombiloj kaj rubandoj. Ŝi ankoraŭ ne povis akiri novan kombilon. Ŝi intencis tiumatene pruntepreni kombilon de la kuirista edzino aŭ pruntepreni ĝin de unu el la edzinoj de la metiistoj. Sed antaŭ ol ŝi povis fari tion, ŝin atakis *don* Feliks.

Modesta ne estis alte kreskinta, ŝi havis nur la kutiman alton de la inoj de ŝia raso. Sed ŝia korpo estis bele formita, tre harmonia kaj sammezura rilate la membrojn.

Tial ŝi aspektis pli alta ol ŝi efektive estis, kaj se ŝi staris inter la inoj de sia tribo, ŝi apartenis al la plej grandaj.

Tie inter la viroj ŝi tamen aspektis okulfrape knabineca. Sed kiam ŝi elkriis tiun vokon, ŝi kreskis en rimarkinda maniero. Eble ŝi senintence starigis sin sur siajn piedfingrojn por doni al sia krio la plej grandan efikon, por ke la *muchacho* estu malhelpata de sia ago. Kaj kun ĉiu plia frazo, kiun ŝi nun vokis, ŝi leviĝis denove sur siajn piedfingrojn kaj donis tiel al sia figuro eksterordinare efikan fortan aspekton, pri kio ŝi certe ne estis konscia.

Dramaj gestoj, kiuj intence celas iun efikon, estis al la indiĝenoj en tiu regiono tute nekonataj. Ili estas fremdaj al ilia karaktero, kaj tiel fremdaj, ke verŝajne daŭrus monatojn antaŭ ol oni povus sukcese instrui tian geston al ili.

Sed ĉio, kion Modesta nun diris, kaj kiel ŝi diris tion, estis tiel drame, ke ĝi profunde traskuus eĉ neindiĝenon, se tiu ĉeestus la okazaĵon. Des pli traskuige kaj pli drame ĝi efikis, ĉar kaj al Modesta kaj eĉ pli al la *muchachos*, kiuj tie ĉeestis, mankis eĉ la plej eta sento pri dramefikoj, kaj

eĉ pli tial, ĉar ŝi mem kaj ĉiuj aliaj tute ne intencis atingi iun dramefikon.

En tiu regiono, inter tiuj ofte batitaj, sklavigitaj kaj ĉifonitaj homoj spite al ĉiuj tiuj cirkonstancoj diri, ke Modesta tie staris en la portiko kiel diino el greka tragedio, kiu elpuŝis fanfaran krion de nepacigebla venĝo aŭ kiu kun voĉo, kiu supersonas la murmuradon de la maro, elkriegas sakron en la vastojn de el' universo, kiu timigas diojn, tio aperus en tiu loko kiel tute nedeca komparo. Kaj tamen: neniuj alia komparo ol tiu menciita kapablas pli bone priskribi, kiun efikon Modesta kaj ŝia parolo havis tie al la kolektiĝintaj viroj. Estas ne ĉiam nur la vortoj kaj la gestoj, kiuj havas certan profundan efikon, sed multe pli ofte la cirkonstancoj, dum kiuj tiaj vortoj estas dirataj, kiuj atingas grandajn kaj neatenditajn efikojn.

La indiĝena ino parolas malmulte kaj malofte al viro, kiu ne estas ŝia edzo, ŝia patro aŭ ŝia filo. Paroli kaj eĉ laŭte al multaj viroj, el kiuj ŝi konas nur kelkajn, estas tiom kontraŭ ŝia naturo, ke ŝi, se ŝi estus devigita al tio, preferus morti. Ŝi mortus pro honto aŭ pro koratako, se ŝi

eĉ nur pensus pri tio, ke tiom da okuloj de viroj rigardas al ŝi, kaj speciale al ŝia buŝo. Kompreneble, la inoj, kiuj jam dum generacioj vivas en la urboj, kiuj frekventas altlernejojn kaj universitatojn aŭ akiris kiel sukcesaj negocistinoj respekton, parolas same tiel nekonvencie kiel usona komunistino. Sed tiajn inojn tiuj simplaj kaj tute laŭnature simplaj indiĝenoj tie ne konas. Ili neniam vidis tian inon, kaj neniel aŭdis tian publike paroli, kaj laŭ ilia tuta karaktero ili apenaŭ povus imagi tian inon.

Ke tie timida knabineca ino, ĝis nun apenaŭ atentata de la viroj, apartenanta al ilia tribo kaj plenkreskinta en ties kutimoj kaj moroj, ĉifonvestita kiel ili, pedikohava kiel ili, kota kiel ili, humiligita kaj servutuligita kiel ili, en la ĉeesto de la patrono, de tiu dio, kaj samtempe vidalvide al ĉiuj tie kolektiĝintaj *muchachos*, forgesante ĉiun honton, timemon kaj timon, farus longan fanfarecan paroladon, ja efektive kapablus paroli ĝin, estis por la viroj io tiel neimagebla, ke tiukaze, se ili estus historiaj verkistoj aŭ baladopoetoj, ili tiun okazaĵon certe glorus por estontaj generacioj en libroj, legendoj kaj kantoj, kiel unu el la plej gravaj okazaĵoj de sia popolhistorio.

La parolado de Modesta estis ne nur bone metita, ĝi estis ankaŭ distrumpetita sen eĉ unu interrompo. Sed neniu el la *muchachos* povis scii, ke Modesta kvazaŭ enfosis tiun paroladon en sian animon kaj koron laŭvorte ekde tiu horo, kiun ŝi rigardis kiel la plej malĝojigan en sia vivo, kaj kiun ŝi ĉiam rigardos kiel sian plej malĝojigan, tiom longe, kiom ĝi vivos. Eĉ ne per unu penso ŝi pensis pri tio, ke la okazo por tia parolado venos tiom rapide kaj neatendite.

Modesta tute ne konsciis pri la efiko de la parolado, kiun ĝi havis al la *muchachos*. Ŝi parolis, ĉar ŝi ne plu longe povis silenti, ĉar la sentoj en ŝi superfluis kaj ŝin per unu fojo levis super sin mem. Ŝi parolis kvazaŭ ŝi troviĝus en sonĝo. Kaj certe povis okazi en tiu momento, ke tiukaze, se ne aplaŭdus ŝin jesigaj vokoĵ de la *muchachos*, sed interrompus vortoj, ŝi kvazaŭ vekiĝus el sia sonĝo kaj ne povus paroli plu.

„Ne mortbatu tiun viron!“ ŝi vokis trian fojon! „Ĉar mi devos havi lin vivanta. Vivanta mi devos havi lin, por ke mi povu vivi plu.“

La *muchacho*, kiu tenis genuon sur *don* Feliks, nun tute rektiĝis, retiriĝis de sia viktimo kaj retroiris heziteme paŝon post paŝo ĝis proksime de Modesta. Li rigide rigardis al ŝiaj okuloj. Sed Modesta ne vidis lin. Ŝi gapis nur al *don* Feliks, kiu, kvazaŭ li atendus de la ino atakon, ankoraŭ pli profunde premiĝis en la angulon ol li jam faris. Li tute rampis en sin mem, tiel, ke oni plu povis vidi nur lian kapon kaj liajn larĝajn ŝultrojn.

La *muchacho* forŝteliĝis preter Modesta kaj miksiĝis inter la aliajn, kiuj pli kaj pli proksime ŝoviĝis al la portiko, sed restadis tamen brakolongon for de ŝia dorso.

Modesta levis sian dekstran brakon, etendis ĝin al *don* Feliks, kaj montrofingre ŝi gestis al lia vizaĝo.

„Vi! Vi! Fi! Ke vi sendis mian fraton kun ties knabo en la nokto kun ebriulo laŭflue de la rivero kaj la malgranda knabo dronis, kvankam mia frato petis vin ekveturi nur matene, tion mi pardonas al vi!“

La virojn ekregis embarasiga silentado. Ili ne komprenis, kion celis la knabino. Kelkaj fariĝis maltrankvilaj kaj

flustris la sekvan: „*No*, kial pardoni? Mortbati!“ Sed tiuj, kiuj staris proksime, silentigis ilin. El la tonoj, kiel Modesta parolis, ili ĝuste elsentis, ke la parolado ĵus komenciĝis kaj, ke sekvos plia.

Post paŭzo por spiri kelkajn sekundojn, sen mallevi la montrofingron direktatan al la vizaĝo de *don*Feliks, Modesta parolis denove: „Ke vi lasis droni la knabeton, tion mi pardonas al vi, ĉar vi estas la mastro kaj ordonas, kaj ni devas obei!“

„*No mas patrones*, neniujn mastrojn plu!“ intervokis kelkaj viroj.

„*Calma*, estu trankvilaj!“ vokis aliaj.

Modesta ne aŭdis tion, kio estis dirita post ŝi. Per sia rigida rigardo ŝi fiksas la okulojn de *don* Feliks, kvazaŭ ŝi volus ensorĉi lin. Lante, sed videble el ĉiuj flankoj, li timis tion terure, ke la timo ekmontriĝis bone ekkoneble sur lia vizaĝo. Eble en tiu momento li memoris pri tio, ke li aŭdis iam, ke al prizonulo povas okazi nenio pli terura ol esti elmetita al la inoj de tribo. Viro batas forte por fini

sian laboron, ju pli rapide des pli bone. Sed inoj kutimiĝis pri tio kuiri siajn manĝojn lante kaj kun pripensemo.

Levante sian voĉon, diris Modesta nun: „Ke vi volis sekspertforti min hodiaŭ, eĉ sen min demandi, kaj, ke vi forkurigis min nuda ĉi tie, antaŭ la vizaĝoj de ĉiuj viroj, ankaŭ tion mi pardonas al vi; ĉar vi estas viro kaj mi estas ino.“

Celso, kiu ja konis ŝian sorton pli bone ol iu alia tie, ekkomencis kompreni nun, kion Modesta celis. Li ekridis glugle. Samtempe li sentis fieron, ke Modesta elektis lin, ke li ŝin protektu. Rapide kaj mallaŭte li diris al la viroj, kiuj staris plej proksime de li: „Lasu ŝin paroli, lasu ŝin paroli do, ŝi scias tute precize, kion ŝi volas.“

Modesta ankoraŭfoje interrompis sian paroladon. Ree ŝi profunde enspiris. Denove ŝi etendis brakon kaj montrofingris tiel emfaze al Feliks, kiu pli kaj pli rampis en sin mem, kvazaŭ ŝi volus piki lin per tiu montrofingro al la vando. Tiuj interrompoj en ŝia parolado, la mallevado de ŝia voĉo, se ŝi finis frazon, kaj la pli kaj pli intensa voĉo, se ŝi komencis post spirpaŭzo novan frazon,

estis tute laŭnatura, kvankam ĝi havis ege draman efikon kaj tute sen dubo devis fari al *don* Feliks la impreson, ke la tago de la Lasta Juĝo alvenis kaj, ke akuzanta anĝelo staras antaŭ li.

„Ke vi de mia kara frato Candido, kiu laŭ vi ŝarĝis sin per kulpo, fortranĉigis la orelojn kaj kripligis lin tiel, eĉ tion mi pardonas al vi; ĉar li fuĝis kaj rompis sian kontrakton, kaj vi, lia mastro, havis la rajton puni lin, kiom ajn dura kaj kruela estis la puno.“

Tiumomente fine ĉiuj *muchachos* ekkomprenis, ke la kulmino de ŝia akuza parolado estas proksima. Samtempe ĉiuj havis la senton, kiu subite konsciiĝas kaj koniĝas al ĉiuj homoj egale de kiu ajn raso kaj rango en grandaj momentoj: partopreni agadon, kiu havos iam por la historio longe daŭrantan signifon, eĉ se tiu historio havas nur rilaton al la vivo kaj la sortoj de limigita aro de homoj.

Modesta, ĝis tiam nur simpla kaj modesta ino de sia raso, apenaŭ vere atentata de la *muchachos* ĝis tiu tago, ĉar ŝi estis tute tiel, kiel ĉiuj aliaj indiĝenaj knabinoj, kreskis

nun antaŭ la okuloj de la *muchachos* al ina heroo. Kaj, ĉar tia prezentado de needziniĝinta ino inter tiuj homoj estis tiel nekutima, ke ĝi fariĝis por ili kvazaŭ nekomprenebla, la viroj sentis, ke okazas miraklo. Aperis al ili nova Sankta Virgulino, des pli proksima al iliaj sentoj, ne ĉar ŝi estas de iliaj haŭtkoloro kaj karno, sed ĉar ŝi estas akuzantino, venĝistino, soldato de la ribelo. Kie oni iam ajn aŭdis ĉe tiuj sensciantaj kaj sklavigitaj homoj, ke juna ino leviĝis kaj diris al sia patrono, al ladino, ja eĉ al hispano: 'Vi, vi, fi!' anstataŭ kliniĝi antaŭ li, kisi manon de li kaj atendante liajn ordonojn kruci siajn brakojn sur la mamoj kaj kun klinita kapo stari antaŭ li sen eĉ levi la okulojn kaj ekrigardi lian dian vizaĝon kaj, se ŝi ricevis la ordonojn, retropaŝi en la fonon, fiksante la rigardojn al la tero por ne montri pli frue sian dorson al la patrono ol ŝi estos ekstere de la pordo. Okazis, ke *muchacho* fariĝis impertinenta kaj ribelema, eble, ĉar li drinkis tro multe aŭ estis tiom trolacigita, ke fariĝis ĉio indiferenta al li. Sed eĉ tio okazis nur tiom malofte, ke, vere oni parolis pri tio dum monatoj, eble eĉ jarojn en la kabanoj de la peonoj, kiel oni plej kruele elpelis de la viro lian impertinentecon.

Sed tie ne estis *muchacho*, neniuebria impertinenta peono, sed tiukaze estis kutima sklavigita indiĝena knabino vestita en ĉifonoj kaj kun vilaa taŭzita hararo, kiu levis sian akuzantan voĉon al la patrono kaj eĉ kuraĝis cidiri al li kaj montri per montofingro al li.

Ke tio okazis, ke tio povis okazi, donis al la viroj multe pli ol la sangoplena superforto de siaj mastroj kaj turmentantoj la certecon, ke nova tempo etendis siajnflugilojn kaj komencis flugi kun granda rapideco tra la hereda lando de la indiĝenoj.

Tial la revolucio, eĉ se ĝi kostus milionojn de viktimoj, devis fini kun venko por la indiĝenoj kaj por la indiĝena proletaro, tial ili devis gajni teron kaj liberon kun tia certeco, kiel ili ĝis nun konis nur subigon kaj sklavigon.

La *muchachos* mense falis, kiam Modesta nun ree haltis, en ebrion de ekstazo, en specon de tumulto, kiu ne estis ĝojo, sed kvazaŭ religia entuziasmo. Ili vidis nun je la unua fojo la promesitan landon antaŭ la okuloj. Ili saltadis, brakumis sin reciproke, dancis kaj kriis kaj jubilis: „*Arriba, Muchacha! Viva, Modesta! Vivu,*

chamulanino!“

Tiun tumulton *don* Feliks provis uzi por fuĝo. Je la maldekstra flanko li havis la longan vandon de la konstruaĵo, dekstraflanke estis nur mallonga vando, kiu servis kiel protekto kontraŭ falanta pluvo kaj estis aldonita kontraŭ ŝtormoj. Tiu ĉiu vando estis longa nur proksimume du metrojn, poste komenciĝis la balustrado, kiu estis nur iom pli alta ol metro kaj facile transgrimpeblis. *Don* Feliks ja tute ne povis fuĝi longan distancon; ĉar la *muchachos* sufiĉe bone gardis la alirejojn al la placo, kaj la seloj kaj ĉevaloj ne atingeblis sen transiro de la placo, sur kiu kolektiĝis ju pli da viroj des pli proksimiĝis la sunsubiro.

Kliniĝinte li ŝovis sin kelkajn colojn pli proksime al la finaĵo de la mallonga vando. Sed jen li vidis du durajn profunde brunajn manojn sur la balustrado, kiuj ŝajne apartenis al viro, kiu retenis klaran kapon, evidente al neniuj aliaj celoj krom gardi *don* Felikson. *Don* Feliks pripensis rapide kaj konkludis, ke certe estas pli sekure ankoraŭ atendi. La ino ankoraŭ ne finis sian paroladon. Ŝi staris ankoraŭ je la sama loko, kie ŝi komencis la

paroladon, tute sen iri paŝon antaŭen aŭ malantaŭen.

Don Feliks tre bone konsideris atendi la finon de la parolado. Li diris al si, ke tiam verŝajne la entuziasmo plej kulminos kaj, ke li havos multe pli da bonŝanco povi fuĝi ol tiumomente, kiam la tumulto jam komencis malkreski, ĉar la *muchachos* vidis, ke Modesta estas parolonta pluajn vortojn.

Ŝi ŝajne, se oni juĝas laŭ ŝiaj gestoj kaj la rigidaj okuloj, per kiuj ŝi seninterrompe fiksas *don* Felikson, tute malĉeestis rilate al siaj sensoj. Ĉu iu el la *muchachos* aŭdas ion el tio, kion ŝi diris, ŝajne estis tute indiferenta al ŝi. Ŝi peris eĉ ne la plej etan videblan aludon pri tio, ke ŝi kaptas ion de la tumulto kaj de la vokoj de la viroj. Ŝi estis sola kun *don* Feliks, parolis nur al li, montris nur al li, kaj ŝi vidis neniun krome en sia proksimeco. La mondo ĉirkaŭe estis estingita por ŝi.

Profunde ŝi spiradis, kvazaŭ ŝi estas sub la influo de potenco ekster sia volo.

Ŝiaj vizaĝmuskoloj konvulsiis, kvazaŭ ŝi batalus kontraŭ

atako de senkonscio.

Tio daŭris nur kelkajn sekundojn, sed ĝi daŭris sufiĉe longe por atingi la plej grandan efikon. La *muchachos* ĉiuj eksilentis per unu fojo, tiel, kiel ili ne povus fari tion pli bone eĉ post komando.

„Sed! *Pero, pero!*“ vokis Modesta nun per ĉiuj fortoj de sia voĉo. „Sed, ke vi fortranĉis la orelojn de la eta knabo, kiu neniel suferigis vin, diablo, ne povis suferigi vin iel per siaj etaj manoj kaj per siaj senkulpaj pensoj; ke vi, kvankam mi kuŝis antaŭ vi sur la nuda tero kaj min ofertis al vi je ĉio, kvankam mi pro Sankta Dipatrino petegis vin pri graco pro la timo de mia koro; ke vi, ladino, kaj *cachupin*, bestaĉo kaj Satano, kvankam la knabeto surgenuis antaŭ vi kaj levis al vi siajn etajn manojn kaj preĝis al vi kiel al *Dios Santo*, ke vi detranĉigis liajn oreletojn por venĝi eraron de lia torturita patro, al la knabo, kiu havos longan vivon antaŭ si, kaj ke vi kripligis lin hontege por lia tuta plua vivo, ke vi donis al li vizaĝon, kvazaŭ li estus la plej mizera pekinto sub la ĉielo, tion mi ne pardonos al vi! Kaj se justa Dio loĝas super ni kaj estas preta elŭti etan peceton de sia

kompato kaj de sia graco al ni, al ties forgesitaj infanoj, kaj li emos aŭdi miajn plej ardajn preĝojn, mi petegas Lin, ke li al vi, bestaĉo, pardonos neniam, kiom ajn longe eble daŭros la eterna eterneco. Vi estu la plej perdita inter la plej perditaj pekintoj dum ĉiuj tempoj, tiel vere kaj tiel honeste, kiel mi min pie kaj honorige kliniĝas antaŭ la Plej Sankta kaj senpeke koncipita Virgulino, kiu konas miajn dolorojn kaj scias, ĉar ŝi vidis suferi sian filon, tiel, kiel mi vidis suferi la knabeton, kies patrino mi fariĝis, kiam mi sekvis libervole ties patron por doni ankaŭ al tiu knabo mian amon kaj mian protekton. Mi ne kraĉas sur vin, ĉar vi sinkis tro profunde, por ke ino sur vin povu kraĉi. Mi ne tuŝos vin, ĉar miaj manoj fetorus ĝis la lasta horo de mia surtera vivo. Mi ne malbenos vin, ĉar mia malbeno tiukaze ne plu havus efikon, se mi volus malbeni iun, kiu ĉagrenos min. Mi lasos vin al la infero kaj al la kondamno kaj venĝo de justa dio tia, kia vi estas nun. Ĉar tia, kia estas vi nun, ankaŭ la plej bonkora Dipatrino en la ĉielo rifuzos al vi eĉ la lastan plej etan fajreton da kompato en eterneco!“

Modesta eksilentis kvazaŭ ŝi subite konsciiĝus. Ŝi rigardis

supren, rigardis ĉirkaŭ si kaj ŝajne je la unua fojo rimarkis, ke tie ankoraŭ estis aliaj homoj krom *don* Feliks. Ŝi lasis fali la levitan brakon. Estis kvazaŭ ŝi falus mem. Sed en la sama momento ŝi rektiĝis je la tuta korpo kaj komencis tremi.

Ĝis tiam ŝiaj vortoj ja sonis laŭte kaj brue, sed varmtone kaj sonore, kaj estis agrable aŭskulti ilin.

Sed nun, kvazaŭ ŝi rekonsciiĝus kaj revenus al la sobrotero, ŝi ĵetis vehemente ambaŭ brakojn supren kaj kriis akresone kaj kriĉante, kun vaste kaj aĉe formiĝanta buŝo: „*Muchachos, ahora es suyo el tigre de las monterías!* Viroj, nun la bestaĉo apartenas al vi! Kaptu lin, li estas via. Li ne havas animon, neniun koron. Li ne estas homo kaj neniam estis homo. Nur bestaĉo. Li pagu nun la orelojn de la knabeto, *muchachos!* La orelojn li devos pagi, kiujn li ŝtelis. Pagi li devas! *Pagar! Pagar! Debe pagar las orejas!*“

Modesta, dum ŝi elkriis tion, saltadis tien kaj tien al ĉiuj flankoj por instigi ekagi la virojn, kvazaŭ ŝi kunvokus ĉiujn al milito. La viroj, ankoraŭ nun starante kvazaŭ

anatemitaj, ekmoviĝis kaj vokis: „*Viva muchacha! Arriba Modesta! Viva la chamula! Arriba nuestra heroína! Viva Modesta, la rebelde! Viva la rebellion! Tierra y libertad!*“

Modesta nun sekve de sia sovaĝa kriado de la viroj tute vekigis. Ŝi ŝanceliĝis kaj falis sur la balustradon, kie kelkaj viroj, kiuj tie staris, kaptis ŝin antaŭ la falo. Ŝi rektiĝis, metis ambaŭ manojn antaŭ sian vizaĝon, falante teren, ŝi kunkaŭrigis kaj komencis laŭte plorsingulti.

La *muchachos* estis konfuzitaj. Ekscitite ili parolis reciproke kaj ŝovante miksiĝis, sed sen proksimiĝi al Modesta kaj sen restarigi ŝin.

Ĉapitro 15

01

Tiu konfuzo estis, kiun *don* Feliks atendis kaj kiu, kiel li ĝuste supozis, baldaŭ venos.

Per hasta movo li ĵetiĝis apud la vandon kaj proksimen de la balustrado. Ambaŭ manojn li apogis kaj en la sama momento li jam havis ambaŭ genuojn alte ĉe la balustrado. Tio okazis tiel neatendite, ke la viro, kiu tie staris, estis puŝita flanken, ĉar *don* Feliks puŝiĝis per sia antaŭŝovita kapo al ties brusto.

Sed kiam li volis fuĝi trans la balustradon, Celso saltis, longe etendite kiel ĉasata kato, sur ties dorson kaj ambaŭ falis kelkfoje ruliĝante unu sur alian reen al la planko de la portiko.

Celso tiris sian kontraŭulon ĉe la ĉemiza kolumo supren kaj bategis per sia larĝa, fere dura mano Felikson tiom gigante transverse de la vizaĝo, ke ĝi diskrevis laŭ la tuta longo. *Don* Feliks retroŝanceliĝis kontraŭ la balustradon.

Celso liberigis la ĉemizan kolumon kaj same batis al li ankaŭ per sia maldekstra piedege granda mano sur la vizaĝon. La vizaĝo fariĝis mola kaĉo.

Celso elpuŝis laŭtan kaj kontentan ridadon. Li viŝis manon per alia mano. Dum tio li diris: „Tiu mi nun devos lavi per brando, por ke mi fariĝu libera de via koto. Tiuj batoj trafis, knabeto, ĉu? Tio estis laŭordaj batoj. Vi faris miajn manojn tiaj per kvar toneladoj da mahagono ĉiutage. Nun vi scias, kiel tio sentiĝas. Tion mi volis foje montri al vi, kotulo.“

Don Feliks denove kuŝis en sia angulo. Per senespera gesto de siaj manoj li forviŝis la sangon de la vizaĝo.

„He, *muchachos!*“ Celso vokis al la viroj. „Vi ja aŭdis, kion la *muchacha* diris al ni. Dekroĉu la orelojn – kaj kun pura kaj muzikema pendumado. Vi ja scias, kiel oni pendumas homon. Ni ricevis bonan edukadon rilate al la pendumado.“

Tiam li turniĝis al Modesta, kiu ankoraŭ kaŭris kaj plorsingulte larmis.

Li diris al ŝi: „Ne ploru, Modesta! Ankoraŭ nun, ĉi-vespere, ni venigos Candidon kaj la malgrandan Pedron. Ni altiros la kanuistojn je iliaj pisiloj, se ili ne volas obei.“

Dum Celso kun kelkaj viroj kuris transen al la kabanoj, kie la metiistoj kaj *cayuqueros* loĝis kun siaj familioj, aliaj viroj puŝadis *don* Felikson antaŭ si al la placo. Tie ili pelis lin al arbo kun longaj kaj vaste elstarantaj branĉoj. Ne estis necese, ke iu diru al la viroj, kion ili nun faru kaj kiel. Ili ĉiuj estis pendumitoj kaj havis riĉajn spertojn kiel pendumitoj. Tiu sperto estis utila al ili.

Ili eltordis fortan fadenon el ŝnurego. La fadenon ili kunnodis firme ĉirkaŭ la dekstran orelon de *don* Feliks, proksime al la vango. Tiam ili ĵetis la finaĵon de la fadeno supren trans branĉon. Poste tri viroj levis supren *don* Felikson, kies brakojn ili malvaste ŝnuris ĉirkaŭ lian korpon kaj kies piedojn ili kunligis tiel, ke li malproksimis kun la kapo nur du manlarĝojn de la branĉo. Tie ili tenis la korpon ĝis aliaj viroj la fadenon aranĝis tiel, ke li havis la deziratan longon, kaj poste ili ligis la finaĵon ĉirkaŭ la trunkon de la arbo. Ili vokis, kiam tio estis preta: „*Listo muchachos!*“ Nun la viroj delasis zorgeme la korpon, ja

tre zorgeme, ĝis li libere je la dekstra orelo svingependis. Ne nur la vango, sed la tuta vizaĝo de *don* Feliks estis etendita longe de lia kapo.

„Ne tion, *muchachos*! Ne tion, *muchachos*!“ li kriis, tiom, kiom la tute tordita vizaĝo permesis tion. „Mortbatu min! Mortbatu min!“ Poste, kvankam li penegis, ne montri al la viroj sian doloron, li komencis ĝemi en sin mem. Sed ju pli longe li pendis, des pli kunpremiĝis lia gorĝo ĉar la haŭto pli kaj pli kuntiriĝis kaj tiris ankaŭ la haŭton de la kolo kaj de la ŝultro kun si.

„Nun vi scias, kota pusokovrita bastardo, kio estas pendumado!“ vokis unu el la viroj.

„Ni pendumas iom alie ol vi kaj viaj fratoj, tiuj banditoj, kiuj nun estas en la infero“, vokis alia. „Sed ni ja ne volas havi vin morgaŭ kun novaj fortoj antaŭ la arboj, por ke vi faru kvar toneladojn. Ni pendumas nur vin kiel solulon. Vi skurĝis centojn de ni kaj centojn de ni pendumis, kiam ajn plaĉis al vi. Tial vi do devos pendumi por centoj de viroj.“

„Liberigu min, *muchachos!* Mi donos al vi la tutan mahagonon, kiun ni havas ĉi tie. Ankaŭ la tutan *tienda*.“
Don Feliks nun tamen fine devis komenci peti, kvankam li ĉiam ĵuris al si, ke li neniam petos ion de *muchacho*, eĉ se tiu metus tranĉilon al lia gorĝo.

„Tiun *tienda* ni prenos ankaŭ sen vian permeso, patrono. Ha, patrono. Kaj la mahagonon ni tute ne volas havi. Ni fekas sur vian mahagonon. Ĝi povas ĉi tie ŝimi kaj putri. Kial koncernu nin via mahagono?“

„Lasu min malsupren!“ li petegis denove. „Faru kion ajn kun mi, kio plaĉas al vi, nur ne tion. Delasu min malsupren!“

Al tio respondis alia viro. „Aŭskultu, *cachupin*, ni ne plu emas ankoraŭ plu stari ĉi tie kaj aŭskulti vian hurladon. Ni malsatas. Ni sklave laboris la tutan tagon por vi, sen ricevi manĝaĉon. Ni iros nun al la *tienda* por malfermi ladskatolojn. Ni volas vidi, kiel vi vivis. Sardenoj, enmetitaj aprikotoj, bonaj supoj, hepataj pasteĉoj, ŝinko, lardo, ĉokolado, kafo, kaj neniujn rostitajn kaj poste muelitajn tortiljojn, kiujn vi nomis kafo sufiĉe bona por

ni.“

„Kaj“, alia obĵetis, „post horo ni venos por kontroli, ĉu la vango ankoraŭ eltenas aŭ ĉu via fivizaĝo jam estos deŝirita de via kranio. Kaj, kiam vi ĉi tie malsupre kuŝos en la koto kaj la dekstra lardohaŭto deiĝis, tiam la maldekstra orelo estos en la vico kaj la maldekstra lardohaŭto aŭ tio, kio ankoraŭ restos de ĝi.“

Mokege diris kun rido alia: „Dependos de la kvalito de via ledο, Feliksĉjo. Se ĝi estas bona kaj eltenema – ni esperu, ke ĝi estos eltenema – tiukaze povos daŭri ses horojn aŭ eĉ dek da ili, antaŭ ol la lardohaŭto deiĝos kaj ni venos por senfeligi la duan. Intertempe multe da plezuro. Vi sidis en viaj bangaloj kaj en la hamakoj balanciĝadis ĝis beateco, dum ni tie transe pendumis en la densejo kaj ĝemis. Ĉifoje estos vi tiu, kiu ĝemos, dum ni balanciĝos en la hamakoj kaj voros viajn provizojn kaj fumos viajn cigarojn kaj fikos viajn inaĉojn, se ili plaĉos al ni. Ĉu ili plaĉos al ni, ni devos unue konstati.“

La *muchachos* ekiris al la *oficina*.

„Multe da plezuro, Feliksĉjo“, iu retrovokis al li por gajigi la svingopendantan *don* Felikson.

Intertempe fariĝis malhele. La nokto estis komenciĝonta post kvaronhor.

Ankoraŭ plu alvenis grupoj de hakistoj kaj *boyeros* en la ĉefa kampadejo. Multaj ricevis sciigojn pri tio, kio okazis tie, kaj ili venis, kvankam alikaze ili ne aperus tie en tiu ĉi tago.

Andreo iris al la *tienda*, akompanata de Santiago por malhelpi, ke la *muchachos* nepripense ĵetiĝu sur la stokitajn provizojn. Ĝis tiu momento ankoraŭ neniu *muchacho* pensis pri tio elrabi la stokejon. Ili ĉiuj estis tro okupitaj pri tio „krei ordon“. Andreo proponis, parolinte pri tio kun Celso kaj Martin Trinidad, ĉiujn provizojn samparte disdoni al ĉiuj viroj, jen propono, kiun ĉiuj akceptis. Andreo, kiu povis legi kaj skribi, ricevis la komision kiel proviantisto.

Kiam li venis al la *tienda*, ĝi estis fermita. La viro, kiu administris ĝin, kaŝiĝis.

Andreo, postlasante Santiagon kiel gardiston ĉe la *tienda*, iris al la kabanoj, kie la metiistoj loĝis. Li certis, ke li trovos tie la administranton por ricevi de li la ŝlosilojn por eviti la disrompadon. Ĉe la kabanoj li trovis Celson kaj ankaŭ kelkajn aliajn virojn, kiu tie estis por kunvoki la *cayuqueros*, ke tiuj kunveturigu la *muchachos*, kiuj distrite laboris ĉe la diversaj kampadejoj je la bordo de la riveroj, kaj inter kiuj troviĝis ankaŭ Candido kun sia knabeto.

La metiistoj, forĝistoj, jungilarfaristoj, ŝnurfaristoj, kuiristoj kaj *cayuqueros*, estis la preferitaj laboristoj. Ili formis la malgrandan mezklason. Kiel pagon ili ricevis peson ĉiutage aŭ peson kaj dudekkvin centavojn aŭ peson kaj kvindek. Ili vivis kun siaj inoj kaj infanoj tie, kvazaŭ ili loĝus en urbeto. Kelkaj estis mestizoj, aliaj ladinoj. Ili malestimis la laborantajn *muchachos* same tiom aŭ eble eĉ pli ol la patronoj. Ili estis „pli bonaj homoj“, parolis „aŭtentikan“ hispanan, havis tie malgrandan kapelon, povis legi kaj skribi kaj estis plej ofte naskitaj en urboj.

Nur ĉeokaze ili havis kontakton al la *muchachos*, se ili povis vendi ion al la *muchachos* kaj vidis kontantan

monon en la manoj de la viroj. Ili fieris, ke ili rajtas paroli kun la patronoj kvazaŭ ili starus kun ili sur la sama ranga ŝtupo. Ili ne devis kliniĝi kaj ne stari kun surbruste krucigitaj brakoj antaŭ ili. Ili eĉ ne devis teni la ĉapelon ĉiam permane, se ili parolis kun la patronoj, sed rajtis remeti sur la kapon la ĉapelon, se *don Severo* diris: „Surmetu la ĉapelon, viro!“ Formi societon kun tiel nomataj aristokratoj kaj rajti saluti ilin varmigis en ili la dolĉan kontenton, kvazaŭ ili estus ankoraŭ nur paŝon for de la ŝtupo, sur kiu rajtas stari la regantoj. Laŭ la ekonomia situacio ili dekfoje pli proksimis al la *muchachos* ol al kiu ajn el la patronoj. Sed tion ili ne volis koncedi. Eĉ, se ili malpli perlaboris ol *muchacho*, ili tamen sentis sin abunde pagataj, se la mastro mansalutis ilin kun graca rideto kaj ilin ĉeokaze eĉ invitis al glaseto da brando, kiun ili trinkis starante. Ili estis ĉiam pretaj sakri kun la patronoj pri la pigraj kaj pedikohavaj viroj kaj des pli ne sentis embarason kun la mastroj tradraŝi per batoj la *muchachos*, tuj, se oni alvokis ilin por tio.

Ĉiuj metiistoj, *cayuqueros*, brandaj elverŝantoj kaj ties familioj vidis de siaj kabanoj, kiel la *muchachos* sturmis

la ĉefadministrejon. Kelkaj metiistoj kaj ĉiuj brandokomercistoj posedis revolverojn. Se la patronoj kaj *capataces* estus alvokintaj la metiistojn, kiam la sturmo komenciĝis, ĉiuj metiistoj estus venintaj, eble heziteme kaj elturniĝante tiom ofte, kiom eblas, sed ili estus venintaj. Sed por tiu mobilizado *don Severo* havis nek tempon nek okazon. Unue li ne pensis, ke estas tre granda danĝero. Kaj kiam li eksciis tion, estis jam tro malfrue ordoni la mobilizon.

La metiistoj tre ĝojis, ke oni ne vokis ilin. Ili sentis sin pli sekuraj kaj pli bonfartaj, dum ili observis la batalon el kaŝitaj anguloj, kie oni ne povis trafi ilin, kaj atendis, kio okazos. Tuj kiam la batalo estis decidita, ili paŝis sur la flankon de la venkintoj, laŭdis ilin kaj rakontis al ili, ke ili pravas kaj, ke tio, kion ili fine faris, jam de longe estu farita de ili. Se la patronoj kaj *capataces* montriĝus venkintoj, la *artesanos* priskribus ĉiun kruelecon kroĉitan al la venkintoj kiel punon pro la ribelo kiel justan kaj merititan. Kun entuziasmo kaj deva fervoro ili helpus ĉe tio liveri rimenojn, ŝnuregojn kaj fostojn, por skurĝi kaj pendumi la ribelulojn.

Sed ĉifoje la ribeluloj venkis. Kaj tial, tuj kiam la unuaj *muchachos* venis al la kabanoj, diris la *artesanos*: „Tion ni diris ja ĉiutage ĉi tie, ke tio iam okazos tiel, ke oni devus pli bone trakti la virojn, ni diris ĉi tie ĉiam, ĉar tion ja neniue ĉevalo eltenas, multe malpli *muchacho*, kiu estas ja ankaŭ homo.

Celso, Andreo, Santiago, Fidel, Martin Trinidad, Juan Mendez, Lucio Ortiz kaj multaj aliaj *muchachos* kompreneble tre bone konis siajn novajn amikojn. Ili ne lasis stultigi siajn cerbojn rifuzis la servojn, kiuj rapide kaj malkare estis ofertataj pro komplezemo al la venkintoj kaj por gajni ties favoron. La pli inteligentaj inter la *muchachos*, kiuj ne nur sekve de la rapida venko fariĝis ribeluloj, sed laŭ sia tuta karaktero estis insurgentoj kaj ribeluloj, sciis sufiĉe bone, kion ili povus atendi de tiuj senspinaj postkurantoj kaj glorigantoj de la patronoj. Se okazus, ke sekvatage la patronoj denove transprenus la potencon kun la helpo de la *rurales* kaj la federaciaj trupoj, tiukaze ĉiuj tiuj metiistoj kaj brandoelverŝuloj tuj starus sur la flanko de la *aristocratas* kaj regantoj. Ĉiun konfideman vorton, kiun tagon antaŭe diris la ribeluloj al

ili, ĉiun agon, kiun faris la ribeluloj, ĉiun ladskatoleton da olesardenoj, kiujn la ribeluloj prenis el la *tienda*, ili denunciis al la *rurales*. Ili mem estus ja la plej bona polico, multe pli bona polico ol la *rurales* estis, ja eĉ pli bona ol la timata Sekreta Ŝtatpolico de la diktatoro.

Tial la *muchachos* estis nealireblaj por la fia flatema konduto de la metiistoj, kiuj nun kvazaŭ rampante, tamen heziteme kaj nesekure serpentis el siaj kabanoj, kiam Celso, akompanata de kelkaj viroj, iris renkonte al la loĝejoj.

„Tio ja devis okazi tiel, *muchachos*! Tio ja devis okazi tiel, *muchachos*! Tion mi ĉiam diris ĉi tie“, ekscitiĝis la forĝisto. Li turniĝis al du ilarfariistoj, kiuj proksime de li sekvis: „Ĉu mi ne ĉiam diris tion, *compadres*, ke tio tiel okazos?“

„Jes, tion vi ĉiam diris, *compadre*, kaj ankaŭ ni ĉiam diris, ke tio tiel ne plu iros longatempe!“

„Tenu fermita vian diodamnitan grimacon“, vokis Celso, „aŭ mi batos vin tiel vizaĝen, ke viaj dentoj fulmglitos en

viajn intestojn, cimoj, kiuj vi estas – kie loĝas la *cayuqueros*?“ li diris poste bruske.

„Jen, chamulanĉjo, venu, mi montros al vi la vojon. Tie, kie briletas la lampo, tie loĝas Pablo kaj tuj apud tiu, Felipo.“

Celso iris renkonte al la kabano de Pablo. Sen paŝi en la pordon li vokis: „Pablo, elvenu de tie!“

La *cayuquero* eliris. Liaj genuoj tremis tiel, ke aspektis, kvazaŭ ili volus kunrompiĝi.

„Kiom da infanoj vi havas?“ demandis Celso.

„Tri da, *muchacho*.“

„Eligu ilin!“

„Sed, bonvolu, *por favor, chamulito*, vi ja eble eĉ ne suferigos miajn infanetojn?“ petegis la *cayuquero* kun kreskanta timo.

„Eligu la infanojn al mi, mi diris!“

„Ili jam dormas, *muchacho*!“ Pablo apenaŭ plu povis movi la lipojn pro timo.

„Ĉu mi alportu ilin sur mia maĉeto?“ kriis Celso.

En la sama momento la infanoj scivole venis al la pordo. Ilia patrino troviĝis en malgranda malantaŭa kabano, kie ŝi pretigis la vespermanĝon, ŝi ne aŭdis, kio okazas antaŭe aŭ ŝia edzo ordonis al ŝi, ke ŝi ne montru sin, ĉar la *muchachos* eble povus kapabli aranĝi gigantan seksperfortigadon de la inoj – kiel venĝon por la sennombraj malicaĵoj, kiujn ekzercis la metiistoj al tiuj inoj, kiujn kunprenis kelkaj viroj en la monterion, ĉar ili ne volis disiĝi de siaj edzoj.

Unu *muchacho* tuj kaptis la tri infanojn, kiuj komencis krii. Nun ankaŭ la patrino alkuris kaj ĵetiĝis sur siajn genuojn.

„Ne kriu, maljuna kapriculino“, diris viro al ŝi „ni ne manĝos vian putinan idaron. La plej malgrandan knabineton vi tuj lasu ĉe vi, ŝin ni ne volas havi.“ Li donis la etulinon al la patrino, kiu kaptis la infanon tiel, kvazaŭ ŝi fortiris ĝin el la ungegoj de koleriĝinta jaguaro.

Poste diris Celso al la *muchachos*: „Konduku la du plej grandajn infanojn al la placo, kaj vi, Pablo, iru kun mi.“

La ino denove kriis. Sed viro vokis: „Prefere ne kriiu, se vi volos rehavi viajn infanojn.“

Alveninte sur la placo, Celso ordonis ligi la du infanojn, knabinon kun dek jaroj kaj knabon kun sep jaroj, al arbo.

La infanoj lamentis terure. Celso diris: „Trankviliĝu, ni ne manĝas infanetojn. Ni tute ne suferigos vin, se via patro faros tion, kion ni ordonos al li. Vicente, kuru al la *tienda* kaj petu Andreon, ke li donu al vi pecon da ĉokolado por la infanoj. Kaj poste gardu la infanojn ĉi tie, por ke ili ne estu morditaj de serpento aŭ pikita de skorpiono, dum ili estas alligitaj ĉi tie.“ Vicente forsaltis por alporti la dolĉaĵojn por la infanoj.

„Pablo!“ Celso turnis sin nun al la *cayuquero*. „Vi konas ĉiujn kampadejojn laŭ la riverfluo kaj kontraŭ ĝi. Vi nun tuj veturu al la nova kampadejo kaj de tie veturigu ĉi tien Candidon, lian knabon kaj ĉiujn aliajn virojn, kiuj estas tie en la kampadejo. Alvoku Felipon, ke ankaŭ li veturu per kanuo, por ke ni havu ĉiujn *muchachos* pli rapide ĉi tie, el ĉiuj kampadejoj.“

„Sed *muchacho!*“ diris post tio Pablo, „estas nokte, kiel mi tiukaze veturigu kanuon?“

„Ulo fia, sed vi ja povis veturigi ĝin en la plej tenebra nokto, se la patrono ordonis tion, ĉu? Kaj nun estas ni ĉi tie la patronoj, kaj vi faros, kion mi diros al vi. Por ke vi eble eĉ ne eskapu per la *cayuquo* kaj ankaŭ ne Felipe, mi retenas viajn infanojn ĉi tie. Se vi havos ĉiujn *muchachos* el ĉiuj kampadejoj ĉi tie ĉe ambaŭ bordoj de la adminstrejo, Candido malligos viajn infanojn. Ju pli rapide vi kaj Felipe kaj kiu ajn krome, kiu povas veturigi kanuon, estos denove ĉi tie kun la *muchachos*, des pli rapide oni liberigos viajn infanojn. Se unu el vi eskapos, la infanoj ankoraŭ post kvar semajnoj estos alligitaj ĉi tie. Ni uzas nur ĝuste la saman helprimedon, kiun la patronoj kaj la tiranoj uzis kontraŭ ni. Estis ili, kiuj eltrovis la firmitenadon kaj torturadon de ostaĝoj kaj nun vi ne rajtas lamenti, ke ni uzas la rimedon je nia favoro. Prefere rapide survojiĝu. En la nokto venos la ruĝaj formikoj, tion vi scias, kaj tio ne tre plaĉos al viaj infanoj, se la fomikoj murdos ilin. Ni scias, kia sento tio estas. Ni scias tion eĉ tro bone. Ne povas damaĝi por la estonteco al viaj infanoj

sperti je la propra korpo, kiel vi turmentadis nin. Ek do, voku Felipon, kaj tiujn, kiuj krome kapablas veturigi kanuon kaj poste ek kaj for, kaj alveturigu la homojn. Ĉiuj kunprenu siajn pakaĵojn kaj siajn maĉetojn, hakilojn kaj kion ajn ili krome havas.“

Celso mangeste venigis kelkajn *muchachos* al si kaj diris: „Ĉiu el vi sidiĝos en alian kanuon kaj vi kunveturu kaj atentu, ke la friponoj ne fuŝu al ni la macon, ke ili ne tro salu la paston. Ekhopu!“

Post du minutoj kvar *cayuquos* depuŝiĝis de la bordo.

„He, kion vi celas tie transe?“ postvokis Celso al kvin aŭ ses viroj, kiujn li vidis iri al la brandotavernoj. „Revenu ĉi tien!“

La *muchachos* alvenis. „Ni volas nur trinki kelkajn glasplenojn; ili mansalutas nin transen.“

„Ĉu vi eble eĉ volas drinki tiun venenon? Ni devos fari pli gravan kaj nun ne povos nebuligi niajn kapojn. Iam venos ankaŭ la tempo, kiam ni povos fari tion, sed pli bone estus, se ni tute ne farus tion.“

Kiel fulmo trafis Celson la memoro pri tago, kiam li revenis hejmen post dujara kontraktlaboro en la kafoplantejoj de Soconusco. En la lasta urbo antaŭ lia vilaĝo ladino forprenis de Celso, pro laŭdira ŝuldo de ties patro, la pene ŝparitan salajron. Lia eblo geedziĝi per tio estis nuligita. Pro malĝojo li ebriigis sin por siaj lastaj centavoj, kiuj ankoraŭ restis al li, li ŝanceliĝis hejmen kaj falis ebrie sur la sinon de sia patrino.

„Cetere, tion mi ankoraŭ devos diri al vi ĉiuj,
camaradas.“ Celso turnis sin al la grupo, kiu tuj
pligrandiĝis, kiam la aliaj aŭdis, kiel li revokis tiujn
virojn. „Ni mortbatis ĉi tie ĉiujn patronojn kaj
ekzekutistojn kaj skurĝistojn kaj ni estas nun liberaj. Sed
tion mi povas diri al vi, la brandon oni eltrovis por teni
nin en mallibero. Se ni volos plu liberi, jen delasu la
fingrojn kaj buŝojn de tiu veneno. Tion ja atendas ĉiuj
aristocratas en la tuta lando, ke ni drinkos ĝis renversiĝo
kaj havos ĉiuj stultigitan kapon. Tiukaze ili ree kaptos nin
ĉe la kolumo dum unu tago, kaj ĉio estis vana. Antaŭen!
Vi ĉiuj, kiuj estas ĉi tie, iru nun tie transen al la budoj,
kunprenu la hakilojn kaj disbatu ĉiujn barelojn kaj ĉiujn
botelojn. Kaj tion mi povas diri al vi, se mi trovos morgaŭ
eĉ nur duonon de botelo plena de komiteko aŭ, se mi
vidos nur unu viron el vi ebria, mi kondukos Andreon ĉi
tien, Santiagon, Martinon, Juanon, Lucion, Fidelon, kaj –
mi promesas tion al vi, *por Dios Santísimo!* – ni disbatos
vin en pecojn kaj ankoraŭ tute alie ol mi moligis hodiaŭ
Feliĝojn, ĉar mi disŝiros vin el pura amikeco, kaj tio
fariĝos eĉ pli malica. Miajn manojn vi ja konas, ĉar mi
estis dum tri jaroj mahagonhakisto, tial vi ja scias, kiel mi

povus trakti vin. Antaŭen do, kaj ne lasu flari min, ke de unu el vi la dentoj fetoras laŭ *aguardiente*, tiukaze li havos morgaŭ eĉ ne unu denton plu en la grimaco.“

Ne pasis pli ol kvin minutoj, kiam oni aŭdis el brandotavernoj kaj putinnestoj sakradon, lamentadon, kriĉadon, krakadon de bareloj, displitadon de boteloj. Inoj flugis tra la aero kaj grasaj brandoŝakristoj rapide estis ĵetitaj transkapiĝe el siaj kavernoj kun distorditaj membroj, kiuj ne postlasis dubon pri tio, ke kun granda pasio tretis ilin postaĵen la feraj piedoj de spertaj ĉaristoj. Kaj antaŭ ol iu povis preni al si tempon iri transen por rigardi, kia infero tie prezentiĝas, jam ekflamis kvar kabanoj kaj la flamoj kun laŭta kraketado leviĝis supren.

Per la ardanta fajro la placo taghele estis lumigata.

Don Felikso ankoraŭ nun plu svingopendis. Ĉu li ankoraŭ baraktis je la dekstra orelo aŭ jam je la maldekstra, ne klare videblis, ĉar lian vizaĝon kovris folioplennaj branĉoj. Kvar viroj kaŭris tuj apude, gardante, por ke ne eble eĉ iu el la *artesanos*, el la metiistoj, alŝteliĝu por detranĉi *don* Felikson aŭ montru al li sian dankemon per tio, ke ili

pafmortigos lin.

Martin jam antaŭ certa tempo iris al la kuiristo,
ordonante al li, ke li pretigu grandan vespermanĝon
plibeligitan per kelkaj dekoj de konservujoj el la *tienda*.

Nur nun, kiam la brandobudoj flamis kaj cirkaŭe estis hele, Celso pensis pri Modesta. Li havis la inon seninterrompe en sia subkonscio. Tiel dure trakti Pablon, por ke tiu rapide alveturigu Candidon kaj ties filon, tio okazis pro ŝi. Li sciis kiel forte ŝi sopiris brakumi la knabon.

Sed ĉiu ago, kiun li faris, sekvis tiom rapide unu post la alia, kaj estis tiel urĝa, ke li ne povis okupiĝi pri la knabino. Sed nun li estis libera dum kelkaj minutoj. Li kuris al la *oficina* kaj trovis Modestan kaŭriĝintan al la balustrado, kie li vidis ŝin laste. Ŝi ploris nur mallaŭte plu kaj atingis jam lastan fazon de sia korpremiteco. De tempo al tempo leviĝis perdita plorĝemo el ŝia gorĝo. Per la ĉemizaj anguletoj, kiuj vestis ŝian korpon, ŝi sekigis sian vizaĝon rapide kaj tro haste, kiam Celso iris renkonte al ŝi kaj tuŝis ŝin je la ŝultroj.

„Jen ja ne estas plu kaŭzo por larmi, chamulino“, konsolis Celso ŝin kaj gaje ekridis. „Post dek minutoj Candido estos ĉi tie kaj ankaŭ la knabeto. Kaj tiam ni marŝos

hejmen. Ĉiuj ni marŝos hejmen kaj kultivos nian *milpa* kaj bredos niajn kaprinojn kaj ŝafojn kaj konstruos al ni belajn dometojn el bona argilo. Ili aspektu kiel la domoj de la patronoj. Kion vi diras pri tio, Modesta?“

„Tio estas bonega, ege bonega, Celso, se vi diras tion tiel.“
Ŝi parolis, interrompate de du novaj plorĝemoj. Denove ŝi sekigis sian vizaĝon. Poste ŝi rigardis lin kaj ridis nun kun brilaj dentoj.

Ŝi skuis sian hararon el la vizaĝo kaj faris geston, kvazaŭ ŝi memoras pri io. Ŝi rigardis atente la okulojn de Celso kaj diris: „Mi certe songĝis. Mi songĝis ion pri la patrono. Li kuŝis en tiu angulo kaj mi kriis al li, ke li redonu al mi la du knabetojn, kiujn li murdis kaj kripligis. Tio estis tute konfuza songo, kian mi havis neniam.“

Celso karesis ŝian kapon. „Tiajn aĉajn songojn oni havas de tempo al tempo. Ĉiu ĉeokaze songas tian. Tion oni devas rapide forgesi kaj ne plu pensi pri tio.“

„Konsentite“, ŝi respondis. „Mi ne plu volas pensi pri tio.“

„Kaj ĉu vi scias, kion ni nun faros?“

„Kiel mi sciu tion, se vi ne diras ĝin al mi?“

„Ĝuste. Kiel vi sciu tion? Sed, por ke vi nun sciu: ni iros ambaŭ al la *tienda*, kie vi ricevu la plej belajn vestojn. Ankaŭ ŝuojn kaj ŝtrumpojn.“

En la *tienda* troviĝis Andreo, Santiago kaj ankoraŭ kelkaj *muchachos*. Ankaŭ la administranto de la *tienda* ĉeestis.

En tiu momento, kiam Celso kun Modesta proksimiĝis al la *tienda*, Andreo ĝuste havis gravan interparolon kun la administranto.

„Ne longe hezitu, la revolveron al mi“, diris Andreo.

„Ankaŭ la kartoĉojn. Kaj ne retenu iujn al vi.“

„Sed tio estas mia propra revolvero, tiu ne apartenas al la Montellanoj.“

„Ĝuste tial vi donu ĝin al mi.“

„Sed kiel mi moviĝadu ĉi tie en tiu ĝangalo sen revolvero, ĉu?“ demandis la administranto.

„Tute tiel, kiel ni devis moviĝi ĝis nun sen revolvero, ĉu jaguaroj ĉirkaŭis ĉu ne. Kaj foriĝu nun!“ diris Santiago kaj puŝis dorsen la administranton.

„He, Andreo“ vokis Celso, kiu paŝis tra la pordo. “Nu, donu al Modesta belan robon, la plej belan robon.”

„Kun granda plezuro“, respondis ridante Andreo. „Kiom vi volas havi, *muchacha*? Tri, ses aŭ dek da ili, ĉu? Vi ankaŭ povus havi dudek da ili, ĉiukaze ankoraŭ sufiĉe postrestos, se ĉiuj *muchachas* estos bone vestitaj. Vi ricevos ankaŭ subĉemizojn, kaj vi ja scias, mi celas ankaŭ *calzones*. Ankaŭ ŝuojn vi ricevos kaj longajn ŝtrumpojn. Ĉi tie estas eĉ kolĉenoj kaj orelingoj. *Por Dios Santo*, kiom ili havas ĉi tie! Stokigita ĝis supren al la plafono, kaj ni ĉiuj iris en vestŝiraĵoj kaj ĉifonoj. Ĉio ĉi estis nur por iliaj putinoj kaj inoj.“

La administranto kvazaŭ eksplode ekparolis: “Sed, *muchachos*, mi devas havi miajn librojn kaj inventurlistojn. Alikaze oni supozos, ke mi falsis ilin.”

„Tenu fermita vian fibuŝaĉon!“ diris Celso. „Librojn, listojn. Kion ankoraŭ krome? Ĉiujn librojn kaj listojn ni forbruligos. Kaj ĉiujn kontraktojn, kiujn ni serĉos kaj trovos morgaŭ, ni forbruligos. Ne estos plu kontoj. Neniu ŝuldoj plu. Neniu kontraktoj plu. Se ni kreos novan

ordon, tiukaze ĝisdetale. Kion vi opinias, Andreo? Kaj vi, Santiago?”

„Ni ja sufiĉe longe atendis ĝis la novordigo, ĉu ne?” diris Santiago, kiu tiris antaŭen keston kun cigaroj. „Kaj ju pli da libroj kaj listoj kaj kontraktoj kaj dokumentoj ni nun forbruligos, des pli liberaj ni estos. Kiam troviĝos neniu listo kaj neniu dokumento plu surtere, nur tiam ni vere kaj por ĉiam estos liberaj. „Do“, li turnis sin al la administranto, „tion vi scias nun. Kaj nun foriĝu de ĉi tie! Se vi nur unufoje estos revidata ĉi tie aŭ nur proksime, tiukaze ekos spektaklo kaj vi ricevos batojn.“

„Kaj sukajn“, aldonis Celso kun laŭta ridado.

„Ek, ek, Modesta!“ kuraĝigis Andreo la inon. „Jen, elserĉu la plej belan veston kaj poste iru post la keston, tie vi ĉion povos prove surmeti. Nur ne hezitu, *muchacha*. Ni pagis ĉion, kio estas ĉi tie, ni ĉion dekfoje perlaboris. Apartenas al ni. Morgaŭ ni ĉion disdividos ĉi tie inter ni. Ĉiuj *muchachos* ricevos novajn ĉemizojn, pantalonojn, ĉapelojn, sandalojn, kartoĉojn, konservujojn. Kion ajn ili volas. Kaj iliaj knabinoj ĉiuj ricevos vestojn. Jen montoj

da katunŝtofoj kaj lankovriloj kaj Dio mia en la ĉielo, mi ja ankoraŭ tute ne scias kio ajn ĉi tie ankoraŭ estas aldone.“

„He, Celso“, diris Santiago, kiam la administranto parte ĉagrenigite kaj parte timigite fortrotis, „ni iros nun transen al la *artesanos* kaj al la venenigintoj kaj kolektos ĉiujn pistolojn kaj fusilojn, kiujn ili havas, ankaŭ ĉiujn kartoĉojn. Poste ni rastos la terenon. Kaj al tiu, kiu kaŝis revolveron aŭ kartoĉojn, ni ligos ŝtonon al la piedoj kaj ĵetos lin en la riveron.“

„Tiom da peno pri tiaj ŝtelantoj kaj friponoj, ĉu?!“ vokis unu el la viroj, kiuj tie ĉirkaŭstaradis. „Tio ankoraŭ mankas al ni surnuke. Per bastono ni mortbatos ilin, tiel kiel ili meritas tion, se ili baros al ni ĉi tie la vojon. La hipokrita fiularo eĉ ne meritas, ke ni kraĉu sur ilin.“

„Bone, Santiago, prenu al vi kelkajn dekojn el la *muchachos* kaj havigu al vi ĉiujn pistolojn kaj fusilojn, kiujn ili havas“, Celso kvazaŭ ordonis tion. „Kaj ne estu hezitemaj. Se iu volas ĉirkaŭbabili la aferon, ne permesu diskuton kun tiuj fiaj helpservistoj. Batu ilin sur la

grimacon tuj, kiam iu el ili malfermos la buŝaĉon.“

Juan Mendez en tiu momento alvenis en la *tienda*. Li aŭdis la lastajn vortojn kaj plivastigis ilin. „Se okazus, ke la patronoj subigus nin denove, vi povus gluti vian lastan spirtiron pri tio, ke neniuj kondutos pli kruele kaj pli malice kaj pli naŭze kontraŭ ni ol tiuj komercistoj, kiuj nun montras afablajn vizaĝojn al ni kaj ofertas brandon, por ke ili retenu sian felon sana. Mi scias tion el aliaj ribeloj kiel tio deruliĝas, se tia ribelo estas bastone batita teren. Mi estis kun mia bataliono je strikoj kaj je ribeloj de etkamparanoj. Mi iros kun vi, Santiago, mi scias pli pri pistoloj ol vi.“

La grupo, kiu estis forsendita por kolekti armilojn, apenaŭ foriĝis de la *tienda*, kiam Modesta aŭdis voki sian nomon.

Candido, lia knabeto kaj granda kvanto da *muchachos*, kiuj laboris kun li en la nova kampadejo, ĵus alvenis.

„Ĉu vi rimarkas, kiel tio deruliĝas, Andreĉjo?“ diris Celso fanfarone. „La *cayuqueros* en sia tuta ĝisnuna vivo ne

tiom rapide kaj ne tiel sekure veturis kiel hodiaŭ. Mi estas tute konvinkita pri tio, ke ili ankoraŭ antaŭ noktomezo estos veturigintaj ĉiujn *muchachos* el ĉiuj kampadejoj ĉe la bordoj de la rivero ĉi tien. Observu foje, kiel lerte kaj apide ili traktas la longajn torĉojn, nur por ke ili ne perdu eĉ sekundon. Oni devas nur ĝuste laborigi tiujn fifratojn.“

En tiu momento saltis Modesta kun surĵetita nova florornamita katunrobo kaj kun nur unu ŝuo surpiede, kaj la alian svingante enmane, el post la surmontigitaj kestoj sur la placon, kie ŝi ĵus aŭdis voki sian fraton.

Estis giganta bankedo, kiu en tiu nokto okazadis en la *oficinas Generales*. Grandegaj ŝtipomontoj flamegis sur la placo antaŭ la manĝotegmentoj kaj la dormkabanoj de la *muchachos*. Ĉar la kvanto de la alvenintaj *muchachos* fariĝis pli granda dum ĉiu horo, baldaŭ ne plu sufiĉis la ejo sub la granda tegmento; la viroj ĉirkaŭsidadis ekstere sur siaj petatoj, sur kestoj, sur trunkoj, sur benkoj kaj seĝoj, kiuj estis alportitaj tien el la bangaloj.

Ĉiuj inoj, kiuj apartenis al la mahagonviroj, surhavis novajn vestojn. Por multaj tiuj vestoj estis tro vastaj kaj longaj. Ili ne ĉagreniĝis pri tio kaj trenis la vestaĵojn tra la ŝlimo kaj la pluvoflakoj, ĉar ili ne kutimiĝis pri tio vesti sin per laŭordaj vestoj. Por la plej multaj inoj la elegantaj ŝuoj estis maloportunaj, ili preferis ĉirkaŭvadi per nudaj piedoj, tiel kiel ili faris tion dum sia tuta vivo. Ili apenaŭ penis porti la ŝuojn por ne perdi ilin; tiom malmulte ili interesiĝis pri ties posedo.

La *muchachos* posedis novajn ĉemizojn kaj blankajn, flavajn, brunajn kaj bluajn katunpantalonojn, novajn

ĉapelojn kaj fortikajn sandalojn. Matoj kaj kovriloj por la nokto jam kuŝis sternite en la dormkabanoj kaj en la bangaloj, kiujn okupis la viroj.

Martin Trinidad intertempe jam kun la helpo de kelkaj *muchachos* transloĝigis ĉiujn ceterajn loĝantojn de la *ciudad*, la metiistojn, la brandokolportistojn kaj ruletposedantojn, ties familiojn, la lavistinojn kaj flikistinojn, la komplezemajn kunulinojn ĉe la drinkado, tiel, kiel la multnombrajn vidviniĝintajn inojn de la fratoj Montellano kaj tiujn de la *capataces* en unu el la plej grandaj dormkabanoj, kiuj havis du grandajn apudajn kabanojn, kie ili estis bone gardataj de speciale por tio asignita grupo, por ke ili ne eskapu kaj ne tro frue perfidu la ribelon. Ĉar ĉiuj memstaraj viroj havis familiojn, apenaŭ estis la danĝero, ke ili forkuros kaj postlasos solaj siajn inojn kaj infanojn. Sed Martin Trinidad diris al Celso: „Misfido en ĉiu kazo estas pli bona. La *rurales* kaj *federales* ankoraŭ sufiĉe frue ekscios tion kaj survojiĝos kun mitraloj por akcepti nin, tuj kiam ni atingos la unuajn vilaĝojn ekstere de la ĝangalo.“

Kelkaj *muchachos* posedis buŝharmonikojn. En la *tienda*

oni malkovris tridek ses pluajn, ankaŭ du gitarojn kaj unu akordionon. En la bangaloj de la *capataces* troviĝis du trumpetoj, tri gitaroj kaj unu duone disrompita klarneto. Kompreneble, nur unu el la gitaroj posedis ĉiujn kordojn. Sed ĉeestis kvar viroj, kiuj bone kaj lerte sciis ludi la akordion. Kvankam la tuta muziko sonadis sufiĉe mizera, sen ĝusta harmonio rilate al tio, kion tiu aŭ tiu ĉi intencis ludi; kaj eĉ kvankam en iu grupo estis ludata danco, kiu tute kontraŭis la tempmezuron kaj la melodion de la danco, kiun alia grupo ludis kvazaŭ gurde, tio tamen neniun ĝenis je ties ĝuo. Ili havis muzikon kaj gajis. Tio estis ĉio, kion la *muchachos* deziris post la turmentoj de la pasintaj monatoj. Iom da ĝojo, iom da simpla manĝo, sed sufiĉe da ĝi, neniun skurĝado aŭ pendumado, kaj la espero povi reveni hejmen, kaj en paco kultivi sian kampon – tio estis ĉio, kion ili atendis en la mondo kaj de la vivo. Ne estis multe, sed neniun iam permesis tion al ili.

„Ĉiuj *muchachos* de la bordaj kampadejoj estas nun ĉi tie!“ Celso aŭskultis diri iun malantaŭ si. Estis Pablo, la kanuisto, kiu alvenis por sciigi la plenumon de sia tasko.

La viro, kiu estis sendita kun Pablo por kontroli lin, konfirmis la ĝustecon de la sciigo.

„Andreo!“ vokis Celso.

Andreo ekstaris de sia manĝo kaj iris al la grupo, en kiu sidis krom Celso ankaŭ Candido, ties knabo, Modesta kaj Martin Trinidad.

„Vi estas ĉi tie la loĝejmastro kaj havas la ŝlosilojn al la *tienda*.“

„Ĝuste“, diris Andreo kun bonkorema rido.

„Iru do transen al la arbo kaj malligu ambaŭ infanojn de Pablo. Poste konduku ambaŭ transen al la *tienda* kaj donu al ili grandan pecon da ĉokolado aŭ kiun ajn dolĉaĵon ili krome volos havi. Donu al la knabino kelkajn

orelringojn kaj kolĉenon kaj al la knabo poŝtranĉilon, kaj poste sendu ilin al ilia patro.“

„*Muchas gracias, muchacho!*“ diris Pablo ĝojigite. „Mi tre dankas. Mi tre tre dankas.“

„Lasu la dankon prefere tute flanke“, seke obĵetis Celso.
„Se vi havos viajn infanojn, vi iros kun ili transen al tiu kabano, kie estas via edzino kaj ĉiuj viaj kunuloj. Okazos al vi eĉ ne iomete da malbono. Tion mi promesas al vi. Ni ekiros, kaj vi havos la tutan *ciudad* por vi mem. Ni sufiĉe lasos al vi en la *tienda*, kaj vi havos ankaŭ sufiĉe da maizo ĉi tie kaj dekojn da bovoj, kiujn ni postlasos. Malsatmorti vi ne povos. Kaj du semajnojn, post kiam ni estos ekmarŝintaj, ankaŭ vi rajtos survojiĝi.“

„*Gracias, muchacho!*“ diris Pablo.

Tiam Martin Trinidad komencis paroli. „Tio koncernas vian estontecon, *cayuquero*, kion diris mia *camarada* al vi. Sed mi diru ankaŭ ion pri nun al vi. Neniu el vi rajtas provi eskapi kaj sciigi ion en Hucutsin aŭ al alia militara postenulo. Pri tio mi avertas vin ĉiujn. Celso faris al vi

certan promeson. Sed nun ankaŭ mi promesas la sekvan al vi. Se eĉ nur unu el vi forlasos la administrejon ĉi tie, hodiaŭ aŭ morgaŭ aŭ nur tagon pli frue ol du semajnojn post nia ekmarŝo, mi tratanĉigos al ĉiu el via parencaro postrestonta ĉi tie la gorĝojn, al la viroj, inoj kaj infanoj. Ke mi faros tion, mi ĵuras al vi. Ni ne havas ion plu por perdi, nun tute ne plu. Cetere, plej prefere mi ĉiun el vi dronigus tuj nun rive kiel superflujajn katojn. Ĉar amikoj ni ne estas, ne estis, kaj neniam estos. Mi scias tute konkrete, kion vi valoras kaj kiel vi kondukus, se oni kaptus nin je la nuko. Se ni tuj nun kaj ĉi tie buĉus vin kiel fiinsektojn, kiuj vi estas, ni poste ne devus ĉagreni pri tio, ke ni detruis vian malvasthorizontan vivon. Sed ĉifoje ni lasu ĝin tiel, kiel ĝi estas. Iru nun tuj transen al la kabanoj, kie vi ĉiuj estos kvazaŭ peklitaj por certa tempo. Poste vi raportu tie, kion ni ĵus malpermesis fari al vi. Kaj ne forgesu precize aldoni, kio okazos al tiuj, kiujn perfidinto kaj eskapinto postlasos. Vi estas de nun la gardohundoj por ĉiuj viaj kunhomoj.“

„Vi, Pablo, kaj vi, Felipe“, aldonis Celso.

Andreo venis kaj havis ĉe si la infanojn de Pablo. Poste ili

iris al la *tienda*.

Antaŭ ol Pablo turniĝis por foriri, li diris: „Certe ne, *muchachos*, certe ni ne forkuros kaj denuncos vin. Ja kial ni faru tion? Ni volas nur, ke oni lasu en paco nin. Kaj cetere, ĉu estas ne ankaŭ ni laboristoj ĉi tie? Tiel bonaj kaj tiel malbonaj laboristoj kiel vi mem, *muchachos*, ĉu ne?“

Pri tio respondis Martin Trinidad moke: „Antaŭe vi neniam sciis tion. Tion vi ŝajne nun je la unua fojo rekonis. Kaj, se ni malsukcesus, tiukaze vi jam estos forgesintaj ĝin tri tagojn poste. Nu, ni ja certe ekscios. Postkuru al viaj infanoj.“

Ĉapitro 16

01

„Se ni ekmarŝos, eĉ ne unu viro manku al ni!“ diris Martin Trinidad je la sekva mateno, kiam la *muchachos* kunsidis por militkonsiliĝo. „Ni postlasos neniun en la monterioj, eĉ se ni devus elbatali ilin kun viktimoj. Neniu manku al ni, kaj neniun, kiu apartenas al ni, ni postlasu ĉi tie.“

Estas ankoraŭ frue matene. Suno jam leviĝis sed neniuj radio videblis de ĝi. Je sunleviĝo denove forte pluvis. La tuta loko estis vualita en dikan nebulon kaj super la rivero la malsekaj nuboj estis tiel densaj, ke oni ne povis vidi la akvon ĉe la borda deklivo.

„*Por diablo*, jen ja estas ankaŭ miaj belaj porkoj“, vokis Candido, kiam li vidis kuradi porkojn sur la placo, tien kaj tien ĉasatajn de hundogregoj.

„*Oiga, Candido!*“ diris Celso, „prefere lasu la porkojn ĉi tie en paco kaj ne plu tuŝu ilin.“

„Kial, *manito*?“

„Lasu ilin foriri en paco kaj forgesu ilin. La *artesanos* buĉu kaj manĝaĉu ilin. Por ni ili ne plu estas.“

„Sed ili jam tiel bele grasigis sin“, diris Candido kun bedaŭro.

„Ĝuste tial lasu ilin foriri. Aŭ, jen mia propono, vendu ilin al la *artesanos*, ili ŝategas grasajn porkojn.“

„Tion mi faros. Estas certe multe da peno, dum la tuta tago retropeli ilin, kaj kiel ni igu ilin trans la ŝvelintajn riverojn, mi krome ankoraŭ ne scias.“

La porkoj kaj hundoj en la nokto elfosadis sin tra la moligita tero el la *oficina*, en kiu oni enfermis ilin.

Post la mallonga interrompo ili interkonsilis plu. Oni fine decidis, ke Juan Mendez kaj Lucio Ortiz kun dudek viroj, ĉiuj ekipitaj per ĉevaloj, vizitu ĉiujn monteriojn, kiuj troveblis en ĉirkaŭo de dudek kilometroj, ke tie la *muchachos* same kreu ordon, tiel, kiel tio okazis en la ĉefadministrejo, ke ili havigu al si armilojn kaj

provizaĵojn kaj venu en la ĉefkomandojn por granda kunveno, por povi formi grandegan ribelotrupon kun tricent aŭ kvarcent viroj, ke poste tiu trupo ekmarŝu al Hucutsin, ke survoje al Hucutsin ili detruu ĉiujn bienojn kaj grandajn bienojn kaj mortbatu ĉiujn bienposedantojn kaj *patrones* kaj *aristocratas* kaj ĉiujn *ladinos*, ke ĉiuj *muchachos* kaj sklavigitaj kamparaj laboristoj aliĝu al la trupo, ke Hucutsin estu konkerita, poste ĉiuj vilaĝoj kaj urboj ĝis Balun Canan kaj Jovel por regi la *carretera*-n, la plej gravan kunligan straton ĝis la registara urbo kaj la fervojstacio.

Neniu pensis pri tio, kio okazu, se ĉio estos detruita. Eĉ Martin Trnidad havis nur tute nedifinitan ideon pri tio, kio tiam sekvu kaj kio sekvos. Li kaj la pli inteligentaj viroj kiel Andreo, Celso, Santiago, Fidel, Matias kaj ankoraŭ du aŭ tri pluaj, klarigis, ke la ribelo estu disvastigata tra la tuta lando, se ili volos havi poreterne teron kaj liberon. Ĉiam nur la duono de la viroj batalu, dum la dua duono reiru al siaj vilaĝoj kaj agroj por kultivi la teron. Se tio estos okazinta, tiu duono revenu kaj alternu la batalintojn, kiuj iris hejmen por kultivi siajn

agrojn. Rikoltu la inoj, la infanoj kaj la maljunaj patroj kaj patrinoj. Efektive oni tion tiel faris pli poste en la grandaj revoluciaj armeoj.

Kompreneble tio estis por la ribeluloj konsilo, kiu dum longa tempo tute ne uzeblis. Ili ne havis agrojn, kiujn ili povus kultivi. Ili unue devis forpreni tiujn agrojn de la bienuloj, ili devis mortbati la mastrojn kaj ties idaron, ili devis detrui ties grandajn bienojn kaj grandajn kortegojn, kiuj kvazaŭ estis burgoj, por ke la etkampanoj efektive povu kultivi la konkeritajn agrojn kaj la *patrones* ne povu ree forpreni ilin de ili, tuj kiam la peonoj demetis la armilojn por fuĝi kaj rikolti. La bienoj, la grandaj bienoj, troviĝis longan distancon ekstere de la ĝangalo, proksime de la grandaj vilaĝoj kaj urboj, proksime de la militistejoj kaj garnizonoj, ili estis ĉiam protektataj de la speciale elektitaj korpogardoj de la diktatoroj, la tielnomataj *rurales*. Por ricevi la agrojn oni unue devis venki tiujn *rurales* kaj *federales*. Kaj ili venkeblis por longa daŭro nur tiukaze, se oni detruis ĉion, per kio la mastroj kaj korpogardoj nutris kaj satigis sin.

Ribelo por la *muchachos* signifis nenion krom detruo kaj

neniigo de ĉio, kion ili trovis kaj renkontis dum siaj marŝoj. Ĉiuj tiranoj, diktatoroj, *patrones* kaj *aristocratas* senkompatate mortbatendis, kaj ĉiuj tiuj estis neniigendaj kaj murdendaj kun sia tuta idaro, kiuj iutage eble ree povus fariĝi malamikoj aŭ tiranoj.

Ne estis la kulpo de la ribeluloj, ke ili estis kolere detruemaj kaj murdemaj. Neniam ili povis interkonsiliĝi, neniam ili rajtis interkonsiliĝi, neniam venis al ili iu, kiu instruis ilin pri politikaj aŭ ekonomiaj aferoj. Neniu gazeto rajtis kritiki la politikon de la diktatoro. Ne estis libro, kiu instruis laboristojn, kiel ili plibonigu sian situacion sen murdo aŭ detruo.

Ĉiuj, kiuj ne apartenis al la grupo de la diktatoroj, devis obei. Laboristoj kaj kamparanoj kaj aliaj simplaj homoj havis nur unu devon, kaj tiu estis obei. Neniu havis rajton. Blinda obeemo tiom longe kaj tiom kruele estis skurĝita en ilin, ĝis ĝi fariĝis ilia ununura karaktera trajto. Ĉie, kie la malmultaj havas la rajtojn kaj la multaj aliaj nur devojn, kiuj eĉ ne plifaciliĝas per tio, ke la koncernatoj rajtas kritiki ilin, la fino ĉiam estas neevitebla kaoso.

Ne nur El Caudillo diktis diktatore, diktatore diktis ankaŭ la grandaj fabrikmastroj, la bankieroj, la feŭdaj mastroj kaj posedantoj de grandaj bienoj, dum ili havis neniun

alian devon krom lasi la diktatoron sur la trono sen ĝeni lin.

Ĉiam, kiam tiuj grandaj mastroj devis diktatore dikti ion, ili diktis ĝin ne mem, sed ili devigis El Caudillo-n, la diktatoron, diktatore dikti tion, kion ili celis. Je tiu maniero oni ŝutis sablon sur la okulojn de la popolo. Se la grandaj industrimastroj kaj financmoguloj mem estus diktatore diktintaj ion, la popolo ja povus ekhavi la opinion, ke la tuta diktado servas nur al la celo plenigi la poŝojn de la grandaj mastroj. Sed tial, ĉar la mastroj devigis la diktatoron dikti siajn *decretos* pro sia imposta forto, oni diris do, ke tiuj *decretos* estas necesaj por la bonfarto de la ŝtato kaj tiel oni endormigis la bonajn patriotojn. Kontraŭe al la bonfarto de la ŝtato oni tial facile pretervidis, ke tiuj novaj *decretos* servis al neniu alia celo krom la personaj interesoj de la grandaj mastroj.

Se la lando hazarde estus glitinta en militon, ĝi malaperus de landa mapo. Ĉar tiom malmulte, kiom la diktatoroj kaj magnatoj permesis, ke iu grumblu per vortoj je iliaj agoj, tiom malmulte, se ne eĉ pli malmulte eltenus la generaloj kritikon pri siaj planoj. Tiel, kiel ili pensis entrepreni

militon, nur tiel estis ĝuste kaj tiu, kiu farus aliajn proponojn, estus ŝtatperfidulo.

Eĉ, se la *muchachos* provintus inviti la *patrones*, por ke ili pace kaj kiel samrajtigitoj interkonsiliĝu kun ili, la patronoj respondus nur per mitraloj. Estis ja jam krimo je la ŝtato eĉ nur fari proponon, laŭ kiu eble la laboristoj kaj mastroj interparolu pri ekzistantaj rilatoj, aŭ ke laboristoj eĉ havu la rajton, entute fari proponon. La laboristoj devis nur obei kaj streĉege labori. Ĉion alian sciis la diktatoro kaj ties kripokunuloj pli bone. Tial ili havis ja ankaŭ la rajton diktatore dikti kaj komandi.

Ne estis pro la sovaĝeco de la indiĝenaj laboristoj, ke ili detruis kaj murdis, kie ajn troviĝis okazo por forigi la ŝutaĵon, kiu baris ilian vojon.

Ili estis nur tial sovaĝuloj, ĉar ili havis kontraŭulojn kaj subigantojn, kiuj estis dekfoje pli sovaĝaj kaj centfoje pli kruelaj, se ili timis, ke iliaj ŝinkoj povus esti prironĝataj.

Du semajnojn post la komenco de la ribelo la trupo estis preta ekmarŝi. Du poŝtrajdistoj estis kaptitaj de la grupoj, kiuj alvokis aliajn monteriojn. El la gazetoj kaj leteroj, kiujn legis fervore tiuj viroj, kiuj kapablis legi, estis ellegebla, ke en la nordo de la respubliko kvar regimentoj malkaŝe ekribelis, sataj pri la diktaturo kaj des pli sataj pri la maljuna ridindulo, kiu tute kovrita per ordenoj kaj eterne fabulante pri siaj militaj agoj, fariĝis tiom cerbmalsana, ke li nomis sin kaj lasis nomi sin „Dio kaj savanto de la meksika popolo“. Kompreneble el la poŝto ankaŭ ellegeblis, ke la maljuna kaciko ne tiel rapide forlasus la tronon, kiel entuziasmaj revoluciuloj diskonigis tion. Centmiloj per siaj postenetoj kaj oficetoj estis ligitaj kun la diktaturo je vivo kaj morto. Tiuj patriotoj ne defendis la maljunan *El Caudillo*-n, ili defendis sian panon kaj siajn bifstekojn, kaj tiu defendo estis pli serioze traktenda ol tiu de diktatoro, kiu estas timata kaj eble adorata, sed de neniuj ŝatata kiel amiko. Diktatoroj havas pli da piedlekantoj oli ili volas havi, sed ili havas neniam amikon.

Kiam ĉiuj poŝtaĵoj estis legitaj, diris Martin Trinidad:
„Ĉio ĉi ne afliktas min. Tie ekstere neniuj scias ion pri ni.
Ni atendas neniun. Se ni volas havi teron kaj liberon, ni
devas perlabori ĝin al ni kaj batali pri ĝi. Eĉ se el ĉiuj
postrestus nur unuopulo, sed li posedus sian agron en
paco, kaj li ne havus tiranon super si, nia batalo ne estus
vana. Ni vivas surtere ne por obei, por esti subuloj kaj eĉ
turmentatoj pro tio. Ne, kamaradoj, ni vivas surtere por
esti liberaj kiel personoj kaj kiel homoj. La vivo estas tro
mallonga, ke ni forĵetu ĝin por ideoj de aliaj kaj por la
tintilado kaj maskmontrado de tiuj, kiuj volas gvidi nin,
por nin povi regi. Sed, se ni volas esti liberaj, *muchachos*,
ni ĉiutage denove devos perlabori nian liberon. Tiu, kiu
volas ripozi sur sia libero, havos ĝin eĉ ne dum semajno,
ĝis ĝi estos forprenita de li. Kiam vi iam estos liberaj,
kamaradoj, tion mi povas diri al vi, vi perdos la liberon je
la sama tago, kiam vi festos kaj sunbanos en via libero. Ne
pensu, ke vi havas la liberon, se vi supozas, ke ĝi estas
certigita nun al vi per leĝo kaj konstitucio kaj mi ne scias
per kio plu ankoraŭ, sigelita kaj stampita kvazaŭ por
eterneco. Estas rajtigita ĉi tie surtere per letero aŭ sigelo
nenio, kio ne estas ĉiutage denove skribita kaj denove

sigelita. Neniam fidu al gvidanto, kiu ajn tiu eble estas, kio ajn li eble promesos al vi, de kie ajn li venas. Libera restos nur tiu el vi ĉiuj, kiu konfidas al si mem, tiu, kiu ĉiutage batalas mem por sia libero kaj donas ĝin al neniuj por konservado. Vi ĉiuj estos liberaj, se vi volas esti liberaj, kaj vi ĉiuj estas servutuloj, se vi volas esti servutuloj kaj lasas komandi vin. Ne lasu komandi vin kaj obeu neniun. Ne afliktiĝu pri la libero de viaj najbaroj. Zorgu unue pri via libero propra. Kaj, se ĉiu el vi estos libera, ankaŭ ĉiuj aliaj estos liberaj, kaj neniuj bienulo kaj neniuj *politico* kaj neniuj *cientifico* povos sendi vin en la monteriojn.“

„Vi pravas, *camarada!*“ vokis Celso. „Ni marŝos, kaj neniuj armeoj el *federales* aŭ *rurales* detenos nin de tio. Postmorgaŭ ni ekmarŝos!“

„Postmorgaŭ ni ekmarŝos!“ vokis jubile centoj de *muchachos*, kiuj tie kolektiĝis.

Kaj tra la ĝangalo resonis unuvoĉa militkrio: „*Tierra y Libertad!*“ kiu konfirmis, ke ĉiuj *muchachos* esti laŭsence unuecaj.

„Ni havos ankoraŭ multe da laboro ĉi tie, antaŭ ol ni povos ekmarŝi“, diris Andreo, kiam la *muchachos* kune sidis ĉe la manĝo. „Tre grava afero estos farenda, mi diras, por ke vi eksciu tion.“

„Nu, kio tio do estas?“ demandis Celso. „Ni faros ĉion, kio estos necesa, eĉ se ni devus mortbati ĉi tie la tutan kanajlaron, la fian bandon, kiu restos en nia dorso kaj ĉiam kaj eterne perfidos nin.“

„Tiujn mi ne celis.“ Andreo rigardis transen al la ĉef-*oficina*. „Jen transe, tie estas tio, pri kio mi parolas. Ĉio, kio estas papero, estu bruligita kaj la cindro blovita en ĉiujn ventojn.“

„Dio damnu ĝin, Andreĉjo, vi pravas“, vokis Martin Trinidad. „Tion ni eble eĉ forgesus. Ĝuste, ĉiujn kalkuladajn ĵurnalojn ni forbruligu, ĉiujn kontraktojn, ĉiujn listojn kaj ŝuldoskribaĵojn. Kaj, kiam ni venos al la

vilaĝoj en Hucutsin, ni terenbruligos la tutan *cabildo*-n, la tutan urbodomon.“

„Por kio?“ demandis Pedro, „tie en Hucutsin ni ne havas ŝuldojn.“

„Eble ne“, korektis lin Martin Trinidad. „Sed tie estas kopioj de ĉiuj dokumentoj kaj kontraktoj kaj obligacioj . Entute mi devas diri al vi, se vi volas venki kaj volos daŭre resti la venkintoj, vi devos forbruligi ĉiujn dokumentojn, kiujn vi ie vidos kaj ekrigardos. Ĉiuj revolucioj, kiujn subigitoj kaj tiranitoj iam entreprenis, fiaskis, ĉar oni ne forbruligis la dokumentojn. Vi povos mortbati ĉiujn bienulojn, se vi volas kaj, se vi kaptos ilin. Sed iutage venos iliaj filoj aŭ filinoj aŭ kuzoj aŭ onkloj kun dokumentoj kaj registroj kaj katastroj. Kaj se vi tiam en bela trankvilo kaj paco kultivos viajn *milpas* kaj ne plu pensos pri ribelo plu, tiam ili ĉiuj iom post iom rampos el siaj kavernoj kaj kaŝejoj kaj venos kun policianoj kaj *federales* kaj *rurales*, kun juĝistoj kaj kodoj por ataki vin per la montrado de dokumentoj. Kaj la dokumentoj pruvos, ke viaj *milpas* apartenas ne al vi, sed al *don* Aŭrelio aŭ *don* Cornelio aŭ *doña* Rosalia aŭ *doña* Regina,

kaj mi ne scias, kun kiu ankoraŭ ili venos. Kaj tiam oni diros al vi: '*Muchachos*, la revolucio delonge pasis kaj nun ni vivas ĉiuj ree en paco kaj ordo, laŭ deco kaj laŭ la moroj en civilizacio, kaj tial ĉiuj ĉi paperetoj kaj stampoj kaj subskriboj estas respektendaj, ĉar sen dokumentoj ne eblas civilizacio.“

„Ĉe la diablo, Martin, vi pravas“, vokis Matias, „tiukaze ni farus ĉion por nenio kaj devus komenci denove.“

„Bone, ke vi akceptas tion. Kaj tial mi diras al vi, ke ni ĉi tie nun kunkolektu ĉiujn paperojn kaj forbruligu ilin. Kaj kiam ni venos al la bienoj kaj en la vilaĝojn kaj al Hucutsin kaj Jovel kaj Balun-Canan kaj Oshchuc kaj Cahancu kaj Nihich kaj Achlumal, jen ĉiam kaj ĉiufoje ek al la *cabildo* por forbruligi la civilstatan registron kaj ĉiujn paperojn: geedziĝdokumentojn kaj registrojn pri mortintoj, naskiĝlibrojn, registrojn pri vendado, impostĵurnalojn, entute ĉio, kio estas papero kun stampo kaj subskribo. Se ĉio iam estos forbruligita, scios neniuj plu, kiu tiu estas, kiel tiu nomiĝas, kiu estis ties patro kaj kio apartenis al ties patro. Tiam plu alkuros neniuj heredantoj, kiuj svingados paperon enaere. Tiam estos vi

la solaj heredantoj, kaj tiam vi restos daŭre la solaj heredantoj, ĉar neniuj plu povos pruvi ion. Ja por kio vi bezonas naskiĝregistrojn? Vi havas malsaton, kaj tio estas sufiĉe da pruvo, ke vi estis naskita kaj, ke vi vivas. Kaj por kio la mondo bezonas geedziĝregistrojn? Vi vivas kun la ino, kiu amas vin kaj produktas infanojn kun ŝi, kaj tial vi simple estas geedzoj. Por kio vi do bezonas ankoraŭ paperojn? Por ke vi sciu, la dokumentoj ekzistas nur tial, por ke oni ree povu forpreni de vi la teron, kiun vi kultivas. Kiu la teron kultivas, al tiu ĝi apartenu; kaj se vi kultivos la teron, tio estos la plej bona dokumento, kiun vi povus havi, kaj per kio vi povus pruvi, ke la tero apartenas al vi.“

Dekoj de viroj ekstaris, forgesis sian manĝon pro tio, kion Martin Trinidad klarigis kaj formis densan bulon ĉe la grupo, kie kaŭris Martin Trinidad, Celso, Andreo, Pedro kaj Matias. Eĉ vorton el tio, kion diris Martin Trinidad, ili ne volis lasi neaŭdita. Tio estis nova al ili, sed ili komprenis tuj, ĉar ĝi estis tiom simpla. Ili ĉiuj konis la regadon de dokumentoj kaj listoj kaj ŝuldolibroj. Ili ĉiuj sciis, ke tiuj paperoj estis kvazaŭ iliaj tiranoj plej grandaj.

Kiam ajn oni alvokis ilin, ĉu estis la bienisto aŭ la polico aŭ *cura*, oni ĉiam montris al ili fakturlibron aŭ punpagendaĵon aŭ baptateston, kaj ĉiam ili devis pagi, aŭ oni metis ilin en la *calabozo*-n aŭ vendis ilin en monterion aŭ ili ricevis novan mastron. Estis ĉiam iu papero, per kio oni pruvis al ili, ke ili rajtas diri nenion, sed nur obei.

„Ni estas tamen malbenitaj kaj pedikohavaj filoj de putinoj“, vokis Santiago. „Pri tio mi ne pensis. Sed vi ja pravas, Martin. Estas tiel, kiel vi diras. Ĉio, kio estas papero kaj stampita kaj priskribita, devos esti forbruligita.“

„Mi volus nur scii, de kie li havas ĉion tion, ĉu?“ demandis Gabino, unu el la *hacheros*. „Vi scias ja pli ol nia *cura*, *hombre*, efektive, vi scias multe pli ol li.“

„Tion li ĉion legis en libroj. Tio estas ja ĝuste la afero, ke oni devas povi legi, se oni ne plu volas akcepti maljustaĵojn“, diris alia el la viroj.

„Kompreneble mi ĉion tion legis en libroj, ja kion vi

imagas?!“ Martin verŝis kafon en sian pelvon. „De kie, ĉe la infero, vi do pensas, mi prenu tion? Mi legis amason da libroj, ja amasegon. Kaj ĉiuj pri revolucioj, insurekcioj kaj ribeloj. Kaj pri tio, kion faris la homoj en aliaj landoj, se ili ne povis pli longe elteni subigon kaj volis senigi sin de siaj skurĝistoj kaj tiranoj kaj bestaĉaj regentoj. Sed tio pri la paperoj kaj dokumentoj mi legis en neniuj libro, tion mi elpensis mem.“

„*Hombre* mia, tio estas ja la plej bona el ĉio ĉi“, kriis Pedro trans la tutan grupon. „Se vi tion mem elpensis, vi scias ja multe pli ol estis skribita en la libroj.“

„He, *burro*, maljuna azeno“, vokis Celso al li, „kompreneble li scias pli ol ĉiuj libroj, kiuj ekzistas. Kaj li povas elpensi ankoraŭ multe pli, se li volas, kaj eĉ tion, kion oni tute ne povus meti en librojn. Li estas ja profesoro, vera instruisto. Do, por ke vi fine ĉiuj sciuj ankaŭ tion, bovoj. Neniu el vi en sia tuta vivo estos instruisto. Sed eble almenaŭ Andreo, kiu lernis iom, ĉar li havas prudenton. Ni estas multe tro stultaj. Profesoro li estas, tiu Martin Trinidad, vera instruisto, kiu instruis en grandaj lernejoj multajn infanojn.“

„*Un profesor?*“ demandis deko da viroj samtempe, kaj parte mirigite ili reciproke rigardis sin.

„Celso diris tion. Mi rakontis tion antaŭe al li. Estas ĝuste, mi estas instruisto. Sed ĝuste tial, ĉar mi estas honesta instruisto, tial mi ne estas piedlekanto kaj flatanto, kiu kapkliniĝante faras riverencojn. Mi ne lasas nebuligi mian cerbon de la *políticos* kaj *científicos* kaj mi ne akceptas, ke la maljuna kaciko tie supre estas la savanto de la respubliko. Tial la bestaĉoj min ja trenis en la koncentrejon. Unue al El Valle de la Muerte en Verakruco. Pli poste en la stratkonstruan koncentrejon en Jukatano. Buboj, tion vi povas fidi, jen la vento blovis ankoraŭ multe pli draste ol ĉi tie en la monterio. Ĉi tie mortaĉas du aŭ tri da viroj ĉiusemajne, kelkfoje eĉ kvin. Sed tie tuj mortaĉis tridek homoj en ununura tago! Ĉi tie vi trenas trunkojn, tio estas sufiĉe streĉega, sed vi havas dudek parojn da bovoj kiel helpoj. Sed en la koncentrejoj en Jukatano, tie, kien oni metas ĉiujn ĉi danĝerulojn, jen ni, la kaptitoj, tiras la pezajn ferajn straticilindrojn, jen helpas neniuj enjungitaj bovoparoj al ni. Jen estas ni la bovoj kaj muloj. Kaj skurĝadoj okazas senkomplete. Se vi

falas, la cilindro ruliĝos trans vin kaj la aliaj diras: *Por Dios*, kiom bonŝanca li estas, ke li jam trapasis tion. Sed *muchachos*, pri tio fidu al mi, ĉe Dio, ĉiuj viroj, kiuj tie revenas el la koncentrejoj, estas ĝisdure kuiritaj, brogitaj, rostitaj kaj kradrostitaj. Tiuj timas nek diablojn nek sanktulojn plu, kaj des malpli kacikojn kaj gvidantojn kaj *leaders*. Ili metas siajn manojn en fajron kaj lasas stufi ilin en la kazernoj kaj en la gardoĉambroj de la *rurales* nur por montri, kiom durigitaj ili estas, kaj kion la registaro devos atendi de ili, se ili iam ekatakos. Tiuj disŝiras ĉiun policanon ankoraŭ vivantan en pecojn, alsaltas policianojn per nudaj manoj, faras sin nenion el sabroj, bastonoj kaj mitraloj. Oni bone edukis ilin en la koncentrejoj, kie oni esperis fari el ili adorantojn de la maljuna kaciko. Atentinda kvanto da ili jam ekagis kaj laboras sekrete. Pasas nun jam neniuj tagoj plu, kiam matene ne almenaŭ dek dispecigitaj *rurales*, policianoj kaj uloj de la sekreta ŝtatpolico, estas trovataj oen anguloj kaj malplenaj ĉambroj, en fosaĵoj kaj sulkoj. La venĝo jam komenciĝis. Kaj nun estas vi en la vico, *muchachos*, por venĝi kaj repagi ĉiun baton, kiun vi ricevis. Kun terurigoj la kaciko havigis la potencon al si, kun terurigo li tenis sin

en la potenco, sed kun milionope pli granda teruriĝo li estos ĉasata ĝis pereco, kaj ĉiuj liaj torturservistoj kaj skurĝistoj kaj kriuloj kaj mesogantoj kun li. Ja ne cedu nun, tiom longe, kiom ankoraŭ unu el tiuj bestaĉoj ankoraŭ estas vivanta. Se vi vere volas fari revolucion, tiukaze faru ĝin tute kaj ne haltu meze de la vojo. Ĉiun fripono, kiun vi lasos vivi, elkovos kaj produktos cent idojn, kiuj estos eĉ pli fiaj friponoj. Risku ĉion! Estas pli bone, se ni ĉiuj mortaĉos en tiu ribelo anstataŭ vivi kaj la ribelo malsukcesos. *Tierra y Libertad, Muchachos! Salud! Viva la Revolucion Social!*“

Kaj denove bruas la militkrio kiel ventego trans la vastan placon de la *oficinas* kaj eĥis de la vandoj de la densa ĝangalo: „*Viva la Revolucion Social! Tierra y Libertad! Libertad para todos los Indios! Tierra para todos los campesinos! Abaja los Finqueros! Viva El Profesor! Arriba el profesor! Vivu la instruisto! Vamonos a la guerra civil! La Muerte al la dictadura! La diktaturo mortu! Viva el proletario indio!*“

Dum ankoraŭ jubilis la pli granda kvanto de la *muchachos* kaj multaj saltis pro entuziasmo en la aeron, sin reciproke brakumis kaj dancadis kaj kelkaj grupoj kantis kaj aliaj iris de grupo al grupo por ankoraŭ pligrandigi la entuziasmon aŭ doni konsilojn, marŝis ĉirkaŭ dudek viroj al la ĉef-*oficina* kaj prenis ĉiujn paperojn, ĵurnalojn, listojn kaj notfoliojn de la tabloj, el kestoj, de fostoĵ ĉe la vandoj kaj de bretaroj, disŝiris ilin per siaj manoj kaj dentoj kaj portis ilin eksteren sur la placon.

Ekstere tuj ekflamis fajro kaj ĉio, kio estis papero, komencis flamiĝi. Eĉ ne ununura parte karbigita ŝiraĵo povis eskapi. Ĉiun folieton, kiu estis forbloviĝonta, ili persekutis, kaptis ĝin kaj portis al la fajro kaj atente distretis eĉ la nigran cindron.

„Ne forgesu tiujn *artesanos*, la metiistojn. Ankaŭ tie troviĝas ankoraŭ sufiĉe da notfolioj kaj paperetoj. Ek, alportu ilin!“

La metiistoj ekŝvitis pro timo, kiam grupo rapidis al kelkaj kabanaj, en kiuj estis buligitaj la viroj kun siaj familioj, por ke ili ne elsendu mesaĝojn.

„Tenu fermitaj viajn didamnitajn grimacojn“, vokis Santiago, kiam li, sekvate de kelkaj paperserĉantoj, penetris en la unuan grandan kabanon. „Ni ne voros vin. Diru al via bastarda infera idaro, ke ili ne krii ĉi tie. Ekde nun krii ni, ĉu komprenite?“

„Jes, certe, *cierto, muchachito*“, diris *arriero*, mulpelisto, „prenu ĉion, kion vi trovos.“

„Ni prenos ĝin ankaŭ sen via permeso“, vokis Jeronimo, kiu urĝis proksime apud Santiago en la kabanon.

„*Por Jesu Cristo y la Virgencita*“, lamentis kelkaj el la inoj, „ne faru malbonan al ni, ni ja ankaŭ volonte sternos nin kun vi, sed ne faru ion malbonan al ni, *muchachos*.“

„Kun vi sterna sin, stinkantaj putinoj, ĉu? Tio certe plaĉus al vi. Ne, ne kun vi. Eĉ ne donacite. Kaj, se ni volus, ni farus tion sen demandi vin, ĉu komprenite, fiputinoj?“ Tio diris tria el la viroj, kiuj premegis sin en la kabanon.

Santiago ĉiujn pluajn ofertojn bruske interrompis: „Ek, donu ĉiujn paperojn, kiujn vi havas, pedikohavaj putinfiloj.“

„Estos pli bone, se vi forgesos eĉ ne ununuran leteron aŭ postaĵviŝilon, kiun vi ie proksime havas“, memorigis Jeronimo la timigitajn homojn, el kiuj ne nur ĉiuj infanoj, sed ankaŭ ĉiuj inoj kaj eĉ kelkaj viroj surgenuiĝis kaj alte kunpremite tenis siajn manojn, kvazaŭ ili alpreĝus la sanktulojn en preĝejo.

„Ni tratanĉos la gorgon al ĉiu, kiu retenos eĉ nur etan peceton da papero.“

„Jen, jen!“ el ĉiuj flankoj eksonis respondoj. Oni transdonis leterojn kaj fotojn kaj preĝlibrojn kaj notlibretojn kaj sanktulbildetojn kaj traktaĵetojn kaj lernejlubrojn, cigaredafiŝojn kaj salajroslipojn.

La forĝisto hezitis transdoni siajn salajroslipojn. Jeronimo tuj per larĝa pugno puŝis forte en lian gorgon, tiel, ke la forĝisto retroŝanceliĝis kaj perdis la spiron. El la kabanangulo, kie li sinkis teren, li diris: „*Perdoneme*,

muchacho, sed tio estas ja miaj salajroslipoj, se mi ne retenos ilin, oni ja ne pagos mian salajron.“

„Kial koncernu via merdosalajro min, putinfila porkoservisto“, kriis Santiago kolerigite. „La diablo pagu vian salajron. Tiu, kiu povis pagi ĝin al vi, delonge fulmtransiĝis inferen. Ek, donu la slipojn!“

Sin turnante al ĉiuj, li vokis: „Ankoraŭ unu plua vorto, kaj ni rapidigos la transdonojn per niaj maĉetoj! Ek, donu ĉiujn paperojn!“

Tri minutojn poste kriis iu: „Ĉu vi ĉiuj ĉion liveris?“

„Jes, *muchachos*“, vokis kelkaj metiistoj samtempe al li.

„Serĉu, *muchachos*!“ komandis unu el la amkompanantoj. „Serĉu, ankaŭ sub la pisoplenaj jujoj de la inoj. Ne forgesu eĉ unu lokon. Kaj al tiu, kiu kaŝis nur unu peceton da papero, kiu estas pli granda ol tiu ĉi ungo de fingro, ŝovu la maĉeton en sterkoventron. Diodamnita, hipokrita kaj rampanta denunca kanajlaro kaj klaĉbando! Se la vento turniĝos al ni, vi ĉiuj tuj ree ĉeestos. 'Aĥ, kara patronĉjo, oh, gracoplena kara mastro, ni estis ĉiam

kontraŭ tio, neniam ni partoprenis ĉe tio, ni estas por ordo, patronĉjo!“ Santiago kun rikana buŝo simigeste imitis, kiel li imagis parolonta tiujn metiistojn al patronoj, *rurales*, *federales* kaj policanoj, se la ribelo estus subigita. „Se oni decidus laŭ mi“, li kriis, subite koleriĝante kaj tretante la plej proksiman viron, taniston, en la ventron, „se oni decidus laŭ mi, diodamnitaĵoj fetorantaj klaĉuloj, mi tratanĉus al ĉiu el vi, inklude de via bastarda idaro, la gorgojn. Ĉar vi estas rampanta perfidema fibando. Merdo vi estas.“

Tiam turniĝante al siaj kunuloj, li diris: „Ĉu vi trovis ion? Ne? Jen ilia bonŝanco. Ek, al la aliaj kabanoj, kie la putinfiloj estas firmpinĉitaj. Kaj ne tro delikate traktu ilin. Andreo kaj Celso kaj El Profesor ne volas havi tion tiel. Domaĝe, mi lasus ĉi tie neniun vivanta.“

Du horojn post tio eĉ ne unu eta peceto da papero plu troveblis ie en la *ciudad*, ĉu presita, ĉu priskribita, ĉu malplena.

Vidante la nigran monton da cindro, diris El Profesor al Santiago: „*Muy bien hecho, manito*; tre bone farita,

fratĉjo mia. Nun vi scias tion precize, tute same ni faros tion en Hucutsin kaj en ĉiuj bienoj kaj en ĉiuj oficejoj. Niaj kamaradoj en San Rafael, en la granda paperfabriko, scias produkti paperon. Ili faros por ni novan paperon, kiun ni tiam priskribos kaj surpresos, tiel kiel plaĉos al ni kaj kiel ĝi bonfartigos nin.“

Pli malfrue vespere Andreo kaj ankoraŭ du pluaj viroj rondiris al ĉiuj grupoj kaj demandis, kion ĉiu volas havi el la *tienda*, ke ĉiu pripensu tion, ĉar morgaŭ ĉio estos disdonata, kio estas en la *tienda*: vestoj, ĉemizoj, pantalonoj, koltukoj, matoj, kovriloj, maĉetoj, municio, kolĉenoj, orelringoj, fingroringoj, butonoj, kuntorditaj fadenoj, ŝtofoj, hararrubandoj, ĉapeloj, sandaloj, ledoj, rimenoj, ŝnuregoj, tabako, alumetoj, cigaredoj, lanternoj, kandeloj. Dirinte tion, li aldonis: „Sed neniu postulu plu ol li nepre bezonas. Kiam ĉiu havos tion, kion li vere bezonas, ni povos paroli pri la restaĵoj. Eble eĉ ne sufiĉos por ĉiuj, por doni al ĉiu tion, kion li bezonas. Kaj ĉiu pripensu ankaŭ tion, ke li devos porti surdorse certe konsiderindan parton de tio, kion li kunprenos, ĉar la ĉevaloj, azenoj kaj muloj devos porti sufiĉe da ŝarĝo por ĉiuj el ni, kiuj ne estas sufiĉe fortaj. Marŝos ankaŭ dekdu inoj kun ni kaj preskaŭ dudek infanoj.“

Martin Trinidad, El Profesor, aliĝis al la grupo. Li diris: „Pli malfrue ni havos militkonsiliĝon pri tio, kiel ni

aranĝu la marŝon. Kaj, ĉar vi ĝuste nun parolas pri la *tienda*, sciu, ke la nutraĵoj ne estos disdonataj al ĉiu unuopulo, sed al la marŝtaĉmentoj, kiuj samtempe estos kuirgrupoj kaj provizgrupoj. La taĉmentojnojn ni kunmetos en kunvenoj, sed vi ĉiuj reciproke povos interŝanĝi ĉion laŭplaĉe. Kamarado kun kamarado. Kaj kompreneble ĉiu devos kunporti parton de siaj nutraĵoj en sia kuirgrupo. Tial ne kunportu tro da aĵoj: la marŝo al la unuaj vilaĝoj eble daŭros kvar aŭ eĉ kvin semajnojn. Ni renkontos la plej fortan pluvsezonon, kaj ni havos distancojn, dum kiuj ni ĝojos, se ni marŝos ĉiutage tri leŭgojn.“

Kiam sekvmatene la stoko de la *tienda* estis disdonita, montriĝis, ke nur tre malmulte estis postulita. Tio, kion ĉiu nepre bezonis, oni disdonis jam en la unuaj tagoj de la ribelo. Ĉu la kaŭzo, kial la *muchachos* ne postulis pli el la *tienda*, estis manko de havemo aŭ la penso pri la pli granda ŝarĝo, kiujn ili devus porti dum la komplika marŝo, tion Andreo, la administranto de la *tienda*, ne kapablis decidi. Li ankaŭ tute ne cerbumis pri tio. Moralajn konsiderojn, ke eble temas pri mallegala havaĵo,

havis neniŭ el la *muchachos*. Tio estas certa.

Sed certa afero estis rimarkinda. Tiel rimarkinda, ke ĝi frapis la atenton de Andreo. Estis tio, ke granda kvanto de la *muchachos* ne iris al la *tienda* kaj ne postulis ion, kvankam ili surhavis nur ĉifonojn, kaj tial eĉ la plej aĉa kaj plej malkara ĉemizo, kio estus trovebla en la *tienda*, estus granda valoro por ili. Andreo renkontis kelkajn el ili kaj demandis ilin, kial ili ne postulis almenaŭ laŭordan ĉemizon aŭ uzeblan lanpantolonon kaj novan ĉapelon. „Antaŭ ol ni estos el la ĝangalo ja tamen ĉiuj vestoj estos disŝiritaj“, diris unu el ili. Alia respondis: „Por kio la ĉemizo taŭgu, se mi tamen mortaĉos. Ja tion mi povas diri al vi, tuj kiam mi renkontos iujn *rurales*, mi ekatakos ilin kiel freneziĝinto. Aŭ mi postrestos kuŝanta en la koto, tiukaze estus en ordo tiel, tiukaze mi bezonus tute nenion plu. Aŭ ses el tiuj favaj hundoj postrestos kuŝantaj, kaj tiukaze mi tiam tute trankvile povos elserĉi al mi ĉion, kio plaĉas al mi. Ties ĉemizojn kaj pantalonojn kaj uniformjakojn kaj botojn. Antaŭ ĉio alia bonan karabenon kaj mil altkvalitajn kartoĉojn, eĉ se ili pezus kvindek kilogramojn, sed mi portus ilin. Do, kial mi

tiukaze okupiĝu pri la fatraso en via *tienda*? Mi estas ja nun *un rebelde* kaj tial devas pensi pri aliaj aferoj ol pri la aĉa fatraso, kiun vi havas en la damnita *tienda*. Tiom longe, kiom miaj ĉifonoj kovros mian aspergilon kaj mian postaĵtruon, ili estos al mi sufiĉe bonaj dum la marŝo. Kaj se mi poste bezonus ion, tie estos ja la *rurales* kaj *federales*, kaj tiujn mi ja traktos laŭorde, Andreĉjo.“

Kiam Andreo ankoraŭ plu enketis kaj volis ekscii opiniojn, li lernis, ke la plimulto el *muchachos*, kiuj ne okupiĝis pri la *tienda*, havis saman aŭ similan respondon. Ili nur ne tiel bone povis esprimi tion per vortoj kiel la unua *muchacho*, *boyero*, kiun demandis Andreo.

Tri tagojn ĉiuj inoj de la *artesanos* devis baki kaj rosti *totopostles* por la forirontaj *muchachos* por krei grandajn provizojn. Ĉiu *muchacho* estu ricevonta mininume *sontle* da *totopostles* por la marŝo. Unu *sontle* estas kvarcent *totopostles*. Tio estis sufiĉe malmulte por tia longa marŝo; ĉar la *totopostles* estis sufiĉe maldikaj. Oni simple povus manĝi dudek da ili dum unu sido sen embarasigi la stomakon.

La inoj ja unue ne volis fari tion, por ke ili ne fariĝu servistinoj, kuirstinoj kaj bakistinoj por la *muchachos*. Ili sentis sin ofenditaj rilate al sia digno. Preterire Santiago hazarde aŭdis unu el la inoj. „Kial taŭgu ĝuste ni por tio baki *totopostles* por tiuj kotaj kaj pedikohavaj fi-chamulanoj. Estas hontego kaj humiligo por ino de ladino devi esti *la criada* por tia kota chamulano, kiu eĉ ne kapablas paroli kristanan lingvon.“

Santiago trankvile lasis elparoli ŝin. Sed nun li preteriris angulon de la kabano. „Nu, diodamnitaj stinkpiĉulinoj, por kio vi, cetere, entute taŭgus, kaj kial ni cetere lasu vivi

vin kun via bastarda idaro?“ La inoj terure ektimis, kiam ili vidis stari Santiagon antaŭ si, ekkomprenantaj, ke li aŭdis ilian klaĉon.

„Dio damnu vin“, li kriegis plu al ili „ni faris ja por vi, fatrasuloj, mil da *faenas*, kromlaboron ĉiuvespere, post nia damnite streĉega ĉiutaga laboro. Kromlabore ni devis haki ŝtipojn por vi, ni devis ripari viajn tegmentojn, reordigi viajn latbarilojn, priŝmiri la vandojn per argilo, ni devis planti kaj fosadi la ĝardenojn por vi, ĉio por nenio, kaj ĉio krom kaj post nia dura laboro, kiam ni apenaŭ plu povis rampi. Kio okazis tiam? Jen vi, fetorantaj putinoj, ja ne malfermis la buŝaĉon, eĉ ne unufoje iu el vi plendis pro tio, ĉu? Sed diru nur, ke tamen jes, jen mi tuj larĝbatos viajn mensogemajn grimacojn tiom, ke ili krevos, putraĵo, nur tio vi estas. Ek, al la *metates* kaj knedu. Kaj mi mem elprovos ĉu la *totopostles* estos kneditaj bone. Kaj, se ili ne plaĉos al mi, ĉe la diablo, mi tretos kontraŭ viaj grasaj femuroj ĝis ili estos verdaj kaj bluaj. Ek, *y un poco prontito*, sed tre *prontito*. Kaj sekigu maizon, knedu, baku kaj poste rostu ĝin. Post tri horoj mi revenos, kaj, se ĉiu el vi ne estos

liverinta dek *sontles*, mi kaptos kaj traktos vian pedikohavan hararon. Do, hopu kaj saltegu!“

„Sed, *muchacho*“, timide respondis iu el la inoj; „sed tion vi ja scias certe bone, ke la maizo bezonos dek kaj pli da horoj ĝis ĝi fariĝos mola, eĉ se ni enmetos grandan pecon da kalko.“

„Tenu fermita vian buŝaĉon! Se vi ne kapablas moligi la maizon sur fajro, jen sidigu vin per via postaĵo sur ĝin kaj elkovu ĝin ĝis moliĝo. Sed post kvar horoj mi volos vidi tiujn *totopostles*. Milfoje ni devis fari dum unu tago laborojn, kiujn homo ne kapablus fari dum tri tagoj; kaj, se la laboro ne estis preta, oni pendumis nin aŭ skurĝis nin tiel, ke la pecoj da karno disflugis kiel hajlo. Ĉu vi tiam iam malfermegis la buŝaĉon kaj diris al la sinjoro patrono, ke la kompatindaj *muchachos* tion ne povos fari ĝustatempe? Nenion aŭ nur merdon vi faris. Kaj vi eĉ ĝojis, se ili skurĝis nin kaj vi eble eĉ diris aldone al la *capataces*: 'Suke tradraŝu ilin, tiujn chamulanajn kanajlojn.“

„Tion mi diris neniam“, defendis sin la edzino de la

jungilarfaristo.

„Eble ne vi, sed aliaj diris tion, kaj vi protestis eĉ ne per unu vorto. Do, ekhopu!“

La inoj ekkuris kiel obsedite kaj ĵetiĝis sur la maizon. Ili alvokis ĉiujn siajn infanojn, por ke tiuj helpu elpremi la maizgrejnoj al ili. Santiago kompreneble ne iris post kvar horoj al ili por kontroli, ĉu la *totopostles* estas jam pretaj. Li sciis, ke la komisio dum kvar horoj ne plenumebblas.

Rimarkoj

criada = ĉambristino, servistino

metates = indiĝenaj frotmueliloj

y un poco prontito = *iom rapide*

La edzoj de la inoj, la *artesanos*, ankoraŭ eĉ pli severe estis traktataj. Ili havis Matiason kaj Santiagon kvazaŭ sur la nuko, kaj ambaŭ eĉ multe pli draste ol Santiago al la inoj diris al ili, kion ili pensas pri ili.

La viroj riparis ĉiujn selojn, plenŝtopis la pakselojn, eltranĉis rimenojn kaj kuntordis ŝnurojn, ili kuracis ŝarĝbestojn, kiuj alvenis vunditaj de la paŝtejoj. Estis sufiĉe da laboro por fari marŝpreta la grandan trupon. Kaj la *muchachos* sciis bone, kiel eklaborigi la metiistojn. Ili devis uzi nur la samajn rimedojn, kiuj estis uzataj de la samaj metiistoj kontraŭ ili. Ĉe tio eksciis tiuj *favoritos* de la regintoj, tiuj flatuloj de la patronoj, eĉ se nur malfrue, sed fine foje je la propra korpo, kiel tio sentiĝas, se oni ne apartenas al al favoratoj kaj preferatoj, sed al la subigitoj, kiuj lernas neniun vorton krom la signifogравan: obei.

Tiu instruado tamen ankoraŭ okazis tute gracoplene. Oni ne skurĝis aŭ pendumis iun. Kaj nur ĉeokaze tro fervoraj *muchachos* alkroĉis kelkajn puŝojn dorsen kaj sur la ripojn de la viroj aŭ tretis perpiede iun por disdoni al la

ordonoj pli grandan emfazon kaj pli rapidan plenumon.

Ĉe tio la *muchachos* eksciis ankoraŭ aldone, pri kio ili tute ne sciis ĝis tiam, ke ili kapablas tion. Ili lernis, ke ankaŭ ili kapablas ordoni, se tio devas esti. En sia tuta longa ĝistiaama vivo ili ĉiam pensis, ke oni devas esti naskita kiel ladino aŭ kiel *cachupin* por scii, kiel oni ordonas. La ordonado estis tute ne tiom malfacila, kiom la *muchachos* antaŭe supozis. Kaj, ĉar tio ne estis komplika komandi ĉiujn ĉi *favoritos* de la regantoj, tial ankaŭ ne multe pli komplike povus esti entute regi, se estus necese. Komandado kompreneble estas multe pli facila ol regi. Tial ĉiuj diktatoroj estas tre malbonaj regantoj. Komandi iun povas ĉiu azeno, des pli indiĝenon, kiu povas nek legi nek skribi. Diktatori povas eĉ idioto. Kaj ju pli iu estas idioto des pli facile kaj pli senzorge kaj pli impertinente iu diktatoras.

Ĝis tiu momento la *muchachos* ankoraŭ estis tre malproksimaj de tio provi, ĉu ili same tiel bone povus regi tiel, kiel tie komandi la postaĵlekantojn de la patronoj. Inter la monterioj kaj la regenteco de la indiĝenaj proletoj estis ne nur marŝo dum semajnoj tra la ĝangalo en la plej

drasta pluvperiodo, sed interis ankaŭ la kompanioj kaj batalionoj de la *rurales* kaj *federales* kun mitraloj kaj moveblaj kampaj kanonoj. Sed ankaŭ tio ankoraŭ estis futura muziko. Unue necesis komenci per la regado kaj organizado tie, kie la *muchachos* konatiĝis al la ekonomiaj rilatoj.

„Ekzercu vin ĉi tie, kie vi konas ĉiun vojon kaj ĉiun arbon!“ diris El Profesor je tiu vespero. „Se ni iam alvenos tie, kie ni ne plu scios, kie estas dekstre kaj kie maldekstre, kaj kie ni troviĝos sur malkaŝita kampo, la afero fariĝos pli komplika. Ĉi tie en la ĝangalo ni venkus armeon da registaraj soldatoj kaj kvar armeojn da *rurales*. Ĉi tie ni ĉie estus la venkintoj. Sed ĉi tien tiuj sklavoĵ ne venus. Ĉar ili tro fekus en siajn pantalonojn. Ili atendas ekstere antaŭ la ĝangalo, en la vilaĝoj kaj la bienoj. Kaj se ni volas venki, ni devos iri al la bienoj kaj vilaĝoj. Jen helpas nenio alia. La ribelo devas esti elbatalita, ĝi ne estas eldiskutebla. Revoluciojn ankoraŭ neniam venkis subigitoj per tio, ke ili bele sciis paroli pri tio aŭ pacience aŭskultis, kion diris ĉiuj aliaj. Revoluciojn la regatoj gajnas nur per furioza batalo. Neniu alia rimedo

ekzistas. Tiu, kiu volas rakonti ion alian al vi, mensogas;
ĉar li estas je la flanko de viaj malamikoj, de viaj
tiranoj. Ne forgesu tion, *muchachos*! Ne hodiaŭ, ne
morgaŭ, kaj ne post cent jaroj!“

Ĉapitro 17

01

En ok taĉmentojn, kiel Juan Mendez ilin nomis, la granda aro estis dividita. Juan Mendez estis la generalo de la trupo. Ĉar li estis serĝento ĉe la *federales*, li havis komprenon pri militecaj aferoj. Dekfoje li gvidis partojn de kompanioj al militecaj ekzercoj, se la oficiroj estis tro pigraj aŭ tro ebriaj kaj ne kapablaj matene ellitiĝi. La ekzercoj por la soldataj taĉmentoj estis ordonitaj kaj tial farendaj. Kaj tial, ĉar krome neniu alia kapteblis, aŭ eble nur kapitano aŭ leŭtenanto por la tuta kompanio, la serĝentoj devis ŝtopi la breĉon kaj dresi kaj kurigi kompanianojn tien kaj tien.

Juan Mendez transprenis la unuan kompanion, lia bataliona kamarado, la kaporalo Lucio Ortez, la lastan *compania*, la endorsan protekton. El Profesor estis nomumita El Comisario, do, li fariĝis generalestro de la tuta armeo.

Andreo transprenis la organizadon de la provizoj kaj

deponejoj. Matiason, Fidelon kaj Cirilon oni respondeigis pri la transporto kaj ĉiuj ŝarĝmuloj kaj rajdobestoj.

Juan Mendez nomumis Celson kiel sian stabestron aŭ kiel li nomis lin: *Jefe del Estado Mayor*. Celso kompreneble tuj diris: „La titolo interesas min kiel hundokoto. Mi estas ja nur tial via adjudanto, por ke mi tuj povu esti la unua, kiu ekatakos, se mi nur vidos la unuan uniformon antaŭ miaj okuloj. Mi havas ja sufiĉe belan revolveron, ĉe l' diablo; sed mi pensas, ke mi preferos mian bonan intiman maĉeton.“

„Tute laŭ via plaĉo, *camarada*“, respondis Juan Mendez, El General, „pri tio ni parolos, se ni havos la unuan renkontiĝon post ni kaj tiam ankoraŭ vivos.“

„Eble mi tiam ne plu vivos, generalo mia. Sed ĉu mi mortaĉus ĉe tio ĉu ne, en tiu kazo, se mi mortaĉus, vi tamen postkrie nomu min skabian kaj pusoplenan hundon, se mi ne forsabris de minimuma kvinopo el la uniformuloj la kapon. Se tio ne sukcesus al mi, mi ne havus trankvilon en mia tombo kaj vi povus elfosi min,

tiam vi vidos, ke mi ankoraŭ vivos, ĉar mi ne povus mortaĉi antaŭ ol mi plenumis mian normkvanton.“

Nur tre malmultaj *muchachos* havis revolverojn, kaj eĉ malpli el ili posedis ĉasfusilojn. La plimulto de la pafiloj estis malnovaj hispanaj, kiujn oni buŝe ŝarĝas. Ili estis nur ses, oni forprenis ilin de la *artesanos*, el kiuj, kiel montriĝis, neniuj havis revolveron. La brandovendistoj kompreneble havis revolverojn. Ankaŭ la du *arrieros* posedis revolverojn, kiujn ili devis transdoni. Tiuj revolveroj kompreneble valoris preskaŭ nenion. Ili servis al la *arrieros* dum la transportoj kiel timigiloj kaj ne pafis, se oni liberigis la ellasilon.

Male al tio ĉiuj maĉetoj estis bone ŝlifitaj, ankaŭ la hakiloj, kiujn kelkaj el la viroj kunprenis. Sed entute prijuĝate kaj speciale en rilato al la granda amaso da marŝantaj *muchachos*, oni povis paroli en la plej bona maniero nur pri tre mizera armiteco.

Se oni plu konsideras, ke ĉiu unuopulo de la *rurales*, de la ŝtatpolico, jen la precipa persona ilo de la diktatoro, havis karabenon kun po kvin kartoĉoj en magazenoj, krome ĉiu

viro 45-an revolveron kun po ses kartoĉoj pendantaj je la koksoj, tiukaze ne estus troigite paroli pri memmurdo de la ribelantaj *muchachos*, se tiuj provus ataki eĉ nur malgrandan taĉmenton de *rurales*, kiuj ĉiuj estis ekzercitaj soldatoj. La registaraj soldatoj havis nur fusilojn kaj karabenojn ĉe si, sed se ili alvenis en taĉmentoj kun ĉirkaŭ kvindek viroj, ili kunportis unu aŭ eĉ du mitralojn kun si. Kaj ili sciis lerte uzi tiujn mitralojn de la plej bona usona konstrumaniero, kaj tre sukcese, kiel ili centfoje pruvis en multnombraj strikoj de laboristoj kaj en ribeloj de kamparanoj kaj peonoj. Se kvindek *rurales* atakis kvincent ribelemajn peonojn, tiukaze fine de la batalo la *rurales* havis eble tri mortintojn kaj kvin vunditojn, dum la ribeluloj postlasis sur la batalekampo kvarcent sesdek mortintojn kaj neniun vunditon. La kvardek ribeluloj, kiuj mankis en la tuta kvanto, bonŝancis eskapi en la vepron aŭ en la montojn.

La ununuraj viroj en tiu trupo de la mahagonoviroj, kiuj sciis ĉion tion tute precize, kio okazus en tia malsama batalo, estis El Profesor, El General kaj El Coronel. Lucio Ortiz estis nomumita kolonelo de la generalo.

Kaj tiuj tri viroj, kiuj sciis pro sperto, kiel malbone estis la bonŝancoj de la monteriaj ribeluloj pri venko, se ili rekontus trupon de la *rurales* aŭ *federales*, tute ne prisilentis sian scion. En la lastaj tagoj antaŭ la ekmarŝo ili diris multajn fojojn ĉe la bivakfaroj al ĉiuj *muchachos*, kio atendeblus ilin, se okazus batalo aŭ eĉ nur bataleto.

Sed ĉiuj avertoj kaj konsiloj de ili trafis kvazaŭ surdajn orelojn. Al la *muchachos* fariĝis ĉio tute indiferenta. Ili devis tiom trasuferi kaj elteni, ili kolektis tiom da kolero kaj malamo en si, ke ĉiu batalo kun ties malamikoj, egale kiel ajn estus la fino, pli estus liberigo el animaj turmentoj ol vera malvenko. Ili ne subigeblis. Ili ne venkeblis, almenaŭ ne konscie. Ili povis nur morti aŭ venki. Ion alian neniue el ili celis kaj neniue el ili esperis. Pri iu alia fino eĉ ne iu pensis. Ilia vivo fariĝis tiom senvalora kaj senenhava, ke fali kun la konscio, ke oni ribelis, estis milfoje pli valora kaj pli dum eterneco ol gardi sian haŭton, eviti batalon kaj forŝteliĝi sur apudvojoj el la ĝangalo por eviti, ke oni renkontu malamikojn.

Celso ne parolis por si mem. Tiel, kiel li, pensis ĉiu en la

trupo. Por ĉiu malfermiĝis jam la paradizo de la indiĝenoj, se sukcesus al li buĉi kvin *rurales* aŭ *federales* antaŭ ol li mem pereos.

Tia malamo kontraŭ la diktatoro kaj ties helpantoj kaj servistoj estis trovebla ne nur inter la plej sklavigitaj de la respubliko, simila sovaĝa malamo disvastiĝis en tri trionoj de la tuta popolo. Tiu malamo estis la kaŭzo, ke tiam, kiam la revolucio fine trabalais la tutan landon, oni faris je neniuj flanko prizonulon, sur neniuj flanko oni donis kompaton nek postulis ĝin. Kiel hontegon oni rigardis tion, se la kaptito lasis amnesti sin. Tiun, kiu ne gajnis kunpuŝiĝon aŭ batalon kaj ne povis fuĝi, oni murdis. Neniu vundito postrestis sur la batalkampoj. La inoj de la revoluciuloj, kiuj sekvis siajn edzojn, kuregis kiel obseditoj sur la batalkampo tien kaj tien kaj mortpikis per kuirejoj tranĉiloj ĉiun trovitan vunditan malamikon, kiu kuŝis sur la kampo. Nenio interne de la sama popolo povas esti tian nepacigeblan diablan malamon kiel diktaturo. Ĉar ĉiu diktaturo, kiom ajn entuziasme kaj jesige ĝi estas komencita de centmiloj da homoj, ĉiam degeneras en malamon, kiu estis naskita kaj

bredita per netoleremo kontraŭ alia parto de la popolo, kaj kiu kondukas al nepacigeblo, ĉar ĝi iom post iom ekskludigas ĉian reciprokan komprenon. Ĉar diktaturo povas daŭri nur tiukaze, se ĝi permesas neniun kritikon, neniun reciprokan elparoladon de pensoj.

Kiom senŝanca estis ĉiu konsilo de Juan Mendez, ke oni ekzercu la plej grandan atentemon, ĉar tiu sciis plej bone, kiel la *rurales* kaj soldatoj avancas kaj kiom multe ili avantaĝas kompare al senarmitaj kaj sendresitaj ribeluloj, tiu mem komprenis el la respondo, kiun li ricevis, kiam li iam diris: „Se ni renkontos kun nia unua *compania* trupon el ducent *federales*, restos neniuj el ni vivantaj. Vi havos eĉ ne tempon levi nur la revolveron per kiu vi ja tamen ne povus pafi, kaj jam vi estus mortpafitaj. Nu, kion vi faros tiukaze?“

„Kion ni faros?“ respondis Matiaso kun sakro. „Tion mi diros al vi, Juanĉjo, kion ni faros. Se ducent el ili proksimiĝos al ni, jen ni havos ducent, kiujn ni povus buĉi. Kaj estus plorinde malĝoje, se nur dudek alvenus kaj ne tricent. Ju pli da ili ni havos antaŭ ni, des pli ni povos mortbati. Kaj, se tio ne plaĉas al vi, jen vi ja povos

fuĝi antaŭ ol la afero fariĝos danĝera. Ni ne fuĝos kaj ekatakos.“

„Mi ne fuĝos“, diris Juan Mendez. „Mi avancos kiel la unua antaŭ vi ĉiuj. Mi volas ja nur diri al vi, kiel tio deruliĝos, mi faris tion, sed ne vi.“

„Konsentite“, diris pri tio Fidel, „kiam vi faris tion, vi estis soldato. Sed ni estas mahagonlaboristoj. Tie kiel ankaŭ vi nun. Tio estas tute alia afero ol esti soldato. Soldato povas esti ĉiu olda lama azeno. Sed revoluciuloj povas esti nur la plej bonaj, kiuj iam ajn estis naskitaj. Estas nur la plej bonaj patrinoj, kiuj naskas ribelulojn. Kaj pri mia patrino, jen neniuj aliaj estas en eterneco, kiu estis pli da ribelulino ol mia. Tiu elgratis per siaj ungoj de la frato de nia bienulo la ĝorĝon el la kolo, kiam li volis ĵetiĝi sur ŝin. La bienulo poste pafmortigis ŝin kiel malsanan hundon. Jen mia patrino. Kaj, se vi havas pli bonan, jen do parolu pri ŝi. Al mi mia patrino, kiu naskis min, estas pli valora ol dekmil Dipatrinoj starigitaj antaŭ mi, kiuj ĉiam nur volas esti admirataj. Sed se vi iam volas havi ion de ili, aŭ ili iom subtenu vin nur en unu diabla situacio, jen prefere midzu vin mem. Jen ili lasos sidi vin en la kaĉo. Ĉu vi tial

estos pendumita tiel, ke kunnodiĝos ĉiuj viaj ostoj, aŭ ĉu oni skurĝos vin, ke restos neniu karno plu sur via kadavro – ŝi tamen faros nenion por vi. Kaj krome, tute libere dirite, Santiago pravas, ni devus buĉi ĉiujn *artesanos* kaj sendi ili inferen. Ja kion valoras tiu fibando? Eĉ ne pantalonfekon.“

Generalo lerninta la metion fariĝus senkonsila rilate al tiu marŝo, senespera kaj despera. Li ekvidus tiom da malfacilaĵoj, ke li dirus: „Ho, kara Cezaro, per tiuj rimedoj mi movus tiun armeon eĉ ne trans distanco de dek kilometroj aŭ mi perdus duonon.“ Ĉiuj liaj parkere lernitaj reguloj kaj instrukcioj, liaj komandoj, liaj belaj grupflankeniĝoj kaj rektgenuigaj gamboĵetiĝoj eĉ nur pligrandigus lian senhelpecon. Li devus kunvoki ĉiujn stabestrajn oficirojn; poste dum kelkaj tagoj devus interkonsiliĝi kaj ellabori marŝplanojn, el kiuj ĉiu plano uzata, kiam la armeo fine vere estus sur la marŝvojo, kaŭzus, ke la tuta armeo en la marĉo estus retenita.

Sed Juan Mendez estis generalo de la revolucio. Li ne konis instrukcilibrojn, kaj li eĉ ne sciis, ke tiaj libroj ekzistas. Li diris: „*Marcha adelante al frente!*“ Kaj jen marŝis la armeo kaj marŝis ĝuste, ĉar ĝi marŝis laŭhome kaj nature.

En la seka sezono marŝo kun tia amaso da homoj kaj ŝarĝbestoj estis jam rimarkinda entrepreno, kiun neniu

laboristo-agento aŭ komercisto komencus. Nun, meze de la pluvsezono, neniuj prudenta homoj eĉ pensas pri tio, provi tian marŝon. Certe ne kun tia amaso da homoj kaj bestoj. Kompreneble, se la *muchachos* estus prudentaj homoj, ili ja ne havus la kuraĝon por ribelo. Ribeloj, popolvegiĝoj kaj revolucioj ĉiam estas malprudentaj, ĉar ili ĝenas la agrable dormeman staton, kiun oni nomas trankvilo kaj ordo.

La *muchachos* tiel pruvis krome, ke ili estis veraj ribeluloj kaj ne nur strikantoj. La vera revolucio ne konas malhelpaĵojn. La ribelulo, kiu en sia koro kaj en sia animo estas ribelulo, marŝas. Ĉiam tiu, kiu marŝas, jam gajnis je tri kvaronoj. Se iu dirus al la *muchachos*, ke ili dum sia marŝo tra la ĝangalo devus iri semajnon tra la infero, ili certe respondus: „Ĝuste tio estas bonvena al ni. Ankaŭ el la infero ni fine eliros. Kaj kiam ni eksteros, ni estos pli bonaj ribeluloj ol ni estis, antaŭ ol ni enmarŝis en la inferon.“

La infero efektive troviĝis sur ilia vojo. Ne nur dum semajno, sed dum tri semajnoj.

Eĉ tiuj distancoj, kiuj kutime estis sekaj, estis nun aŭ marĉaj aŭ en vastaj akvoflakoj, kiuj estis tiom grandaj, kiom lagoj. Pluvis ĉiun trian aŭ kvaran horon. Kaj tio estis *aguaceros*. Ne pluvis, sed riveroj fluis el la nuboj malsupren, ne riveretoj, ili surbatiĝis tiel forte teren, ke tie, kie ne staris arboj, la tero de tempo al tempo estis malfermŝirita kvindek centimetrojn profunde. Dikaj branĉoj estis batitaj de la arboj, tiel, kiel en gravegaj ŝtormoj. Padoj diseriĝis, glitis en ravinojn kaj kie ili ne derompiĝis, ili formis larĝajn sulkojn kun furioze moviĝantaj fluoj. Rokoblokoj desolviĝis kaj tondre ĵetiĝis en krutajn deklivojn, disrompante sur siaj vojoj praajn arbarogigantojn, elradikante kaj kunŝirante ilin, kvazaŭ ili estus nur putriĝintaj branĉoj. Se la torento el la ĉielo dum certa tempo haltis, jen kuris la akvo en sulketoj kaj riveretoj malsupren el la branĉaro de la densfoliaraj arboj, por ke la tersurfaco ne perdu eĉ guteton. La ĉielo klariĝis. Suno en kvazaŭ pafanta ardo malsupreniĝis kaj ŝanĝis la ĝangalon en vaporbanejon tian, ke ĝi forprenis la spiron de la marŝantaj homoj. Kaj apenaŭ la kronoj de la plej altaj arboj komencis iom sekiĝi de la ardo, jam foriĝis Suno kiel forpafita el la ĉiela volbaĵo kaj komencis

guteti. Gutetis kaj fluetis kaj estis *chipichipi*, pluveto, dum dek minutoj. Malgranda averto. Kaj tiam pafiĝis plurento teren, plej ofte akompanata de fulmotondro, tiel, ke oni estis certa, ke la fino de la universo proksimas.

La peza, valorega tero de la ĝangalo, sata de la akvo, vekis la impreson, ke ĝi ĝemis kaj ĝemegis sub la ĉiamaj ŝarĝoj. Ĝi eĉ ne guton plu kapablis gluti. Ĝi firme kuntiriĝis, fariĝis tenaca, gluiga kaj rezistis laŭ la rezisto de ĉiuj aĵoj kaj estaĵoj de la kosmo, kiuj volas vivi kaj por povi vivi senkompatate devas batali kontraŭ siaj detruantoj. Kaj ĉar la tero estis tiom sata kaj troplena, ne plu akceptis akvon kaj neniun plu tralasis, la pluvo haltis sur la tero, fariĝis marĉo, lago, riverbrako, ŝlimo kaj milfoje pli da ŝlimo. Kien ajn la homo paŝis, la tero sinkis profunde sub ties piedoj. Sed poste ĝi firmtenis la homon kaj ne plu volis redoni la korpon, ĝi firmkroĉiĝis je tiu per cent brakoj kaj implikis la homon en maŝoj. Ĉiu paŝo estis kvazaŭ ĝi sinkus en kaptilon. Ĉiun forton, kiun la homo posedis, estis uzata por eltiri la piedojn. Sed la plua paŝo finiĝis denove en la tenaca ŝlimo kaj ree kostis similan penon fari la sekvan paŝon.

Por viroj, kiuj ne konas tiajn marŝojn en la pluvsezono tra la ĝangalo, la plano entrepreni tiun marŝon estus kuraĝa aventuro. Por la mahagonviroj, kiuj tute precize sciis, kion signifas la marŝo en tiu jarsezono, la fakto, ke ili planis la marŝon kaj entreprenis ĝin, estis certe la plej bona pruvo, kiom da streĉegoj ili pretas ŝarĝi sur sin por senkompatate entrepreni la jam komenciĝintan ribelon.

„Ni ankaŭ tute bone povus atendi ĝis la pluvtempo estos finita“, diris iu el ili, kiam ili interkonsiliĝis pri la marŝo.

„Kompreneble ni povus atendi“, respondis El Profesor.

„Sed, tiuj, kiuj ne povas atendi, estas la peonoj en la bienoj, kiuj volas esti liberaj tiel, kiel ni estas jam nun, kiuj volas marŝi kun ni kaj batali kun ni por liberigi ĉiujn peonojn.“

Estis jam delonge ne nur plu la sopiro iri al la hejmlando. Sopiron pri sia hejmlando ili havis ĉiam. Sed nun ekis la ribelo kaj ĉiuj *muchachos*, kiuj laboris en la ĝangalo aliĝis al ili. Ĉiutage alvenis novaj grupoj kaj unuiĝis kun ili. Kaj ili ĉiuj pensis ne plu pri tio iri do hejmen, sed pri tio ribeli kontraŭ la mastroj por liberigi sin de ĉiu subigo. El tiuj

kaŭzoj malproksimiĝis ĉiuj interkonsiliĝoj, debatoj kaj interparoloj pli kaj pli de nur personaj interesoj kaj deziroj. Per tiuj interparoladoj kaj interkonsiliĝoj ili pli kaj pli konvinkiĝis, ke ribelo, se ĝi ne etendiĝus al ĉiuj de ilia speco, ankaŭ al ili mem ne povus porti liberon, sed nur mallongan spirtiron de la libero. Sekve de tiu ekkono la iam tiom grave ŝajnantaj deziroj pri rapida hejmiro al iliaj vilaĝoj pli kaj pli ŝoviĝis fonen. Parte la prudentaj paroloj de El Profesor kulpis tiun ŝanĝon de iliaj individuaj deziroj. El Profesor diris centfoje: „*Muchachos*, se vi nur sole ribelas kaj sole hejmiros por kultivi en paco viajn *milpas* kaj por naski infanojn, jen vi rikoltos en la plej bona kazo nur unu rikolton. Antaŭ ol vi nur turniĝos, *rurales* kaj *federales* estos sur vi kaj oni rekondukos vin ĉi tien, pli sklavigitaj ol antaŭe, kaj tiukaze dumeterne. Ni devos fari tiom longe bonan, sanan kaj fortan ribelon ĝis eĉ ne unu *rural* plu estos vivanta, kaj ĉiuj *federales* aŭ libervole transflankiĝos al ni aŭ estos neniigitaj. Ne faru ion nur parte, *muchachos*, kaj fidu al neniuj promeso! Tuj en la unuaj bienoj kaj vilaĝoj oni promesos al vi mil bonajn aĵojn kaj aferojn. Oni ofertos al vi parcelojn kaj monon, kaj ĉion tion, kion vi deziros. Sed ne lasu senti

vin. Ĉio ĉi estas nur timpromesoj kaj timdonacoj, kiuj ĉiuj estos senvaloraj, se vi ne gajnos la tutan revolucion kaj ne finfaros la puran kaj tute decidan aferon.“

„*Bravo, Profesor! Viva, Profesor! Arriba, camarada!*“
kriis la *muchachos*. „Tiel estas. Vi pravas. Kaj tiel ni faros tion!“

Tiel ŝanĝiĝis entute kaj profunde kaj tute ne nerimarkite de la *muchachos* la senco kaj la celo de ilia ribelo en la lastaj semajnoj. La penso iri hejmen, estis tute forgesita, la batalo pri la tuto pli kaj fariĝis la centra temo.

Eĉ Andreo kaj Celso, kiuj je la unua tago de la ribelo apenaŭ pensis pri io alia ol nur revidi siajn fianĉinojn kaj saluti siajn gepatrojn, pensis nur ĉeokaze plu pri tio.

„Ĉio ĉi povos atendi, Celso, ĉu ne ankaŭ vi havas la saman opinion?“

„Certe Adreĉjo. Hejme ja neniue atendis, ke mi revenos dum kvar jaroj. Ili do simple plu atendu. Pli bone estas, ke ili ekde nun ankoraŭ atendos dum jaro ol ke ĉio ĉi ree estos fuŝita. Tiukaze oni havos almenaŭ la certon, ke oni

povos esti ĉiam hejme kaj ne dumeterne devos vivi en la timo, ke oni devos remarŝi en monterion iutage.“

„Ĝuste, Celso. Kaj tiel ni faros tion. *Tierra y libertad o la muerte.*“

Rimarkoj

aguaceros = pluvelverŝiĝoj

chipichipi = pluveto

Tio kio estis komence nur tute regiona insurekcio de turmentitaj kaj mizere trolacigitaj, povraj, sensciaj indiĝenaj viroj, kaj kio post la murdado de iliaj ekzekutistoj ŝanĝiĝis en ribelon, kiu unuigis ĉiujn subigitajn kaj turmentitajn laboristojn en la regno de l' mahagono, eĉ tiujn, kiuj delonge perdis ĉiun esperon pri saviĝo, tio evoluis kvazaŭ per si mem en faktan revolucion. Fariĝis revolucio, kiu iom post iom disvastiĝis en la tuta federacia ŝtato, kaj kiu ekflamigis kaj vivigis ĉiujn, eĉ la plej pigrajn, plej inertajn kaj plej timemajn revoluciulojn kaj ribelemajn grupojn de la lando kaj disvastiĝis tra la la tuta vasta respubliko. Kiel tie en la limigitaj limoj de la ĝangalo, tiel estis en la respubliko en ĉiuj anguloj kaj ĉiuj lokoj. Ke tiuj sensciaj indiĝenaj viroj en la monterioj iam povus pensi pri ribelo, ja eĉ nur fari insurekcion, ja eĉ malpli nur kondukti provoke kaj kritike paroli, por ĉiu homo en la respubliko estus estinta neimagebla kaj neverŝajna. La konstruaĵo de la diktaturo estis ŝajne tiom firme farita, tiel detale organizita, tiom bone provizita ĝis ĉiu unuopa viro de la polico kaj de la

militfortoj, tiel nekaptebla kaj neskuebla, ke revolucio, ja eĉ nur strikoj perdiĝis el la uzataj vorttrezoroj de la regantaj partioj, klikoj kaj kluboj.

Sed en la tuta respubliko ĝi ardetis kaj subbrulis. Neniu kuraĝis kritiki ion, ĉar la najbaro, ja eĉ la plej bona amiko povus esti polica spiono. Sed necesis nur unu eta fajrero, kaj jam la tuta respubliko troviĝis en flamoj.

Tiel neimageble kiel ribelo en la monterioj eble estis, ĝi povis okazi nur, ĉar la revolucio kvazaŭ estis jam en la aero. La diktaturo estis tiom plena kaj trosatigita, ke ĝi devis krevi dum la unua puŝo en la stomakon. Dum tie en la profundo de la ĝangalo, sen iu konekto kun aliaj proletaj grupoj, okazis insurekcio, eksplodis en mil aliaj lokoj, bienoj, suker-kaj kafoplantaĵoj, insurekcioj kaj ribeloj. Neniu ribelanta grupo sciis pri la ribeloj aŭ insurekcioj de alia grupo.

La *rurales* estis senditaj tien por dronigi strikojn per mitraloj en sango. Kaj antaŭ ol ili nur atingis la fabrikon kun striko aŭ la ribeleman regionon, je dekoj de aliaj lokoj komenciĝis en la sama regiono insurekcioj. La

diktaturo estis ne nur ĝiskreve grasa, sed ĝi estis ankaŭ jam tro matura. Tiu, kiun la diktaturo ne povis pridonaci per ofica posteno, ĉar ne estis sufiĉe da oficoj, estis nun ĝia plej granda ĝismorta malamiko. Kaj la plej plej granda malamiko fariĝis tiu, kiu ankoraŭ hieraŭ havis oficon, sed devis rezigni pri ĝi por nova jesulo, por kunjesulo aŭ kunkraĉulo.

La diktaturo ne volis morti. Ĝi ŝanceliĝis kaj batalis kaj kriis kaj mensogis kiel neniam antaŭe. Sed la popolo estis tiom plenŝtopita per mensogoj kaj alteflugaj paroloj, kiuj milcentfoje estis ripetitaj sen fariĝi per tio pli aŭ malpli veraj, ke tiam, kiam la diktaturo batalis sian transvivbatalon, neniu plu fidis eĉ tion, kio estis sanga vero, kaj kio, se oni estus akceptinta ĝin, povus savi la popolon kiel ekonomian unuecon. La diktatoro, kiu ankoraŭ hieraŭ estis la savanto de la popolo, estis tagon poste la perfidulo de la sama popolo, kiu vendis la popolon, kiu kulpis pri la sanga kaj senkompata fratobatalo, kiu tiam ekis. Ĝis certa tago li estis la *caŭdillo* festata per *viva*-vokoj de la popolo, poste li estis la fripono, la murdisto de la popolo, kiu devis kaŝi sin kiel

persekutita krimulo de la kolera popolo. Ĝis certa tago la pretermarŝantaj trupoj klinis antaŭ li la landoflagojn, tagon poste la generaloj transiris kun siaj tutaj trupoj al la ribelanta popolo.

Kion tie en la regno de l' mahagono faris la *muchachos*, estis en la detalo la sama, kio en la sekvantaj monatoj okazis en la tuta respubliko. La aero portis la ideojn de la ribelo de urbo al urbo, de vilaĝo al vilaĝo, de feŭdisma reganto ĝis la kortego, ĝis bieno kaj haciendo, de plantejoj al plantejoj, de familia klano al familio, de familio al etna grupo. La diktaturo, kiu ankoraŭ en certa antaŭmonato proklamis al la mondo, ke ĝi fariĝis eterna institucio por la popolo plena de dankemo kaj la ununura regosistemo, sub kiu la popolo povas kreski kaj prosperi, estis monaton poste klakanta fantomo, kiu ne plu timigis eĉ tiujn, kiuj kiel kaptitaj ribeluloj estis starigitaj al vando kaj impertinente kraĉis sur la vizaĝojn de la pafantaj *rurales* kaj *federales*. Kaj dum oni antaŭlegis al ili la verdikton de la milittribunalo, dum ili sen fuĝeblo estis ĉirkaŭtaj de la solduloj de la diktatoro, ili kriis: „*Abajo El Caudillo! Muerte al la dictadura! Viva la Revolucion social!*“

Kvazaŭ falĉitaj teren de la kugloj, ili mortis kun la glorplena kaj jubilanta konscio, ke ili venkis. La diktaturo ekkrakis en ĉiu federacia ŝtato, kaj sude kaj norde, en Verakruco kaj en Jalisco.

La *muchachos* batalis pri sia propra afero, sen scii, ke ili samtempe batalis por la afero de la tuta popolo.

Ju pli malproksime estis ŝtatoj kaj lokoj de la centroj de la revolucio, des pli brutale montris sin la guberniestroj de la diktatoro. Ili dorlotis la esperon, ke ili eble ankoraŭ povos savi la diktaturon, se ili sufokas en la malproksimaj ŝtatoj kiel eble plej brutale ĉiun ĝermon, ĉiun fajreton de ardetanta ribelo. Ili volis vivteni aŭ rekrei la diktaturon denove de la plej foraj anguloj de la lando.

Tiom malmulte, kiom la *muchachos* sciis pri tio, kio okazis en la lando ekstere de la ĝangaloj, ili sciis, ke ili renkontos sur la batalkampo la plej brutalajn kaj plej desperajn trupojn de la renversata diktaturo kiel kontraŭulojn. Estis trupoj, kiuj pli kaj pli perdis ĉiun ligon kun la generalkomandejoj kaj iom post iom forgesis, ke ili batalis por politika sistemo aŭ registaro, kiuj baldaŭ

komencis batali nur plu por propraj interesoj kaj esperis por si mem kaj speciale por siaj gvidoficiroj krei malgrandajn privatdiktaturojn, por ke tiuj oficiroj regu tiujn privatdiktaturojn kvazaŭ estus pirataj insuloj. Ĉiu, kiu kontraŭstaris ilin, estis ne nur ribelulo kontraŭ la registaro, sed li samtempe fariĝis malhelpanto por tiuj malgrandaj imitantoj de la falanta diktatoro. La finrezulto estis efektive tia, ke dudek jarojn post la eksplodo de la revolucio en la malproksimaj ŝtatoj, kiuj nur malfacile povis daŭrigi konekton al la centroj de la lando, ekzistis dekoj de tiuj privataj diktatoroj.

La *muchachos* de la monterioj tute pravis paroli pri tio, ke ilia ribelo ne fariĝos promeno.

Ĉapitro 18

01

Ĉiutage alvenis novaj grupoj el la plej foraj monterioj, kaj ĉiutage ankoraŭ pluaj. Kelkaj el la grupoj konsistis nur el kvin viroj, aliaj eĉ nur el du. Kelkaj el tiuj grupoj alvenis en tute sovaĝiĝinta stato. Ili jam delonge antaŭe fuĝis de monterio, sed ne povis iri hejmen, ĉar ili devus migri tra la konataj padoj en la ĝangalo. Tie oni kaptus ilin. Eĉ, se ne postsenditaj *capataces* kaptus ilin, povis tamen okazi, ke ili renkontus komercistojn aŭ karavanojn aŭ novajn laboristajn trupojn. Kaj kiu ajn, kiu renkontis ilin, raportus, sur kiu pado oni vidis ilin. Se sukcesus al ili reveni en sian vilaĝon aŭ en la hejman bienon, ili certis, ke oni ree transdonus ilin al monterio.

Ĉion tion sciante, parte pro propra sperto, parte el rakontoj de tiuj, kiuj entreprenis fuĝprovojn kaj estis rekondukitaj, rezignis multaj fuĝantoj pri la penso reiri al sia hejmo. Ili fuĝis de la monterioj por eskapi terurajn punojn kaj detenis sin de la padoj kaj vojoj. Ili vivis kiel liberaj banditoj en la profundoj de la ĝangalo. Ili loĝis en

kavernoj, konstruis etajn kabanojn sur la tero aŭ en la branĉoj de la arboj, aŭ ili tranoktis kiel bestoj. Ili vivis de la viando de bestoj, kiun ili ĉasis per ŝtonoj aŭ lancoj. Se la vivo fariĝis tro streĉa kaj ili bezonis aĵojn kiel meĉojn aŭ ŝtalon por fari fajron aŭ salon aŭ kafon, ili nokte rompŝtelis en la *oficinas* tio, kion ili bezonis. Ofte por tio oni kruele skurĝis la *muchachos* en la monterioj, ĉar oni kulpigis ilin, ke estis ili la ŝtelintaj friponoj. Se estis tro komplike rompŝteli en *oficinas*, bangaloj, kuirejoj aŭ kabanoj, ili penis renkonti laborantajn *muchachos* por ricevi de ili tion, kion ili bezonis, aŭ bone aŭ malice. Plej ofte oni libervole donis tion al ili, kio mankis, sub la antaŭkondiĉo, ke la alparolitaj viroj havis mem tion, kion la sovaĝuloj, la *los salvajes*, bezonis.

Se fariĝis tro da *salvajes*, kunigis la monterioj, en kies distriktoj la sovaĝe vivantaj fuĝintoj hejmiĝis, kelkajn *capataces* kaj tiuj ĉasis la sovaĝulojn kiel bestojn.

Oni ne kaptis ilin, kvankam la monterioj nepre bezonis ĉiun viron, sed la unua ĉasisto, kiu vidis sovaĝulon, pafis sur lin. Kaj por povi ĉasi kaj trovi ilin pli facile, la ĉasistoj kunprenis tutajn gregojn de hundoj, ekrajdante denove

por refoje purigi la ĝangalon.

La koncesiistoj de la monterioj unuavice punis kaj malhelpis ne la ĉeokazajn rompŝtelojn. Tion, kion la *salvajes* ŝtelis, estis por si mem malgrava. Multon la sovaĝuloj ne povis ŝteli, ĉar tro da aĵoj limigus ilian moveblecon kaj eĉ devigus ilin setli daŭre en iuj regionoj. Sed setlejojn ili ne povis permesi al si, ĉar oni tiukaze facile povus kapti ilin. Ili devis eterne migri en la ĝangalo, por ke oni ne kaptu ilin. Kaj ĉiu pakaĵo estus nur malhelpaĵo dum tio.

Tio do ne estis, kio instigis la monteriojn de tempo al tempo entrepreni krudan kaj brutalan ĉasadon kontraŭ la dizertintoj. La kaŭzo estis alia. Se oni ne molestus tiun sovaĝajn fuĝintojn interne de certaj tempospacoj kaj aranĝus novan ĉasadon, ekestus la danĝero, ke la *muchachos* de la monterioj preferus la vivon de la *salvajes* kompare al la dura laboro kaj kruela traktado en la monterioj, ke ili postlasus la monteriojn sen viroj kaj la grandajn ŝuldokontojn neforlaboritaj. Estis tie tute la samaj kialoj kiel en civilizitaj landoj, kie la registaroj malhelpas, se necesas per militista perforto, ke senlaboraj

proletoj prenu nekultivitan kaj neŭzatan terpecon, setlu sur tiu kaj tie vivu laŭ propra bontrovo kun propra regado. La ideo povus trovi tro da adeptoj kaj la industrio estus sen granda aro de senlaboruloj, kiuj ĉiam pretas labori laŭ tiuj kondiĉoj, kiuj estas ŝarĝitaj sur ilin. Ankaŭ diktaturo ne eblus, se ĉiu homo povus vivi sendepende de la paneroj, kiujn la registaro promesas kaj ofertas al tiu homo, kiu estas preta flate laŭdi ĝin kaj alpreĝi por tio.

Tiuj *salvajes*, tiuj sovaĝiĝintaj dizertintoj, kompreneble ne havis iun estontecon. Povis sukcesi, ke ili vivis unu aŭ du jarojn kiel sovaĝuloj kaj poste denove provis aŭ iri hejmen, esperante, ke oni forgesis ilin kaj iliajn ŝuldojn, aŭ atingi alian regionon, kie ili estas nekonataj kaj eble sen molesto en iu formo povus labori. Sed egale ĉu ili laboris en monterio aŭ en kafoplantejo aŭ en bieno, fine estis ĉiam la sama sorto. Kien ajn ili iris, oni subigis kaj sklavigis ilin, ĉie ili estis malliberaj kaj rajtis kundecidi eĉ ne unu vorton, se oni fiksis ilian laboron kaj la salajron por ĝi.

Eble estis ankoraŭ alia eblo, post kiam ili sukcesis eskapi de la ĝangalo sen esti rekonataj. Tio estis provi esti

akceptita en sendependa indiĝena vilaĝkomunumo. Sed tio sukcesus nur unufoje en cent kazoj. Se ili reirus al sia nacio, oni rekonus ilin. Se tio konatiĝus ne daŭrus longe ĝis la *rurales* ĉeestus, enkarcerigus ilin kaj transdonus al la laboragentoj.

Sed, se ili irus al alia indiĝena nacio, kies membroj ili ne estas, oni rigardus ilin misfide. Ili ne kapablus paroli la lingvon, kaj se ili ne havus la tre maloftan bonŝancon, trovi akcepton per edziĝaliĝo al familio aŭ parencaro, ili ne havus terpecon kaj ankaŭ ne povus dungiĝi kiel servistoj aŭ laboristoj, ĉar oni ne konas salajrolaboron en tiuj komunumoj kaj tial ankaŭ ne servistojn.

Plej malofte, aŭ oni rajtas ankaŭ diri neniam, sovaĝulo havis eĉ la plej etan eblon, trovi sian feliĉon ekstere de la ĝangalo. Li ne vivis sufiĉe longe por tio. La vivo en la ĝangalo, sen loĝejo kaj eterne kiel fuĝanto, estas ankoraŭ centfoje pli dura ol tiu de la *muchachos* en la monterioj. Se ne kaptus ilin febro kaj vorus ilin, estus jaguaro aŭ pumo aŭ sovaĝaj porkoj aŭ serpento aŭ reptilo, kiuj havus kompaton kun ilia mizera vivo. Estis plej ofte efektiva kompatato de la ĉielo, se oni liberigis sovaĝulon rapide kaj

forte de ties vivo. Li eble rompis kruron, kaj jen li jam estis perdita.

En la monterioj laboris certe eĉ ne unu *muchacho*, kiu ne sciis aŭ almenaŭ ne povis imagi, kion signifas vivi proprakoste en la ĝangalo. Tiu timo de la *muchachos* pri la teruroj de la ĝangalo estis la saviĝo de la monterioj. Se la vivo kiel sovaĝulo estus plezuro, la monterioj eĉ ne unu viron retenus – ne sub tiaj kondiĉoj, kiajn ili havis.

Nur la plej aŭdacaj kaj plej kuraĝaj viroj riskis eviti kruelan punon per tio, ke ili iris en la sovaĝejon.

Troviĝis ankaŭ kelkaj *salvajes* inter la grupoj unuiĝantaj kun la grandaj aroj de la ribeluloj, la plimulto alvokita per heroldoj, aliaj venintaj per si mem, post kiam iliaj mastroj kaj *capataces* estis murditaj aŭ de ili mem aŭ de la *muchachos* de najbaraj monterioj.

Pere de iliaj pli fruaj laborkamaradoj, kun kiuj ili havis ĉeokazan ligon, se ili bezonis salon aŭ ion alian, kelkaj el ili aŭdis ion pri la ribelo. Aliaj trovis ĝin strnga, ke ĉiuj *muchachos* el la distriktoj formigris sen plu forveturigi la trunkojn, sen fini komencitajn laborojn. Memgardeme ili ŝteliris proksime al la *oficina*. Tie ili renkontis aŭ virojn, kiuj preparis sin por la ekmarŝo aŭ ili trovis nur la murditajn *capataces* kaj komprenis tiel, kio okazis.

Ĉar la monterio La Armonia, unu el la plej grandaj de la ŝtato, troviĝis sur la ĉefvojo al la plej grava riverego, ne estis alia eblo por la *salvajes* ol sekvi la ekmarŝontajn *muchachos* migrantajn sur tiu vojo. Tiel ili atingis kompreneble la monterion La Armonia, kie, sen esti demanditaj kiuj ili estas kaj de kie ili venis, ili estis

bonvenigataj kiel *hermanos*, kiel fratoj kaj tuj trovis akcepton kiel samranguloj. Ili renkontis tie ĉiam konatojn, iamajn kunlaboristojn de tiu monterio, el kiu ili fuĝis, kaj tiuj festis ilin kiel malnovajn ribelulojn; ĉar ili pruvis per sia fuĝo kaj sia sovaĝa vivo, ke ili ribelis eĉ pli frue ol ĉiuj aliaj.

Tri el tiuj sovaĝiĝintaj *muchachos*, Onofre, Nabor kaj Isaias, alvenis je la lasta posttagmezo antaŭ la ĝenerala ekmarŝo ekde la ĉefa kampadejo. Salutinte konatojn kaj samtribanojn, ili promenadis sur la placo de la *ciudad*, esperante trovi ankoraŭ pli da malnovaj amikoj.

Ĉe tiu promonado ili preteriris la kabanojn, kie la *artesanos* estis gardataj. Ili tie kaŭriĝis ĉe la deĵorantaj *muchachos*, kiuj donis cigarojn al ili.

„Kial vi gardas tiujn spionojn kaj denunciatojn?“
demandis Nabor.

„Por ke ili ne fuĝu kaj ne forŝteliĝu kaj ne eble alvenu en bieno kaj tie raportu, kio okazas.“

„Kiu ordonis tion?“ volis scii Onofre.

„El Profesor.”

„Vi estas veraj bovoj!” respondis Nabor. „Se estus mi ĉi tie la gardanto, jen mi delonge ne plu gardus ilin, tion do sciu. Tiun specon vi gardas plej bone kaj plej sekure en tute alia maniero, do tiel, ke ili ne plu povos fari fiaĵon.”

Isaias ekstaris kaj iris pli proksime al la kabanoj. La pordoj de la kabanoj estis malfermitaj. Kelkaj el la metiistoj kaŭris ekstere inter la kabanoj sur la tero kaj ludis kartojn. Aliaj kuŝis longe etendite kaj ronkis. Aliaj havis sian kapon sur la sino de la edzinoj, kiuj ratis ilin pro pedikoj. Je diversaj bivakfajroj kuiris la inoj la manĝon por la vespero.

Dum Isaias rigardis trans la grupojn, li subite vokis: „*Chicos*, venu foje ĉi tien. Nu, imagu, kiu tie estas!”

Ambaŭ liaj kunuloj ekstaris kaj proksimiĝis al li.

„Ĉe la diablo“, Onofre diris surprizite, „jen ambaŭ niaj koketoj, El Poncho kaj La Ficha.”

„Jen ili, belaspekte kaj bone nutrite. Kiu pensus tion?”

La *muchachos* gardantaj tie, proksimiĝis scivole. „Ĉu vi konas ilin ambaŭ?!”

„Ĉu ni konas ilin, *manitos*, fratetoj miaj?“ Onofre ripetis tion moke.

„Kompreneble ni konas ilin. Ili estas la plej fiaj kaj plej malicaj kaj plej aĉaj torturistservistoj, kiuj kiam ajn ekzistis en la tuta kristanaro. Ili ambaŭ estas tiuj, kiuj faris el ni *salvajes*. Ili estas tiuj, kiuj forpelis nian triopon en la ĝangalon. Tiuj brutalaj bestaĉoj. Ili ne estas homoj, tion diras mi al vi, *manitos*. Ili estas eĉ ne jaguaroj. Jaguaroj havas pli da kompato kaj pli kunsuferas ol tiu duopo kune.“

Isaias vokis: „He, Poncho, kaj vi, Ficha, kiel plaĉas al vi ĉi tie?“

La alvokitaj viroj, kiu kaŭris surtere kaj ludis kun kelkaj aliaj kartojn, rigardis supren. Kiam ili rekonis la tri *muchachos*, ili paliĝis kaj lasis fali la kartojn, kiujn ili tenis permane.

„Vi fartas bone ĉie tie, ĉu?“ vokis Onofre. „Vi sidadas ĉi tie

kun viaj inaĉoj kaj viaj bastardoj kaj havas grasigan vivon.“

„Ĝi ne estas tro grasa, *muchachos*“, respondis El Poncho kun pepanta voĉo dum li provis magran rideton.

„Mi supozis, ke vi estas delonge hejme ĉe via *milpa* kaj edzigitaj“, diris La Ficha. Ankaŭ li provis aperigi baraktantan rideton sur sia vizaĝo. Sed ĝi ne estis sufiĉe sana por refreŝigi la palon de lia vizaĝo.

La tri *muchachos* turniĝis kaj retiriĝis kun la gardantaj viroj en la direkto de la granda kampadejo, sed ne pli ol estis permesite al la gardantoj.

„De kiam la du *capataces* estas ĉi tie en La Armonia?“ demandis Isaias.

„Kiel mi sciu tion?“ respondis unu el la garduloj. „Mi ne estas de La Armonia, mi estas de El Palo Quemado. Ĉu ili estas *capataces*?“

„La plej brutalaj kaj plej malicaj sub la ĉielo de Dio.“

„Ni mortbatis ĉiujn *capataces*. Ankaŭ ĉi tie en La Armonia. Sed tiuj ĉi tie ne estis *capataces*. Ili estis ĉi tie *arrieros*. Alikaze ili ne estus kaptitoj.“ Tion diris alia.

„Tio estas ja malbenita ekonomio.“ Nabor komencis sakri.
„Ja kiaj *muchachos* estas ĉi tie? Ili estas maljunulinoj kaj ne ribeluloj. Ha! Tiel ni ne tre avanco. Ni bezonas ribelulojn, neniujn oldajn ploraĉajn piĉulinojn. Grasigi torturistservistojn kaj eĉ gardi ilin, por ke jaguaroj ne fortrenu ilin! Nekredeble! Kia tragedio! Ĉe l' diablo!“

Nabor turnis sin al la *muchachos*, kiuj tie estis. „Kiam vi havos vian *cena*, kiam vi vespermanĝos, *camaradas*?“

„Ĝustatempe estus nun. Malsataj ni estas jam sufiĉe. Sed ni atendas la novajn ontojn.“

„Aŭ la diablon“, ridante diris Isaías, „kiu, ĉe l' infero, sciu, kiam la sekvaj uloj venos? Post kvar semajnoj. La novaj uloj estas ni, nia triopo. Ek do, foriĝu kaj plenŝutu vian vakan kartilagecan ventron, ĝis vi krevos. Vi sufiĉe longe malsatis.“

La gardantaj *muchachos* elkore akceptis la oferton kun

jubilo. „Ni estas tute kurbiĝintaj kaj oblikvaj de la kaŭrado kaj stulta gapado pro tio, kion la spionoj faras, kaj kiel ili ebriigas sin kaj fikadas kun siaj grasaj inoj, kaj kartludas pri faboj kaj tabakfolioj.“

„Por kio cetere ili bezonas tabakon kaj kartojn kaj brandon?“ demandis Nabor. „Ĉu iu el la hundidoj iam ajn donis folion da tabako al ni aŭ eble al vi?“

„Al ni, ĉu? Eĉ ne unu el ili. Ili kriis al ni, se ili nur ekvidis nin kaj klaĉe denunciis nin, ĉiam se eblis kaj ili mensogis. Tion mi rajtas diri al vi, *camaradas*, se mi havus ĉi tie la komandon, mi denukigus ilin per unu fojo kun la tuta kanajlaro tiel, kiel okazis al la patronoj kaj la *capataces*. Sed ni ĉi tie ja ne komandas. Kaj se El Profesor kaj tiu Andreĉjo kaj Celso volas havi tion alie, bone, al ni estu egale.“

Poste diris Isaias: „Ekiru do, por ke ili ne ĉion forvoraĉos. Ili havas antilopon kaj du sovaĝajn porkidojn. Prenu al vi tempon antaŭ la reveno. Ni estas bonaj uloj. Tion vi rajtas rakonti tie en la kampadejo. Ni lasos tragliti nenium ĉi tie. Ne ni. Je la dudekdua oni alternigu nin, rakontu tion al la

generalo.“

„*Bueno, así lo hago*“, diris unu el la forpaŝantaj *muchachos*. „Mi sciigos tion al la generalo, ke vi as ĉi tie. Estas ja cetere tute egale, kiu ĉi tie as. Kaj ankaŭ al la generalo estas egale. La alternulojn de vi mi mem elektos kaj sendos ilin al vi je la dudekdua.“

„Lasu viajn maĉetojn ĉi tie, *camaradas*.“

„Certe, prenu ilin. Ni havigos al ni novajn el la *tienda*. Ĉu vi nur hodiaŭ alvenis ĉi tie?“

„Jes, ni estis sovaĝuloj dum la lastaj ses monatoj. Ni kunprenis niajn maĉetojn, kiam ni fariĝis sovaĝuloj. Sed tio estis antaŭ longa tempo. Unu el la maĉetoj disrompiĝis, alia sinkis en la marĉon kaj ni ne povis eltiri ĝin, kaj trian ni devis postlasi tie, kiam iutage la *capataces* persekutis nin kun hundoj kaj ni ne havis tempon retroiri al nia bivakfajro kaj kunpreni la maĉeton. Ni povis ŝteli maĉetojn de la *muchachos*, se tiuj hakis arbojn; sed tiukaze la *muchachos* devis pagi por tio. Kaj antaŭ ol ni havis la eblon preni novan el *bodega*, la

monteriuloj estis jam marŝantaj ĉi tien.“

„Ĉi tie ĉe ni vi ricevos ĉion, kion vi bezonas, *muchachos*.
Vi devas nur diri, kio mankas al vi. Jen prenu ankoraŭ
nian tabakon, ni iros al la *tienda*.“

La alternuloj venis kiel promesite je la dudekdua. Ili trovis la virojn sidantajn ĉirkaŭ malgranda bivakfajro.

„Ili estas hodiaŭ strange kvietaj“, diris *muchacho* de la nova ontaro. „Alitempe, se ni alvenis, jen ili kriadis kaj kriaĉis, tiom ebriaj ili estis. Sciu, ili havas amason da boteloj kaj ili eĉ kaŝis kaj enfosis bareletojn kun *aguardiente*, kaj per tiu ili ebriigas sin. Ankaŭ la inoj kaj infanoj. El Profesor diris, ke ni trankvile lasu tiun kaŝitan *aguardiente* al ili, por ke ili povu drinki ĝis stultiĝo kaj idioteco. Kaj estas tiom domaĝe, li diris krome, ke ni ne povas doni al ili mariĥuanon al ilia tabako, por ke ili buĉu sin reciproke, se ili sufiĉe fumus de ĝi.“

„Ja ne afliktiĝu, *camaradas*“, respondis Isaias. „Tiu jam trinkis hodiaŭ hektolitron da *aguardiente*. Ili estas ĉiuj tiom ebriaj, ke ili eĉ ne plu hurletas, tiom draste ili plenverŝiĝis. Vi havos facilan on. Vi povos dormi kiel pigraj *dormilones*, kiel longdormuloj, ili ne forkuros de vi. *Buenas Noches*, bonan nokton!“

„*Buenas Noches, Camaradas!*“

Antaŭ ol la mateno griziĝis, la antoj ankoraŭ trifoje en la nokto alternis. Estis ĉiam aliaj *muchachos*. Unu el la viroj kutime ekiris por serĉi novan antaron, sen longe okupiĝi pri tio, kiuj estos la novaj alternuloj. Tiom longe, kiom oni alternis kaj ŝanĝis la ulojn, ĉio estis en ordo. Ilia ununura devo estis ne lasi sen gardantoj la kabanojn de la kaptitaj *artesanos*. Por tio ili ne bezonis generalon kaj komandojn, por havi la ulojn tie, kie ili estu. Tion ili reguladis inter si mem. Kiu serĉis inter la antaj *muchachos* novajn ontojn, tiu trovis ilin ĉe la unua grupo de la dormantoj, al kiu tiu venis kaj diris tie, ke necesas nova alterno.

Kiam komencis nova tago, diris unu el la novaj alternaj *muchachos*: „Damne, tiuj ĉiuj certe estis vespere tre ebriaj. Neniu el ili eĉ nurmovetiĝas.“

Li iris preskaŭ ĝis la unua kabano kaj okulumis tra la latbarilo.

„He, *muchachos*, venu foje ĉi tien. Tio aspektas tie tre

ĉarma. La *aguardiente*, kiun ili hieraŭ drinkis, estis ruĝa kiel inko.“

„Eĉ ne unu el ili movas fingreton plu. Ankaŭ la idoj de la bastardoj ne pepas plu“, diris alia, kiu aldoniĝis.

„Ni foje rigardu la aliajn kabanojn.“

En la aliaj kabanoj la viroj same kuŝis en ruĝa inko aŭ en tomatosaŭco aŭ kio ajn ĝi eble estis.

Muchacho iris transen al la granda kampadejo, kie la *muchachos* jam ĉiuj vekiĝis kaj kuiris ĉe siaj bivakfajroj.

El General, El Profesor, El Coronel, Celso, Andreo, Matias, Fidel, Santiago, Cirilo, Pedro, Valentin, Sixto kaj kelkaj pluaj el la estraj *muchachos* sidis en grupo kaj faris sian lastan militkonsiliĝon antaŭ la ekmarŝo de la unua kompanio, kiu eku ĉirkaŭ la oka.

La *muchacho* raportis, kion li vidis en la kabanoj de la *artesanos*.

„Ĉu vi estas certa?“ demandis El Profesor.

„Tute certa. Neniu plu moviĝas, neniu tikas plu per brovo.“

„*Gracias por Dios!*“ diris pri tio Celso, „ni danku al Dio en la ĉielo, ke tiu gaja pedikeca rampado fine foje trovis finon.“

„Eble ĝi ne estis necesa.“ Andreo montris embarasitan vizaĝon, kiam li diris tion. „Tiuj ne povus damaĝi al ni. Ili bone povus vivi.“

„Ne parolu tiel galimatie“, diris Matias. „For tion. Por kio la bando taŭgas? Ili estas *chinch*es, cimoj.“

„Prave, *manito*“, interrompis lin Santiago. „Tiel ni ne plu devos gardi kaj nutri ilin. Al mi dum la tuta tempo estis malagrabla surdorse, se mi nur pensis pri tio, ke ni postlasu ilin kiel gregon da spionoj.“

El Profesor levis manon kaj movis ĝin iom tra la aero. „Kial longe babiladi pri tio? Ili estas distretitaj kiel cimoj, kaj tiel, kiel ili meritis tion kun sia tuta fia idaro.“

Li turniĝis kaj diris al Fidel: „He, vi, prenu kelkajn

muchachos kaj bruligu la kabanojn. Atentu, ke ĉio bone elbrulu, alikaze morgaŭ tagmeze ĝi stinkus kiel la pesto. Se ĉio estos terenbruligita, surŝutu teron.“

Ĉapitro 19

01

La *primera compania*, la primara kompanio, je la oka matene ne estis preta por la ekmarŝo. Kompreneble ne. En tiuj foraj regionoj karavano neniam estas marŝpreta je tiu horo, kiu tagon antaŭe estis fiksita. Tio ne estis la kulpo de tiuj, kiuj respondecas pri tio, sed estas ĉirkaŭ cent cirkonstancoj kaj kondiĉoj kaj okazaĵoj, kiuj influas ĉiujn kaj ĉiajn planojn. Fervojtrajno aŭ buso aŭ eĉ pasaĝeraviadilo laŭminute povas ekveturi aŭ ekflugi precize en tiu sekundo, kiu estis fiksita jam antaŭ semajnoj. Ĉar temas ĉiam pri la sama mekanika disvolviĝo de la samaj mekanikaj aferoj kun la ĉiam samaj mekanikaj iloj. Sed sufiĉas nur, ke ie pontopilono disrompiĝas, ke rivereto kunportas tiom altan akvon, ke ĝi inundas parton de la strato tute, aŭ ke flugpreta piloto subite ekhavas akutan apendiciton, kaj tuj la plej bela veturplano konfuziĝas, kaj sur ĉiuj stacioj oni manipulas per kreto kaj la vorto malfruo aperas sur nigraj tabuloj.

En la ĝangaloj kaj en la foraj necivilizitaj regionoj eĉ la plej bona kaj plej inteligenta organizado preskaŭ tute ne helpas. Oni planis, ke la karavano bezonas dek mulojn. La dek muloj vespere antaŭ la ekmarŝo ĉiuj ĉeestas. Sed matene mankas tri muloj, kiuj eskapis, ĉar tie ne ekzistas latbariloj kaj muroj. Kaj se oni firmligus la bestojn, ili ne povus serĉi sian manĝon kaj ne povus defendi sin, se jaguaroj aŭ pumoj tro proksimiĝus. Ĉiuj pakseloj vespere estas marŝpretaj. Sed nokte ratoj tramurdis kelkajn riimenojn aŭ ĉirkaŭvagantaj malsataj azenoj eltiris la remburaĵojn de la seloj kaj manĝis la enŝtopitajn magrajn herbojn. La *arrieros* kaj mulpelistoj vespere antaŭe ĉiuj estis sanaj kaj fortikaj. Sed en la nokto unu el ili estis pikita de skorpio en piedon aŭ mordita de serpento aŭ atakita de febro. Vesperon antaŭe la kampadejo estis seka kaj la ĉielo steloklara. Sed en la nokto okazis tropika pluvelverŝiĝo. Ĉio estas inundita, vojaĝpako kaj kestoj kaj seloj estis fordrivigitaj, la padoj proksime neprijuĝeblaj dum almenaŭ duono de tago, sub la kondiĉo, ke ne okazos du aŭ tri novaj kaj eĉ pli drastaj *chubascos*, nubelverŝiĝoj, akompanataj de hurikanoj, kiuj disrompos arbojn kvazaŭ ili estus dentpurigiloj. Se oni

tiam matene pakas, montriĝas, ke necesas reordigi la pakojn, ĉar oni devas surŝarĝi certan beston per malpli peza pako ol origine planita kaj, ĉar alia besto insistas pri tio esti ŝarĝita kiel lasta kaj ne unue, kiel decidis tion la *arrrieros* vespere antaŭe.

Tiel estas cent ĝis mil aferoj kaj aĵoj, kiuj influas planitajn marŝojn. Ĉiu klaŭno povas ekmarŝigi centmil faŝistojn sur placo je certa kvarono de horo; ĉar ekde kvincent jaroj antaŭ la prezento de lia cirko estis konstruataj de demokratoj altkvalitaj stratoj kaj telegrafoj kaj fervojoj, kiujn li povas uzi. La sama klaŭno en tiu regiono eĉ ne povus konduki ducent bone dresitajn virojn de kampadejo al kampadejo kun la metita tasko aperi inter la sesa frue kaj la sesa vespere je certa loko. En la plej multaj kazoj li havus sufiĉe da malfacilaĵoj, se estus donite al li tri tagoj por ankoraŭ alveni ĝustatempe.

Je la vespero en la militkonsiliĝo ili decidis, ke ĉiu taĉmento, krom la primara kompanio, ekmarŝu tagon pli poste ol la antaŭa. Konduki la tutan amason per unu fojo kaj je la sama tempo tra la ĝangalo, estis nefarebla eĉ en la seka sezono. Sed tiutempe, meze de la pluvsezono estus pereige entrepreni marŝon en kunpremita sinsekva amaso.

Kunvenis intertempe jam pli ol kvincent viroj, kiuj formis la tutan trupon. Aldoniĝis ankoraŭ cent muloj, ĉevaloj kaj azenoj. Krom la bestoj, kiuj apartenis al La Armonia, ankoraŭ aldoniĝis ĉiuj tiuj, kiujn *don* Acacio kunprenis el siaj du monterioj. Ankaŭ la *muchachos* el la multaj aliaj monterioj kunhavis plej ofte ŝarĝbestojn ĉe si.

La bovojn oni postlasis. Ili trovis tie sufiĉe da paŝtejoj, kaj se ili iutage decidus reiri al siaj hejmaj bienoj, de kiuj oni kunaĉetis ilin, ili trovus la vojon sole; ĉar oni pelis ilin ja sur la sama vojo en la monterion.

Kompreneble ilia kvanto antaŭ la ekmarŝo ĉiutage fariĝis

pli malgranda, ĉar ĉiutage oni buĉis du aŭ tri bovojn.

La *muchachos* bezonis ties viandon kaj oni ankaŭ kunprenis grandajn viandoproviantojn survoje. Andreo ordonis tion. La viandon oni striigis per tranĉiloj, salis kaj sekigis ĝin, tiel ke ĝi longe konserviĝu dum la marŝo.

La disigita amaso devis marŝi en malgrandaj taĉmentoj konsistantaj el kvindek aŭ sesdek viroj kaj el maksimume dekkvin ŝarĝbestoj, se eblis, eĉ el malpli da bestoj. Nur la primara kompanio havis okdek virojn kaj dudek bestojn. La primara kompanio transprenis la taskon disvastigi ĉiun *paraje*, ĉiun ripozejon, kaj konstrui *chocitas*, kabanetojn. La *parajes* estis plej ofte nur loketoj kunpinĉitaj de densa ĝangalo aŭ inter rivero kaj kruta monto, aŭ strateto, kiu similis al ravino en densa vepro. Por la karavanoj de la komercistoj sufiĉis la loketoj, sed ne por la transportoj de pli grandaj best- kaj homamasoj. Kompreneble la *parajes* estis sendensejigitaj, se la laboristaj agentoj kondukis cent aŭ centkvindek varbitajn virojn en unu trupo al la monterioj. Sed tiuj *parajes* estis ses semajnojn poste denove tute dense prikreskitaj kaj plenaj de densaj kaj pikemaj kreskaĵoj.

Krome la bestoj bezonis nutraĵojn. Kaj konduki cent aŭ cent dudek malsatajn ŝarĝbestojn per unu fojo al *paraje* estis malfacila. Sed en la pluvsezono postkreskis la verdaĵoj neimageble rapide, kaj dum dudekkvar horoj, ĝis la sekva kompanio avancus ĝis la ripozejo, granda parto de la verdaĵoj jam postkreskis. Oni devis trahaki sin nur iom pli profunden en la ĝangalon por povi havigi novan foliaron aŭ haki manĝoriĉajn arbustojn.

Ĉio ĉi do estis nur malgravaj malfacilaĵoj. Sed tio, kio neprigis la partigon de la tuta amaso en multnombrajn marŝtagojn, estis la moligita kaj marĉigita tero. La unua centopo de la tuta trupo ankoraŭ sufiĉe glate trairus. Sed la dua centopo sinkus jam minace profunde en la ŝlimon, kiun estus kaŭzintaj la antaŭmarŝintaj homoj kaj bestoj per siaj piedpoj kaj hufoj. La tria centopo restus poste tute en la marĉo. Sed, se oni limigas la trupkvantojn al taĉmentoj, la tero dum dudek kvar tagoj kunsinkas kaj firmiĝas je konsiderinda parto. En la pluvsezono pluvus ja tamen seninterrompe plu, sed je centoj de la vojdistancoj, kiuj ne estas ebenaj, la akvo povas flui flanken, kio ne okazas, se seninterrompe grandaj amasoj

de homoj kaj bestoj denove kaj denove moligas la teron.

La primara kompanio laŭ tiu plano estus jam dek tagojn antaŭe, se la lasta taĉmento ankoraŭ restadus en la monterio.

Je la unua setlejo elireje de la granda ĝangalo laŭplane ĉiu atendu, ĝis ĉiuj tie alvenos, por tie ree kolektiĝi en grandan aron. Kompreneble necesis malhelpi, ke iu el tiu setlejo transigus raporton al la grandaj bienoj survoje al Hucutsin aŭ Aĥlumal kaj per tio informus la federaciajn trupojn kaj *rurales* pri la almarŝo de la ribeluloj. Pli frue aŭ pli malfrue tio estus ja neevitebla. Sed en siaj planoj la ribeluloj deziris, ke ili atingu almenaŭ Hucutsin aŭ Aĥlumal, antaŭ ol la unua renkontiĝo kun la policaj trupoj aŭ la federaciaj soldatoj okazos.

Mulokaravanoj marŝas kutime, laŭ la jarsezono kaj laŭ la tereno dum *jornada*, dum tagvojaĝo, kvar ĝis naŭ leŭgojn, tio estas dek ses ĝis tridek ses kilometroj. Naŭ leŭgoj estas rigardataj kiel giganta *jornada*. Ĝi eblis nur en la seka sezono, kaj nur kun karavanoj, kiuj iris sur la retromarŝo sen ŝarĝoj. La kutima *jornada* averaĝe havis sep leŭgojn aŭ dudek ok kilometrojn, kaj tio estis bonega rezulto.

La antaŭe iranta kompanio je la unua tago iris nur tri leŭgojn. Kaj atinginte la unuan *paraje*, ili sciis, kion ili faris, tiom lacaj kaj elĉerpitaj ili estis. Ili iris eĉ ne unu paŝon, dum kiu ili ne vadis ĝis la genuoj en marĉo.

La sekvaj taĉmentoj, trovinte vojon, kiu estis moligita de la antaŭmarŝantaj kompanio kaj taĉmentoj, ne kapablis atingi la saman ripozejon dum tagvojaĝo.

El General ordonis, ke ĉiu taĉmento, kiel ajn, devas atingi dum *jornada* la marŝstacion, kiun konstruis la unua kompanio.

Sed kiam la *muchachos* rimarkis, ke la sekvaj taĉmentoj neniel povos atingi tion, kion la primara kompanio pli facile atingis sur la ankoraŭ freŝa vojo, ordonis El General por la antaŭiranta kompanio, ke ĝi ĉiam tagvojaĝu nur tri horojn, egale kiom da distanco pli-malpli ĝi marŝus dum la tri horoj. Kompreneble tiuj tri horoj ne precize fikseblis ĝis la minuto, ĉar *paraje* ĉiam dependas de tio, ĉu trinkakvo estas proksime aŭ ne, krome arboj, kiuj portas manĝfoliaron por la bestoj kaj fine ankaŭ sufiĉe da loko por la kampado de taĉmento. Se oni atingis post tri horoj lokon, kie dekstre estis rivero kaj maldekstre rokovando kaj la pado estis ĝuste tiom larĝa, ke sur ĝi povas iri nur viro post viro kaj mulo post mulo laŭ indiĝena irmaniero, la loko ja ne taŭgis por la konstruado de *paraje*; oni devis aŭ marŝi duonon de horo aŭ eĉ tutan horon pli longe aŭ la taĉmento retroiris al la loko, kiun ĝi jam pretermarŝis, kiu laste tamen pli taŭgis, por ke la *jornada* ne tro longiĝu.

Montriĝis pli poste, ke la dispartigo de la marŝstacioj ne laŭ la vojlongo, sed laŭ la tempo, estis tre bona ideo. Tiel la antaŭa kompanio gajnis multe da tempo por konstrui bonkvalitajn *chozas*, kabanojn, por la tranoktado kaj

krome la homoj kaj bestoj neniam tro laciĝis. Tiujn avantaĝojn kompreneble nur ĝuis la antaŭiranta kompanio. Sed la sukceso de tiu entrepreno ĝuste per tiu komando estis garantiita, eble eĉ entute ebligita. Por la primara kompanio tri horoj da marŝtempo sen konsidero de la atingita vojlongo estis malmulte. Sed por ĉiu sekvanta taĉmento la tri horoj da marŝtempo de la gvidanta kompanio ŝanĝiĝis en vojlongon, ĉar ĉiu sekvanta taĉmento devis atingi la konstruitan *paraje*. Tri horoj estis tiom mallonga tempo, ke, kiom ajn komplika kaj marĉa la vojo eble estis, la konstruita *paraje* ĉiam dum *jornada* atingeblis. Kompreneble la tri horoj da vojtempo de la antaŭiranta kompanio fariĝis jam kvar por la dua taĉmento, por marŝi la saman distancon. El General atentis pri tio, ke tiuj tri horoj estis prefere pli mallongigitaj ol longigitaj. La lasta taĉmento bezonis eĉ ok ĝis naŭ horojn, por iri dum *jornada* ĝis la sekva *paraje*. Sed ankaŭ la *jornadas* de la kutimaj komercistokaravanoj daŭris ok ĝis dek horoj, tempo en kiu ili kompreneble povis vojaĝi kutime pli longajn vojdistancojn ol la marŝantaj *muchachos*.

Ĉiu kvina tago estis ripoztago. Tion oni decidis antaŭ la ekmarŝo. Je ĉiu kvina tago taĉmento kampadis tutan tagon en tiu *paraje*, en kiu alvenis en la vespero antaŭe la antaŭiranta kompanio aŭ antaŭiranta taĉmento. Tio ebligis al la homoj kaj bestoj kolekti fortojn, kaj ĝi donis tempon al la vojo, por ke ĝi iom kunsinku kaj tiel pli firmiĝu.

Tiu ĉi ripoztago estis uzata en alia, tre avantaĝa maniero. Ĉiu taĉmento sendis du *muchachos* al la antaŭiranta taĉmento kaj al la postiranta por ricevi sciigojn kaj sendi ilin. Tielmaniere la taĉmentoj kaj la kompanio restis en ĉiama konekto, krome ĉiuj taĉmentoj inter si de la unua ĝis la lasta.

La plej granda militestro ne povis fari tion pli bone ol tiu neinstruita ĉefa stabo, je kies pinto estis serĝento, kiu apenaŭ kapablis skribi raporton, ĉar li estis malmulte lerta pri skribado. Sed kiel oficirojn li havis virojn kiel El Profesor, kaj li havis virojn kiel Celso, Andreo, Santiago kaj Matias, indiĝenaj viroj, kiuj ja ne estis edukitaj sed ankore kaj anime ribeluloj de tia speco, kia ne havas ambicion por la propra persono, sed nur ĉiam kreskantan

ambicion por ideo, kiun ili ekkonis ĝusta kaj entreprenebla. Ili sciis precize, kien ili volis stiri, kaj ili stiris tien, sen agi aŭ traktadi kun iu, kiu krucis aŭ baris ilian vojon. „Ni volas teron kaj liberon!“ Tio estis ilia tuta programo. Neniu alian ili havis. Ili eĉ ne estus akceptintaj, ke ankoraŭ povus ekzisti alia programo. „Ni volas teron kaj liberon, *tierra y libertad*; kaj, se ni volas havi teron kaj liberon, ni devas preni ĝin tie, kie ĝi troveblas; kaj ni devas batali pri ĝi, se ni volas havi ĝin ĉiam. Neniu alia programo necesas. Se ni havas teron kaj liberon, ni havas ja ĉion, kion la homo bezonas surtere; eĉ la amo estas inkludita en tion.“ Tiu programo estis tiel simpla, tiel ĝusta kaj tiel nefalsita, ke El Profesor ne devis paroli dum horoj por konvinki la *muchachos* pri la saĝo de tiu postulo; li ne bezonis ellabori statutojn kaj interkonsiliĝi pri ili, li ne devis rekomendi al la *muchachos* dikajn libregojn pri ŝtata ekonomio, por ke ili legu ilin kaj por peri al ili la veron, ke, ju pli stulta iu estas, ju pli limigita kaj ju pli idiota, des pli bone tiu taŭgas regi popolon – sub la antaŭkondiĉo, ke oni donas al tiu la mitralojn kaj forprenas ilin de ĉiuj aliaj.

La vojo, kiun la granda aro iris, krucis ne nur multnombrajn riverojn, kiuj tiam en la pluvsezono estis fordrivigaj kaj kiuj inundis siajn bordojn je larĝo de kilometroj kaj krome eĉ etendiĝis laŭborde de multaj lagoj estantaj tiom oftaj en tiuj ĝangalaj regionoj.

Kelkaj el tiuj grandaj lagoj havas altajn montecajn bordojn kaj la pado kondukas trans tiujn altajn relative sekajn bordojn, ĉar la akvo de la nubelversĝiĝoj rapide forfluas de tiuj rokaj altoj, kaj tuj, se la eterna suno ekbrilas, sekigas tian vojon dum horo.

Multajn el tiuj lagoj oni povis ekkoni de la vojo nur inter la trunkoj de la arboj, tiom profundan nivelon ili havis.

Sed preter kelkaj lagoj la pado etendiĝis proksime de la bordo, la lago estis vasta kaj neprofunda kaj la vojo dum la seka tempo troviĝis nur kvaronmetron super la bordo. La bordoj de tiuj lagoj estis plej ofte tre dense prikreskataj de fragmito kaj tial ofte estas malfacile ricevi bonkvalitan akvon por kuirado kaj trinkado el la lago, ĉar

oni devas profunde vadi en la fragmitoplena ŝlimo antaŭ ol oni atingas la akvon mem.

Tiaj lagoj ĉe la marŝvojo estas tiaj, ke ili povas malsukcesigi ĉiun prudentan planadon de la ĉefa ŝtabo.

Je la sesa tago atingis la antaŭiranta kompanio la unuan el tiuj lagoj. Estis la lago Santa Lucina.

El General iris renkonte al la viroj, kiuj marŝis longan distancon antaŭe kaj validis kiel antaŭtrupo. Celso kaj Santiago troviĝis inter ili.

„Tio aspektas damnite aĉe ĉi tie“, diris El General.

„Kial vi diras tion ĝuste al mi, generalo?“ ridante respondis Celso, kiu staris ĝis la koksoj en la marĉo.

„Ĉi tie nia revolucia marŝo je la unua fojo devos ekstari...“

„...kaj entrepreni sian unuan batalon“, aldonis Santiago, kiu kelkajn paŝojn malantaŭ Celso estis retenita de la ŝlimo kaj pene streĉis iel je nova maniero tiri sin per propra hartufo el la ŝlimo.

„Verŝajne ni ĉiuj firmgluiĝos ĉi tie dum tuta semajno“, diris El General, rigardante la inunditan bordon. Li ne proksimiĝis tiom, ke li same eksinkus. Kiam la unua mulo alvenis, li grimpis sur ties dorson por ricevi pli bonan kaj pli vastan superrigardon. Kion li vidis, tio logis el li novan frazon: „Povas ankaŭ esti, ke ni restados ĉi tie tri monatojn ĝis la akvo foriĝos ĝis la lasta guto.“

Celso vadis kun peno en tiu direkto, el kiu li venis por atingi pli firman teron. Tio sukcesis al li kaj al la ceteraj viroj de la antaŭtrupo.

El General sendis tuj sciigon, ke la tuta trupo haltu dum certa tempo tie, kie ĉiu staras. De la unua viro el taĉmento ĝis la lasta estis ofte unu kaj duono de kilometroj da distanco.

La *muchachos* komencis ekzameni kaj esplori la terenojn, kiuj troviĝis pli malproksime de la bordo, por eltrovi, ĉu nova vojo, vaste preteriranta la lagon, kreeblas. La unua raporto, kiu alvenis post du horoj, sciigis, ke flanken laŭlarĝe almenaŭ kvin kilometroj da tereno estas tute marĉaj kaj ŝlimaj.

„Tio estis antaŭvidebla“, diris Celso al la generalo, „ĉar tiukaze, se ne estus tiel, la centoj de *pataches* kaj karavanoj, kiuj preteriris ĉi tie en la lastaj jaroj, delonge estus serĉintaj novan vojon.“

„Certe tio pravas“, opiniis El General. „Sed ie devas esti trovebla nova vojo. Malproksime malantaŭ la ĉeno de montoj. Tia vojo certe signifas ĉirkaŭvojon du - aŭ tritagan, tial iu *arriero* certe neniam serĉis ĝin. Kiu volus perdi tri tagojn dum tia marŝo? Por ni tio estas alia afero. Ni povos iri ĉirkaŭvojon. Ni ja ankoraŭ alvenos ĝustatempe. La bienoj kaj la vilaĝoj kaj la tero, kiujn ni volas havi kaj la libero pri kiu ni batalas, ne forkuras de ni.“

El Profesor nun tute alproksimiĝis. „Ĉu la tero forkuras, eble ne estas la demando. Sed la libero povas forkuri de vi ĉiuj, se vi ne estos je dispono. Ni, la viroj, kiuj volas havi teron kaj liberon, ne nur ĉiuj devos alveni ĝustatempe, sed ankaŭ je la sama tempo. En grandaj aroj ni devos alveni. Alikaze ni malvenkos. Ni povos nur kiel granda aro kaj en amaso kaj kun amaso venki, ĉar ni nur kiel amaso havas valoron. Forprenu de ĉi tie iun viron,

ekzemple vin, Celso, aŭ vin, Santiago: mankas al vi la edukita kapo, la prudenta cerbo por gajni ion sola por vi mem. Ĉiu kutima skribisto en iu *cabildo* aŭ en iu *tienda* estas supera al vi, li prenas de vi la lastan centavon el la poŝo kaj la lastan terpeceton, ĉar li estas pli edukita ol vi. Unu el tiuj, kiuj havas prudentan kapon, valoras pli ol cent stultuloj el vi, kiuj scias kaj lernis nenion, kiuj ne povas skribi kaj kalkuli ion, al kiuj tial oni ĉiam mensogas, kaj kiujn oni trompas, ĉar vi fidas ĉiun laŭvorte, kion iu parolas al vi. Sed kiel amaso vi havas valoron. En granda aro vi havas mil kapojn kaj dumil brakojn, kaj en granda aro vi estas superaj al ĉiuj. Kaj tial mi diras al vi, ke la libero povus ankaŭ forkuri, se ni ne alvenos ĉiuj kune en granda aro kaj samtempe. Kontraŭ dek milionoj da formikoj ankaŭ la plej forta leono estas senpotenca, en tiu kazo li redonus la junan bovon, kiun ĝi ĵus kaptis al si. Vi estas la formikoj kaj la *patrones* estas la leonoj.“

„Vi ĉion tion bone parolis, El Profesor“, diris El General.
„Sed tio, kio ĝuste nun estas pli grava, estas serĉi novan vojon. Reiri al la monterio kaj atendi tie du aŭ tri

monatojn ĝis ĉi tie la vojo elsekiĝos, ne havas valoron.“

„Prave, tio ne havas valoron. Ni marŝu plu. Tiukaze ni ne rustos. Kaj kiu sciu, kio ĝuste nun en la lando okazas? Eble ni alvenos ja ĝustatempe por skue veki ĉiujn ankoraŭ neglektemajn kaj pigrajn peonojn. Se ili vidos nian trupon kaj nian armilojn, ili ekkuraĝos. Do, ek do, marŝu plu!“

Rimarko

cabildo = urbodomo, municipa sidejo aŭ municipa organizaĵo,
ankaŭ = carcero

pataches = (hisp.)= kuntekste: mulokaravanoj

Estis efektive dura laboro trabati novan vojon en la marĉan ĝangalon. La nova vojo deflankiĝis pli ol ses kilometrojn de la lago Santa Lucina, profunden en la netuŝitan ĝangalon. Poste ĝi etendiĝis penige trans trarompitan, rokecan terenon, krutan tricent metrojn supren kaj poste malsupren. Post tio ili serĉis nordokcidente denove la ĉefvojon, kiun la trupo post neimageblaj streĉoj atingis malfrue vespere.

Tiu vojo ĉirkaŭ la marĉan terenon de la inundita granda lago bezonis tiom da tempo, ke la dua taĉmento atingis la primaran kompanion kaj kampadis je tiu vespero kun ĝi komune.

Por ke la trupo kaj la primara kompanio ree disiĝu, por daŭrigi la deciditan marŝordon, la kompanio anstataŭ tri horoj devis iri ses. La unuajn tri horojn ambaŭ formacioj marŝis kune. Kiam troviĝis poste taŭga ripozejo, la taĉmento haltis tie, dum la primara kompanio ankoraŭ tri horojn marŝis plu.

La kompanio havis la komplikan taskon sendensigi la vojon kaj post alveno je la marŝtacio vastigi la lokon kaj konstrui kabanojn por la tranoktado. Sed la sekvantaj taĉmentoj havis neniel pli facilajn taskojn, kvankam tiujn laborojn faris aliaj. Ili devis vadi en la ŝlimo, kiun kaŭzis la centoj de antaŭmarŝantaj piedoj de la *muchachos* kaj ŝarĝbestoj, krome ofte la vojo fariĝis tiom ŝlima, ke ankaŭ la sekvaj taĉmentoj devis sendensigi novajn flankvojojn por povi ĉirkaŭiri tiajn lokojn, kiuj estis tro ŝlimaj kaj tro marĉaj kaj por ke ili ne sinku ĝis la kolo en ilin.

La vojo ĉirkaŭ la lago Santa Lucina ne estis la ununura ĉirkaŭvojo, kiu estis nove kreenda. Ĉe tri riveroj la transiro sur la kutima karavanvojo ne fareblis. Oni devis serĉi novajn travadejojn. Kaj ili renkontis lageton, kiu kaŭzis eĉ pli da peno ol la grandaj. Estis *La Lagunita*. Tie, pro la rokecaj montoj, pro kelkaj riverfluojoj kaj pro du aliaj lagoj ne eblis serĉi ĉirkaŭvojon, kiu ne postulus pli ol tridek kilometrojn. Ne restis io alia krom rekte preteriri *La Lagunita*-n kaj kvazaŭ pavumi la vojon per trunkoj, tiel, kiel oni konstruis la stratetojn en la ĝangalo por treni trans ilin la *trozas*. Sed la marĉo glutis la kunligitajn

trunkojn tiel rapide, ke ĉiu sekvanta taĉmento denove devis konstrui la ponton.

La marŝo ĝis la unua setlejo je la plej ekstera limo de la ĝangalo kostis la vivon al dudek ok *muchachos*, al kvar inoj kaj tri infanoj. Kelkaj sinkis en la ŝlimon kaj sufokiĝis, aliaj dronis ĉe la multnombraj riveraj transiroj, aliaj estis fortiritaj de forŝirantaj fluegoj kaj frakasitaj per ĵetiĝo al ŝtonoj aŭ trunkoj, pluaj sur forrompiĝantaj padoj falis en ravinojn aŭ frakasis ilin solviĝintaj rokopecoj falintaj sur la marŝformaciojn. Dekdu gamboj kaj brakoj estis rompitaĵoj. Kvindek kranioj estis malfermbatitaj, kaj plua kvindeko da viroj kvazaŭ nur treniĝis antaŭen, vipate de la febro, kun ŝrumpigitaj obtuzaj okuloj, verdete flavaj vizaĝoj kaj pugnograndaj grizaj kavetaĵoj sur la vangoj. Ses el la perditoj certe unu post la alia en la diversaj noktoj estis kaptitaj de jaguaroj aŭ pumoj. Ĉiam nokte, se sekve de la pluvo la bivakfajroj estingiĝis aŭ la viroj en la tenebro tro malproksimiĝis de la kerno de la kampadejo. Estis kompreneble ne certe, ĉu jaguaroj kaptis ilin. Neniu vidis tion. Sed la viroj matene mankis kaj oni malkovris plurfoje la fortajn piedegajn spurojn de

reala jaguaro parte jam forviŝitajn, ne tre malproksime de la kampadejo.

Triono de la ŝarĝbestoj estis perdita. La kaŭzoj estis la samaj kiel ĉe la *muchachos* kaj preskaŭ en la samaj rilatoj koncerne la diversajn specojn de kaŭzoj. Sed la bestoj malsaniĝis ne je febro, sed je koliko. Tio estis la ununura diferenco. Kaj duono el ili, spite al ĉiu memgardemo, havis vundojn sur la dorso, en kiu turniĝadis fingrolongaj vermoj. Kaj aliaj havis aĉajn vundojn je la gamboj, kaŭzitaj de vitre akraj rokaj eĝoj aŭ de mordoj de la serpentoj aŭ de jaguaroj.

Spite al tiuj perdoj, spite al malsanoj, spite al la laceco kaj laciĝo de ĉiuj, la trupo gaje humuris. Regis granda ĝenerala ĝojo, ne nur en unuopaj marŝtaĉmento kaj kuirkomunumo, sed en ĉiuj taĉmentoj kaj en la primara kompanio. Tute egale, kiom streĉa la vojo estis dum ĉiu tago, tute egale, kiom malgajiga la kamarada perdo sentiĝis de tiu aŭ de tiu ĉi, vespere en la kampadejo ŝajne ĉio estis forgesita. La mortuloj estis entombigitaj kaj oni lasis ilin tie. Gajeco regis en ĉiu ripozejo de kiu ajn marŝformacio. Gaje kompreneble tiel, kiel la serioza

karaktero de la indiĝenoj permesas tion.

Sed ili estis ĉiuj tiom esperplenaj, tiom optimismaj, tiom ĝojaj, tiom konfidaj, ke ili troviĝas dum la marŝo al sia promesita lando de libero kaj tero, ke eĉ ne unu el ili povis memori, ke tiu estis iam ajn tiom ĝoja kaj tiom plena de espero kiel dum la marŝo.

Ĉiuj dum la lastaj monatoj kaj jaroj vivis tute sen espero eĉ je nura ŝanĝeto de sia situacio. Ili estis, spite al ĉiuj kontraktoj, spite al ĉiuj promesoj, spite al la plej perfektaj konstituciaj leĝoj kaj paraĝrafoj kontraŭ ŝuldaŝto, kontraŭ peonismo, kontraŭ ŝervuteko kaj korpopunoj nur certaj pri unu fakto: se oni foje iam estas en monŝerio kun kontrakto, oni revidos nek la hejmlandon nek la familion. Tiel ili vivetis en la monŝerio kvazaŭ kiel en duondormo, obtuzigitaj kontraŭ ĉio, kio diferencigas homon de beŝto, kaj nur en tiu kazo ili iom ĝojis, se oni vespere ne ŝkurĝis aŭ pendumis ilin kaj lasis ilin en paco. Dankemaj ili estis ĝis la ŝervila ŝubuleco de tute malkuraĝa hundo, se la patrono aŭ la *capataz* kun larĝigita buŝo diris: „Nu, en ordo, *muchacho*, ĉifoje mi ne traktos vin per batoj, venu al mi, ŝurgenuiĝu kaj kisu tiun manon!“ –

Kaj nun ili venis, taĉmenton post taĉmento, al la unua setlejo. Ili havis post si la ĝangalon kaj la hororojn de monterio. Antaŭ ili estis iliaj vilaĝoj, patroj kaj patrinoj. Antaŭ ili estis libero kaj tero. Antaŭ ili estis: „*Tierra libres para todos, tierra sin capataces y sin amos!* Libera tero por ĉiuj, tero sen skurĝistoj kaj sen mastroj.”

Enanime fariĝis tiel agrable al ili, ke ili plej prefere ekplorus, kiam El Profesor kolektigis la tutan trupon ĉirkaŭ si kaj diris: „*Oiga, muchachos*, eĉ, se ni malvenkus, *muchachos*, eĉ se la *federales* kaj *rurales* mortpafus nin per mitrajlaj kugloj, eĉ, se neniuj el ni iam gajnus liberon kaj teron: ke ni venkis la monteriojn, ke ni faris la marŝon por ni, ke ni hodiaŭ libervole estas ĉi tie kaj kiel liberaj viroj, sen kia ajn speco de servuteco, sole tio jam valoras nian vivon kaj tiun de ĉiu unuopulo el ni. Unufoje esti libera, kaj se estus eĉ nur dum tri monatoj, valoras pli ol cent jaroj da vivo kiel obeema servutulo. Se ni nun en la batalo mortus, ni ne plu mortos kiel peonoj kaj kiel pendumitoj aŭ skurĝitoj, se ni nun batale mortus, tiukaze ni mortos kiel liberaj civitanoj de l' Tero, kiel liberaj ribeluloj, kiel veraj soldatoj de la revolucio.“

„Si, si, profesor. Es la verdad!" kriis ĉiu el la centoj de la kolektiĝintaj *muchachos*. „Somos libres y somos los luchadores para la libertad para todos, para campesinos y para obreros, todos unidos!"

„Prave, *muchachos*! Ĝuste dirite!“ vokis El Profesor malsupren de branĉego de la arbo, sur kiu li sidis, por havi vastan superrigardon de la tuta kampo de l' kolektiĝintaj *muchachos*. „Ni estas liberaj. Sed ni estas liberaj ne nur por ni mem. Kiel liberuloj ni ankaŭ devas plenumi taskon. Kiel liberuloj ni estas batalantoj por la libero de ĉiuj, kiuj nun ankoraŭ estas malliberaj, por ĉiuj kamparanoj kaj laboristoj, kaj ĉiuj unuigitoj por la sama liberbatalo.“

„Viva la libertad! Viva El Profesor! Arriba la lucha para Tierra y Libertad!" La *muchachos* kriis tion plena de entuziasmo.

Je tiu tago la lasta taĉmento alvenis kaj la trupo estis do kompleta.

Konatoj kaj amikoj kaj laborkamaradoj, kiuj marŝis en diversaj taĉmentoj, retroviĝis, kaŭris je la sama bivakfajro kaj interrakontis la travivaĵojn de la marŝo.

Regis gajeco. Multaj muzikis sur buŝharmonikoj, aliaj sur simplaj violonoj kaj gitaroj. Ili kantis. Sufiĉe priplorinda estis la kantado. Sed estis ilia kantado propra, kaj tial plaĉis al ili. Ili dancis, ridis, bruis. La sento, ke ili havas malantaŭ si la ĝangalon kun ties hororoj, streĉoj, marĉoj, marĉa ŝlimo kaj teruraj noktoj, en ĉiuj estigis ŝanceliĝon de ĝojo. Estis la ripozo post la duraj marŝoj kaj la malsekaj noktoj.

La ĝangalo kiel tuto tie en la setlejo finiĝis. Ties finaĵoj kompreneble ankoraŭ tagvojaĝojn profunde etendiĝis en la eksterajn terenojn. La vojoj fariĝis nun pli bonaj, sed je multaj lokoj ili estis simile aĉaj kiel tiuj de la ĝangalo. La pluvo ankoraŭ longe daŭris, eble eĉ semajnojn; sed ĝi

fariĝis de tiam pli kaj pli maldensa. Jam en la lastaj tagoj dum la marŝo la pluvo estis malpli ofta. Estis eĉ tri tagoj sen pluvo. Sed anstataŭ tio povis komenciĝi grava nubelversĝiĝo je la sekva tago aŭ jam en la nokto kaj sekvi du-aŭ trisemajna pluvperiodo.

Sed la ĝangalo estis forlasita. Dum marŝo de dekkvin kilometroj oni nun jam povis renkonti du aŭ tri kabanojn, setlejon aŭ ranĉon. Post pluaj dekkvin kilometroj oni renkontos la unuajn pli grandajn bienojn. Kaj tiam, post pliaj kvindek aŭ sesdek kilometroj oni atingos la unuajn antaŭŝovitajn urbetojn, ekzemple Hucutsin-on aŭ Achlumal-on.

Ekde tie oni renkontos malgrandajn *pataches*, mulkaravanojn sur la vojoj, ankaŭ grupojn de indiĝenaj kamparanoj, kiuj portas siajn varojn al la foirplaco. Ĝis tiuj urbetoj, kaj eĉ ankoraŭ malantaŭ ili, ankoraŭ troviĝas tie kaj tie ĉi ĝangalaj areoj, vastaj terenoj kun vepro kaj grandaj arbaroj, tra kiuj oni marŝas dum duonoj de tagvojaĝoj. Sed la ĝangalo simila al tage kaj nokte minacanta monstro estis jam finita.

Ekmontriĝas la kampoj kun maizo kaj faboj, tie kaj tie ĉi ŝtelaranĝataj kaj ĉirkaŭataj de praarbaro kaj vepro. Kaj ju pli longdistancaj estis la vojoj des pli oftaj ili estis, ĝis ili disvastiĝis en la bienoj tiom, kiom oni ankoraŭ povas rigardi ilin per siaj okuloj.

Kaj ĉar estas tie maizo kaj faboj, ekde tiam estis ankaŭ pli granda sekureco, ke la *muchachos* ne plu povis morti pro malsato. Ĝis tiu setlejo la monterioj pagis la marŝon.

Tion, kion la *muchachos* kunportis de la monterio, eble ankoraŭ sufiĉis por du aŭ tri marŝtagoj. Sed tiam ja la bienoj kun siaj abundaj provizoj da maizo, faboj, porkoj, bovidoj, salo, sukero kaj ankoraŭ multaj pluaj bonaĵoj estis mankapteblaj, jam elkore sopirataj de granda trupo de sanaj junaj viroj, kiuj dum monataj kaj kelkaj el ili eĉ dum jaroj malhavis tion, kion homoj bezonas por trovi la vivon eltenebla. Ĉar maizo sola ne sufiĉas, ankaŭ ne faboj kun akra kapsiko, kaj ankaŭ ne porkoviando, eĉ se estus kiom ajn freŝa kaj aldone kiom ajn bongusta, ĉar rostita kaj kuirita laŭ indiĝena maniero.

Sur la bienoj en la kabanoj de la peonoj atendis ne nur tortiljoj kaj *frijoles*, faboj, estis ankaŭ aliaj aĵoj kaj aferoj

sufiçe valoraj por ne lasi kuŝi ilin senatente ĉevoje. Kaj eĉ, se neni *muchacho* estus bandito aŭ rabisto aŭ seksperfortulo, ribelo ne povas vivi sen ribeluloj. Kaj ribeluloj devas vivi, se ili volas fari ribelon. Ne la ribeluloj kulpas la ribelon kaj ĝiajn sekvojn, kiuj estas embarasigaj kaj maloportunaj al la satuloj. Sed ribelojn kaj ĉion, kion ribeluloj faras kaj delikte faras, kulpas antaŭ ĉio tiuj, kiuj supozas, ke oni senpune povas bati homojn dum longa tempo sur la buŝon, sen tio, ke ili iam fariĝos malobeemaj. Ili ne malobeas hodiaŭ, eble ne. Sed morgaŭ ili leviĝos kaj ribelos, ĉar morgaŭ estos pli dolĉa ribeli ol obei kaj teni fermita la buŝon.

Ĉapitro 20

01

El Requemado, la setlejo tie enireje de la ĝangalo, komenciĝis antaŭ ĉirkaŭ tridek jaroj kiel monterio. Post kiam estis hakita ĉiu mahagonarbo, kaj kiel en ĉiuj ceteraj monterioj, ne estis plantita eĉ unu nova mahagonarbeto, kvankam la koncesioj eksplicite devigis tion, amiko de la *Jefe Politico* akiris la monterion por kelkaj centoj da pesoj de la registaro, poste li logis tien kelkajn indiĝenajn familiojn, por ke ili laboru tie kiel peonoj. Li enoficigis viron kiel *mayordomo*-n kaj ŝanĝis tiun iaman monterion en ranĉon. Tiu ranĉo estis tre malbonstata kaj havigis al la posedanto, kiu neniam iris tien, sed vivis en Jovel kaj tie entreprenis malgrandan butikon, preskaŭ neniun gajnon, eble cent pesojn ĉiujare. La *mayordomo* ne ricevis salajron, sed devis doni pagojn al si per la vendo de vivnutraĵoj al la karavanul- kaj mahagonuloj, kiam ili en la marŝo restadis tie dum nokto antaŭ ol ili iris plu.

Don Chucho, la aktuala *mayordomo*, terure ektimis, kiam la primara kompanio almarŝis tien kaj intencis

kampadi proksime de la ranĉo. Li provis demandi kelkajn el la *muchachos*, ĉu la monterio finiĝis aŭ ĉu ili estas eksigitaj kaj kial ili havas mulojn kaj ĉevalojn de la monterioj ĉe si, sen akompano de *capataces*. La respondojn, kiujn li ricevis, estis malabundaj kaj konfuzaj. Sed li estis sufiĉe atentema ne tro insiste esplori, kial la *muchachos* troviĝas dum marŝo. Fine li trankviligis sin per tio, ke en vero ĝi ja ne koncernas lin, kial la *muchachos* forlasis la monterion.

Sed kiam poste ĉiutage alvenis plua grupo kaj neniuj el la antaŭe almarŝintaj formarŝis, sed la kampadejo fariĝis pli kaj pli granda, li decidis sendi iun el la peonoj kun sciigo al la plej proksima bieno. Sed lia edzino konsilis al li, ke li lasu tion. „Ĝis nun neniuj ŝtelis ion de vi, Chucho. La *muchachos* pagas tion, kion ili aĉetas. Kvankam ne estas multe, kion ili aĉetas, ĝi estas ja tamen pli ol nenio. Kaj, se la *muchachos* konsentis ion inter si, kial tio koncernu nin? Se konatiĝos, ke vi sendis viron al la bienoj kaj, ke vi perfidis ilin al la *rurales*, tiukaze la sekvoj por ni ĉiuj estos mornaj. Tion vi scias bone, lasu tial la fingrojn de tio.“

Don Chucho akceptis, ke lia edzino denove pravis. Tio dolorigis lin pli ol la proksimeco de la granda kampadejo de indiĝenoj, kiuj troviĝas en marŝo kaj – kio estis la plej malagraba – havis armilojn ĉe si. De kie la *muchachos* havis la revolverojn, ĉasfusilojn kaj ŝrotpafilojn, li certe divenis. Sed li estis sufiĉe saĝa tion ne laŭte konfesi al si mem, ĉar li timis, ke li falus pro teruriĝo tuj morta teren, se li klare imagus, kio eventuale okazis en la profundo de la ĝangalo kaj en la monterioj. Lia edzino havis la saman percepton. Sen tio, ke ambaŭ interkonsiliĝus pri tio, ili tute ne permesis al si interparoli pri pensoj, kiujn ili tiurilate havis. Estis en ĉiu kazo kaj ankaŭ por la sobra menso multe pli bone supozi, ke temas nur pri tute neklara suspekto. Certeco certe puŝus ilin en panikon.

Sed la decida kaŭzo, kial *don* Chucho ne sendis heroldon kun sciigo, estis prudenta kaj vere strategia. Li diris tute ĝuste al sia edzino: „Se oni informos la *rurales* pri la almarŝo de la ribelantaj *muchachos*, tiukaze la *rurales* ne marŝos ĉi tien, sed restos proksime ĉe la ranĉoj kaj bienoj kaj urbetoj, kie ili atendos la trupon kaj tie batalos kontraŭ ili. La *muchachos* malvenkos en la batalo kaj

retrofuĝos en la ĝangalon, kie ili kaŝiĝos, ĝis ili unuope povos ŝteliri en siajn vilaĝojn. Se ili retiriĝos, ili devos denove preteriri la setlejon, ĉar la ĝangalo estas ilia sola savelirejo, ĉar tie ili ne devos timi atakon. Se ili revenos, tiukaze, kiel despera aro, venkita kaj humiligita, malsata, ĉagrena, kolerega, tial de la setlejo ne postrestus eĉ ununura tigo, neniuj porko, neniuj kaproj ja neniuj kokino.

Sed kio estas plej terure, tio estas, ke oni mortbatus min kiel malsanan hundon, kaj ankaŭ vin, kaj neniuj scias, kion ili krome ankoraŭ farus kun vi. Intertempe ili ja ekscius, ke mi perfidis ilin al la *rurales*.”

Don Chucho ekkonis la situacion bone. Tion devis agnoski eĉ lia edzino. Ŝi diris: „Vi estas multe pli prudenta ol mi pensis, Chucho.”

Li respondis: „Bone, *vieja*, ke vi fine foje konsentas tion, kiu el ni havas la pli grandan cerbon en la kranio. Estas malofte, ke vi foje ŝatas la saĝon de via edzo.”

„Domaĝe, ke vi tiel malofte malkaŝas tion.” Ŝi mangestis lin en la argilan domon, en kiu ili loĝis. Kiam li enestis, ŝi

diris al li: „Estos pli bone, se vi ne tiom ofte montros vin ekstere.“

Tro proksime de la ranĉo la kampadejo kompreneble ne troviĝis. Por tio en la ranĉeto ne estus sufiĉe da loko, ĉar la ranĉuloj senveprigis ja nur ĝuste tiom da ĝangalo, ke ili havis lokon por la kabanoj de la peonoj, tiel, kiel por la maizkampoj kaj fabaj agroj. Sed survoje, iom pli proksime al la bienoj, ĉirkaŭ kilometron for de la ranĉo, estis senarbejo ĉe la bordo de la rivero, dense prikreskata per dratecaj ĝangalaj herboj kaj alta fragmito. Kaj estis tiu senarbejo, kiun El General ordonis kiel kampadejon por la trupo.

La senarbejo havis la strategian avantaĝon, ke de la ranĉo apenaŭ iu povis iri al la bienoj aŭ en la maldirekto preteriri la kampadejon, ĉar tie estis la ununura travadejo trans la riveron, kiu tiutempe sekve de la pluvo estis alta, kaj verŝajne aliloke nur kruceblus, se oni entreprenus iri sur longa ĉirkaŭvojo, kio povus daŭri tagojn. Nur trovi tiun ĉirkaŭvojon kaj esplori ĝin povus daŭri tutan semajnon.

Estis do sufiĉe da kaŭzoj, kial la ĉefa stabo de la ribelula

trupo ne devis atendi atakojn de la *rurales* kaj de la federaciaj soldatoj. Neniel tie, ankaŭ ne interne de la sekvaj ses tagoj. Neniu kiom ajn kuraĝa polica kompanio de la diktatoro marŝus tien por kvazaŭ buĉi la trupon. La ĝangalo tie estis ankoraŭ tro masiva kaj tro densa. Mitraloj tie tute ne havis valoron, kaj eĉ la bonegaj karabenoj en tiu tereno ne sufiĉus. Tie uzeblis nenio el ĉi tio, kion soldatoj sur ekzercejoj kaj kazernaj kortoj kaj dum manovroj lernis tiel pene. Tie la *muchachos*, kiuj iris nudpiede kaj konis la ĝangalon, ĉiam kaj ĉiufoje havis avantaĝojn kontraŭ kutimaj soldatoj. Tie batalis ĉiu viro sen kompato kaj sen pardono. Tie bastonoj, maĉetoj, tranĉiloj, ŝtonoj kaj la duraj pugnoj de la hakistoj havis pli grandan valoron ol la plej perfekta karabeno. Ĉion tion sciis kompreneble ankaŭ la oficiroj de la polico kaj de la soldatoj sufiĉe bone. Kaj tial la *muchachos*, eĉ se la *rurales* ricevus sciigojn de la ribelo, estis tie, kie ili kampadis, sekuraj kontraŭ ĉiu atako.

La militkonsiliĝo, kiu aktuale okazis, estis vigla. Sed ne evidentiĝis tie la malgajiga sorto de ĉiuj revolucioj kaj de ties parlamentoj, en kiuj oni interkonsiliĝis kaj interkonsiliĝis, paroladis kaj paroladis – kaj se tiam fine decido estis farita – la paroloj denove komenciĝis kaj ripetiĝis, speciale pri tio, kiel tiu decido estu realigata kaj efektivigata.

Estas ĉiam la revoluciaj parlamentoj kaj ties kunsidoj, kiuj fuŝas revolucion kaj fine faligas ĝin.

Dum oni diskutas kaj kverelas en longaj kaj lacigaj kunsidoj, kiu parolu do kaj kiu ne, kio apartenu al la tagordo kaj kiel aspektu la flago de la revolucio, la kontraŭuloj havas tempon kaj trankvilon trovi la fadenon en la konfuziteco, sin kolekti kaj ekmarŝi. Kaj antaŭ ol la diskutantaj revoluciuloj interkonsentiĝis pri tio, kiu havu la rajton skribi noktpasportojn kaj kiu havu la rajton aranĝi sian buroon en la urbodomo, la kontraŭuloj estas jam malsupre ĉe la pordo de la halo, en kiu la revoluciuloj parolas, ili jam arestis la gardintojn kaj nun grimpas sur

la ŝtuparo supren por aresti la tutan kunsidaron. Ekstere intertempe jam ne estas plu revoluciuloj, dekonon oni pafmortigis, du dekonoj estas en la kazernoj, kie oni ĝuste traktas ilin per pugnoj kaj plua dekono fuĝas aŭ kaŝiĝas. Kaj ĉiuj ceteraj kontentas, ke nun fine la revolucio finiĝis kaj ĉiu ree trankvile kaj plezure povos okupiĝi pri sia laboro kaj, kun subteno de sia edzino, rajtas meti novan mizerstatan proleton en la mondon.

Bonŝance la *muchachos* ne estis malnovaj kaj ekzercitaj revoluciuloj, kiuj pasigis sian ĝistiaman vivon per tio, preni en kunsidoj la vorton, verki fajre ruĝajn artikolojn por revoluciaj gazetoj kaj ĉiam almozpeti pri krompagoj por tiu aŭ tiu ĉi celo de la movado. Se al tiuj ekzercitaj maljunaj kaj spertaj revoluciuloj iutage, tute neatendite de ili, falas revolucio de subigatoj kaj tiranatoj sursinen, tute sen la kunagado de la la malnovaj revoluciuloj, kaj esence eĉ kontraŭ iliaj volo kaj intencoj, jen ili staras senhelpe, ne scias kiel fari ion kaj kion, kaj sopiras la malnovan trankvilon kaj ordon, en kiu ili rajtis oponi kaj oni festis ili pro tio, sen tio, ke ili krome devis riski ion.

La militkonsiliĝo de la *muchachos* pro aliaj kaŭzoj fariĝis

vigla, kaj ĝi havis pro aliaj kaŭzoj, spite al longaj interparoloj, neniujn rezultojn. Oni tie parolis ne pri iuj programeroj, ne pri tio, kiu vidpunkto estas la plej revolucia kaj kiu estu rigardata kiel perfidulo, sed la kverelo temis pri tio, kiu el la trupo nun, kiam la afero fariĝos serioza, marŝu je la pinto. La kompanio, kiu estas gvidonta la trupon, havos la gloriĉan perspektivon, esti mortpafita ĝis la lasta viro, tuj, kiam la *rurales* estos metintaj mitralon surteren. Antaŭe, antaŭ ol la mitralo estos malŝarĝita de la muloj, la *ruraloj* ne restos senagadaj. Por tio havas ja ĉiu el ili novan magazinkarabenon kaj *Colt*-revolveron. Krome *rurales* kaj *federales* estis ekzercitaj pri tio, tuj, kiam estas okazo, uzi la armilojn, donitajn de la kaciko al ili, kontraŭ ribelantaj proletoj kaj indiĝenoj, kiuj por la salajro, plej grandanime ofertita al ili, ne volas labori aŭ fariĝas eĉ ribelemaj. Tia uzado de karabeno estas pli agrabla ol iu alia kontraŭ grave armita malamika lando, kiu same havas karabenojn kaj mitralojn.

Kompreneble, tie dum la militkonsiliĝo kaj la kverelo pri tio, kiu trupo aŭ kompanio marŝu antaŭe, ne temas pri la

gloro, kiu trupo aŭ kompanio el ili oferu sin kaj uzu siajn korpojn kvazaŭ kiel protektan remparon por la sekvaj kamaradoj. Por tiaj idealaj kaj bele aspektantaj agoj en poemoj kaj rakontoj la *muchachos* havis eĉ ne la plej etan intereson. Bonŝance ili ne estis stultigitaj kaj ŝtipkapuligitaj de artikolverkistoj kaj de kunsidoparolantoj. Ili estis sobraj kaj praktikaj. Por ili ne temis pri tio gajni gloron, sed ili havis neniun alian penson krom tiun forpreni de la *rurales* la belajn karabenojn, revolverojn kaj mitralojn.

Neniu el la *muchachos*, kun escepto de El Profesor, iam legis artikolon en revolucia gazeto, ili neniam studis la historion de revolucio aŭ de ribelo, ili neniam partoprenis en kunsido aŭ iam aŭdis pri programo. Sed ĉiuj posedis bonan naturan instinkton, kiu instruis ilin, ke tiukaze, se oni posedas la armilojn kaj la malamiko ne, oni gajnas la revolucion aŭ la ribelon aŭ la leviĝon aŭ la strikon aŭ kiel ajn oni nomas tion, kio garantias al la proletoj justecon, ĉar en sia lasta formo temas ĉe ĉiuj veraj revolucioj ne pri pli da salajro, ne pri dispartigo de ĉiu posedo, ne pri privilegioj, sed pri tute nekaŝita kaj nekamufлита justeco.

La senco de la ribelo por la *muchachos* provizore estis neniuj aliaj krom ne plu esti subigitaj, ne plu batitaj, ne sklavigitaj. Ekde sia infaneco spertis kaj vidis ĉiuj *muchachos*, ke ĉiam tiu, kiu portas revolveron surpostaje aŭ karabenon pendigitan surŝultre, rajtas subigi, ekspluati, bati kaj komandi la indiĝenojn, kaj ĉar la indiĝenaj proletoj ne havas revolverojn, tial la indiĝenoj devas obei kaj akcepti ĉion, kio estas fide farata al ili. Kaj, se indiĝeno malfermas la buŝon por diri ion kontraŭ tio, oni batas la indiĝenon per la revolvera tenilo sur la buŝon aŭ per la karabentenilo en la stomakon. Tial estis tute nature, ke por la *muchachos* la posedo de armiloj estis samsignifa al la venko de la ribelo; de ĉiuj kontraŭuloj forpreni la armilojn do signifis al ili sekurigi la rezultojn de la revolucio por ĉiuj estontaj tempoj kaj okazaĵoj.

La kompanio, kiu marŝos je la pinto, havos la unuan renkontiĝon kun tiuj, kiuj posedas la armilojn. Ke de tiu kompanio tri kvaronoj estos mortpafitaj per la kugloj de mitraloj, estis al ĉiuj *muchachos* tute klara. Sed ankaŭ, ke kvarono el ili verŝajne transvivos. Kaj tiu kvarono havas la rajton je la konkeritaj armiloj. Tiel, kiel ĉiu homo

aliloke, kiu aĉetas loteribileton, esperas, ke li gajnos la grandan premion, tiel ĉiu *muchacho* esperis aparteni al la transvivonta kvarono kaj elserĉi al si inter la konkeritaj armiloj tiujn, kiuj plaĉos plej multe al li.

La longajn parolojn kaj kverelojn pri tio, kiu el la trupoj kaj la kompanio de tiam formos la antaŭirantan puŝtrupon, El General kaj Celso subite rapide finis.

El General elkriis sen paŭzo: „Damnita fiularo, ĉu vi estas gregoj el oldaj inaĉoj kaj plorulinoj, ke vi ĉi tiel longe babiladas? Ni estis la antaŭiranta kompanio kaj ni restos la antaŭiranta. Do finu la diskuton kaj trankviliĝu!“

Ĉar tiu mallonga kaj decida parolo al la armeo ŝajne ankoraŭ ne estis sufiĉe klara al Celso, li ekstaris de la bivakfajro kaj vokis: „Damnitaj filoj de putino, jenaj kamaradoj, kiuj ne konsentas pri tio, kion El General ĝuste diris al vi, ricevos baton sur la fian vizaĝon. Komprenu! Ni estas en ribelo. Kaj en ribelo oni ne parolas, sed batalas. Vi ĉiuj estos ankoraŭ en la vico. Nur ja ne afliktiĝu pri tio. Kaj post ses tagoj vivos ja ĉiel kaj ĉiukaze nur duono el vi plu.“

„*Viva! Bravo!*” vokis la *muchachos*. Kaj kelkaj vokis :
„Ĝuste, Celso, sed la alia duono havos la fusilojn kaj la
kartoĉojn. *Tierra y Libertad!*“

Dum tiuj paroloj alvenis tie en la kampadejo indiĝenaj viroj, kiuj vivis kiel peonoj en la setlejo. Ili konis kelkajn *muchachos* el pli frua tempo. Estis nokto. En la hela tago ili ne kuraĝis iri tien, pro timo pri la *mayordomo* de la ranĉo.

Timeme ili proksimiĝis, ĉar ili ne certis, kiel la trupo akceptus ilin. Ili ja ne apartenis al tiuj aliaj kaj ĝis tiam kaj dum la tagoj de la almarŝo de la multaj trupoj kaj la kompanio ili entreprenis nenion por povi gajni la konfidon aŭ la amikecon de la ribelantaj *muchachos*. Estus tute normale, se la *muchachos* rigardus ilin kiel spionojn, kiuj ne venis tien por trovi kunulojn en la ĝenerala batalo, sed ŝteliris tien nur por esplori la planojn de la *muchachos* kaj tiam sciigi ilin al sia *mayordomo* aŭ eĉ por gajni peson kaj por perfidi la ribelulojn al la *rurales* aŭ al la plej proksima bienulo.

Sed pro la viroj, kiuj konis ilin el pli frua tempo, ĉar ili devenis el la samaj vilaĝoj kaj apartenis al la sama nacio, ili ja ne multe, sed tion kaj tion ĉi, eksciis. Ili sciis, ke la

ribeluloj troviĝis en ribelo, ke ili ĝisdetale „purigis“ la monteriojn kaj nun estis dum marŝo por „purigi“ foje same tiel detale ankaŭ la bienojn.

Ĉar ili sciis tion, ili ankaŭ tuj tuŝis la kernon de la afero, tuj, kiam ili estis en la kampadejo.

Ili demandis, kie estas la *leader*, la *capitan*, kaj oni diris, ke tiuj estas El Profesor kaj El General. Ili iris al la bivakfajro, kie kaŭris la armea stabo kaj la ĉapelojn ĝentile deprenante, ili diris: „*Jefe*, kion ni faru ĉi tie, ĉu vi ne volas diri tion al ni?“

„Mi ne estas via ĉefo, *hombres*“, respondis El Profesor. „Ne plu estas *Jes*, kaj ankaŭ ne *patrones*. Mi estas via *camarada*. Kaj, se vi estas peonoj kaj *campesinos* tie en la aĉe kota ranĉo, jen estu bonvenaj, vi estas niaj kamaradoj. *Tierra y libertad!* Teron kaj liberon por ĉiuj, sen *capataces* kaj sen patronoj!“

„*Camaradas*, tio estas ja ĝuste tio, kion ankaŭ ni celas. Pecon da tero, kiu apartenas al ni, kaj liberon por povi kultivi la peceton da tero en paco sen batoj de

mayordomos, kaj, ke ni kune povos paroli kaj interkonsiliĝi pri tio, kion ni celas, kaj ke oni ne batu nin sur la buŝon. Jen ĉio. Kaj, se ni havos tion, ni estos kontentaj kaj ne partoprenos en ribelo.“

„Bone, se vi celas tion, jen vi estas *camaradas buenos*, fidelaj kunuloj. Ni bezonas pli da batalantoj, ĉar sufiĉe da ili estos mortpafitaj. Tiukaze do tuj iru kun ni. Frumatene ni ekmarŝos.“

„*Mire, Jefecito*, atentu ĉefĉjo“, komencis paroli la vortgvidisto.

„Damne kaj malbenite, ĉu mi ne diris, ke vi ne diru ĉefo al mi. Ankoraŭfoje tion, kaj mi boksos vin grimacen.“

„*Perdoneme, Camarada. Mire*. Pripensu: mi havas etan *milpa*, peceton da kampo, kaj tie mi nun plantis maizon. Se mi irus kun vi, mi ne povus rikolti la maizon. Kaj mi havas tri porketojn. Kion mi faru kun tiuj?“

„Vi ja volas havi teron kaj liberon, ĉu ne?“

„Certe vi volas havi tiujn. Sed jen pripensu, krome mi

havas ankoraŭ edzinon. Tiu ĝuste nun estas grave graveda. Daŭros nur ankoraŭ tri semajnojn, diris la *madrona*, kiu tiam helpas al ŝi, ĝis ŝi naskos la infanon. Tial mi nun ne povas lasi mian edzinon sola.“

„Bone, tiukaze do restu ĉi tie. Kaj pli bone eĉ estus, se vi ĉiuj restus en tiu ranĉo, kaj plu lasos bati vin kaj larĝbati viajn fiajn vizaĝojn, se vi malfermos ilin.“

„Ni volonte ĉion tion ŝanĝus. La ranĉon ni bone povus uzi por ni mem. Ni havas ĉiuj tie, vi povas demandi ĉiun el ni, nur etan kampon, kie ni plantas nian maizon kaj niajn fabojn. Por tio, ke ni ricevis la etan kampon, ni devas labori ĉiumonate tri semajnojn por la ranĉo, sen tio, ke la *mayordomo* pagus eĉ nur centaviton.“

„Ĉu vi ĉiuj havas maĉeton?“ El General tiel daŭrigis la interparoladon.

„Kompreneble, *camarada*, ni ĉiuj havas maĉeton.“

„Bone do. Se vi senarbigus por nova *milpa* lokon en la ĝangalo kaj arbusto staras en la vojo, kion vi farus tiukaze?“

„Mi akriĝus mian maĉeton kaj dishakus la arbuston en pecojn.“

„Prave, amigo. Kaj se vi volas havi teron kaj liberon sur la ranĉeto, kie vi nun laboras, se oni fie traktas vin kaj vi ne perlaboras eĉ centaviton, kiu baras tiukaze vian vojon?“

„Tion vi ja scias, *camarada*. Jen *don* Chucho, la *mayordomo*.“

„Do, tiu baras la vojon kontraŭ via sopiro pri tero kaj libero, ĉu?“

„Tion mi diris, kaj tion scias ja ankaŭ vi.“

„Vi ja ĉiuj havas maĉetojn, ĉu ne?“

„Kompreneble ni havas maĉetojn. Florencio kaj Marcos, tiuj havas eĉ du da.“

„Kaj vi ankaŭ bone scias kiel akriĝi la maĉetojn, ĉu?“

„Tre bone. Tion ni faras ja ĉiumatene du horojn antaŭ ol Suno leviĝas, ĉar ni ĉiuj kun akriĝitaj maĉetoj devas

starigi nin en vico antaŭ la *mayordomo* kaj longe antaŭ ol ekaperas Suno.“

„Tiukaze prenu do viajn maĉetojn, akriĝu ilin bone kaj forigu ĉion, kio baras vian vojon, se vi volas havi la ranĉon.“

Kiam la peonoj estis for, El General vokis la kapitanojn el ĉiuj grupo al si, por eldoni la komandojn por la sekva tago.

Ili decidis, ke de tiam ĉiuj grupoj restu kune pli proksime, ĉar en unu el la tri sekvaj tagoj verŝajne okazos la unuaj kunpuŝiĝoj. La kompanio gvidata de El General, de lia staba ĉefo Celso kaj El Profesor, marŝis antaŭe kiel puŝtrupo. Tridek minutojn poste sekvis la dua kaj tria marŝgrupoj. Same tridek minutojn poste sekvis la kvara kaj kvina grupoj. La sesa, sepa kaj oka formis la dorsan protekton, en kiu estis kondukataj tri kvaronoj de ĉiuj muloj kaj ĉevaloj, kaj kie troviĝis ankaŭ la rezervoj de la nutraĵprovizo. Ĉiu *muchacho* portis krome sian pakon, tiel, kiel kutime en sia vivo, kiam li marŝis. La inoj kaj infanoj, kiuj estis en la trupo iris en la grupoj, en kiuj kunmarŝis iliaj edzoj kaj patroj. Kelkaj inoj, inter ili ankaŭ Modesta, marŝis en la puŝkompanio, sed ili portis sian pakaĵon tiel, kiel la edzoj.

Kion la *muchachos* faros kaj kiel ili konduku, se ili atingos

la bienojn kaj la vilaĝojn, tion ili ne interkonsilis. Ili eĉ ne havis la penson, ke ili devus interkonsiliĝi pri tio, kio okazu, se la *rurales* kaj *federales* fine estos venkitaj. Sen scii tion, kaj denove nur sekvante sian instinkton kiel subigitoj, ili agis tute bone. Ne havas valoron interkonsiliĝi dum tagoj aŭ dum semajnoj kaj kvereli en kunsidoj, kion oni devos fari, kiam la revolucio estos venkita, kiam la kontraŭulo jam sternis sin surtere pro nokaŭto kaj ne plu povas eĉ movi sin. Venku la revolucion, neniigu ĉiujn kontraŭulojn, kaj ĉiujn, kiuj povus fariĝi viaj kontraŭuloj, kaj se vi estos farinta tion, interkonsiliĝu pri tio, kio nun devos okazi!

„Ankaŭ vi ja ne dispartigas la felon de jaguaro, antaŭ ol la jaguaro estas mortpafita kaj ĝi ne plu povas fuĝi“, diris El Profesor al Andreo, kiam Andreo konsilis, ke ili faru planon kiel estu dividita la bieno, kie li naskiĝis kaj kie liaj gepatroj laboras kiel peonoj.

„Sed ĝi estas ja eble bona, jam antaŭe serĉi iun, kiu volus aĉeti la felon, por ke oni ne tiom longe ĉirkaŭkuradu kun la felo.“

„Sciu, Andreo“, instruis lin El Profesor, „provizore lasu la aĉetantojn de feloj mem cerbumi pri tio. Se la feloj foje iam estos kun garantiaĵo viaj, la aĉetantoj venos per si mem, kaj tiam estos tempo por paroli pri la prezo kaj la pagmaniero.“

Estis ankoraŭ profunda nokto ĉirkaŭ je la tria matene, kiam El General alvokis la virojn de la antaŭkompanio, ke ili tenu sin marŝpretaj. La ceteraj grupoj havis ĉiuj tridek minutojn pli da tempo ol la antaŭiranta grupo.

Dum kvar tagoj pluvis nur malofte. Sed tiam, mallonge antaŭ noktomezo, pluvis denove dense. Kompreneble ne plu estis la pluvelverŝigaj torentoj, kiuj kvazaŭ pafigis el la nuboj. Sed estis tamen suka kaj forta pluvo, kiu dum du horoj moligis ne nur la tutan kampadejon, sed ankaŭ kunsinkigis ĉiujn malgrandajn rapide konstruitajn palmkabanojn. La tuta trupo en tiu horo, kiam El General donis la signalon al la unua marŝformacio, estis tiom malsekigita, kvazaŭ ĝi ĵus vadis tra alta rivero. Kostis senfinan penon kaj paciencon teni brulantaj la bivakfajrojn de la kampadejo. La *muchachos* sekigis siajn pakojn kaj vestojn, kuiris kafon kaj varmigis la fabojn kaj la rizon.

Ĉirkaŭ la kvara la pluvo malfortiĝis kaj El General ordonis, ke la antaŭiranta kompanio ekmarŝu.

La *muchachos* ĵus levis siajn pakojn por ekmarŝi, kiam la peonoj, kiuj vespere estis en la kampadejo, proksimiĝis kaj demandis pri El Generalo.

„Ĉu vi do pripensis marŝi kun ni?“ demandis El Generalo.

„*No, camarada*“, respondis la vortgvidanto. „Tio nun ne plu necesas por ni. Ni havas nun tion, kion ni volas. Ni havas teron kaj liberon. La ranĉeto estas nun nia. Ni dividos ĝin hodiaŭ inter ni.“

„Kaj la *mayordomo* donis al vi la ranĉeton, ĉu?“

„Jes. Kompreneble, kiam ni diris al li, ke ni kultivis la *ranchito*-n jam dum kelkaj kelkajn jaroj, kaj ke tial la *ranchito* nun devu aparteni al ni, ĉar ni kreis ĝin elhakinte ĝin el la ĝangalo, jen diris la *mayordomo*, *don Chucho*, ke li tion jam atendis. Li diris, ke la pedikohavaj kaj kotaj insurekciuloj el la monterioj fi-agitis nin kaj, ke tiukaze, se ni ne tenos fermitaj la buŝojn, li skurĝos ĉiun el ni centfoje, tuj kiam la malbenitaj, stinkantaj kaj kotaj ribelaj incitantoj foje estos foririntaj.“

„Kaj kion vi respondis?“

„Nu, ni diris apenaŭ ion, ĉar ni vespere ja ankoraŭ akrigis niajn maĉetojn. Kiam ni do renkonte pli proksimiĝis al *don Chucho*, jen li ekpafis al ni per sia revolvero, tuj poste Calixto kaj Simeon estis mortpafitaj, kaj tri el la aliaj moviĝadis transkapiĝe surtere, ĉar ili havis pecon da plumbo en la intestoj.“

„Kaj tiumomente vi ektimis kaj forkuris, ĉu?“

„*No, Camarada*. Jen ni ne forkuris, sed ni memoris pri tio, ke oni devas labori per bona maĉeto, se oni volas senarbigi kaj senarbustigi lokon el la ĝangalo por *milpa*. Ni poste tuj enfosis *don Chucho*-n kaj *doña Amalia* kaj la infanojn, por ke matene neniu vidu ilin. Kompreneble ni prenis de *don Chucho* la revolveron kaj la ĉasfusilon, kiujn li havis, antaŭ ol ni enfosis lin. Ni tute bone povas uzi ĝin mem. Lian domon ni ne volas havi. Ĝi estas plena de ratoj. Kaj nun vi komprenos, *Jefecito*, kial ni ne devos marŝi kun vi. Ni ja havas ĉion, kion ni volis kaj pluan ni ne celas. *Tierra y Libertad para todos, sin mayordomos y sin patrones*. Ni estas nun la patronoj kaj mastroj ĉi tie. Sed, se vi ankoraŭ volas kampadeji kelkajn tagojn ĉi tie, *muchachos*, ni volonte permesos tion al vi.“

„Nu, en ordo, *amigos*“, diris El General. „Ni ekmarŝos ankoraŭ hodiaŭ frue kaj neniuj ĝenos vin ĉe la disdividado de la tero kaj de via laboro. Sed, se la *rurales* venus al vi kaj demandus vin, kie estas via *mayordomo*, *don Chucho*, kion vi do dirus tiukaze ?“

„Nu, ni dirus, ke *don Chucho* kaj *doña Amalia* sentis timon kaj fuĝis al la *selva*, en la ĝangalon kaj pluan ni ne scias. Kaj se la *rurales* ne estos kontentaj pri tio, jen ni akriĝos denove niajn maĉetojn, kaj ni havas ja ankaŭ revolveron kaj la *escopeta*-n, la ŝrotfusilon. Cetere ja ne plu venos *rurales*, *Jefecito*. Vi venkos ilin ĉiujn kaj ankaŭ la federaciajn soldatojn. Kaj ni nun ekiros, ĉar la *muchachos* buĉis grandan porkon, kiun *doña Amalia* tiel bone nutris, sekve ni havas nun freŝan viandon por rostado. Tio estas nun ĝuste preta por manĝado. Sed por vi ĝi estus tro malmulte, tial ni ne povas inviti vin matenmanĝi kun ni. *Adios, Camarada Jefe y adios a todos los capitanes y muchisimas gracias*. Havu ĉiuj bonan kaj gajan marŝon.“

El Profesor vokis Andreon al si kaj diris mallaŭte al li: „Vi atente aŭskultis, Andreo. Tio estas revolucio praktika. Ili

eĉ ne invitis nin al la matenmanĝo, kvankam ni tute ne havus tempon akcepti la inviton.“

„Kion vi celas pri revolucio praktika, El Profesor?“
demandis Andreo.

„La posedo kaj la propraĵo estas pli firme bazitaj ol antaŭe en tiu ĉi najbareco. Ŝanĝiĝis nur la nomo de la posedanto. Kaj mi povas diri al vi, *camarada*, ke morgaŭ aŭ postmorgaŭ la novaj posedantoj ĉi tie per siaj maĉetoj reciproke vundhakos sin, ĝuste pro la nova posedo, ĝis iu aŭ neniu postrestos por ĝoji pri la nova posedo. Tiu, kiu gajnis la revolveron, fariĝos verŝajne la nova patrono, kaj tiu, kiu havas la ŝrotfusilon, la nova *mayordomo*. Kaj tiuj, kiuj ankoraŭ postrestos denove estos peonoj.“

„Tiukaze la revolucio ĉi tie ja ne havis sencon.“

„Ĉi tie ne. Je tiuj homoj la revolucio estis tro facila kaj tro rapida. Tio neniam bonfartigas revoluciulojn. Ili ŝanĝis la agrojn kaj la porkojn. Sed tio, kio estas la plej grava, la ideoj, sur kiu la tuta sistemo estas starigita, tiujn ideojn ili ne ŝanĝis tie, eĉ ne tuŝis ilin, ja eĉ ne komprenis. La

sistemo restos la sama. Hieraŭ la mastro estis *don* Chucho, hodiaŭ Eusebio, morgaŭ Florencio. Ĉiam denove mastroj ĉeestas, kaj ĉar mastroj ĉeestas, tial ankaŭ ĉeestas servutuloj. Esence nenio ŝanĝiĝis tie. Ili havas eĉ ne vorteton da dankemo al ni, kvankam ni helpis al ili. Ili lasus malsatmorti vin aŭ min, nur por ke ili havu eĉ ne peceton da viando malpli por si mem.“

„Kiel la povraj *muchachos* povas scii tion pli bone, se neniu klarigas tion al ili?“ defendis Andreo la peonojn.

„Revolucio, kiu estas klarigenda kaj por kiu oni eble eĉ devas prezenti kaŭzojn ne estas revolucio, sed nur kverelo pri posedo kaj oficoj. La aŭtentika revolucio, kiu kapablas ŝanĝi sistemojn, sidas en la koro de aŭtentika revoluciulo. Aŭtentika revoluciulo ne pensas pri tio, kion li povus persone gajni per revolucio, ĉu estas ministra posteno ĉu urbestra oficeto ĉu neniigita konkura negocisto. La aŭtentika revoluciulo skuas la fundamenton de la sistemo, sub kiu li suferas kaj sub kiu li vidas suferi aliajn homojn. Li sin oferas kaj mortas por detrui la sistemfundamenton kaj realigi novajn ideojn.“

Andreo skuis la kapon kaj diris: „*Profesor*, tio ĉio tro kapturnigas min. Mi unue devus fariĝi profesoro tia, kia vi estas, antaŭ ol mi komprenus tion.“

„Ne afliktiĝu pri tio, Andreĉjo“, diris pri tio El Profesor, „vi kaj El General, El Coronel, Celso, la ino Modesta, Santiago, Matias, Fidel, Cirilo kaj ankoraŭ bona kvanto el ni estas la ĝustaj homoj, kiujn ni bezonas. Vi havas ĝin en la koro, kaj al tiu, kiu havas tion en la koro, al tiu oni ne devas klarigi ion.“

Jen subite kriis voĉo el malantaŭ la arboj: „He, ĉe l' diablo, kie estas El Profesor? Profesor! Ek, ni ekmarŝu!“

Estis El General, kiu vokis sian *comisario*-n al si.

„*Estoy*, jen mi, General!" diris El Profesor,
proksimiĝante.

„Kneĉe irante ni moviĝu antaŭen, *camarada*, tra la
malbenita ŝlimo ĉi tie. Ni devas iri al la antaŭtaĉmento.
La kompanio antaŭas jam konsiderindan distancon.“

„Mi ĵus parolis kun Andreo. Infero kaj diablo helpu al ni,
kiaj homoj estas tiaj? La peonojn mi celas. Morgaŭ ili
ekbuĉos sin reciproke, ĉar iu el ili postulos peceton da
tero pli ol la aliaj volas koncedi al li, aŭ tial, ĉar al iu peco
da tero plaĉos pli bone, sur kiu jam setlis ties najbaro.“

„Tio afliktu ne nin, *camarada* Profesor. Pri tiaj bagateloj
ni nun ne okupu nin. Ankaŭ por tio iam venos la tempo.“

„Prave, General. En la sekvaj semajnoj ni alfrontos pli
gravan.“

„Aha, bone divenite, *Comisario*, eble jam en la sekvaj

tagoj. Ni eksaltu ambaŭ, nur kuraĝe rekte knedire baraktante antaŭen, preter la ĝemantaj *muchachos*, por ke ni antaŭeniĝu. Ĉiam antaŭa estu antaŭe, Profesor, jen oni ne aŭdas tiom pri la ĉagrenetoj. Ju malpli oni atentigas ilin, *camarada*, des pli da konfido oni retenas por tio, ke revolucio ne nur kapablas ŝanĝi sistemon, sed eble ankaŭ forigi la mizeran fatrasan komercan avidon de la homoj.“

„De kie vi havas tion, General? Tion mi volonte ekscius.“

„Tion mi elpensis en la lasta nokto, post kiam la peonoj foriris kaj mi ekstere stumble ĉirkaŭiris la kampadejon kaj elfore vidis inter la arboj la brulantajn bivakfajrojn kaj tie kaj tie iom orekaptis de la centoj kaj centoj da paroloj kaj interparoloj, kiuj tie flirtis enaere. Mi fakte ne vere elpensis tion, sed ĝi tute per si mem trudiĝis al mi.“

„Bonege vi elpensis tion, General, tion oni povus bellitere kaj bone legeble surskribi, por ke ĝi ne perdiĝu.“

Kaj dum ili tiel interparolis, ili vadis fervore antaŭen, stumblante trans branĉojn, radikojn kaj ŝtonojn, tie kaj tie sinkante ĝis la genuoj en la tenacan ŝlimon de la

ĝangalo, denove malsekigite de la forta pluvo de l' nokto.

Frida, griza kaj akveca komenciĝis heziteme rampante la mateno kaj blovis mishumure kaj malbone dorminte ĉirkaŭ la kronojn de la praarbaraj gigantoj. Sed tie sur la pado en la densa arbustaĵo kaj sub la konfuze kunkreskinta foliarplena tegmento de la densejo, kiu eĉ ne tralasis iometon de la lante griziĝantaj nuboj, estis ankoraŭ tenebro.

La marŝantaj *muchachos* kaŭzis strangan monotonan bruadon per la kvaksimilaj suĉaj sonoj kaj la treniĝanta ŝprucado de la truoj kaj kanaletoj de la marĉa ŝlimo, en kiun la marŝantoj premadis kaj eltiradis siajn nudajn gambojn. Ili gruntis, grumblis kaj ĝemis, se ili subite pli profunde ol atendite sinkis ĝis la koksoj, kaj se moviĝis tiam ankoraŭ ĉe la plej eta ventspiro arboj kaj altaj arbustoj kaj tial verŝis abundan saluton de kolektiĝinta akvo el la foliaro sur la sube knedirante moviĝantaj *muchachos*.

El General kaj El Profesor, kvankam apenaŭ kapablaj rigardi antaŭen pro la tenebro kaj nur de tempo al tempo

nebule perceptante la ombrojn de la peze ŝarĝitaj homoj apud si, kiujn ili lasis post si, sciis per unu fojo, ke ili estas certe proksime de la antaŭkompanio, ĉar ili aŭdis krei la fortikan voĉon de Celso, kvazaŭ ĝi volus disŝiri la densejon en lignosplitaĵojn.

„Pedikohavaj indiĝenoj, jen tio, kio vi estas, vi estas ja la veraj fi-akompanantoj. Ribeluloj vi volas esti, ĉu? Merdo vi estas, hundofeko. Ne pli. Ribeluloj, ĉu? Ha! Ke mi ne krevu pro ridado! Ribeluloj, ĉu? Larmplorulinoj vi estas. Maljunaj ŝrumpiĝintaj inaĉoj. Jen tio, kio vi estas. Ĉu vi same tiel ĝemis, hurletis kaj plendadis, se vi sidis ĝiskole por la *patrones* en sterko kaj koto kaj merdo, kaj tiam ankoraŭ trenis la plej pezan mahagontrunkon kun vi? Jen vi, homlaŭsaj larmbuboj, eĉ ne pepis kontraŭvorton, neniue el vi malfermis la buŝaĉon, ĉiu unuopa el vi nur laboregis, kaj pli terure ol kvaropo de bovoj. Tio kompreneble estis por la diodamnitaj kaj putinavidaj *patrones* kaj *cabrones*. Kaj nun, kiam ĝi fine foje estas por vi mem, jen vi malfermŝiras la kotan buŝon eĉ ĝis viaj feltigitaj oreloboj jam tiukaze, se nur via plej malgranda piedfingro ĝis la taŭzita ungo ekestas en la malbenita

ŝlimo. Sakru pro mi de matene ĝis nokte, kiam vi malfermos viajn manĝopordegojn, sed ne hurletadu ĉi tie, se temas foje pri via propra ribelo. Vi konas min ja bone, ĉu eble ne? Vi konas ja miajn brakojn kaj pugnojn. Kaj tion mi diras al vi, diodamnitaj kaj pedikohavaj indiĝenoj, kiuj vi estas, se mi aŭdos hurleti vin ĉi tie ankoraŭfoje aŭ eĉ nur timeme tuseti, jen mi foje venos al vi por refreŝigo, por laŭorda. Ribeluloj. Ha! Ribeluloj. Ek do! Ĉe l' diablo! Kaj movu la stilzojn, antaŭen! Ek! Ek! Nur ne tiel timeme kaj heziteme.“

El Profesor kaj El General haltis.

„Vi elserĉis ja grandiozan generalstaban ĉefon, General. Pri li kaj via elekto vi povas fieri.“

„Mi efektive fieras.“

„Kiun rangon li nun havas?“

„*Teniente*, leŭtenanto.“

„Nur *teniente*, ĉu? Mi proponas, ke vi nomumu lin kapitano , *camarada* General.“

„Vi estas *comisario*, *camarada* Profesor, kaj ĉar vi rekomendis lin por la rangaltigo, bone, li estu nomumita kapitano.”

„*Muchas gracias, camarada!*”

„Sed jen venas en mian kapon, *camarada Comisario*, ke mi havas unu *coronel*-on, dek kapitanojn kaj kvindek leŭtenantojn. Kio nepre ankoraŭ mankas al mi, estas majoro. Kun via permeso, *camarada*, mi nomumos lin majoro hodiaŭ vespere en la kampadejo.“

El Profesor jam denove ekmarŝis. Kaj en la sama sekundo li stumblis pro larĝa arboradiko kaj falis laŭlonge etendiĝante en la ŝlimon. Kun la brakoj ĝis la kubutoj kaj kun la vizaĝo ĝis la oreloj li retroviĝis en la ŝlimo. Tio estis la kaŭzo, kial li ne povis respondi kaj tuj konfirmi la rangaltigon.

FINO

Glosaro

aceptado = akceptite

aguaceros = pluvelverŝiĝoj

aguardiente = brando

ahora = ĉe Traven „*ahoa*“ : nun, de nun

aleman = germano

alemanes = germanoj

amigo = amiko

amorcito mio = karulĉjo mia

arriero = mulisto, mulpelisto

arroyo = rivereta trafikstrateto, rojo

artesanos = metiistoj

Aŭtomatic = marko de revolvero

baĥajonteko = indiĝeno el regiono *Bachajón Celta*

barranca = ravino, tersulko

bebida = trinkaĵo

benkeroti = ne skribararo, sed E-vortludo el benko kaj roto, ĉar originale germane estas „*bankerott*“, sed devus esti „*bankrott*“.

benzoo = aroma rezino

bestia = besto

bodega = gardejo por vendaĵoj kiel nutraĵoj, kutime ne vendejo

botica = apoteko

boticario = apotekisto

boyero = bovpelisto, bovoservisto

bruja = sorĉistino

burro = azeno

caballo = Pferd

caballero = sinjoro, kavaliro, ĝentlemano, honorindulo

caballeros = sinjoroj, ĝentlemanoj, kavaliroj

cabildo = urbodomo, municipa sidejo aŭ municipa organizaĵo, ankaŭ carcerero

cabrón = fikulo, merdulo, virkapro, idioto ks

cabrones = virkaproj, fikuloj (kiel insultvorto)

cachito = La malgranda (frato) en la kunteksto

cachupines = hispanoj, hidalgoj

cafetales = kafplantaĵoj

caja = kesto, ĉerko

campecito = kuntekste 'senarbejo'

campesinos = kamparanoj

cañe = alhoholaĵo

cantina = kantino

caoba = mahagono

capataz = subestro, skipestro, gvidanto de laborgrupo, kontrolisto, inspektisto

caray = fulmotondro

carretera = ĉarostrato

cayucos = kanuoj

cayuqero = kanuisto, trunkboatisto, kanuveturigisto

cementerio = tombejo

centavo = nikela monero

chamulito = chamulano, ano el Chamula

chipichipi = pluveto

choza = kabano

ciudad = urbo

cocilo = tsotsilo, ano de indiĝena tribo en Meksiko, ekz. en Ĉiapaso

Comandancia de Policia = Polica komandejo, policejo

compadre = baptopatro, amiko, kunulo, kamarado

compañia = kompanio

comisario = komisaro

confiador = garantiulo

Con su permiso, Doctorcito! = Kun via permeso, kuracistĉjo!

contratista = kontraktisto

copita = brandoglaseto, glaseto por brando ks.

coronel = kolonelo

corre = kuregu!

creolina = kontraŭinsekta likvaĵo, ankaŭ uzita por mortigi pulojn sur hundoj

criada = servknabino

cura = pastro

curas = pastroj

dinero en efectivo = kontanta mono

diputado = deputito, parlamentano

don = titolo por vira antaŭnomo

doña = titolo por ina antaŭnomo

duro = kvinpesa monero

El Caudillo = la gvidanto

El Faldon = la basko

El Guapo = la belulo

enganchador = varbisto por la laborkontraktoj

federales = federaciaj trupoj

fiesta = festo, sed en la libro eŭfemismo por kruela

pendumado

finca = bieno

finquero = bienulo, bienposedanto, mastro de bieno

flojos = pigruloj

frijoles = faboj, fazeoloj

golfos = fivagabondoj, stratbuboj, friponoj

gracias = dankon

hacha = hakilo

hachero = hakisto

hamako = ŝnura reto aŭ tolaĵo, horizontale pendigita per
siaj du ekstremaĵoj kaj formanta porteban liton en kiu oni

kuŝas, aŭ sin balancas

hasta luego = ĝis baldaŭ

Hennessy = viskiomarko

hermanito = frateto

hijito = fileto, filĉjo

hombres = homoj, viroj

ĥorongo = jorongo = lankovrilo ĉiam kun enmeza
entranĉaĵo por la kapo, uzata kiel mantelo, similas al la
sudamerika „ponĉo“

iguana = leguano

jacal = kabano

jacalito = kabaneto

jefe = ĉefo

Jefe Politico = la politika ĉefo de distrikto

jorongo = ĥorongo = ponĉo

Jovel = oficiale kaj hispanlingve San Cristobál, pli ofte uzate
de la celtaloj kaj cociloj

kaciko = indiĝena vilaĝestro, tribestro, kuntekste
eŭfemisme uzata por El Porfirio

konstipo = malfacilo feki

ladino = mestizo, ido de blankuloj kaj indiĝenoj, en Ĉiapaso
uzate specife por diferencigi ne-indiĝenojn kaj indiĝenojn,
do blankulojn de indiĝenoj

La Mecha = la meĉo, en la romano nomo de *capataz*

leŭgo = hispana mejlo = mezurunuo de distancoj, surtere
5555 m-ojn

Made in Germany = produktita en Germanio

manito mio = frateto mia

mayordomo = administranto

mestizo = vidu ĉe ladino

mecate = ŝnuro, lazo

milpa = kultivita terpeco, agro, sur kiu oni plantas ekz.

maizon, fabojn kaj kukurbojn

mi vida = koramata mia

mocha = piulino

montería = monterio: Laborkoncentrejoj en la ĝangalo, kie oni dehakas kaj prilaboras permane la mahagonarbojn, por povi fortransporti ilin de tie. Tiu laboro per maŝinoj pro la altaj kostoj ne fareblas.

muchacha = knabino, junulino, kamaradino

muchachos = knaboj, junuloj, kamaradoj

muy bien = tre bone

mujer = edzino, vivkunulino

Municipalidad = municipo aŭ municipio, urbodomo, komunuma administrejo, urbo aŭ teritorio havanta relative sendependan registaron

niños = infanoj

No, Jefecito, nadie = Ne ĉefĉjo, bedaŭrinde

nuevo = nova

oficinas = burooj, administrejo

ola = interjekcio de entuziasmo

orito = *señorito*, mastreto, ĉefĉjo

oye = Ho ve

palo = bastono

paraje = ripozejo, loko, ejo

partera = akuŝistino

patache = kuntekste: karavano, ekspedado

patroncito = ĉefĉjo, patroneto, patronĉjo

patrono = sanktulo aŭ ĉefo

Pero, por el amor de Dios = Sed, pro la amo de Dio

peso = monunuo en Meksiko

petate = petato = specifa mato el palmfolioj

Por Dios = pro Dio

por favor = bonvolu

posol aŭ *potzol* = posolo, trinkaĵo el fermentita maizo en Ĉiapaso

post mortem = post la morto

profesoro = instruisto, helpinstruisto ktp.

pueblo = setlejo de indiĝenoj

Que chinguen matricula! = Fiku viajn patrinojn!

ranchito = malgranda ranĉo, malgranda bieno

realo = dudek kvin centavoj

regular = ne malbone, laŭkutime

rurales = *Guardia Rural*, sub diktatoro Porfirio Diaz

federacia rura kavaleria kaj ĝendarma polico, neregularaj helptrupoj

salvajes = sovaĝuloj

Sanctum (latina) = sanktejo, templo

seguro = certe

selva = praarbaro, sovaĝejo, ĝangalo

señor = sinjoro

señorita = fraŭlino

su humilde servidor = Je via humila servo

tate = patro (indiĝena vorto)

tienda = vendejo

tonelada = metra tuno = en Hispanio 20 quintales = 80

arrobas

totopostle = granda tortiljo, rostita maizoflano el muelitaj kaj kaĉigitaj maizograjnoj, maizaj kukoj, maizaj panetoj kun diametro de 35 centimetroj kaj du milimetrojn alta.

tumbo = la loko, kie la trunkoj estas suramasigitaj ĝis komenciĝos la pluvotempo kaj sin pleniĝos la *arroyos* (la sekaj sulkoj de rivereto) per alta akvo kaj la trunkoj tiam povos drivi aŭ flosi ĝis la transporta riverego

Un abrazo = unu ĉirkaŭbrako

Vuelo, doctorcito = Mi flugas, kuracistĉjo

Yassuh = Jes, Siro

y algo prontito = Kaj rapidu iom

zocalo (Meksiko) = la ĉefplaco